



Bonan tagon, kolego! Jes, en nia aŭto-buso, vojaĝonta en Esperanto-lando, estas unu libera loko. Kion ni faros dum la vojaĝo? Ni konatiĝos kun la historio, kulturo, vidindaĵoj de tiu belega lando, kun ĝiaj plej interesaj homoj. Kaj ni tiel profunde studos ĝian lingvon, ke vi povos fariĝi civitano de tiu lando, kiu ne estas sur la geografia karto. Mi diros al vi sekreton: se vi montros vin interesigema, laborema kaj kapabla, ĉe la fino de nia vojaĝo vi, eble, eĉ ricevos propran pecon de tero sur la plej alta monto de tiu lando - Verda Parnaso. Okupu do la lokon, kolego, kaj vojaĝu kun ni! Ek!

Eldonejo «Progreso»

Boris Kolker • Vojaĝo en Esperanto-lando



Boris Kolker

VOJAĜO
en
ESPERANTO-
LANDO

Perfektiga
kurso
de
Esperanto

Boris Kolker

VOJAGŔO
en
ESPERANTO -
LANDO

Perfektiga
kurso
de
Esperanto



Moskvo
Eldona grupo «Progress»
«Junior»
1992

Борис Колкер
Путешествие в Эсперантиду.
Повышенный курс языка эсперанто

На языке эсперанто

Redaktis V. Arolovič, A. Ševčenko

К 4602020500-114 280-91
014(01)-92

ISBN 5-01-002953-7

© Eldonejo "Progreso", 1992

ANTAŬPAROLO

Bonan tagon, kolego! Jes, en nia aŭtobuso, vojaĝonta en Esperanto-lando, estas unu libera loko. Kion ni faros dum la vojaĝo? Ni konatiĝos kun la historio, kulturo, vidindaĵoj de tiu belega lando, kun ĝiaj plej interesaj homoj. Kaj ni tiel profunde studos ĝian lingvon, ke vi povos fariĝi civitano de tiu lando, kiu ne estas sur la geografia karto. Mi diros al vi sekreton: se vi montros vin interesiĝema, laborema kaj kapabla, ĉe la fino de nia vojaĝo vi, eble, eĉ ricevos propran pecon da tero sur la plej alta monto de tiu lando — Verda Parnaso. Okupu do la lokon, kolego, kaj vojaĝu kun ni! Ek!

Kara leganto! Vi tenas en la manoj unikan libron, kiu celas:

— profundigi vian konon de Esperanto ĝis tia grado, ke vi povos ne nur libere legi ajnan libron, sed ankaŭ verki bonstile;

— enkonduki vin en Esperanto-literaturon kaj pli vaste — en Esperanto-kulturon;

— montri al vi laboron de modela Esperanto-klubo;

— pliriĉigi viajn ĝeneralajn konojn.

Certe, unu libro ne povas enhavi ĉion. Aliflanke, mi estos feliĉa, se vi ne trovos en ĝi enuon kaj banalecon.

La libro estas verkita kvazaŭ taglibro de ideala Esperanto-klubo, en kiu vi renkontiĝos kun steloj de Esperanto-kulturo kaj ankaŭ kun (dume) malpli konataj esperantistoj.

La tekstoj plejparte estas originale verkitaj en Esperanto kaj jam ie publikigitaj. Principe, ili estas prenitaj senŝanĝe, kvankam ofte ili estas mallongigitaj ĝis amplekso, akceptebla por instruaj celoj. Nur kelkfoje estas faritaj tute etaj ŝanĝoj por klarigi ne sufiĉe klarajn lokojn.

La ĉefa materialo de la libro estas la tekstoj, kiuj estas nepre legendaj. Unue legu la tekston kaj penu kompreni la ĝeneralan sencon tute ne uzante vortaron. Poste relegu ĝin, denove ne rigardante en vortaron, kaj penu kompreni ĝin laŭeble detale: a) per konjekto pri la

senco de novaj vortoj laŭ iliaj vortpartoj kaj per komparo de novaj vortoj kun nacilingvaj vortoj, b) per ĝenerala kompreno de la frazo kaj per kunteksto. Ankoraŭfoje tralegu la tekston, uzante la vortaron, por kompreni ĉiujn detalojn. Kaj tralegu la tekston lasfoje, denove sen helpo de vortaro, kaj konvinkigu, ke ne restis neklaraj lokoj.

En la lernolibro estas uzitaj diversaj tipoj de ekzercoj. Se la instruisto sentas, ke en iuj lecionoj estas donitaj ne sufiĉe da ekzercoj, li povas facile ilin multigi, preninte el aliaj lecionoj ekzercojn de tiuj tipoj, kiuj ne estas uzitaj en la studata leciono. Aliflanke, ne estas nepre necese plenumi ĉiujn ekzercojn.

Estas supozate, ke la leganto (studento) bone konas bazan kurson de Esperanto, ekzemple, mian libron: Boris Kolker. Uĉebnik jazika Esperanto. Osnovnoj kurs. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Baza kurso). Sed fakte ne gravas, per kiu lernolibro vi studis la bazan kurson.

La lernolibro estas uzebla por memstara, koresponda kaj klasa uzado. En ajna okazo helpo de spertaj lingvo-parolantoj estas dezirinda.

Mi esperas, ke vi povos ĉerpi el tiu ĉi libro ne nur novajn konojn, sed ankaŭ inspiron kaj entuziasmon.

Dum la laboro pri ĉi tiu libro pluraj personoj diversmaniere helpis min, pro kio mi ilin kore dankas. Mi ne povas ne mencii laŭnome kelkajn personojn: Viktor Aroloviĉ, Nina Cvileneva, Sergej Derevjanniĥ, Stanislav Galkin, Nina Korĵenevskaja, Johannes Palu, Jerzy Uspienski.

Mi estos ĝoja ricevi de vi, kara leganto kaj kolego, viajn demandojn, rimarkojn, proponojn, konsilojn laŭ la adreso: Boris Kolker, ab. jaŝ. 1125, RUS-450000 Ufa, Rusia Federacio.

LECIONO 1

— Karaj membroj de la Esperanto-klubo! Hodiaŭ, la 7-an de januaro, ni renkontiĝas unuafoje en la nova jaro. Laŭ la decido de la kluba estraro, la kunvenoj ĉi-jare okazos en merkredoj: unu kunveno estos dediĉata al prelegoj, konatiĝo kun la Esperanto-literaturo kaj lingva praktiko, la alia — al alispecaj aranĝoj, kaj tiel plu.

— Nin ĉiujn tre interesas la renovigo kaj rekonstruo de nia socio, kion ni nomas per la vorto “perestrojko”. Pri tio parolos la konata socia aganto, ĵurnalisto kaj poeto Vitalio Korotič.

PERESTROJKO ESTAS REVENO AL LA NORMO

Tio, kio nun okazas en nia lando — temas pri la perestrojko — estas granda patriota¹ afero. Ja, la patriotismo estas ne nur fiero, sed ankaŭ ekonomie normala vivo. Nepre ne necesas disdividi fieron pri heroaĵoj de la antaŭuloj kaj aspiron al sata kaj riĉa vivo.

Malgraŭ ĉio, ŝajnas al mi, ke nia lando povas esti gravega fonto de optimismo por la homaro. Post ĉio, kion oni faris kun ni, tamen restis en ni grandega rezervo de spiriteco kaj honesto. La homo kredas je sia praveco, li pravas, estas ekzilata, kaj li, spite al ĉio, kredas kaj pravas... Ni rememoru pri la mirinda civitano Andreo Saĥarov². Estas bonege, ke ni kapablis konservi tion.

Ni revenas al la normala vivo; nun necesas kompreni, ke la perestrojko estas trasuferita reveno al la normo. Ni admiras, ke iu eldonis verkojn de Nabokov³ aŭ de Pasternak⁴. Sed nenio ĉi tie estas admiranda, tio estas normala ago! Tiu, kiu malpermesis eldoni ilin siatempe, efektive estis “heroo”. Sed ni estas normalaj homoj. Estas ĉagrene, ke ni vivas kun ia misformita psiko, kun misformitaj kriterioj enkreskintaj en nin.

Mi elpensis formulon, kiun mi kelkfoje diris en Okcidento. Ĝi ŝajnas al mi ĝusta. “En la jaro 1917 ni havis revolucion, kaj ties rezultojn vi utiligis plen-

mezure. La revolucio ŝanĝis la rilatojn inter la laboristoj kaj la labordonantoj. Dreiser⁵ diris en la 30-aj jaroj, ke por senlaborula subvencio la usonaj laboristoj devas danki al la Rusia revolucio. Tiu revolucio neniigis la kolonian sistemon. La sola lando, kiu ne utiligis ĝiajn rezultojn — estas ni”.

Estas komplike ŝanĝi la staton, sed tio estas ebla. Ni multon donis al la homaro. Ni estis kobajoj⁶ de la progreso, nun estas la tempo transiri de eksperimentoj al agoj. La kapitalismo multon lernis de ni, nun ni lernu de ili, ni lernu de ĉiuj — nenio timinda. Ja en nia orgojlo ni ĉesis esti patriotoj. Ni prenu la plej bonan el la sperto de la homaro kaj ni rekonstruu la vivon. Ja ni ĉiuj timigas unu la alian per neimageblaj danĝeroj, ne komprenante, ke “pli malbone” jam estis.

Dum longa tempo ĉe ni regis idealo de mezepoko. Ni asertis, ke honesta mizerulo estas la plej bona civitano. Tio estas monstraĵo. En 1917 ni metis finon al riĉuloj, nun ni devas fari tiel, ke ne estu malriĉuloj. Kaj pleje gravas, ke ne estu malriĉuloj en spirito.

Vitalij Korotič. Perestrojka — eto vozvraŝĉenije k norme // Sovetskij patriot, 1990, N^o 1, p. 6.
Mallongigita traduko de fragmento.

— Dankon, Vitalij Aleksejeviĉ, pro tio ke vi venis kaj esprimis viajn pensojn pri tiu gravega problemo. La perestrojko tuŝas la tutan socion, interalie ankaŭ la Esperanto-movadon, pri kio ni ankoraŭ parolos en la klubo.

— Nun ni konatiĝu kun la historio de la apero de Esperanto. Ludoviko Zamenhof priskribis ĝin en ruslingva letero al Borovko⁷, kiu, verŝajne, devis esti publikigita en iu ruslingva gazeto. La Esperanta traduko, kiun faris Gernet⁸, aperis en 1896.

Ludoviko Zamenhof

KIEL NASKIĜIS ESPERANTO

La ideo, al kies efektivigo mi dediĉis tutan mian vivon, aperis ĉe mi en la plej frua infaneco kaj neniam min forlasadis.

Mi naskiĝis en Bjelostoko⁹. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj¹⁰; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tiu urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke diverseco de lingvoj estas la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion.

Iom post iom mi konvinkiĝis, ke ne ĉio fariĝas tiel facile, kiel prezentigas al la infano; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Sufiĉe frue ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj. Kaj mi komencis malklare revii pri nova, arta lingvo.

Germanan kaj francan lingvojn mi ellernadis¹¹ en infaneco. Sed kiam mi komencis ellernadi¹¹ lingvon anglan, la simpleco de la angla gramatiko ĵetiĝis en miajn okulojn, precipe dank’ al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj latina kaj greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Sed la grandegaj¹² vortaroj ĉiam ankoraŭ ne lasadis min trankvila.

Unu fojon, mi okaze turnis la atenton al la surskribo “Ŝvejcarskaja” (pordistejo) kaj poste al la elpendaĵo “Konditorskaja”¹³ (sukeraĵejo)¹⁴. Tiu ĉi “skaja” ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne

devas aparte ellernadi¹¹. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegulajn¹² vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.

Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante tiun ĉi grandegon per unu sufikso, kiu signifas certan rilaton. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan¹⁵ la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron. Mi rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj jam vortoj internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia, — kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiama “lingwe uniwersala” kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en 8-a klaso de la gimnazio). La plimulto da¹⁶ ili estis forlogitaj de la ideo kaj de la frapinta ilin neordinara facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin ellernadi¹¹. La 5-an de decembro 1878 ni ĉiuj kune festis la sanktigon de la lingvo¹⁷.

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Mi estis tiam tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5-6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Mi komencis evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte pensi en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro kaj komencis serĉi eldonanton. Sed tie ĉi mi

renkontis la finan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887.

Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je “flankaj aferoj”; mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon, kaj ... mi transiris Rubikonon¹⁸.

L.L. Zamenhof. Tamen la afero progresas! (Plena verkaro de Zamenhof, kajero 4). — Kioto, 1975, p. 27-35. Mallongigita.

— Kaj nun ni konatiĝu kun alia historio pri la apero de Esperanto, kiun gaje kaj sprite, en biblia stilo, rakontis Izrael Lejzerowicz /Lejzeroviĉ/ (1901-1944). Li estis mortigita en Pollando dum la Dua mondmilito.

Izrael Lejzerowicz

EL LA “VERDA¹⁹ BIBLIO”

En la komenco la Senkorpa Mistero²⁰ kreis Volapukon²¹. Kaj Volapuk estis senforma kaj kaosa, kaj mallumo estis en ĝi. Kaj la Senkorpa Mistero diris: Estu lumo! Kaj fariĝis Esperanto. Kaj la Spirito vidis Esperanton, ke ĝi estas bona: kaj la Spirito apartigis Esperanton de Volapuk. Kaj la Spirito nomis Esperanton Eterna Tago, kaj Volapukon nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno — unu tago²².

Kaj la Spirito diris: Estu firmaĵo en la lingvo. Kaj la Spirito kreis tiun firmaĵon. Kaj Li nomis la firmaĵon


regula akcento. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago.



Kaj la Spirito diris: Kolektiĝu la reguloj gramatikaj en unu lokon, kaj aperu la firma grundo; kaj fariĝis tiel. Kaj la Spirito nomis la firman grundon Fundamento²³. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. Kaj la Spirito diris: la Fundamento kreskigu verdajon¹⁹, kiu naskas ĝojon: vortaron, kiu donas laŭ sia speco radikojn, kies semoj estas en ĝi mem, en la Fundamento²⁴. Kaj fariĝis tiel. Kaj la Fundamento elkreskigis verdajojn¹⁹, laŭ sia speco: verdan lingvon¹⁹ kaj verdan movadon¹⁹, vortaron kaj arbon, kiu havas radikojn, kies semo estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la tria tago.

Kaj la Spirito diris: Estu lumaĵo en la ĉiela firmaĵo, por apartigi Esperanton de mallumo. Kaj ĝi estu lumaĵo por lumi super la tero; kaj fariĝis tiel. Kaj la Spirito faris la grandan lumaĵon por regi la mondon. Kaj la Spirito starigis ĝin sur la ĉiela firmaĵo, por ke ĝi lumu sur la teron. Kaj la Spirito nomis la lumaĵon Verda

Stelo¹⁹. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvara tago.



Kaj la Spirito diris: la vortaro aperigu moviĝantaĵon, vivajn estaĵojn kiuj fleksebligas la Lingvon. Kaj la Spirito kreis afiksojn, kiujn aperigis la vortaro²⁵, la sufiksojn kaj prefiksojn laŭ ilia speco. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. Kaj la Spirito benis ilin dirante: Fruktu kaj multigu, kaj plenu la vortaron. (Kaj tial afiksoj tiel multiĝas ĝis nun)²⁶. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvina tago.

Kaj la Spirito diris: La vortaro aperigu vivajn estaĵojn, brutojn kaj vermojn. Kaj la Spirito kreis la neologismojn²⁷ kaj ĉiujn malfacilajn vortojn, laŭ ilia speco, por eterna turmento de la novaj verduloj¹⁹. Kaj la Spirito diris: Ni kreu potencon aferon, kiu respegulos nian internan potencon; kaj ĝi estu la akso de la lingvo kaj ĝi regu ĝian gramatikon. Kaj la Spirito kreis la Akuzativon; en formo de la finaĵo -N Li kreis ĝin²⁸.

Kaj la Spirito diris: Fruktu kaj multiĝu kaj plenigu la verdan lingvon¹⁹ kaj regu super ĉiuj ceteraj reguloj de la Fundamento. (Kaj de post tiam ĉiuj verduloj¹⁹ uzas la akuzativon en troa abundo)²⁸. Kaj la Spirito diris: Jen Mi donis al vi ĉiujn regulojn de la Fundamento. Ĝi estu por vi sanktaĵo²³. Kaj fariĝis tiel. Kaj la Spirito rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.

Kaj estis finitaj la Fundamento kaj Radikaro kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj. Kaj la Spirito finis en la sepa tago sian laboron, kiun li faris, kaj li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun li faris. Kaj la Spirito benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis, legante la originalan literaturon²⁹, kiun li faris kreante.

I. Lejzerowicz. El la "Verda Biblio". — Budapest, 1978, p. 5-8. Fragmento.

— Ĝi estas efektive tre amuza kaj instrua historio. La simileco de la senco, formo kaj stilo inter la vera kaj verda Biblio estas admirinda.

— Fine ni konatiĝu kun versaĵo de la poeto Vasilij Eroŝenko, pri kies legendeca vivo ni parolos iom pli malfrue³⁰.

Vasilij Eroŝenko

HOMARANO³¹

Ekbruligis mi fajron en kor',
Ĝin estingos nenia perfort'³²;
Ekflamigis mi flamon en brust',
Ĝin ne povos estingi eĉ mort'.
Brulos fajr' ĝis³³ mi vivos en mond',
Flamos flam' ĝis³³ ekzistos la ter'.
Nom' de l' fajr' estas am' al homar',
Nom' de l' flam' estas am' al liber'.

V. Eroŝenko. Lumo kaj ombro. — Toyonaka, 1979, p. 19.

— Sekvamerkrede, la 14-an de januaro, ni vidos kinofilmon pri Kubo, kiun faris niaj klubanoj dum la 75-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano. Vi povos konvinkiĝi, ke pravis Kristoforo Kolumbo, malkovrinto de Ameriko: "La lando plej bela, kiun homaj okuloj vidis". Poste funkcios tradukista kurso. Okazos lernado de novaj Esperantaj kantoj.

— Fine de tiu ĉi kunveno okazos la tradicia "lingva praktiko".

KOMENTARO

1. Patriota — rilata al patrioto aŭ al patriotismo.
2. Saŝarov Andrej Dmitrijeviĉ (1921-1989) — unu el la plej grandaj fizikistoj de la 20-a jarcento, akademi-ano, Nobel-premiito pri paco. Pro sia batalado por la homaj rajtoj, li havis multe da malagrablaĵoj. Legu pri li tekston en la leciono 25.
3. Nabokov Vladimir Vladimiroviĉ (1899-1977) — rusa-usona verkisto, kies libroj ekaperis en Sovet-Unio nur fine de la 80-aj jaroj.
4. Pasternak Boris Leonidoviĉ (1899-1977) — rusa sovetia poeto, aŭtoro de la fama romano "Doktoro Ĵivago". Pro tio ke li ricevis Nobel-premion pri literaturo, li estis eligita el la Unio de verkistoj de USSR kaj dum multaj jaroj liaj verkoj preskaŭ ne estis publikigataj en Sovet-Unio.
5. Theodore Dreiser /Téodor Drájer/ (1871-1945) — usona verkisto.
6. Kobajoj estas bestetoj, uzataj en medicinaj eksperimentoj.
7. Borovko Nikolaj Afrikanoviĉ (1863-1913) — pioniro de Esperanto, lernis la lingvon en 1889 en Odeso.
8. Gernet Vladimir Aleksandroviĉ (1870-1929) — pioniro de Esperanto, lernis la lingvon en 1890 en Odeso, eldonis la gazeton "Lingvo internacia".
9. Prefere: Belostoko. La urbo tiam troviĝis en Ruslando, nun ĝi apartenas al Pollando.
10. Hebreoj — popolo, kiu loĝas nun grandparte en Israelo kaj ekster ĝi — precipe en Eŭropo kaj Ameriko.

11. Anstataŭ "ellernadi" nun oni preferas la simplan formon "lerni".

12. Anstataŭ "grandegulaj" oni preferas "gigantaj".

13. Tio okazis, verŝajne, en 1876. Sed tiutempa vortaro de la rusa lingvo de Vladimir Dal donas la formon "konditerskaja", kiu estas uzata ankaŭ en la moderna rusa lingvo.

14. Prefere: dolĉaĵejo.

15. skribitaj.

16. el.

17. En 1968 en Moskvo aperis ruslingva libro de Ermar Svadost "Kiel estiĝos universala lingvo?" kun tri redaktoroj: Eŭgeno Bokarjov (esperantisto), Mikaelo Kammari (kontraŭesperantisto) kaj Aleksandro Spirkin (neŭtralulo). La aŭtoro montris sin arda adepto de la ideo de artefarita lingvo, same kiel arda kontraŭesperantisto. Demandita, kial li allasis en la libro tiom da maljustaĵoj kontraŭ Esperanto, Bokarjov ridete diris, ke tamen li atingis forigon de kelkaj maljustaĵoj, ekzemple, de tia frazo: "Kiam la gimnaziano Ludoviko Zamenhof finis sian projekton de internacia lingvo, li kunvenigis siajn amikojn kaj aranĝis komunan drinkadon".

18. akceptis senrevenan decidon.

19. La verda koloro simbolas la esperon kaj, sekve, Esperanton.

20. Aludo al la versaĵo de Zamenhof "Preĝo sub la verda standardo".

21. Volapük (Volapuko) — projekto de internacia lingvo, kun misformitaj kaj nerekoneblaj vortoj, kreita en 1879 de J.M. Schleyer /Šlájjer/ (1831-1912). En multaj lingvoj la vorto "Volapük" akiris la kromsignifon "aro da nekompreneblaj vortoj".

22. Komparu la fragmenton el "La Sankta Biblio" en traduko de Zamenhof: "Kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo. Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estas bona; kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo. Kaj Dio nomis la lumon Tago, kaj la mallumon Li nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, unu tago".

23. "Fundamento de Esperanto" — verko eldonita de Zamenhof en 1905; konsistas el kvar partoj: Antaŭparolo, Gramatiko el 16 reguloj, Ekzercaro kaj

Universala Vortaro, En la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo (1905), la "Fundamento" estis akceptita kiel netuŝebla bazo de Esperanto, en kiu neniu rajtis fari kian ajn ŝanĝon.

24. La Universala Vortaro entenas vortojn en formo de iliaj radikoj, kiuj ebligas krei multege da novaj vortoj.

25. Krom radikoj, la Universala Vortaro entenas ankaŭ afiksojn, kiuj estas tre gravaj por la evoluo de la lingvo; vidu pri tio la tekston "La afiksoj de Esperanto" (leciono 6).

26. Post la publikigo de la "Fundamento" estis proponitaj multaj novaj afiksoj. Nur kelkaj el ili iĝis oficialaj.

27. Neologismo — nova (ofte neoficialigita) vorto en Esperanto.

28. La akuzativo ebligas liberan ordon de la frazo. Sed ĉar en multaj lingvoj ĝi ne ekzistas, la komencantoj ofte ne sufiĉe uzas ĝin (kio estas eraro) aŭ tro uzas ĝin (kio estas erarego).

29. kompreneble, en Esperanto.

30. en la leciono 20.

31. "La vorto *homarano* signifas *membro de la homa familio*" (Zamenhof).

32. Perforto — uzo de fizika forto, kiel rimedo trudi sian volon.

33. Prefere: dum.

LINGVA PRAKTIKO

Perestrojko estas reveno al la normo

1. Por ĉiu alineo de la teksto trovi frazon aŭ parton de frazo (eblas iomete ŝanĝi ĝin), kiu povas esti ĝia titolo. Numeru la titolojn, tiel ke ili formu planon de la teksto.

2. Kion signifas la esprimo: *Ni estis kobajoj de la progreso?*

3. Kiuj homoj, laŭ via opinio, estas malriĉaj en spirito?

4. Ĉu vi konsentas kun la formulo de la aŭtoro? Kial? Donu viajn ekzemplojn.

5. Kiun rilaton havas la aŭtoro al la prezentata problemoj?

6. Kion vi opinias pri la perestrojko en la socio? Ĉu, laŭ via opinio, la perestrojko havas kontraŭulojn? Se jes, kiuj ili estas kaj kial ili kontraŭas ĝin?

7. Ĉu vi opinias, ke ankaŭ la Esperanto-mondo bezonas perestrojkon? Se ne, kial? Se jes, do en kio unuavice?

Kiel naskiĝis Esperanto

8. La teksto estas verkita en la unua persono (*Mi naskiĝis...*, *mi konvinkiĝis...*, *mi rimarkis...*). Mallonge rerakontu la ĉefan enhavon de la teksto en la tria persono (*Zamenhof naskiĝis...*, *li konvinkiĝis...*, *li rimarkis...*), foriginte detalojn.

9. Kion signifas la esprimoj: *La vortaroj komencis rapide malgrandiĝadi antaŭ miaj okuloj kaj Mi subite eksentis la teron sub la piedoj?*

10. Kial la gramatiko de Esperanto estas malgranda kompare kun la gramatikoj de la "naturaj" lingvoj? Ĉu la malgrandeco de la Esperanta gramatiko malriĉigas la lingvon?

11. Kial multaj Esperantaj vortoj estas kompreneblaj por eŭropanoj sen antaŭstudo?

El la "Verda Biblio"

12. Diru, ĉiufoje per unu frazo, kion faris la Spirito en ĉiu el la sep tagoj?

13. Trovu en la teksto terminojn de lingvoscienco.

Homarano

14. Kiu estas la ideo de la versaĵo?

15. Trovu la liniojn, en kiuj temas pri fajro; kaj la liniojn, en kiuj temas pri flamo.

16. Klarigu en Esperanto, kion signifas la subaj vortoj (ekzemple: *misskribo* — erara skribo, *miskompreni* — malĝuste kompreni):

Misaserti, misaŭdi, misfonto, misformi, misnormo, mispaŝo, miskriterio, mistero, misfrapi, misprononco, misuzi.

17. Finu la frazojn:

Amu domon novan kaj amikon Eĉ la plej nigra bovino donas lakton nur... . En arbaro li sidis kaj arbaron ne... . En sia propra domo ĉiu estas granda... . Kia demando, tia Malsato ne estas Unua venis, unua Se vi pri ĉio informiĝos, vi baldaŭ

18. Elpensu laŭeble multe da esprimoj, en kiuj la vorto verda havas nerektan senceon (ekzemple: *verda patrioto*, *verda broŝuro* ktp).

19. Ni prenu la frazon: *Patriotismo estas ne nur fiero, sed ankaŭ ekonomie normala vivo.*

Jen ĝia modelo: *...o estas ne nur ...o, sed ankaŭ ...e ...a ...o.*

Laŭ tiu modelo elpensu unu aŭ kelkajn frazojn.

20. Oni povas fari en frazo diversajn transformojn, ekzemple: *Mi forĵetadis el la vortaro vortojn, anstataŭigante (kaj anstataŭigis, mi anstataŭigis, por anstataŭigi) ilin (cele al anstataŭigo de ili) per unu sufikso.*

Faru similajn transformojn en la frazo: *Mi komencis evitadi laŭvortajn tradukojn, penante pensi rekte en la nova lingvo.*

Elpensu similan frazon kaj faru en ĝi similajn kaj aliajn transformojn.

21. Temo por diskuto aŭ rakonto: Kion vi semas, tion vi rikoltos.

22. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) En kiu urbo naskiĝis Ludoviko Zamenhof?

b) En kiu jaro estis preta la lingvoprojekto Lingwe uniwersala?

c) Kiu estas la aŭtoro de la libro *El la "Verda Biblio"* ?

ĉ) Kio estas Volapük? Kiu estis ĝia kreinto? Kiam ĝi aperis?

- d) Kio estas la “Fundamento de Esperanto”? Kiam ĝi aperis? Por kio ĝi servas?
e) Kio estas simbolo de Esperanto?
f) Nomu elstarajn Esperanto-pionirojn el Odeso.

LECIONO 2

— Karaj klubanoj! Esperantistoj, same kiel ĉiuj homoj, havas diversajn hobiajn. Unu el la plej disvastigitaj hobiaj estas kolektado. Ŝajnas, ke preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas en ioma grado filatelistoj. Aliflanke, multaj filatelistoj uzas Esperanton por la internacia korespondado kaj interŝanĝo. Pri tiu temo al ni hodiaŭ parolos sperta esperantisto kaj filatelisto Johano Palu.

FILATELO SIGNIFAS AMIKECON

La fama usona verkisto Mark Twain¹ diris iam, ke “ĉiu inteligenta homo devas kolekti ion, krom mono”. Kaj homoj kolektas vere tre diversajn objektojn: poŝtkartojn, alumet-etikedojn, kalendaretojn, fotojn de aktoroj, insignojn, librojn, pentraĵojn, monerojn, tasojn, sed ankaŭ ordenojn, kostumojn, aŭtomobilojn, tramvagonojn ktp.


Oni nomas *filatelisto* la homon, kiu kun plezuro kaj kun scio, kun intereso kaj kun faka kono kolektas poŝtmarkojn, stampojn, kovertojn.

Por inteligenta homo, kiu deziras scii multon, ĝuste poŝtmarko estas unu el tiaj objektoj, kiuj portas al li abunde da novaĵoj. Kiam vi ricevas leteron, ĉu vi turnas iom da atento al la koverto kaj al la poŝtmarko sur ĝi? Se *ne*, vi perdas multon!

Nepre rigardu la poŝtmarkon sur la koverto de la ricevita letero. Ĝi rakontos al vi pri siaj lando kaj popolo, pri la kulturo, naturo, historio kaj tekniko en la lando, de kie venis la letero. Vi devas nur povi legi la sciigojn. *Tio* estas filatelo, la arto kompreni la poŝtmarkojn.


Ankaŭ tiam, kiam la letero estas enlanda, ne forjetu la kovertojn kun poŝtmarko, ne rigardinte ĝin: vialandaj poŝtmarkoj estas ŝatataj inter filatelistoj en la tuta mondo. Konservu poŝtmarkojn! Kelkfoje la koverto havas surprisitan, tute ordinaran poŝtmarkon; ŝajnas, ke tiaj kovertoj neniom valoras. Sed tiaj kovertoj ofte

surhavas bildon en la maldekstra parto: la bildo parolas al vi pri la naturo de la lando aŭ pri famaj homoj aŭ pri laboroj, urboj, bestoj kaj pri diversaj aliaj temoj. Vi trovos multajn novajn konojn per poŝtmarkoj kaj per bildoj sur kovertoj.



Multe pli interesaj estas leteroj el aliaj landoj. Ili portas al vi la vizitkartojn de siaj landoj — la poŝtmarkojn.

Rigardu la poŝtmarkon sur via eksterlanda letero. Sur ĝi vi vidas portreton de iu viro. Ĉu ne leviĝas al vi la demandoj: Kiu estas tiu ĉi viro? Kion li faris? Kial oni metis lian bildon sur la poŝtmarkon? Li devas esti grava homo, ĉar sur poŝtmarko aperas certe nur gravaj homoj... Se vi esploras la poŝtmarkon pli detale, vi trovos la nomon de tiu viro. Nun vi havas kaŭzon preni enciklopedion kaj ekscii pri tiu viro pli detale. Vi sentas fieron: la filatelo igis vin pli saĝa.



Povas okazi, ke mankas la nomo sur la poŝtmarko. Tio signifas, ke la viro estas tre vaste konata persono, kiun oni konas laŭ bildo. Poŝtmarkoj kun bildo de Vladimir Iljiĉ Lenin ofte ne portas la nomon, ĉar li estas en la tuta mondo konata per sia portreto. Lin multe konatigis ankaŭ la filatelo.

Ofte vi trovas sur poŝtmarkoj tute fremdajn nomojn de landoj kiel *Thailand*, *Tanger*, *UAR*, *Uganda*, *Bhutan*... Ĉu vi scias, kie troviĝas tiuj landoj? Denove helpas enciklopedio kaj atlaso. Same per atlaso vi trovos urbojn en fremdaj landoj, kies bildojn al vi montras poŝtmarkoj. La filatelo pliriĉigas viajn konojn pri geografio.

Ne sole landojn, urbojn kaj personojn konatigas al vi la filatelo. Ĝi portas al vi konojn pri historio, kulturo, kutimoj, pri arto kaj tekniko el multaj landoj. Ĝi proksimigas al vi homojn de tiuj landoj, vi konatigas kun iliaj verkoj kaj laboroj, vi sentas amikecon al homoj, kiuj en aliaj landoj havas saman laboron, saman

vivmanieron, samajn opiniojn, kiel vi. Tio estas la al-tira forto de la filatelo.

Multaj famaj homoj kolektis poŝtmarkojn: Franklin Roosevelt², A. Lunačarskij³, M. Gorjkij⁴, I. Pavlov⁵, A. Blok⁶, fama polus-esploristo Ernst Krenkel⁷, fama kantisto E. Caruso⁸. Ili ĉiuj estis kleraj, saĝaj, noblaj homoj.

Ne vane homoj interesiĝis pri la filatelo, la arto de amikeco. Ni, esperantistoj, estas feliĉaj: ni havas en la manoj bonegan rimedon por amikeco — la Internacian lingvon. Ĝi kreas amikecon. Al ĝi helpas forte la filatelo, la scienco pri poŝtmarkoj, ĉar la poŝtmarko estas internacia, same kiel Esperanto. Esperanto kaj la filatelo servas amikecon.

— Mi deziras aldoni kelkajn vortojn pri Esperantaj poŝtmarkoj. Onidire, la unua tia poŝtmarko aperis en Bavario. Sed mi ne renkontis ĝian bildon aŭ priskribon. Jen kelkaj frazoj el la bonega "Katalogo de Esperantaj poŝtmarkoj": "En 1925 Sovet-Unio emisiis la unuan serion de Esperantaj poŝtmarkoj. Sekve la Esperanta filatelo fariĝis nova temo de la tutmonda filatelo. Lastajn jarojn Esperantaj poŝtmarkoj ne nur ofte vidigis en filatelaj ekspozicioj, sed ankaŭ estis plurfoje premiitaj".

— Kvankam nun estas mezo de vintro, en la suda parto de la terglobo regas somero. Kaj mi ĝojas tralegi al vi leteron de mia brita korespond-amiko John Leslie /Ĝon Lézli/. La letero venis el Argentino, kie li nun ferias.

FERIOJ

La suno brilas. Jen frazo el lernolibro. Tamen, tio estas ankaŭ fakto, dum mi skribas. La suno brilas kaj oni pensas pri la ferioj. Se oni estas normala persono, oni havas intereson pri ferioj. De tempo al tempo, oni renkontas homon, kiu ŝajne fieras, ke dum pluraj jaroj li ne ferias.

Kio estas ferio? Ĝi estas ŝanĝo en la normala vivmaniero, kaj ju pli ĝi kontrastas kun la normala ĉiutaga vivmaniero, des pli sukcesa ĝi estas: des pli saniga, korepe kaj mense, ĝi estas.

En la moderna mondo pli da homoj emas ferii eksterlande; kaj jen temo por konsidero. Kiom da homoj, kiuj vojaĝas eksterlanden, vere kapablas paroli kun la indigenoj de aliaj landoj? Eble, oni devus difini la vorton "paroli". Miaopinie, ne sufiĉas, ke oni povas eniri butikon kaj, uzante kelkajn parkere lernitajn vortojn, aĉeti ion, aŭ mendi manĝon en restoracio. Kiom el ili povas babili kun komizo en butiko pri lokaj kondiĉoj, babili kun kelnero en lia propra lingvo loka pri la loka socia vivo, pri lastatempaj teatraĵoj, pri aferoj pli gravaj ol taso da kafo?

Mi tuj pensas pri propraj spertoj en pluraj landoj, kiujn mi vizitis kiel esperantisto. Indigenaj gesamideanoj estis kun mi, kaj en ilia kunesto mi ĉiam preskaŭ forgesis, ke mi estas fremdulo. Ĉiam mi facile povis babiladi pri multaj aferoj, same facile kiel mi parolas pri la samaj aferoj en mia hejmlando per mia propra gepatra lingvo. Esperanto donas tiun grandan avantaĝon al ĉiu esperantisto, kiu vagas ekster la propra lando, ĉar neniam necesas, ke li, en kiu ajn lando, estu devigata "paroli" nur per gestoj, aŭ fuŝe paroli parte lernitan lingvon.

En la moderna mondo, tiu, kiu iras eksterlanden, sen scio de Esperanto, estas kiel homo, kiu opinias, ke li povas veturi tra regiono sen konsidero al la trafikaj gvidsignaloj.

Alia necesa aspekto de bona feriado estas troviĝi inter simpatiaj homoj. Jen kiel bonŝancas la esperantistoj! En ĉiuj landoj de la mondo ili trovos simpatiajn geamikojn, por kiuj vizito de eksterlandaj gesamideanoj estas ankaŭ bonvena travivaĵo.

Tiuj, kiuj ferias eksterlande sen helpo de la internacia lingvo aŭ sen altgrada scio de la lingvo de la lando, en kiu ili vojaĝas, ne povas havi plenan kontentigon, kiun ili devus havi pro la feriado.

Esperantistoj povas paroli konvinke pri la utilo de Esperanto, ĉefe, kiam ili revenas de siaj ferioj.

"Verdiro". Elingita glavo. — La Laguna, 1962, p. 88-89. Mallongigita.

— Efektive, eksterlanda vojaĝo sen eblo komunikiĝi ne donas veran kontentiĝon. Ni rememoru, kiel lastatempe ni akceptis en nia klubo esperantistojn el Bulgario, Hungario⁹, Svedio¹⁰, Danlando¹¹. Ili sentis sin inter ni ne fremduloj, sed homoj el la sama rondo. Ankaŭ ĉi-jare nin vizitos diverslandaj esperantistoj, kelkaj el ili prelegos en la klubo. Dum la Universaliaj Kongresoj de Esperanto por mi persone la plej agrablaj estas la vesperoj, kiam ni dekope — dudekope¹² kunvenas en ies hotela ĉambro aŭ restoracio kaj parolas pri diversaj temoj. Nin ne malhelpas tio, ke ni estas el diversaj landoj, havas diversajn gepatrajn lingvojn, apartenas al diversaj socioj. Ni parolas, laŭ diro de Zamenhof, kiel homoj kun homoj. Tio estis precipe mirinda dum la “malvarma” milito, kiam registaroj ne deziris aŭskulti unu la alian; male, ni, simplaj homoj, ne nur volonte aŭskultis, sed ankaŭ komprenis unu la alian. Do oni povas diri, ke Esperanto estas lingvo de la popola diplomatio.

— Kaj nun ni transiru al la literatura parto de nia kunveno. La plej laborkapabla Esperanta verkisto estas István Nemere¹³, kiu eldonigas ĉiujare po du librojn en Esperanto (kaj po kelkajn librojn en la hungara lingvo). Li verkas pri tre diversaj, ĉiam aktualaj temoj. Hodiaŭ ni konatiĝos kun fragmento el lia romano pri rasisma, apartisma ŝtato.

István Nemere

LA BLINDA BIRDO

La oficiro prenis la pasporton de Sven.

— Sven Viborg...? Skandio?¹⁴ — demandis li malferminte ĝin. Sven kapjesis, sed interne miris: “Kial li demandas tion...? Ja vidas li la foton, mian foton. Kaj se la pasporto estas falsa, do mi ne diros: ne, sinjoro, ne mi estas Sven Viborg”.

Ĉe la landlimo li ĉiam sentis sin eksterulo, — homo, alveninta de ekster la Tero; nervozigis lin tiuj superflujaj

stultaĵoj. Oni desegnas ie iun linion kaj diras: por ke vi ĝin trapasu, vi devas plenumi tiajn kaj tiajn kondiĉojn...

— La celo de via vizito?

— Privata afero.

— Sinjoro, — la oficiro surtabligis la pasporton, per la harkovrita mano eĉ kaŝis ĝin, tiel li klarigis al Sven — vi ricevis la enirvizon, sed tie oni skribas: por turisma celo...

— Jes, tiel estas, — interrompis Sven. Por momento li streĉe rigardis al la okuloj de la alia. La oficiro sentis, ke okaze de diskuto Sven estus malmola kontraŭulo. Post momenta konsiderado li decidis:

— Bonvolu iri al la dogankontrolo, — svingis maldekstren, — la pasporto provizore restos ĉe mi.

La doganoficistoj metigis la valizojn surtablen. Staris tie multaj pasaĝeroj, do Sven devis atendi. Ankaŭ tio lin kolerigis. Tra kelkaj altaj fenestroj ĵetiĝis internen ruĝaj sun-rektanguloj. Iu megafono monotone ripetis nomojn de urboj por li nekonataj. Iu vortgalopis itale — aŭ hispane?

Fine venis lia vico. Sven metis sian solan valizon antaŭ juna, maldika lipharulo.

— Por kiom da tempo vi alvenis? — demandis tiu.

— Mi havas vizon por tridek tagoj.

— Nur unu valizo?.. Malfermu.

La duan fojon en la vivo okazis al li, ke oni postulis malfermon de lia valizo ĉe la landlimo¹⁵. La internon de siaj pakaĵoj li ĉiam traktis kiel plej striktan sian privataĵon. Ja la fremdaj okulparoj kvazaŭ eniĝus en parton de lia animo...

Tiu doganisto ne nur rigardis, sed permane ankaŭ renversis liajn aĵojn. Lia falema-indiferenta mano fulmrapide ŝovadis la kalsonojn, ĉemizojn, razilon. Kaj poste li elprenis iun... libron. Sven staris antaŭ li, kiel infano kaptita ĉe freŝa kulpo. “Kial ni sentas tion ĉiam antaŭ ili? — pensis Sven. — La afero por ni estas humiliga, sed ili ne hontas serĉadi en valizoj de fremduloj”.

La doganisto levis alten la libreton. Kiel krimdokumenton.

— Johann... Gottlieb... Fichte¹⁶, — legis la doganisto la nomon de la aŭtoro.

— Verko filozofia, — diris Sven trankvile.
— Tion vi ne rajtas kunporti en la landon. Eble ĝi estas literaturo ribeliga.

— Ĉu vi estas certa pri tio?

— Ne.

— Do...?

— Por ĉia okazo mi retenas ĝin. Vi ricevos kvitancon.
Ĉe la reveturo vi povos repreni la libron.

— Ĝia aŭtoro mortis antaŭ cent sepdek jaroj, — aldonis Sven. Tio iomete enpensis la doganiston, sed li ja certe memoris pri Marks kaj forprenis la libron. Post nelonge li revenis kun la kvitanco, li diris ion al la oficiro. Tiu ankoraŭfoje ĵetis rigardon al Sven, kvazaŭ konsiderante, ĉu tiaspeculon oni rajtas enlasi en la landon, poste per movo enua-senvola li stampis la pasporton kaj transdonis ĝin. Sven ne dankis. Li fermis la valizon kaj foriris.

Antaŭ la konstruaĵo estis larĝa, asfaltita vojo, multaj aŭtomobiloj veturis brue. Ĉe la placo staris miloj da aŭtoj. Nigraj valizoportistoj, taksi-ŝoforoj, policistoj, blankuloj, kolorvestitaj infanoj...

Sven haltis por momento kaj ripozis. Li alvenis en la Sudan Respublikon.

István Nemere. La blinda birdo. — Budapest, 1983, p. 21-23. Roman-fragmento.

— Certe, la rasismo estas neakceptebla por la normalaj homoj, sendepende de tio, kontraŭ kiuj ĝi estas direktita: nigruloj, hebreoj, araboj, armenoj aŭ iuj aliaj. Estas miriga kaj bedaŭrinda fakto, ke rasistoj ekzistas inter la personoj, kiuj konsideras sin inteligentaj.

— Hungario donis al Esperantujo brilajn verkistojn. Inter ili estis Julio Baghy¹⁷, kiun oni nomis homa homo. Enpensiĝu en unu eldiron de Baghy: "Esti esperantisto signifas ne nuran lingvoscion. Ĝi estas destino. Misio. Sapiro al pli bona mondo. Vera esperantisto ne fariĝas, sed naskiĝas, kaj li estas esperantisto jam antaŭ ol li lernas la lingvon". Ĉu vi ne sentis ion similan?

Julio Baghy¹⁷

ĈE FENESTRO DE VAGONARO

Vilaĝeto ĉe rivero,
verda monto, flora bord',
sonoril-son' de l' vespero,
benko ĉe la doma pord',
ligas min al vi memoro:
gaja ludo de infan',
la sekret' de juna koro,
kiso de l' unua am'...
Vilaĝeto ĉe rivero,
vin revidi vanas rev',
tenas min en mallibero
urba vivo, zorgo, dev'.

Julio Baghy. Aŭtuna foliaro. — Oosaka, 1970, p. 19.

— En la sekva merkredo en nia klubo gastos geedza paro de Aŭstraliaj esperantistoj. Krome, okazos konkurso de bela legado.

KOMENTARO

1. Mark Twain /Tuejn/ (1835-1910).

2. Franklin Roosevelt /Ruzvelt/ (1882-1945) — prezidento de Usono.

3. Lunaĉarskij Anatolij Vasiljeviĉ (1875-1933) — sovetia ŝtata aganto, komisaro pri klerigo, verkisto, literatura kritikisto, akademiano. En sia salutletero al la internacia kongreso de laboristaj esperantistoj en Leningrado (1926) li skribis: "Faktoj estas aĵoj obstinaj kaj la faktoj pledas por Esperanto. Tiu ĉi movado disvastiĝas kun nevenkebla potenco kaj fariĝas unu el la plej seriozaj fenomenoj de la moderna socia vivo".

4. Gorĵikij Maksim (Aleksiej Maksimoviĉ) (1868-1936) — rusa sovetia verkisto kaj socia aganto. Li plurfoje esprimis sin pri Esperanto, ekzemple: "La konservativa penso obstine pravas, ke Esperanto estas utopio. La viva, evoluinta realeco iom post iom, sed ĉiam pli energie refutas la opinion de la konservativuloj".

5. Pavlov Ivan Petroviĉ (1872-1936) — sovetia sciencisto, akademiano.

6. Blok Aleksandr Aleksandrovič (1880-1921) — rusa poeto.

7. Krenkel Ernst Teodorovič (1903-1971) — interalie, prezidanto de Sovetia societo de filatelistoj.

8. Enrico Caruso /Enriko Karúzo/ (1873-1921) — itala kantisto.

9. Hungario — lando en Centra Eŭropo kun la ĉefurbo Budapeŝto.

10. Svedio — lando en Norda Eŭropo kun la ĉefurbo Stokholmo.

11. Danlando — lando en Eŭropo ĉe la Balta maro kun la ĉefurbo Kopenhago.

12. Inter dek kaj dudek personoj.

13. István Nemere /Iŝtvan Némere/. Naskiĝis en 1944. Esperantistiĝis en 1962. Hungaro. Aŭtoro de multaj popularaj romanoj, interalie: “La fermita urbo”, “Sur kampo granita”, “Febro”, “La monto”, “La alta akvo”, “Serĉu mian sonĝon”, “Dum vi estis kun ni”, “Vivi estas danĝere”, “Vi povas morti nur dufoje”.

14. Imagita lando.

15. Feliĉa homo estas tiu Sven, se tio okazis al li nur la duan fojon en la vivo; ĉu ne estas mirige, ke li tiel koleriĝis?

16. Johann Gottlieb Fichte /Jóhan Gótlíb Fífte/ (1762-1814) — germana filozofo.

17. Julio Baghy /Bági/ (1891-1967). Hungara aktoro. Pedagogo. Esperantistiĝis en 1911. Unu el la plej famaj Esperanto-verkistoj. Kelkaj liaj libroj: “Preter la vivo”, “Viktimoj”, “Sur sanga tero”, “Hura!”, “Prin-tempo en la aŭtuno”, “Sonĝe sub pomarbo”, “Koloroj”, “Aŭtuna foliaro”, “En maskobalo”.

LINGVA PRAKTIKO

Filatelo signifas amikecon

1. Imagu, ke vi estas pasia filatelisto. Skribu leteron al eksterlanda filatelisto, en kiu esprimu vian rilaton al la filatelo, prezentu vian kolekton kaj la plej ŝatatajn poŝtmarkojn, klarigu viajn filatelajn interesojn, proponu interŝanĝi poŝtmarkojn pri iuj temoj kaj aliajn objektojn

(eble, tute neordinarajn). Uzu vortojn kaj esprimojn el la teksto.

Ferioj

2. Klare montru la temon de la teksto per unu frazo.

3. Kion signifas la esprimo *indigenaj gesamideanoj* ?

4. Rakontu pri via vera aŭ imaga vojaĝo al iu lando (eble, tre malproksima) kun helpo de Esperanto. Priskribu diversajn okazojn, kiam Esperanto kaj esperantistoj helpis al vi fari viajn feriojn pli agrablaj. Uzu esprimojn, frazojn kaj ideojn el la teksto.

La blinda birdo

5. Donu titolon al la romanfragmento.

6. Trovu la leksikon (vortojn, vortkunojn, esprimojn), kiu atestas pri malkontento kaj kolero de Sven.

7. Prezentu la unuan parton de la teksto, kiel ĝin rakontus la pasportkontrola oficiro, kaj la duan parton — kiel ĝin rakontus la doganisto.

8. Rakontu, kiel vi (kaj via grupo) trapasis la pasportan kaj doganan kontrolojn dum via vera aŭ imaga vojaĝo eksterlanden.

Ĉe fenestro de vagonaro

9. Diru, pri kio el siaj infaneco kaj juneco rememoras la aŭtoro.

10. Kial la aŭtoro ne revenas al sia sopirata vilaĝeto?

11. Klarigu en Esperanto, kion signifas la subaj vortoj (ekzemple: *oficialulo* — oficiala persono; *moder-nulo* — homo, kiu emas alpreni ĉion plej modernan; *fervorulo* — homo, kiu fervoras pri io):

Blindulo, fantaziulo, orgojlulo, teoriulo, spegulo, potenculo, neologismulo, babilulo, okulo, fuŝulo, kulpulo, stultulo, gratulo, krimulo, hazardulo, formulo, maldek-

strulo, ĉiamulo, ruĝulo, fakulo, funkciulo, regulo, fremdulo, spitulo.

12. Al la frazpecoj el la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu bone sidas,	tiu ŝanĝiĝas.
Kiu demandas,	tiu pravas.
Kiu edziĝas,	tiu lokon ne ŝanĝu.
Kiu tro rapide saltas,	tiu ne eraras.
Kiu jam havas,	tiu baldaŭ haltas.

13. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj (vortoj similsonaj, sed signife malsamaj):

Honesta — honora, komizo — komisaro, babilo — balbuti, norma — normala, trinki — drinki.

14. Anstataŭ la vortoj en la krampoj metu aliajn vortojn por ricevi novajn frazojn: En la kunesto de (*esperantisto*) mi forĝesis, ke mi estas (*fremdulo*).

15. Laŭ la modelo: ...i ...e (ekzemple: ferii julie, ferii eksterlande, kanti kungitare, rigardi explore, respondi geste, fari fuŝe, sidi surseĝe) elpensu aron da vortkunoj.

16. Elpensu kelkajn frazojn laŭ la modelo: La ...o ne nur ...is, sed ankaŭ ...is ...ajn ...ojn (ekzemple: La doganisto ne nur rigardis, sed ankaŭ renversis liajn aĵojn).

17. Temo por diskuto aŭ rakonto: Ne doloras frapo sur fremda kapo.

18. Kvizo pri esperantaj temoj:

a) En kiu jaro Sovet-Unio emisiis la unuan serion de Esperantaj poŝtmarkoj?

b) En kiu jaro kaj okaze de kiu evento A.V. Lunaĉarskij eldiris sian opinion pri Esperanto?

c) Kiu granda rusa kaj sovetia verkisto plurfoje esprimis sin favore pri Esperanto?

e) Nomu la nuntempan hungaran verkiston, kiu eldonigis multe da popularaj romanoj en Esperanto.

d) En kiu jaro esperantistiĝis Julio Baghy? Kiun profesion li havis?

LECIONO 3

— Genadio Gerasimov, kiu ĵus revenis el Finnlando, havas multon por rakonti. Sed por hodiaŭ li elektis nur unu ege interesan temon.

MI AŬDAS VIN BONE!

En la pasinta sabata vespero grupo da komunikiĝemaj finnoj vespermanĝis en restoracio ĉe la maro, proksime de Helsinko. Oni rememoris konatojn en diversaj landoj kaj ekdeziris interŝanĝi kelkajn vortojn ankaŭ kun ili.

Telefonon oni elprenis el virina taŝo (mansako) — ĝi estis negranda skatoleto kun modesta sescentimetra anteno. Kelkaj premoj sur lumantajn butonojn kun ciferoj — kaj jen apude troviĝas la matena Los-Anĝeleso¹. Denove kunmeto de butonoj — kaj apudas jam Amano². La aŭdeblo estas superba.

La poŝa telefono dume estas moda luksaĵo. Tamen ni imagu, ke ĝi ne nur iĝos poŝa, sed ankaŭ kostos laŭ ĉies poŝo. Kiom da vivoj estos savitaj, kiuj estas perdataj nur tial, ke la helpo ne venis ĝustatempe! Kiom da tempo estos konservita, kiu estas perdata por serĉi iun, kiu subite iĝis ege bezonata! Mi jam ne parolas pri forigo de la nerva streĉo ĉe la malfruanto al la rendevuo.

En Finnlando multaj aferoj estas farataj per telefono, kiu estas ĉi tie helpanto-laboregulo. La abonantoj ĉiujare ricevas senpage tri volumegojn de manlibroj pri telefonaj numeroj de personoj, de oficejoj kaj entreprenejoj, de institucioj por priservado. Per la lasta oni povas fari aĉetojn kaj mendi ĉiutagajn servojn, ne deirante de la telefono. Se oni povus kalkuli, kiom da tempo estas ŝparata, kiel malsarĝataj estas la telefonaj informoj kaj transportiloj!

La telefono en Finnlando prezentas aron da aldonaj servoj. Ekzemple, se vi ne estas hejme, sed vi deziras, ke oni kontaktu vin, vi sciigas al la centralo la numeron

de la telefono, kie vi intencas esti. La cetero estas la afero de tekniko, kiu aŭtomate aliadresos tiujn, kiuj kunmetas vian malnovan numeron, al via nuna numero.

G. Gerasimov. Amman? Slišu vas ĥorošo! —
Sovetskaja kultura, 25.08.1987, p. 7.
Mallongigita traduko.

— Vere, ege interese, Gennadij Ivanoviĉ! Ja ankaŭ ni havas amikojn en la tuta mondo, kiujn ni ofte konas nur per-letere. Sed se ni posedus tian miraklan aparaton, ni povus tuj kontakti ilin kaj ekkoni ankaŭ per-sone.

— Belan vortludon vi hazarde eldiris! Kaj kiam ni veturos eksterlanden, ni renkontos tiujn personojn kaj ekkonos ilin ne nur per-sone, sed ankaŭ persone!

— Telefono estas teknika rimedo de komunikigo. En kombino kun la alia (neteknika) rimedo de komunikigo — la internacia lingvo Esperanto — ĝi fariĝas eĉ pli utila: tiamaniere ni ne nur kontaktas, sed ankaŭ komprenas unu la alian en la tuta mondo.

— Ĉu diverslandaj esperantistoj ĉiam bone komprenas unu la alian? Ĉu ne malhelpas diferencoj en prononcado? Komprenable, ĉiu deziras havi bonan (eĉ bonegan) prononcadon. Sed kia ĝi devas esti? Pri tiu problemo hodiaŭ parolos profesoro pri fonetiko³ de la Londona universitato John Wells⁴, kiu gastas en nia klubo.

BONA KAJ MALBONA PRONONCADO

En Esperanto, same kiel en ĉiu funkcia lingvo, ne ĉiuj prononcmanieroj estas same ŝatataj. Oni ofte aŭdas opiniesprimojn kiel: “Li havas malbonan elparolon”, “Ŝi tre bone prononcas la lingvon”. Kiun bazon havas tiaj eldiroj? Kiuj estas la kriterioj de bona kaj malbona prononcadoj en Esperanto?

Ni konsentas, ke tiaj opiniesprimoj havas parte estetikan bazon, sed tiun flankon ni volas lasi ekster la

nuna diskuto. Do ne estos nun parolo pri belo kaj malbelo.

La unua kriterio, kiun ni povas rimarkigi, estas la *praktika*. Bona prononco estas tiu, kiu ebligas interkomprenon inter esperantistoj de malsamaj etnaj lingvoj. Ĝi estas tiu, kiu faciligas interkomunikigon per la internacia lingvo. Tial mi malrekondas, ekzemple, la kutimon de kelkaj angloj prononci /r/ tiel, ke alilingvanoj povas miskompreni ĝin: oni konfuzas, ekzemple, *oro* kaj *ovo*.⁵

La dua kriterio, aŭ pli ĝuste kriteriaro, estas *lingvistika*. Bona prononco estas tiu, kiu spegulas la fonologian⁶ karakteron de Esperanto. Ĝi estas tiu, kiu nepre distingas inter ĉiu paro da fonemoj prezentigantaj per malsamaj literoj en la ortografio⁶. Ĝi estas tiu, kiu laŭeble konservas la striktan rilaton inter ortografio kaj prononco. Tial mi malaprobis, ekzemple, se iu hispana aŭ japana esperantisto ne distingas inter /b/ kaj /v/: kiel ni sciu, ĉu li *bolas* aŭ *volas*? *benas* aŭ *venas*? vidis *korbon* aŭ *korvon*?⁷

La tria kriterio estas *geografia*. Bona prononco estas tiu, kiu estas geografie neŭtrala. Ĝi estas tiu, kiu ne montras lokajn apartaĵojn, regionismojn aŭ naciismojn. Ĝi estas tiu, kiu ne ebligas al la aŭskultanto diveni, el kiu lando venis la parolanto. Ĝi estas internacia. Tial mi konsilus, ekzemple, ne prononci /o/ kiel diftongon; ĉar diftonga /o/ karakterizas precipe anglalingvanojn⁸. Mi konsilus ne prononci /n/ kiel palatalon antaŭ /i/; ĉar palatala /n/ en *ni* karakterizas precipe polojn⁹. Mi konsilus akcenti la antaŭlastan silabon de vorto, ne la lastan, ĉar akcenti la lastan silabon karakterizas precipe francojn.

La kvara kriterio estas *sociologia*. La socia portanto de la lingvo Esperanto estas ĝia parolantaro, ĝia lingvokomunumo. Tiu kolektivo, geografie disa sed spirite kunligita, havas amason da komunaj kredoj, opinioj, sintenoj — en la plej vasta senco, komunan kulturon. Inter tiuj komunaj opinioj estas iuj, kiuj rilatas al la prononcado. Tio ŝajnas esti la klarigo de tio, ke — ekzemple — /r/ prononcata per vibro de la langopinto¹⁰ estas pli ŝatata ol diversaj aliaj specoj.

Pri la fakto, unika en la historio de Esperanto transformiĝis de kabineta parolado al vivanta, plene funkcia lingvo, — foje atentigis. Atentinda estas ankaŭ la fakto, ke ĉiuj parolantoj de la lingvo; sed estas absolute unuecaj kaj certe ne estas lingvistika fakto, ke ili ekzistas. Se oni diras „mi“ aŭ „li“ signifas ke mi, aŭ li, sukcese liberigis katenojn de la gepatra lingvo por alparoli ... aŭ ke ni saĝe elektis gepatrojn, parolantojn aŭ la serbokroatan.

John Wells. Lingvistikaj aspektoj de Esperanto.
Rotterdam, 1978, p. 2.

— Estas tre interese ĉeesti malfernan Kongreso de Esperanto, kiam kelkfratuloj reprezentantoj de dekoj da landoj. La senroluloj estas kompreneblaj, sed la prononco apartan „aromon“, kio kune formas rimojn. Plej malfacile liberigas de siaj gepatraj anglalingvanoj. Sed ankaŭ inter ili estas esperantistoj, kies anglalingvecon oni ne devas diveni, ekzemple, Humphrey /Hámfríd/ /Víkter/ Sadler, Mark Fettes kaj, ĉi tiu, ginto.

— Verŝajne, vi miros, ke en la sekundo tike ne trovos nekonatajn vortojn. Ĉi tiu de la aŭtoro aŭ de ni? Ni vidu!

*Johán Valano*¹¹

TERURA NOVAĴO

Estis pri-plorinda novaĵo. Vi scias, ke al miaj infanoj, ke mi foriros. Kiam ili ne imagis, ke estos tiel malfacile.

venas sciigi ion tre gravan al vi”, mi diris per voĉo plej serioza. La veturiletoj tuj haltis, kaj Alano direktis al mi siajn belajn, blujn okulojn, tiom plenajn je trankvila amo, ke mia koro ekdoloris. Li havas al mi grandegan amon. Mi estas por li la Patro kun granda P. Patro estas, lia-pense, plej aminda fortulo: ulo vi-rega, havanta la povon ĉiam ĉion superforti.

Kaj nun mi bat-faligos tiun ideon pri mi. Miaj vortoj estos bato, post kiu nenio plu restos el tiu patro-bildo. Ĉu estas bone, ke tiu imagata, se amata, fortulo subite perdu la ekziston? Ĉu Alano ne estas tro malforta por supervivi tian baton?

Ree mi kunigis la tuton de miaj troveblaj fortoj, kaj ekparolis: “Alano, mi baldaŭ foriros. Mi ne plu vivos kun vi ĉi tie. Mi ne plu loĝos ĉi-dome”.

La knabo min rigardis kun esprimo sindemanda. Kaj li ekridis. Mi atendis kion ajn, sed ne tion. Li ne akceptis min serioze! Por li, patro estas tiel klara, natura, ne-forigebla duono de amata paro, ke tiu duono ne povus serioze foriri, lasante la alian duonon sola. Ke mi foriru, tio estas tute simple neebla. Tiu diro de la patro povis esti nur luda.

“Alano, mi ne ŝercas, ĉi tio ne estas ludo. Mi komprenas, ke vi ne kredis min tuj, ĉar vi tutforte esperas, ke mi ne diris la veron. Sed estas vere, Alano, mi foriros. Vi restos ĉi tie kun patrino kaj Klara. Kaj mi ne plu vivos kun vi. Mi...”

Li sentis nun, ke ne temas pri imaga rakonto, ke mi diras puran veron. Sed li ne povis akcepti ĝin. Li rigardis min. Li subite iĝis senkolora. Li aperis tiel eta, senhelpa, ke mi sentis, kvazaŭ la tuta ĉambro turniĝus ĉirkaŭ mi. “Mi mortigis lian koron, lian ĝojon, eble lian povon ami kaj feliĉi”, mi pensis.

Alano ekkriis. Li elmetis siajn etajn brakojn, siajn etajn manojn, batis min per fortega, longa, nehoma krio, kaj post kelkaj ekbatoj al mi, forkuris ploregante.

Mi staris tie, senpensa, sensenta. Mi ne imagis, ke eblas senti tian pezon de malfeliĉo. Mi sentis min la plej malaminda dolorigisto en la mondo. Mi ne plu sciis, kiu mi estas, kion mi faru, kien direktiĝas mia

vivo-vojo. “Ĉu vere tion vi volis?” mi demandis al mi. Sed de nenie venis respondo.

Trezoro: La Esperanta novelarto 1887-1986.
Dua volumo. — Budapeŝto, 1989,
p. 616-619. Mallongigita.

— Jes, vere malgaja situacio. Bedaŭrinde, ankaŭ tio okazas en la vivo. Sed eĉ en tia situacio oni devas resti homo.

— Nun ni konatiĝu kun versaĵo, kiu ne havas rimojn kaj estas verkita en libera ritmo. Malgraŭ ĉio, ĝi estas vera poezio.

*Mikaelo Ternavski*¹²

Al kiu vi povas prezenti
pretendon?
Ja ankaŭ vi iam
havis boaton,
ja ankaŭ al vi iam
lumis fajretoj
de fora insulo.

Sed vi timis
(oni devas almenaŭ foje
diri la veron al si),
vi timis
forlasi la bordon
en tia boato.

Sed li ne timis
kaj en sia malgranda boato
atingis la insulon,
pri kiu vi revis
dum la tuta vivo.

Kaj nun,
kiam li rakontas,
kiaj arboj estas tie,
kiaj birdoj estas tie,
kiaj floroj estas tie —
vi aŭskultas lin
kun intereso
kaj doloro.

Hungara vivo, 1988, N° 2, p. 49.

— Dankon, Miĥail Jakovleviĉ, ke vi venis en nian klubon kaj legis al ni tiun tre belan versaĵon!

— En la sekva kunveno okazos vespero de Esperanto-poezio. Krom tio, ni povos vidi ekspozicion de fotoj, kiujn ni ricevis el Nov-Zelando.

— Post du semajnoj, merkrede, la 18-an de februaro, ni kunvenu apud la klubejo unu horon pli frue ol kutime: ni faros ekskurson al Esperantaj memorigaj lokoj en Moskvo.

KOMENTARO

1. Los-Anĝeleso — Usona haven-urbo ĉe Pacifika oceano (Kalifornio).

2. Amano — ĉefurbo de Jordanio.

3. Fonetiko — fako de lingvoscienco, kiu studas manierojn de formiĝo kaj akustikajn ecojn de la sonoj de homa parolo.

4. John Wells /Ĝon Ŭelz/. Naskiĝis en 1939. En 1989 estis elektita prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

5. “Angloj en iuj fonetikaj pozicioj prononcas “r” tre malforte, preskaŭ nule, neaŭdeble por reprezentantoj de iuj aliaj lingvoj. Tio povas kaŭzi miskomprenon: *verki* — *veki*, *surda* — *suda*, *karto* — *kato*, *korto* — *koto*, *prezo* — *pezo*” (Eŭgeno Bokarjov).

6. “Fonemo estas sono, kiu kapablas diferenciĝi sencon de vortoj kaj vortformoj... En Esperanto ĉiu fonemo estas reprezentata de speciala litero... Lingvosciencia fako, kiu okupiĝas pri fonemoj, estas nomata fonologio” (Eŭgeno Bokarjov).

7. “Rusoj en senakcenta pozicio povas miksi “o” kaj “a”. Anstataŭ *oranĝo* ili povas diri *aranĝo*, anstataŭ *okcidento* — *akcidento*, anstataŭ *ofero* — *afero*, anstataŭ *poŝtisto* — *paŝtisto*, anstataŭ *nocio* — *nacio*. Precipe grava estas la eraro, kiam tiuj fonemoj miksiĝas en gramatikaj finaĵoj: anstataŭ *bono* — *bona*, anstataŭ *mi diras* — *mi diras*. En la sama senakcenta pozicio ruso povas miksi “e” kaj “i”: anstataŭ *letero* li povas diri *litero*. La rusa lingvo ne diferencigas ankaŭ la fonemojn

/g/ kaj /h/. Tial rusoj iafoje povas erari, mikskante tiujn fonemojn: *gardi* — *hardi*, *gasti* — *hasti*...

En la japana lingvo ne ekzistas “l”, en la ĉina — “r”. Tial japanoj kaj ĉinoj povas miksi en sia prononcado tiujn fonemojn: *rado* — *lado*, *revi* — *levi*, *rimo* — *limo*, *roko* — *loko*, *birdo* — *bildo*” (Eŭgeno Bokarjov).

8. “La personoj, kies gepatra lingvo estas la angla, parolante en Esperanto, memoru, ke /o/ ne estas /oŭ/, ke /e/ ne estas /ej/” (Ivo Lapenna).

9. “La rusoj kaj poloj devas bone distingi inter /n/ kaj /nj/, inter /l/ kaj /lj/: *ni* ne estas *nĵi*. Ili ĝenerale evitu la troan moligon en la lingvo. Oni, do, ne diru: *ljia nepo (nepo) nje estas espjertjisto!*” (Ivo Lapenna).

“Rusoj ofte moligas “t” en la pozicio antaŭ la vokaloj “e” kaj “i”, kaj en tiu pozicio ĝi povas esti perceptata kiel varianto de “c”: *timo* — *cimo*, *tiklo* — *ciklo*. Do uzado de la moligita varianto de “t” ne estas rekomendinda. Tiu rekomendo povas rilati ankaŭ al “d” kaj “n” ” (Eŭgeno Bokarjov).

10. kiel en la rusa lingvo.

11. Claude Piron /Klod Pirón/. Naskiĝis en 1931. Sviso. Esperantistiĝis en 1945. Majstro de verkado en parola Esperanto. Sub pseŭdonimo Johán Valano eldonis facilajn librojn por novaj esperantistoj kaj serion de distraj krimromanoj: “Ĉu vi kuiras ĉine?” “Ĉu li bremsis sufiĉe?”, “Ĉu li venis trakosme?”, “Ĉu ni kunvenis vane?”, “Ĉu rakonti novele?”.

12. Mikaelo Ternavskij (Ternavskij Miĥail Jakovleviĉ). Naskiĝis en 1934. Esperantistiĝis en 1983. Profesia poeto, verkanta ĉefe en la ukraina lingvo.

LINGVA PRAKTIKO

Mi aŭdas vin bone!

1. Kiujn eblajn (eĉ tre fantaziajn) telefonajn servojn vi imagas?

2. Imagu, ke vi jam dum kelkaj monatoj posedas poŝtan telefonon, per kiu vi povas senprobleme komunikiĝi

kun ajna loko de la planedo. Prezentu kelkajn neordinarajn telefonajn konversaciojn (ekzemple, kun mondfama kantisto dum koncertpaŭzo, kosmonaŭto en kosma ŝipo, ĉefo de afrika gento, ĵus eksigita ŝtatestro, aliplanedano sur fluganta "telero").

Bona kaj malbona prononcadoj

3. Trovu en la teksto terminojn de lingvoscienco kaj laŭeble klarigu ilin.

4. Prezentu, kiujn erarojn (prononcajn, sencajn, gramatikajn) en Esperanto faras parolantoj de via gepatra lingvo.

Terura novaĵo

5. Trovu la leksikon, kiu rilatas al emocioj de la patro, la filino, la filo.

6. Trovu la frazojn, kies konstruo montras la emociojn de la parolanto.

7. Trovu la vortojn, en kiuj sufiksoj ludas la rolon de radikoj. Elpensu kelkajn frazojn kun tiaspecaj vortoj.

8. Imagu daŭrigon de la rakonto. La patro konvinkiĝas, ke li povas esti feliĉa nur kun sia forlasita familio. Verku liajn konversaciojn kun la edzino, la filino, la filo ĉe reveno.

Al kiu vi povas prezenti pretendon?..

9. Laŭ la ĉefa ideo de la versaĵo, prezentu kelkfrazan rakonton pri iu, kiu ne kuraĝis plenumi sian revon kaj nun bedaŭras pri tio.

10. Ĉu vi bedaŭras pri io, kion vi povis fari, sed ne faris, timante postsekvojn?

11. Klarigu en Esperanto, kion signifas la subaj vortoj:

Elfali, elpremi, elskatoligi, elbordiĝi, elingigi, elekti, elirejo, ellabori, elektro, elteni, elturmenti, elturniĝi, el-

parolo, eldonejo, elpendaĵo, elemento, eldiri, elbabili, elradikigi, eluzita, elstara, eleganta, elhaki, elkuraci, el-aĉeti.

12. La vorto *normalkora* formiĝis jene: (normala koro) — a. Simile formiĝis *bonhumora*: (bona humoro) — a. Kreu kelkajn vortojn laŭ la sama modelo.

13. Laŭ la modelo: pri+R(radiko)+inda (ekzemple: *priplorinda*), formu kelkajn vortojn.

14. Elektu vorto(j)n laŭ via plaĉo:

Ĉia (kono, mono, bombono, citrono, dono, pardono) estas bono. Rol' de virino — bona (patrino, edzino, amatino, mastrino, kuiristino, purigistino, laborantino). Se devigas neceso, faru kun (promeso, permeso, kareso, intereso, sukceso). Afabla vorto pli atingas, ol (raporto, sorto, forto, morto). Kiam pasis la aĝo, aperis (vojaĝo, fromaĝo, saĝo, kurajo, plaĝo).

15. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Instituto — institucio, centro — centralo, supera — superba, premi — premii, taso — taŝo.

16. Anstataŭ la vortoj en la krampoj, metu aliajn vortojn: En ŝia rigardo vidiĝis nek (*malamo*), nek (*timmo*), sed nur (*malfeliĉo*).

17. Ŝanĝante lokon de la vortoj en la frazo, faru laŭeble multe da frazoj, kiujn vi opinias bonaj: *Morgaŭ matene mi trinkos kafon*. Atentu ŝanĝigon de la senco de la frazo.

18. Temo por diskuto aŭ rakonto: Plej facile promeso rimigiĝas kun forgeso.

19. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Pri kio profesie okupiĝas John Wells?

b) Kiun oftan eraron en Esperanto-prononcado faras francoj?


c) Diru la titolon de la kolekto de Esperanto-noveloj, eldonita okaze de la centjariĝo de la Internacia lingvo.

ĉ) Sub kiu pseŭdonimo ofte verkas Claude Piron? Nomu kelkajn liajn librojn, kies titoloj komenciĝas per la vorteto *Ĉu*.

d) Diru la antaŭnomon kaj profesion de Ternavski.

LECIONO 4

— Karaj amikoj! Hodiaŭ ni faras ekskurson al Esperantaj memorigaj lokoj en Moskvo, ligitaj kun la malnova historio de Esperanto. Post du semajnoj ni aranĝos la duan ekskurson por viziti lokojn, ligitajn kun la nova Esperanto-historio. Komprenoble, ni ne povas viziti ĉiujn lokojn, sed nur pli-malpli gravajn.



Strato Nejdanova, 21

ESPERANTAJ MEMORIGAJ LOKOJ EN MOSKVO

Parto 1

Unu el la plej memorindaj lokoj estas la domo, en kiu loĝis la kreinto de Esperanto Ludoviko Zamenhof estante studento de la medicina fakultato de la Moskva universitato en la jaroj 1879-1881. La domo, nun situanta en la strato Nejdanova, 21, bone konserviĝis; ĝin nun okupas Ministerio pri scienco, altlernejoj kaj teknika politiko. Dum la Zamenhofs tempo tiu domo apartenis al Andreo Miklaŝevskij kaj en ĝi estis meblitaj ĉambroj (speco de nemultekosta hotelo); la ĉambron N^o 49 okupis la juna Ludoviko. La adreso de la domo tiam estis: strato Tverskaja, 27.

Menciindas ankaŭ la Moskva universitato (malnova konstruaĵo en la centro de la urbo, strato Moĥovaja), kie studis Zamenhof. Poste, en la jaroj 1909-1916, ĉi tie floris vigla movada aktiveco kun partopreno de tiama studento Sergeo Obruĉev¹, estonta konata sciencisto kaj akademiano. Ankaŭ renaskiĝo de Esperanto-movado en Moskvo post la jaro 1956 estis firme ligita kun agado de universitata studenta Esperanto-rondo sub gvido de profesoro Eŭgeno Bokarjov².

Inter la unuaj apogantoj de Esperanto estis la granda verkisto Leo Tolstoj³. Multaj lokoj en Moskvo memorigas pri Tolstoj — lia domo-muzeo, strato laŭ lia nomo, monumentoj. En la muzeo de Tolstoj (strato Preĉistenka, N^o 11) estas konservataj raraj libroj kaj revuoj en Esperanto, iel ligitaj kun la verkisto.

Ĉi tie estas konservataj ankaŭ leteroj, koncernantaj Esperanton, kiujn sendis al Tolstoj pluraj personoj (precipe valoraj estas leteroj de Esperanto-pioniro Vladimir Majnov⁴, kiu estis peranto inter Tolstoj kaj Zamenhof), kaj respondaj leteroj de la verkisto, publikigitaj en ties Plena verkaro. En la strato Arbat konserviĝis la domo N^o 36, kie komence de la jarcento situis la eldonejo "Posrednik" (Peranto), kiu eldonis dekojn da verkoj de L. Tolstoj en Esperanta traduko kaj kelkajn lernolibrojn de Esperanto.



Monumento de Leo Tolstoj



Strato Arbat, 36

Al la unuaj moskvaj esperantistoj apartenis personoj, proksimaj al Leo Tolstoj — inter ili granda komponisto Sergeo Tanejev⁵. Li korespondis kun Zamenhof, verkis muzikon laŭ Esperantaj tekstoj, skribis taglibron en Esperanto (ĝia ruslingva traduko aperis libroforme), altiris al Esperanto plurajn siajn amikojn el la muzikista medio, inter kiuj estis Modesto Ĉajkovskij, frato de la fama komponisto Petro Ĉajkovskij. Inter apud-Arbataj stratoj estas strato Tanejevoj, kie staras lia modesta unuetaĝa domo (N^o 2).

Inter la jaroj 1908 kaj 1917 en Moskvo funkciis Instituto de Esperanto (kie estis aranĝataj kursoj kaj ekzamenoj kaj enmanigataj atestoj pri kurs-fino), librejo "Esperanto" (kiu publikigis multajn valorajn librojn), oni eldonis la revuon "La Ondo de Esperanto". La ĉefa aganto de la menciitaj entreprenoj estis fama esperantisto Aleksandro Saĥarov⁶. Konservigis la domo, kie li agadis; nun ĝin okupas la muzeo de Majakovskij (interstrato Serov 3/6, iam interstrato Lubjanskij, 3).



Strato Tanejevoj, 2

Ioman tempon Librejo "Esperanto" troviĝis en la strato Tverskaja, 28, poste strato Tverskaja (Gorĵkij), 16, kontraŭ la domo, en kiu siatempe loĝis Zamenhof.

Laŭ la adreso Bolŝaja Dmitrovka (Puŝkinskaja), 12, iom da tempo troviĝis CK SEU (Centra komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio), poste transveturinta en la domon N^o 15 en la strato Spiridonovka (nun strato Aleksej Tolstoj, la domo ne konserviĝis). SEU, fondita en 1921, estis la plej grandnombra landa Esperanto-organizaĵo. Dank' al ĝia agado, la internacia lingvo enradikiĝis en la socio, precipe inter laboristoj. Sovetlando iniciatis Esperantajn radioelsendojn kaj poŝtmarkojn, eldonis kelkajn revuojn kaj pli ol 200 librojn. Ampleksa estis la per-esperanta laboro, precipe internacia korespondado, kiu disvastigis tra la tuta mondo informojn pri la lando de Sovetoj. Ni nomu almenaŭ kelkajn elstarajn agantojn de tiu periodo: Ernesto Drezen, Nikolao Nekrasov, Vladimiro Varankin, Herberto Muravkin, Eŭgeno Miĥalskij, Ida Lisiĉnik, Jefimo Spiridoviĉ, Olga Kazina, Simeono Podkaminer, Sergeo Rublov, Gregoro Demidjuk.

Sed la kruela maŝino de subpremado de Stalin en 1937-38 perforte ĉesigis la agadon de SEU, akuzinte ĝian estraron pri organizado de trockiista-spiona-esperantista centro. Estis arestitaj kaj senditaj al koncentrejoj multaj aktivuloj de SEU, pluraj el ili pereis. Dum la tempoj de Nikita Ĥruŝĉov ili estis rehabilititaj kiel senkulpaj. Dum preskaŭ 20 jaroj la vorto "Esperanto" (same kiel la vortoj "genetiko", "kibernetiko"⁷, "sociologio", "homaj rajtoj") estis uzebla nur en negativaj kaj insultaj kunteksto⁸. Estas nekredeble, sed la cenzura malpermeso skribi pozitive pri Esperanto kaj esperantistoj en la gazetaro estis oficiale forigita nur fine de la jaro 1968!

Kvazaŭ interkonsente, la faŝisma reĝimo de Hitler frakasis la Esperanto-movadon en Germanio kaj en la okupitaj landoj, murdis esperantistojn en koncentrejoj, akuzante ilin pri tio, ke ili estas komunistoj kaj agentoj de Sovetio, kaj ke la aŭtoro de la lingvo estis hebreo. En ambaŭ ŝtatoj estis amase bruligataj Esperanto-libroj⁹. En la teroro kontraŭ la internaciisma agado de

esperantistoj Stalin kaj Hitler agis kiel aliancanoj. Esperanto pene reviviĝis el la ruinoj post la mortoj de ambaŭ diktatoroj kaj dank' al iom-post-ioma demokratiigo de la socioj.

— Jen finiĝis nia ekskurso kaj ni denove estas en la klubejo. La lasta plena semajno de februaro, komence de dimanĉo, estas Semajno de Internacia Amikeco, kiun iniciatis esperantistoj, sed kiu jam transiris la limojn de Esperantujo. En tiu semajno oni sendas leterojn kaj salutajn poŝtkartojn al siaj eksterlandaj amikoj, oni plifirmigas siajn internaciajn ligojn. Kaj estas nun bona momento, por ke ni priparolu problemojn de internacia korespondado. En la paŭzo bonvolu rigardi ekspozicion de leteroj, kiujn ricevis niaj klubanoj el la tuta mondo.

*Marjorie Boulton*¹⁰

UNUAJ PLUMAMIKOJ

Se ni deziras, ke perletero amikeco sukcesu kaj daŭru, helpas tia ĝenerala principo: ni penu plifeliĉigi la alian, — do ni konsideru la alian. De tiu principo povas sekvi almenaŭ kelkaj konsiloj.

Amiko ofte petas de amiko ian servon; reciprokaj servoj kontribuas al amikeco; sed ne tro frue petu ion de nova plumamiko; kaj ne petu tre komplikajn servojn aŭ kostajn objektojn. Multaj esperantistoj starigas korespondajn rilatojn, kies ĉefa celo estas interŝanĝoj de ŝatokupaj objektoj. Tiam, ambaŭ atendas petojn kaj donacojn; ili nur zorgu, ke la interŝanĝoj estu pli-malpli justaj kaj vere reciprokaj.

Por respondi al letero, unue relegu ĝin atente. Estas nur dece, gratuli pri iu sukceso, kondolenci pri iu malfeliĉo, komenti pri iu interesa novaĵo. Kaj nepre ne forgesu danki la amikon pro iu komplezo. Ankaŭ respondu al demandoj; kial la korespondanto faris demandon, se li ne deziras informiĝi? Kutime eblas respondi al demandoj; sed en kazo malfacila, almenaŭ

klarigu, ke vi ne povas respondi; tiam la korespondanto scias, ke vi almenaŭ rigardis lian demandon. Ne faru demandojn, kiuj povas ŝajni al via korespondanto ĝenaj.

Penu ĉiam meti oleon kaj ne sablon inter la radojn de rilato. Laŭdu ion laŭdindan; trovu ion afablan por diri. Hezitu kritiki; se vi vere devas ion kritiki, serĉu modestan, taktan, kiel eble malplej vundan metodon fari tion. Se vi malsamopiniis pri io grava, tio ne necese detruas amikecon. Dume, kiam ni diskutas, ni memoru, ke ni, letterskribantoj, similas ne al generaloj, sed al diplomatoj.

Pli bone skribi: "Ŝajnas al mi, ke..." ol "Ĉiuj scias, ke..."; pli bone: "Ĉu estas eble, ke..." ol "Estas certe, ke..."; pli bone: "Eble estos interesa al vi alia opinio..." ol "Vi tute malpravas pri..."; pli bone: "En mia lando tamen oni sukcesis aranĝi, ke..." ol "En via lando oni daŭre praktikas la abomenan..." Ĝenerale, ni pli probable konvinkos per "Ĉu?" ol per "Fi!"

Kaj nia suferoplena mondo estas tiel dividita, ke ofte unu el la vere valoraj funkcioj de Esperanto kaj de esperanta korespondado, kiu ŝajnas unua-vide nur bagatela, estas, ke amikecoj eĉ iom banalaj kontribuas al monda konscio, ke neniuj popolo konsistas el vosthavaj demonoj aŭ el kruelaj militemuloj; iu ajn amika rilato kontribuas ion al sanaj sintenoj.

Ĉiokaze, plumamika letero devas havi unu kvaliton, por ke la amikeco daŭru kaj fortiĝu: ĝi estu interesa. Kaj oni skribu interesan leteron, strebante igi ĝin interesa ne nur al la skribanto, sed ankaŭ al la ricevonto. Do, ne tro detaligu ion pri modoj, kiuj tre interesas vin, al iu, kiun modoj ne interesas.

Oni ofte povas multon aldoni al la intereso de letero per ia skizo, eltondaĵo el gazeto, bildkarto, fotoĵo. Eble io el vialanda esperanta gazeto estos interesa, eble donos ideon por nova agado aliloke? Kredeble, tio, kio estas plej interesa al via korespondanto, estas ĝuste tio, kio ne ekzistas en ties lando, kaj do por li aŭ ŝi estas ekzotika. Via folkloro, viaj naciaj receptoj, kostumoj, kantoj, proverboj, indiĝenaj floroj kaj bestoj, tradicioj, lokaj moroj kaj kutimoj, eble, ŝajnas al vi banalaj, sed al alilandano estos novaj, interesaj. Demandu, kiuj

temoj estos interesaj al via korespondanto; menciuj viajn proprajn interesojn.

Provu trovi korespondadan ritmon, kiu taŭgas al ambaŭ; kaj memoru, ke foje, kiam letero ne eblas, poŝtkarto indikas, ke ni daŭre pensas pri malproksima amiko. Kaj se vi mencias, ke vi enmetas ion, nepre ne forgesu lastmomente enmeti ĝin.

Marjorie Boulton. Faktoj kaj fantazioj. — Rotterdam, 1984, p. 87-90. Mallongigita.

— La konsiloj estas tre utilaj, kaj, kredeble, ĉiu trovis por si ion en tiu ĉi rakonto.

— La romano de Vladimir Varankin estas unu el la ĉefverkoj de la originala Esperanto-literaturo. Eldonita en Amsterdamo en 1933, ĝi havis la duan eldonon en Danlando en 1977 kaj la trian en la Moskva eldonejo "Progreso" en 1992. Aperis krome ĝia angla traduko. La romano estas kvazaŭ fotobildo de la tiamaj socioj en Sovet-Unio kaj Germanio. Kun miro oni vidas, ke Germanio staris ĉe la sojlo de revolucio, kiun (kiel ni scias nun) malhelpis la politiko de Stalin, ĉar li malebligis komunan batalon de komunistoj kaj aliaj laboristaj organizaĵoj. Rezulte en Germanio venkis la faŝismo. El la prezentita bildo de Sovet-Unio oni vidas, kiel el la revoluciaj atingoj restis ĉefe nur revoluciaj frazoj. Estas mirige, ke la nomo de Stalin eĉ unufoje ne estas menciita en la libro. La fragmento, kun kiu ni tuj konatiĝos, transportas nin en la atmosferon de la tiamaj politika situacio. Oni provu imagi, kiel en tiu situacio povis agi esperantistoj.

Vladimir Varankin¹¹

METROPOLITENO

Kvankam Popov sendis sciigon pri la partikunveno al ĉiu, duono de la ĉelo tamen diskuris. Popov tintigis la sonorilon.

— La ĝenerala kunveno estas malfermita. La unua — raporto pri la internacia situacio. La raportonto — kamarado Vinokurov. La dua — demando pri kontraŭpartiaj agoj de kamarado Ivagin.

Vinokurov aliris la tablon kaj metis sur la randon areton da blankaj folietoj.

— Mia parolo estos mallonga, sed mi avertas, ke tamen mi bezonas ne malpli ol horon kaj duonon.

— Donu al li unu horon! — kriis iu el la postaj vicoj.

— Bone, ni voĉdonu! Kiu estas por unu horo?

Okazis¹², ke ĉiuj unuanime estis por unu horo.

— Ili furioziĝis — diris Popov kolere — enkadriĝu iamaniere!

Vinokurov estis parolanta sen haltoj, glate, laŭte, sed treege rapide. La aŭskultantoj provis kapti la vortojn, streĉis vid- kaj aŭdosenton, eltiris la kapojn, sed laciĝante kaj nenion komprenante, baldaŭ ĉesis aŭskulti.

Post kiam li finis, la demandoj kaj dezirantoj diskuti ne troviĝis. Popov fulmrapide tralegis la rezolucion, traglutante nelegeblajn lokojn, kaj transiris al la dua demando. En la ĉambro ekregis tomba silento. Ŝipova trankvile leviĝis de sia loko:

— Ni estas parolontaj, kamaradoj, pri la membro de l' partio Ivagin! — diris ŝi. — Ĉiuj ni bone konas kamaradon Ivagin. Nenio malbona estas direbla pri li, kiel la homo. Laboras li ĉi tie delonge kaj sufiĉe honeste. Sed, jen malfeliĉo, kamarado Ivagin ne ŝatas kelkajn el niaj gvidantoj. Kamarado Ivagin en ĉiuj elpaŝoj kontraŭ estraro de la ĉelo kaj aparato motivigas tion per la personaj, egoistaj plej malŝatindaj kaŭzoj. Per kio alia oni povus klarigi la sisteman elserĉadon de difektoj en laboro de niaj kamaradoj kaj ilian ŝveligadon en artikolaĵoj? Komence li estis presiganta tiujn en nia murgazeto, uzante kunlaboradon de senpartia redaktoro Zorin, kaj nun li direktas ilin eĉ al la moskva laborista gazetaro! Tiajn metodojn uzas, kamaradoj, neniu alia, krom trockianoj!¹³ Jes, jes, mi prenas sur min plenan respondecon por ĉi tiuj vortoj kaj asertas, ke nur malamiko de l' partio¹⁴ povas agi tiamaniere! Ĝi ne estas batalo kontraŭ mankoj, ĝi estas batalo kontraŭ partiorganizo!

Malantaŭe komenciĝis bruado. El diversaj vicoj aŭdiĝis aplaŭdoj. Al ili respondis indignaj krioj:

— Mensogo! Ivagin ne estas trockiano!

— Nia kamarado! Ni lin konas!

Serebrovskij prenis la sonorileton:

— Kamaradoj! Vi neniam povas garantii, ke via najbaro ne estas trockiano! Ili laboras inter ni ĉiuminute!

— Do, jen, kamaradoj! — daŭrigis Zoja. — Inter vi jam ekzistas pacema rilato al tiaspecaj trockiismaj elpaŝoj. Neniu alia, kiel Trockij, kulpigas nin pri renaskiĝo¹⁵ kaj putrado. Ĉu ne tion alkantas Ivagin? Sed vi defendas lin... La ĉelestraro estis pridiskutanta la demandon pri Ivagin kaj decidis lin el la partio eksigi.

— Kiu deziras paroli? — demandis Popov, subrigardante la aŭskultantojn. Sed tiuj silentis. — Temas pri tio, kamaradoj, ke ni havas la aferon kun la plej malutila elemento kaj tiel plu. Ni havas la aferon kun fuŝagitisto! La fuŝagitisto neniam estas kontenta! Ĉe l' socialismo li ankaŭ estas malkontenta! La fuŝagitisto kalumnias pri la honestaj laborantoj, kiuj, oni povas diri, la tutan animon kaj tiel plu! En nia epoko la fuŝagitisto estas kontraŭsoveta elemento!

— Permesu paroli! — diris Nikolajev.

— Pli mallonge.

— Mi estas kontraŭ la eksigo de Ivagin el la partio. Mi ne vidas kaŭzojn por akuzi lin pri trockiismo kaj fuŝagitado. Ivagin estas labkoro¹⁶. Li malkaŝas negativajn. Oni ne rajtas organizi ĉasadon kontraŭ li...

Vladimir Varankin. Metropoliten. —
Kopenhago, 1977, p. 132-136.
Mallongigita romanfragmento.

— Tiel komenciĝis la epoko de totalismo. Ĝian esencon montras versaĵo, malgranda laŭ amplekso, sed granda laŭ enhavo.



La 1-a eldono de Metropoliteno

*Albert Goodheir*¹⁷

TOTALISMO¹⁸

“Konfesas mi, ke mi dum jaroj fie
perfidis kontraŭ ŝtato kaj parti!”
(se mi venkintus¹⁹, starus vi ĉi tie,
kaj vi konfesus same kiel mi).

Esperanta antologio: *Poemoj 1887-1981*. —
Rotterdam, 1984, p. 785.

— En la postsemajna kunveno ni aŭskultos novaĵojn de scienco kaj tekniko. Kaj ni renkontigos kun profesoro de matematiko el Svedio.

KOMENTARO

1. Obruĉev Sergej Vladimiroviĉ (1891-1965). Esperantistigis en 1907. Kunredaktoro de la gazeto “La Ondo de Esperanto” antaŭ la revolucio; fine de la 50-aj jaroj — gvidanto de Esperanto-klubo ĉe Leningrada domo de sciencistoj.

2. Bokarjov (Bokarev) Jevgenij Aleksejeviĉ (1904-1971). Esperantistigis en 1918. Vidu la tekston pri li en la leciono 14.

3. Tolstoj Lev Nikolajeviĉ (1828-1910) multfoje esprimis sin pri diversaj flankoj de la internacilingva problemo kaj mem kontribuis al disvastigo de Esperanto. Jen unu el liaj eldiroj: “La ofero, kiun alportos ĉiu homo, dediĉinte iom da tempo por lerno de tiu lingvo, estas tiel malgranda, sed la sekvoj — tiel grandegaj, ke oni ne povas ne fari tian provon”.

4. Majnov Vladimir Vladimiroviĉ (1871-?) — la unua konata korespondanto de Zamenhof.

5. Tanejev Sergej Ivanoviĉ (1856-1915). Esperantistigis en 1894. Du eltiraĵoj el lia taglibro: “29.04.1895. Vespere mi estis ĉe Lev Nikolajeviĉ (Tolstoj). Ni interparolis pri la malpermeso de la gazeto “Esperantisto”. L.N. diris, ke li volas klopodi pri permeso de la gazeto, por ke ĝin eldonu *Posrednik*”. — “30.04.1898. Ni tagmangis: Juŝa, Kola kaj la esperantisto Fedorovskij, intencanta presi miajn Esperantajn romancojn” (S. Tanejev. *Dnevnik. Kniga pervaja. 1894-1898*. — Moskva, 1981).

6. Saŝarov Aleksandr Andrejeviĉ (1865-1942). Esperantistigis en 1904. Multe kunlaboris kaj korespondis kun Zamenhof.

7. En la festo, kiun organizis en sia hejmo en 1878 la gimnaziano Ludoviko Zamenhof okaze de la naskiĝo de la internacia lingvo, partoprenis lia amiko Leo Wiener /Vínér/, kies filo Norbert Wiener (1894-1964)

estis kreinto de la kibernetiko. Akademiano Aksel Ivanoviĉ Berg (1893-1979), kiu iniciatis meze de la 50-aj jaroj esplorojn pri kibernetiko en Sovet-Unio, estis arda apoganto de Esperanto.

8. En 1949 Sergej Miĥalkov publikigis la teatraĵon "Ilja Golovin" (premio de Stalin en 1950), en kiu li ĵetis koton sur Esperanton ("ĝin elpensis senpatrujuloj"). Post preskaŭ 40 jaroj, jam en la epoko de la perestrojko, Miĥalkov deklaris en granda kunveno de verkistoj: "Mi eĉ fieras pri tio, ke mi balbutas en la rusa lingvo, sed ne en la lingvo Esperanto".

9. Estas konataj profesiaj herooj de bibliotekistoj, ligitaj kun Esperanto. En la ŝtata biblioteko "Lenin", post transdono de ĉiuj Esperanto-libroj en unu ekzemplero por speciala (sekretigita) konservado, oni dokumentis neniigon de la ceteraj libroj; sed fakte multaj el ili estis kaŝitaj kaj revenis al la leganto post dudek jaroj. La direktoro de la universitata biblioteko en Odeso metis en kaŝejon la valoregan libraron de la Odesa Esperanto-societo. Ĝi restis en la kaŝejo dum la germana okupado kaj en la tempoj de la Stalin-a teroro kaj nun estas uzebla por ĉiu deziranto.

10. Marjorie Boulton /Márgori Bóúilton/. Naskiĝis en 1924. Angla pedagogo kaj verkistino. Esperantistiĝis en 1949. Aŭtoro de multaj libroj de versaĵoj, teatraĵoj, noveloj. Kelkaj el ŝiaj libroj: "Zamenhof, aŭtoro de Esperanto", "Faktoj kaj fantazioj", "Cent ĝojkantoj", "Okuloj", "Eroj".

11. Varankin Vladimir Valentinoviĉ (1902-1938). Esperantistiĝis en 1919. Direktoro de la 2-a Moskva pedagogia instituto de fremdaj lingvoj. Arestita kaj ekzekutita pro akuzo pri partopreno en faŝisma spiona organizo "Unia centro", ekzistinta en USSR sub masko de esperantista organizo. Rehabilitita en 1957 kiel senkulpa.

12. prefere: evidentigi.

13. Trockij Lev Davidoviĉ (1879-1940). Kunlaboranto de Lenin, popola komisaro pri eksterlandaj aferoj, poste pri militaj aferoj, organizinto de la Ruĝa Armeo. Pro tio ke li estis politika kontraŭulo de Stalin, la lasta ellandigis lin kaj aranĝis lian murdon. Stalin organizis

amasan teroron kontraŭ veraj kaj ŝajnaj trockianoj. Pri trockiismo estis akuzitaj la aŭtoro de la libro Varankin kaj la heroo de la libro Ivagin.

14. Poste aperis la esprimo "malamiko de la popolo".

15. Prefere: renegatiĝo.

16. Labkoro — laborista korespondanto de ĵurnalo.

17. Albert Goodheir /Gúdher/. Naskiĝis en 1912. Loĝas en Britio. Esperantistiĝis en 1967. Verkisto, eldonisto, redaktoro.

18. Totalismo — politika sistemo, en kiu la rajtoj de civitanoj estas forprenitaj de la ŝtato kaj en kiu estas unu partio.

19. estus venkinta.

LINGVA PRAKTIKO

Esperantaj memorigaj lokoj en Moskvo. Parto 1

1. Faru liston laŭ jena modelo: memorinda loko; adreso (nuna, iama); kio estas ligita kun tiu loko; dato (se eble).

2. Kial, laŭ via opinio, totalismaj reĝimoj malŝatas Esperanton kaj malhelpas agadon de esperantistoj?

Unuaj plumamikoj

3. Faru liston de rekomendoj por sukcesa internacia korespondado.

4. Skribu interesan leteron al via eksterlanda amiko pri diversaj temoj, uzante rekomendojn, donatajn en la teksto.

Metropoliteno

5. Donu trafan titolon al la romanfragmento.

6. Trovu la leksikon de oficiala karaktero.

7. Trovu la leksikon de akuzita karaktero.

8. Trovu esprimojn, karakterizajn por Popov.

9. Mallonge rerakontu la tekston per propraj vortoj en la nomo de Ivagin.

10. Eldiru vian rilaton al la priskribata evento.

Totalismo

11. Klarigu la sencon de la versaĝo.

12. Kion vi preferas: totalismon aŭ demokration? Kial?

13. El la sekvaj vortoj formu novajn vortojn, aldonaante *-inda* al iliaj radikoj:

Aŭskulti, frakasi, mencii, konsideri, indiki, laŭdi, komenti, kondolenci, abomeni, skizi, defendi, garanti, akuzi.

Faru vortkunojn kun tiuj vortoj (ekzemple: ĉasinda besto).

14. Finu la frazojn:

Eĉ kvar piedoj de ĉevalo ĝin ne savas de Akvo kura — akvo Kara estas dono en minuto de Kia ago, tia La plej bona kuracisto estas la Por ĉiu plezuro devas esti Sen mono oni estas nulo, kun mono —... . Ju pli oni babilas, des pli oni al si En ĉiu objekto troviĝas

15. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Laŭta — laŭda, firma — firmaa, teruro — teroro, mencio — menso — mensogo, koncerti — koncerti — koncentri.

16. Laŭ la donitaj modeloj, elpensu frazojn kun transformoj: Mi venis diri (*por diri*) al vi la veron. Li promesis fari (*ke li faros*) tion rapide. Mi bedaŭras pri mia ago (*pri tio, ke mi tiel agis*).

17. Faru kelkajn frazojn laŭ la modelo:

Kiam ...o ...is, ...o ankoraŭ ne ...is.

18. Temo por diskuto aŭ rakonto: Komplezema malsaĝulo estas pli danĝera ol malamiko.

19. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Laŭ kiu adreso en Moskvo loĝis Ludoviko Zamenhof?

b) Kiun gazeton kunredaktis Sergeo Obruĉev?

c) Diru la vivodatojn de Eŭgeno Bokarjov.

ĉ) Kie estas konservataj leteroj de Lev Tolstoj, koncernantaj Esperanton?

d) Kiu estis la unua konata korespondanto de Zamenhof?

e) Kiu fama komponisto skribis taglibron en Esperanto?

f) Nomu ĉefajn agadirektojn de Aleksandro Saŝarov.

g) En kiu jaro estis fondita SEU?

ĝ) Kiuj du diktatoroj frakasis la plej fortajn landajn Esperanto-movadojn?

h) Kiam okazas la Semajno de Internacia Amikeco?

ĥ) Kiam kaj kie estis eldonita la romano "Metropoliteno"?

i) En kiu lando loĝas Albert Goodheir?

20. Faru kelkajn variantojn de reklamo (oficiala, serioza, multpromesa, gaja, amuza ktp) pri malfermo de nova Esperanto-kurso.

LECIONO 5

— Hodiaŭ ni daŭrigas la ekskurson kaj vizitos kelkajn lokojn, kiuj memorigas pri gravaj eventoj en la postmilita Esperanto-movado. La nova epoko sekvis la 20-an Kongreson de KPSU¹, kiu malfermis la vojon al la demokratiigo en la lando.

ESPERANTAJ MEMORIGAJ LOKOJ EN MOSKVO

Parto 2

En la bulvaro Gogolevskij, 14, situas Centra ŝaka klubo. En ĝi somere 1957 okazis internacia renkontiĝo de esperantistoj kadre de la 6-a Tutmonda Festivalo de junularo kaj studentaro. Ĝi estis sola aranĝo, kie oni efektive interkomprenis, kaj tute sen tradukistoj. Post la festivalo en Moskvo kreiĝis tre agema junulara Esperanto-klubo "Fajrero", kiu vivis nelonge, sed donis bonegan ekzemplon de organizita laboro².

En la kulturdomo de medicinistoj (strato Gercen, 19) funkciis Moskva Internacia Esperanto-klubo, kiu dum dudeko da jaroj estis centro de la landa Esperanto-vivo. Antaŭmilitaj veteranoj de la movado, restintaj junaj anime, dediĉis siajn fortojn al la amata afero³. Viglan vivon vivis ankaŭ la junulara grupo, kiu preferis renkontiĝi en privataj hejmoj. En la klubo ofte estis gastoj el diversaj urboj kaj el eksterlando, okazadis interesaj prelegoj kaj koncertoj. Poste la klubo kelkfoje translokiĝis, ricevis la nomon "Bokarjov" kaj nun troviĝas en la kulturdomo de la uzino "Kaŭĉuko" (strato Pluŝĉiĥa, 64).

Ĉiuj konas la Rusian ŝtatan bibliotekon (antaŭe la ŝtatan bibliotekon "Lenin"; strato Vozdviĥenka, 3), sed ne ĉiuj scias, ke ĝi posedas valoregan kolekton de Esperanto-libroj, kies titoloj troviĝas en la Ĝenerala katalogo. En la Fremdlingva biblioteko (strato Uljanovskaja, 1) super la katalogo de latin-literaj libroj estas skribite: "De la albana ĝis Esperanto". La Esperanta

librokolekto ĉi tie estas riĉa kaj interesa. Lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto en tiu ĉi biblioteko okazis granda ekspozicio. Esperanto-literaturo el tiuj du bibliotekoj estas pruntebla per interbiblioteka abono.



Malantaŭ la muzeo de belartoj "Puŝkin", en la strato Marks-Engels staras malnova domo N^o 1/14. Parton de ĝi nun okupas Instituto de rusa lingvo, kie laboras unu el la ĉefaj organizintoj de la Festivala Esperantorenkontiĝo, nun profesoro Viktoro Grigorjev, konata lingvisto kaj interlingvisto, kiu dum pluraj jaroj estis membro de la Akademio de Esperanto. Sed antaŭe ĉi tie situis Instituto de lingvoscienco, kiu, dank' al profesoro Eŭgeno Bokarjov, dum multaj jaroj estis tutlanda kaj tutmonda pilgrimejo de specialistoj pri interlingvistiko kaj esperantologio kaj de aktivaj esperantistoj. En 1963 ĉi tie fondiĝis interlingvistika grupo, kiu aranĝis interesajn seminariojn kaj diskutojn. En 1980 la Instituto de lingvoscienco translokiĝis en la domon N^o 1/12 en la strato Semaŝko, ĉe la strato Vozdviĥenka. La aktiveco de la interlingvistika grupo malpliĝis, sed, aliflanke, ĉe ĝi kreiĝis aspiranturo⁴ kun la sciencaj gvidantoj doktoroj


de filologiaj sciencoj Mahometo Isajev kaj Sergeo Kuznecov. Kelkaj personoj jam sukcese defendis disertaciojn pri interlingvistiko kaj esperantologio kaj ricevis sciencon gradon.

En la strato Moŝovaja, 8, kontraŭ la Rusia ŝtata biblioteko troviĝas modesta kafeterio. En ĝi fine de decembro 1965 tiam junaj Vladimiro Samodaj kaj Boris Kolker pridiskutis ĉe kafotaso la ideon de Anatolo Gonaĉarov kaj decidis pri fondo de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado). SEJM dum dek tri jaroj kunordigis kaj evoluigis diversflankan agadon de Esperanto-kluboj, precipe junularaj. Ĝia pleja merito estis regula arango de amasaj SEJToj (Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj) kun riĉa programo kaj SEJM-Konferenco. Trafi la Konferencon estis afero de honoro, oni aspiris ĝin, malgraŭ tio ke la partoprenantoj alvenadis proprakoste kaj dum siaj ferioj. La Konferencoj okazadis en la spirito de demokratio kaj glasnosto (publikeco, malkaŝiteco, alireblo por publika konatiĝo kaj pridiskuto). Elektaj de SEJM-prezidanto estis aranĝataj kun kelkaj kandidatoj, kiuj, cetere, ne rajtis ĉeesti la pridiskuton kaj elektojn por ne influi ilin. Rakontante pri tio, esperantistoj tiam ŝercis: "Burokratismon ni dume ne havas". Ve, ili ne antaŭvidis, ke tiu malsano ne estas evitebla, precipe sub la kontrolo de la ŝtato. SEJM famiĝis ankaŭ pro interkluba konkurado, regionaj renkontiĝoj, belartaj konkursoj, bonaj informiloj, internaciaj ligoj. Ĝi kreskigis aron de novaj, modernstilaj aktivuloj⁵. Kaj ĝenerale, la historio de SEJM iĝis bela, romantika legendo, eble pro tio, ke ni estis tiam junaj kaj liberaj, plenaj de optimismo kaj energio kaj ne tre sentis la grizecon, kiu en la periodo de stagnado sub Breĵnev kovradis la tutan landon.

En la strato Vozdviĵenka, 14, troviĝas Unio de sovetiaj societoj por amikeco kaj kultura ligo kun eksterlando (konata sub la rusa mallongigo SSOD), kie en 1962 estis kreita Esperanto-komisiono, frukto de la Ĥruŝĉova degelo. La ĉefaj direktoroj de ĝia laboro estis turistaj grupoj kaj kelkpersonaj delegacioj al Universalaj Kongresoj de Esperanto (unufoje en 1963, Sofio), socipolitikaj kaj beletraj libretoj kaj almanakoj "Por la paco", Esperan-

to-suplementoj al la gazeto "Moscow news". Sed la komisiono estis malproksima de la esperantistaro, ne interesiĝis pri ĝiaj zorgoj kaj bezonoj.

SEJM plurfoje faris provojn oficialigi la movadon, sed ne trovis komprenon "supre", ankaŭ SSOD tion tre kontraŭis. Sed kiam la agado de esperantistoj iĝis videbla, "supre" oni maltrankviliĝis kaj decidis krei por ĝi kadron. Rezulte oni komisiis al tri potencaj sociaj organizoj SSOD, Centra Komitato de komsomolo kaj Tutlanda centro de sindikatoj fondi Asocion de Sovetiaj Esperantistoj (ASE), iom helpi ĝin, sed precipe kontroli.



Kaj jen la 14-an de marto 1979 en la luksa palaco "Domo de amikeco kun alilandaj popoloj" (strato Vozdviĵenka, 16) okazis fonda konferenco de ASE, kie estis donitaj grandaj promesoj. Tamen reale ĉio estis multe pli modesta: la eldona agado de SSOD ĉesis (kvankam ekaperis politikaj broŝuroj en la eldonejo APN), aperis unu lernolibro kaj reaperis unu vortaro, turistaj grupoj kaj eĉ delegacioj al Universalaj Kongresoj ekde 1984 ne plu estis sendataj (krom 1987), la promesita aligo al Universala Esperanto-Asocio (UEA)⁶ ne okazis, la dek-

larita jura memstareco de ASE restis surpapera, la enlandaj bezonoj (tendaroj, klubejoj, instru-raĵta ekzameno ktp) estis malatentataj. Vere utila frukto de ASE estis ĝia "Informa bulteno"⁷, sed ankaŭ ĝi aperadis kun malfruo. Komsomolo kaj sindikatoj tuj deflankiĝis, sed SSOD penis gvidi la esperantistojn per sia kutima komanda-burokratisma stilo: anstataŭ zorgi pri amikeco kaj kulturaj ligoj helpe de Esperanto, ĝi elsertadis "politike nematurajn personojn" enlande kaj "ideologiajn diversiojn"⁸ eksterlande. Ĝi penis, ke en la turistajn grupojn al Esperanto-kongresoj trafu precipe membroj de la Komunista partio kaj komsomolo. Al tio aldoniĝis nekompetenteco de la altrudataj respondecaj sekretarioj de ASE. Komprenoble, inter esperantistoj, kutimaj al demokratia kaj glasnosta stilo, kreskis malkontento⁹. Kaj intertempe en la landon venis la perestrojko. Vivi malnovstile iĝis neeble.

La 24-an de januaro 1989 en kulturdomo laŭ la adreso Volhionka, 13 (kie funkciis vigla Esperanto-klubo) la tutlanda konferenco de esperantistoj taksis la laboron de ASE-estraro nekontentiga kaj decidis surbaze de ASE refunkciigi la memstaran Sovetrespublikaran Esperantistan Union (SEU). La agado de la nova SEU ankoraŭ ne estas historio, pro tio nun ni ne parolos pri ĝi. Ni nur menciu, ke en la unuan SEU-Prezidion estis elektitaj ĉiuj tri fondintoj de SEJM kaj kvar iamaj prezidantoj de SEJM kaj ke post duonjaro SEU aliĝis al UEA. Lige kun la disfalo de USSR, la 10-a Kongreso de SEU la 28-an de decembro 1991 decidis fondi surbaze de SEU Rusian Esperantistan Union (REU), kiu konservis sian teritorion de agado, same kiel la membraron kaj la Estraron.

Por la ekskursata teksto estas parte uzitaj la artikoloj de Leo Vulfoviĉ, publikigitaj en "Informa bulteno de ASE", 1987, N^o 4, p. 12-14; 1989, N^o 6, p. 28; "Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj", 1989, N^o 1-2, p. 57-58; "Impeto '89", Moskvo, eldonejo "Progreso", 1990, p. 93-97.

— Jen ni revenis post la ekskurso kaj daŭrigas nian kunvenon, kiun ni dediĉas al la Internacia tago de virinoj, okazonta la 8-an de marto. Virinoj ĉiam ludis gravan rolon en Esperantujo, komencante de Klara Zamenhof¹⁰, la edzino de la aŭtoro de Esperanto, kiu multege helpis lin. Inter ordinaraj Esperantujo virinoj, eble, estas eĉ pli multaj ol viroj, kvankam inter gvidantoj ili ne tiel oftas. Hodiaŭ ni konatiĝos kun verkoj de tri virinoj, kiujn prezentos niaj aktorinoj Raisa Voloŝina, Svetlana Vaĉulina kaj Olga Viktorova.

*Hilda Dresen*¹¹

NE CEDU!

Se la sufer' multvizaĝe grimacas,
la malespero vin kapti minacas,
restu en stato atenda, ne cedu,
certe troviĝos eliro, nur kedu!
Eble penseto savanta subite,
kvazaŭ hazarde kaj neatendite
en la anim' turmentita ekĝermos,
la malesperon radike ekstermos.
Kredu: nenio ja daŭras eterne,
Sangas kaj floras la koro alterne.

Hilda Dresen. Norda naturo. —
La Laguna, 1967, p. 135.

*Nadija Andrianova*¹²

GLORKANTO AL ESPERANTO

Ho, mia kara lingvo Esperanto,
miraklo vera kaj neripetbla,
ŝlosil' magia, kiu malfermadas
de ĉiuj landoj, kontinentoj pordojn,
kaj same — de la bonaj homoj korojn.

Vi, mia amo, mia vivo kaj konsolo,
multfoje savis min de malespero
dum krudaj, tristaj, dolorigaj horoj,
kiam mi pensis min jam forlasita plene
de ĉiuj karaj kaj amataj homoj,
kaj vivo ŝajnas perdi celon kaj valoron...

Nur sola vi dum tiuj tristaj horoj
helpadis min retrovi ekvilibron
animan kaj plenigi kor-vakuon
per siaj sonoj, melodiaj, belsonoraj,
kaj per ideoj plej humanaj, kiuj
kunigas la bonvolajn pac-amantojn
el ĉiuj anguletoj de l' planedo
en unu grandan rondon familian¹³.

Ho, kara, nobla lingvo Esperanto,
mirakla ilo por interkompreno!
Ĝis lasta spiro kun fervoro
mi gloros, benos vin
el tuta mia koro...

Nadija Hordijenko-Andrianova. *Vagante tra la
mondo maltrankvila.* — Budapest, 1987, p. 63.

*Emilija Lapenna*¹⁴

SOLECO

Parto 1

Intervuoj

(Rolas nur unu aktorino, sed ŝi ĉiam devas transformiĝi al la intervjuita virino kaj per sia rolado esprimi la karakteron konkretigintan en la teksto. Kostumado estu praktika, tiel ke la aktorino aŭ per rapida surmeto de kelkaj vest-objektoj aŭ per formeto de ili pli-malpli ankaŭ laŭ aspekto identigu kun la aktorata virin-tipo).

SCIENCISTINO:

Rapide, rapide, nu jes, mi akceptis, ke vi intervjuu min, sed mi petas rapide, ĉar vi ja vidas kiom da paperoj estas ĉirkaŭ mi, ĉion tion mi devas solvi, aŭ tralegi aŭ korekti. Do, rapide, mi petas. Kion? Ĉu mi suferas pro soleco? Kara ĵurnalistino, ĉu vi bone fartas? Mi kaj soleco? Kio estas tio? Vivi sen edzo kaj infanoj? Ho, kara, kaj kion mi faru en mia situacio kun edzo kaj infanoj? Ili terure ĝenus min. Eĉ dekonon de tio, kion mi atingis, mi ne sukcesus, se ia edzo molestus min per siaj postuloj. Ne, kara, mi havas mian laboron, dudek kvar horojn en la tago estas tro malmulte por mi, mi bezonas almenaŭ 40 horojn. Kion, kion vi demandas? Komprenoble, ke mia laboro kontentigas min kaj komplete plenigas mian vivon. Ne, estimata ĵurnalistino, neniam mi havis tempon rimarki, ke aliaj havas edzon kaj infanojn, ne, mi havas miajn sciencajn verkojn, mian scienca renomon, mian rangon de akademiano, jes, jes, tio komplete riĉigas mian vivon, kaj la rakonton pri solecaj nejunaj virinoj elpensis sentimentalaj ĵurnalistoj. Jes. Ĉu vi opinias, ke en la vivo de virinoj nur viroj povas ludi gravan rolon? Kara, kie vi vivas? Mi vidas, ke por vi egaleco de viroj kaj virinoj restis nur frazo. Kaj nun, adiaŭ, laboratoriaj eksperimentoj atendas min, jes, salutu miaflanke ĉiujn virinojn, por kiuj egaleco kun viroj ne estas nura frazo. Jen, sufiĉe!

VIDVINO:

Kial vi venis? Kial vi elektis ĝuste min? Dudek jarojn mi rifuzas kontakton kun tiu besta, abomena mondo, kiu fortiris de mi miajn filon kaj edzon. Jen, tio estas ilia lasta fotografiaĵo. La filo ridis kaj diris forirante: Ne zorgu, panjo, mi revenos. Neniam. Nek li, nek lia patro revenis. Ne, ne, mi malbone diris. Ĝis nun ili ne revenis, sed kiu scias, eble ili revenos? Eble iaj brutaj homoj ne permesas al ili skribi al mi, ho, ekzistas multaj fiaj homoj. Ne, mi ne estas sola, ĉu vi ne vidas, ke ili estas ĉi tie? Vestoj pendas en la ŝranko, ĉiuj paperoj

sur la skribotablo de mia filo atendas lin. Nenion mi permesis forporti. Eble li bezonos ankaŭ tiujn kajerojn, ili estas plenplenaj de iaj notoj, nu, kiu scias, tiuj notoj povus helpi al li ankaŭ nun, post dudek jaroj. Ne, sinjorino, mi ne estas sola, ĉu vi ne vidas, kiom da laboro necesas ĉiutage foruzi por ordigi ĉiujn tiujn aĵojn? Ja ĉio devas esti en ordo, kiam ili revenos. Ĉu mi permesu, ke ili trovu malordon? Ne, ili trovos ĉion ĝuste kiel ili lasis, sen polvo, ne ĉifita. Ho, kiom da laboro, kaj vi demandas min, ĉu mi sentas solecon? Ne, ne, ne. Ili revenos, ĉu vi komprenas, mi devas zorgi, ke ili estu kontentaj, ke ili trovu nenian ŝanĝon, ne-ni-an. Eble, eble nur mi ŝanĝiĝis? Jes, mi ne havis tempon zorgi pri mi, estis tiom da laboro en la ĉambro de mia filo kaj kun la ilaro de mia edzo, ho, li estis malsane reagema, se lia ilaro ne brilis pro pureco. Jes, ĉu mi ŝanĝiĝis? Jen kian kromlaboron vi kaŭzas al mi. Kial vi venis? Vi atentigis min pri mi mem, kaj mi, mi zorgis nur pri ili, ke ĉio ilia estu en ordo. Iru, mi ne havas tempon, mi ne volas pensi pri mi. Mia vivo apartenas al ili. Iru. Mi ne bezonas vin, nenium mi bezonas. Solece? Vi, vi bruti virino, kial vi puŝas vian nazon en mian vivon? Iru, mi ne estas sola. Iru, iru tuj, nenium mi bezonas el tiu brua, kruela mondo. Ne, ne (singulte krias) mi ne estas sola, ili venos, ĉu vi komprenas, ili venos, venos, venos (la lastaj vortoj estas laŭta plorego)!

AKTORINO:

Nu, ne pardonpetu, se vi jam hazarde enfalis en tiun ĉambron, envenu. Kiu vi estas? Ĵurnalistino, ĉu vi ĉasas min por intervjuo? Ne, min ne? Ha tiel, vi deziras intervjui nur solecajn personojn, kaj mi, kompreneble, fama aktorino, ne povas esti soleca. Ĉu tiel vi rezonas? Bone, bone, mi jam diris: ne pardonpetu. Vere, mi iom ripozas ĉi tie, atendante alvokon al la scenejo, sed mi jam diris al vi, eniru. Eble mi povus rakonti al vi pri la plej terura soleco, ne, ne, ne gapu tiel mire, jes, mi konas la plej teruran solecon — solecon en mezo de bruega aplaŭdo. Ĉio tondras ĉirkaŭ mi, kaj en mia koro

regas muta soleco. Kiam ĉiuj teatraĵoj lumoj estingiĝas, publiko foriras, kurteno falas, tiam, tiam, se la dungita akompananto ne atendas min, mi eliras sola. Jes, jes, mi havas edzon, ankaŭ li estas aĉetita, mi devas havi edzon kaj mi aranĝis la aferon kun tiu homo. Jes, kara mia, ĉio en mia vivo estas arango. Mia aktorado amuzas publikon, ĝi donas al mi monon kaj aplaŭdon, nenion alian. Miaj kolegoj donas al mi envion kaj subfoson, nenion alian. Vi, ĵurnalistoj, donas al mi publicon, tio efikas al la eldonkvanto de viaj gazetoj kaj tio kaŭzas al mi ricevon de multegaj leteroj, al kiuj respondas mia pagita sekretario. Jes, jes, multon mi havas. Monon, famon, mondkonatecon. Ene de ĉio tio mi estas tute, tute sola. Kaj kedu al mi: ne ekzistas pli terura soleco ol senti sin sola inter krianta kaj aplaŭdanta homamaso. Ĉu sufiĉe por via artikolo? Mi petas prisilenti mian nomon kaj eliru, lasu min.

— La dua parto de la teatraĵo “Soleco” estos prezentita post du semajnoj.

— En la post-semajna kunveno okazos seminario pri la temo “Esperanto en scienco”. Ni aŭskultos pri Esperanto-novajoj. Ni vidos ekspozicion de esperantaĵoj, eldonitaj en Anglio.

— Hodiaŭ post negranda paŭzo okazos te-trinkado, dum kiu la viroj de la klubo gratulos la virinojn okaze de la festo. Ni havos eblon danci kaj ludi. Agrablan vesperon!

KOMENTARO

1. La raporto de Nikita Sergejeviĉ Ĥruŝĉov (1894-1971) en la 20-a Kongreso de KPSU (Komunista partio de Sovet-Unio) en 1956 malkovris amasajn reprezaliojn, kiuj havis lokon dum la regado de Stalin.

2. Inter la aktivularo de “Fajrero” estis Vladimiro Korĉagin, Mikaelo Giŝpling, Ludmila Bokarjova, Raisa Goldberg, Julia Sergejeva, Leo Vulfoviĉ, Vera Zlotnikova, Vladimiro Priŝekin, Irena Smirnova.

3. Inter la plej meritplenaj veteranoj estis Eŭgeno Bokarjov, Isaako Ĥoves, Ivano Sergejev, Konstanteno Gusev, Sergeo Sariĉev, Nikolao Ritjkov, Davido Armand, Eŭgeno Salnikov, Nikolao Danovskij, Nina Nikiŝorova.

4. Aspiranturo — formo de preparado de sciencaj laborantoj.

5. El SEJM-aktivuloj ni nomu kelkajn: Vitaŭto Ŝilas, Viktoro Aroloviĉ, Demetro Cibulevskij, Aleksandro Melnikov, Vladimiro Sapoĵnikov, Paŭlo Jegorovas, Ludmila Novikova, Nina Cvileneva.

6. UEA fondiĝis en 1908 kaj estas la plej grava internacia Esperanto-organizaĵo. Ĝiaj celoj estas jenaj: a) disvastigi la uzadon de Esperanto; b) agadi por solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikigon; c) plifaciligi ĉiuspecajn rilatojn inter la homoj; ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidaro kaj ankaŭ komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

7. redaktata de Nikolao Zubkov.

8. “*Diversio* — speco de subfosa agado — difektado, bruligoj kaj eksplodigoj de militaj, industriaj kaj aliaj objektoj, efektividigataj de agentoj de fremda lando aŭ de klase malamikaj organizaĵoj; *diversio ideologia* — metodo de propagando, konsistanta en misformado de faktoj, disvastigo de malveraj informoj kaj ideoj kun la celo misorienti homojn en sia lando kaj ekster ĝi”.

9. kiu plej klare manifestiĝis en kuraĝaj kantoj de Mikaelo Bronŝtejn.

10. Klara (Kejla) Zamenhof, naskita Zilbernik (1863-1924).

11. Hilda Dresen /Drézen/ (1896-1981). Estonino. Esperantistiĝis en 1913. Originalaj versaĵoj, precipe pri naturo. Multe tradukis el la estona, rusa kaj germana lingvoj.

12. Andrianova Nadija (Nadeĵda Nikolajevna). Naskiĝis en 1924. Esperantistiĝis en 1965. Profesia ukraina verkistino. Aŭtoro de kelkaj libroj, i.a. ukrainlingva libro pri Vasilij Eroŝenko.

13. Aludo al la versaĵo de Zamenhof “La espero”: “La popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian”.

14. Emilija Lapenna. Naskiĝis en 1910. Jugoslavino. Esperantistiĝis en 1931. Aŭtoro de pluraj etaj teatraĵoj. Dum longa tempo estis redaktoro de Esperantaj programoj de radio Zagreb.

LINGVA PRAKTIKO

Esperantaj memorigaj lokoj en Moskvo. Parto 2

1. Same kiel pri la parto 1, faru liston de Esperantaj memorindaj lokoj.

2. Prenu imagan intervjuon de malnova esperantisto pri la historio de Esperanto-movado en la lando.

Ne cedu!

3. Al kio alvokas la aŭtorino de la versaĵo?

4. Rakontu pri malfacila situacio, kiun vi iam trafis, kaj kiel vi trovis eliron el ĝi?

Glorkanto al Esperanto

5. Kial la aŭtorino gloras Esperanton? Kiuj apartaĵoj de Esperanto kaj de Esperanto-mondo faras ilin altiraj?

Soleco. Parto 1

6. Trovu leksikajn apartaĵojn de la sciencistino, vidvino kaj aktorino. Kiel la leksikaj apartaĵoj karakterizas tiujn virinojn?

7. Prezentu demandojn, kiujn faris la ĵurnalistino al tiuj tri virinoj, kaj iliajn respondojn (laŭ via imago, ne nepre laŭ la teksto).

8. La vortfarado en Esperanto estas ege riĉa kaj ofte ebligas krei vortojn, netroveblajn en la naciaj lingvoj. Kun helpo de *-in-*, *-edzin-*, *-id-*, *-idin-*, *-inid-* formu novajn vortojn (kiuj estas regulaj kvankam ofte nekutimaj) de la sekvaj vortoj:

Veterano, burokrato, agento, diktatoro, generalo, diplomato, demono, egoisto, renegato, komisaro, prezidento, kelnero, komizo, indiĝeno, oficiro, giganto, koko, vermo, cimo.

9. Elektu la vortojn kun la sufikso *-in-*:

Diino, difino, medicino, meblistino, kombino, kombistino, mastrino, maŝino.

10. Laŭ la modelo: *skribotablo* (= tablo por skribo), formu kelkajn vortojn.

11. Al la frazpecoj el la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu koleras,	finas malfrue.
Kiu komencas tro frue,	malsaton ne konas.
Kiu kritikis kuraĝe,	pli bonan lokon prenas.
Kiu panon donas,	mem agas malsaĝe.
Kiu pli frue venas,	tiu ne prosperas.

12. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Komisio — komisiono, taksio — takso, tondi — tondri, diversaj — diversiaj, prezidanto — prezidento — prezidio.

13. En la teksto "Soleco" trovu nekompletajn frazojn kaj restarigu ilian kompletan formon.

14. Laŭ la donitaj modeloj, elpensu frazojn kun transformoj:

Ni ekiros ĉe mateniĝo (tuj post la mateniĝo, tuj post kiam mateniĝos). Li ne venis pro malsano (ĉar li estis malsana). Mi akceptos vin frate (kiel frato).

15. Faru kelkajn frazojn laŭ la modelo:

Vere, mi ...as ...e, ...ante ...on.

16. Temo por diskuto aŭ rakonto: Kiu ne atentis la "se", tiu sentas la "ve".

17. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kiu grava internacia evento instigis renaskiĝon de Esperanto-movado en Sovet-Unio post la 2-a mondmilito?

b) Nomu kelkajn aktivulojn de la postfestivala Esperanto-klubo "Fajrero".

c) Nomu kelkajn Esperanto-veteranojn, kiuj aktivis en la 50-aj kaj 60-aj jaroj.

ĉ) En kiu moskva biblioteko okazis granda ekspozicio lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto?

d) En kiu moskva scienca institucio funkcias aspiranturo pri interlingvistiko?

e) En kiuj jaroj agis SEJM?

f) Kio estas SEJT?

g) En kiu jaro estis kreita Esperanto-komisiono de SSOD?

ĝ) Kiam okazis la fonda konferenco de ASE?

h) Kiam estis refunkciigita SEU?

ĥ) Kiu estas la plej grava internacia Esperanto-organizo?

i) Pri kiu fama esperantisto verkis ukrainlingvan libron Nadija Andrianova?

LECIONO 6

Emilija Lapenna

SOLECO

Parto 2

PUBLIKULINO:

Ha, kiu vi estas? Kion vi volas de mi? Ĉu mi ne rajtas sidi ĉi tie sola? O-ho, ĵurnalistino! Nu, ĉu vi ne havas pli saĝan okupon ol vagi nokte ĉirkaŭe? Timi atakon vi ne devas, nu eĉ hundo ne emus pliflari vin. Ha-ha, jes, impertinenta mi estas, en mia negoco ĝentileco ne ekzistas. Kion? Ĉu mi sentas min solece? Nun? Stulta virina kapo, mi jam laboris ĉi-nokte, mia lasta ulo elĵetis min el sia aŭtomobilo ĉi tie kaj nun mi iom ripozas. Baldaŭ tagiĝos. Ĉu mi ne rajtas ripozi? Jes, jes, jes, mi estas publikulino, kaj kion? Ĉu malmultaj tiel perlaboras sian panon? Gazetmusino, almenaŭ tion vi devas scii. Vi certe sukcesus nenion perlabori en mia profesio. Kial? Kial? Rigardu vin. Vi timigus ĉiun per tiu via serioza vizaĝo. Viroj ne bezonas seriozajn virinojn, ne. Nun mi tion bone scias. Viroj ne bezonas saĝajn virinojn, nek purajn, nek honestajn, ili entute ne bezonas virinojn, nur ilian korpon, aŭ nur nu, ha-ha-ha, ne la tutan korpon sed ha-ha. Ho, malfacile estas paroli kun vi, vi tiel serioze gapas. Kara mia krajonistino, ankaŭ mi estis iam honesta. Kaj kion mi havis de mia honesteco? Jes, mi havis mian knabon kaj kiam mi postulis geedziĝon, li diris, ke mi estas in-te-re-si-ta kaj ke honesta junulino ne devas esti interesita. Li donis al mi nek monon, nek donacojn, nek geedziĝon, nek atenton, nek belan vorton, nek kareson. Kiam mi kuraĝis sopiri pri io el tiuj belaj aferoj, mi estis "interesita". Doni ĉion kaj ricevi nenion, jen tio estis mia sorto en mia honesta epoko. Ĉu vi komprenas, vi kun via serioza vizaĝo? Mi estis traktita malpli bone ol publikulino: al stratulinoj viroj donas monon, la dion superan al ĉiuj

dioj, jes, monon, kaj kion mi ricevis de mia honesta knabo? Nenion. Ha, tiam klariĝis al mi, kaj mi forĵetis honestecon al mil diabloj kaj nun mi estas ĉi tie, sur tiu benko kun vi kaj via malbenita serioza vizaĝo kaj kun kelkaj miloj en mia taŝo. Perlaboritaj sen kraĵono kaj sen fosilo. Kuŝante, ha-ha-ha! Mi havas tarifon, ĉiu pagas ĝin kaj neniuj diras, ke mi estas "interesita". Ne, mi ne hontas. Hontu tiuj, kiuj pagas al mi, ili bone scias, ke mi kuŝas kun ili pro mono. Iru for kun tiu via timiga vizaĝo, ne, mi ne pentas, mi ne sentas solecon, mi ne havas tempon por tio, mi lacas, lacas, vi ja scias, ke noktaj laboroj estas duoble pagataj, kaj la miaj estas dekoble pagataj, ha-ha-ha, dekoble, dekoble (rikano).

BABILULINO:

Venu, venu, sinjorino, mi vidis, ke vi estis ĉe la najbarino. Mi scias, ke vi estas ĵurnalistino, nu venu, ankaŭ mi ne havas edzon, kial mi ne estu interesa por via artikolo? Nu, eniru, ho, mi ne longe okupos vin, sed mi certigas vin, ke mi estas interesa persono. Ho, fotu min, kia sensacio estos, kiam mia foto aperos en la gazeto! Jes, ne necesas demandoj, mi jam ĉion scias. Vi interesiĝas pri solaj virinoj, via temo estas soleco. Jes, mi diras al vi, ke estante sola oni ne devas sin senti solece. Pruvo estas mi. Antaŭtagmeze mi vizitas sinjorinon vid-al-vide, veninte hejmen mi atendas viziton de la sinjorino el la apuda strato. Tuj kiam ŝi foriras, mi devas forkonduki mian hundon, ĉar en frua posttagmezo vizitas min mia eksa lernantino. Tuj kiam ŝi foriras, mi devas rapidi al kartluda seanco ĉe la sinjorino el la korta domo kaj vespere, se la rigardado de la televida programo estas ĉe mi, mi devas rearanĝi seĝojn kaj se mi iras al najbaroj rigardi la programon, mi tamen devas prizorgi antaŭ tio kaj la katon, kaj la hundon, kaj la kanarion, ĉar mi revenas malfrue vespere, vi komprenas, ĉu ne? Kaj se... nu lasu min, lasu min fini, kion? Mia rakonto ne estas interesa por vi? Ho, por vi do estas interesaj nur aktorinoj kaj kantistinoj, ĉu ne? Ĉu ĉiu povas esti aktorino? Viziti najbarinon, kartludi, havi

hundon kaj kanarion povas ĉiu, kion? Kion vi diras? Ke mi plenigas mian solecon per sensencaĵoj? Televizio estas sensencaĵo? Ha, kaj gazet-artikoloj estas la supro de la saĝo, ĉu? Iru for, vi tropsentenda persono, mi volis doni al vi modelon, kiel milionoj povas forigi solecon kaj vi tion opinias sensencaĵo! Nekredeble impertinente!

NARKOTIKULINO:

Kion vi volas? Kiel vi entute enŝovis vin ĉi tien? Ha, ĵurnalistino, por tia trudulino, kompreneble, ne ekzistas fermita pordo. Ĉu intervjuon? Ĉi tie? Kial diable vi elektis ĝuste min? Ĉu, vi do opinias, ke mi ion interesan povos diri al vi? Kraĉas mi je via opinio. Kion, ĉu pro sento de soleco mi fariĝis konstanta kliento de ĉi tiu salono? Ho, stulta kapo. Hu, kiel vi tedas min, sed jes, iom vi pravas. En la normala vivo, tio estas via kreteneska¹ termino, mi havis edzon, kiu neniam havis tempon eĉ paroli kun mi. Miaj infanoj vivis sian vivon; kion ajn mi demandis ilin, ĉiam mi ricevis respondon: Oldino², ne tedu, lasu min, mi volas havi propran vivon! Ho, kiel soleca mi estis meze de mia kara familio! Mia sola kompano estis hejmlaboro. Ĉu vi pretigis mian ĉemizon? Ĉu vi preparis matenmanĝon? Ĉu vi aĉetis tion kaj tion? Oldino, hodiaŭ mi revenos post noktomezo, mi petas, ne atendu min, tio nervigas min. Nu, ĉu vi komprenas, ĉu vi sukcesis kunkudri miajn vortojn? Kaj tiel ĉiutage, ĉiutage, ĉiutage. Hu, ne parolu, ĉu? Mi povis alie eduki miajn infanojn? Ĉu nur gepatroj edukas infanojn? Ĉu ne estas la tuta medio kiu influas al ili? Vi, pajla kapo, iru nun, mia dozo komencas tre efiki, baldaŭ, baldaŭ, baldaŭ estos al mi bele, mi vivos la deziratan vivon, jes, mia injektilo donas al mi tion, kion mi deziras: afablecon, korvarmon, atenton. Ho lasu min, ha, ha, iru, mi ŝvebas jam en mia mondo, en mia sorĉa mondo, ha ha, ha ha, ĉi tie ne ekzistas soleco, ne, ne, soleco ekzistas nur en la reala mondo, en tiu ha ha, ha ha, ne, tie estas ĉio tiel alloga, alloga, bela, sonĝe bela, hah, hah...

(Mallumiĝo, post momento relumiĝo. La aktorino, kiu rolis ĉiujn virinojn, diras al la publiko:)

Aliajn solecajn virinojn serĉu mem. Ili ekzistas en via apudo.

Emilija Lapenna. Nova teatro: Monologoj. — Zagreb, 1974, p. 14-20.

— En nian klubon venis grupo da hungaraj esperantistoj, kiuj nun turismas en nia lando. Ni interkonsentis pri interŝanĝo de turistaj grupoj. Kaj por interesi vin pri vojaĝo, János Nádasdi³ rakontos pri sia lando.

HUNGARIO BONVENIGAS⁴ VIN!

Hungario bonvenigas gastojn el ĉiuj mondopartoj. La hungara gastamo estas internacie konata. Hungario ne havas marojn, Alpajn montojn por vintraj sportoj, tamen ĝiaj turismaj donitaĵoj estas specifaj kaj iusence eĉ unikaj. Ni pensu pri la kontinenta klimato ĉiam modera en Karpat-baseno, pri la grandega ebenaĵo⁵, pri la plurcentjaraj folklorotrezoroj de la hungara popolo, pri la popolartoj, ĉerpantaj nur el pura fonto, pri la unika hungara kuirarto, pri la fajraj montaraj kaj mildaj sablejaj vinoj kaj ne lastvice pri la kultura heredaĵo de nia malgranda popolo.

La eksterlandaj prospektoj pri Hungario ofte starigas en la centron la romantikon pri “ebenaĵo-ĉevalistogulaŝo” kaj pri “furorega cigana muziko”, sed kie jam la neĝo antaŭjara? Ni ne hontas pro tiuj donitaĵoj, ĉar vere, ĉevalaroj kuregas sur ambaŭ hungaraj ebenaĵoj dum la sun-subiro, ĉevalistoj rajdas sur ardaĵ ĉevaloj kaj klakigas skurĝojn, kaj oni povas veturi per ĉaroj. Tio estas por urbano mirakla kaj eble ne ĉiutaga travivaĵo. Sed la realo estas alia: Hungario fariĝis en la lastaj jardekoj agrara-industria lando, konstruiĝas novaj urboj, ripozlokoj, turismaj centroj, teatroj, sportpalacoj, hoteloj, reto de moderna trafiko, metroo ktp.



La ĉefa turisma centro de la lando estas la hungara ĉefurbo Budapeŝto, la plej granda kuracbaneja urbo de Eŭropo, perlo de Danubo⁶: teatroj, koncertejoj, noktaj amuzejoj, internaciaj hoteloj kaj ne lastvice pitoreska pejzaĝo.

Balatono, la "Hungara maro", estas la plej granda varmakva lago de Eŭropo. Sur la bordoj de la 72 kilometrojn longa lago situas dekoj da ripozlokoj. Ankaŭ ĉi tie vi povas trovi la plej bonajn hotelojn, la malpli kostajn motelojn⁷ kaj kampadejojn⁸, la privatajn loĝejojn kaj gastejojn, preskaŭ ĉiujn formojn de amuziĝo kaj malstreĉiĝo.

Proksime de Budapeŝto situas Danubo-kurbiĝo. Ĝin faras altira, krom la naturaj belajoj, ankaŭ historiaj memoraĵoj. Hungario estas riĉa je ĉasbestoj kaj fiŝoj. La

plimulto de la riveroj kaj lagoj estas taŭgaj por la akvaj sportoj. La nombro de la sportĉevaloj estas duonmiliono.

Vi devas viziti Hungarion, vi devas gustumi la hungarajn manĝaĵojn kaj la bukedajn vinojn, vi devas spekti koncerton, vi devas enbusiĝi por ekskursi, do vi devas vidi kaj sperti ĉion, pri kio disponas ĉi tiu lando.

Kiel butikumi en Budapeŝto? — Budapest, 1983, p. 9-13. Mallongigita.

— Dankon pro tiel varma invito! Mi proprasperte konvinkigis, ke la lando estas ĉarma kaj vizitinda. Krome, ĝi estas, eble, la plej grava centro de Esperanta kulturo. Ĉiu Esperanta libro, eldonata en Hungario, estas bona libro. La revuo "Hungara vivo" estis altnivela, portanta ion interesan al kiu ajn. Iam en Hungario estis eldonata la fama revuo "Literatura mondo", kia mankas nun, bedaŭrinde. Do kiu ĝis nun ne estis en tiu lando, ne hezitu vojaĝi.

— Profesoro John Wells, kiu antaŭ ses semajnoj prelegis en nia klubo pri bona kaj malbona prononcadoj, faris grandan vojaĝon tra nia lando kaj denove venis en nian urbon. Li afable konsentis fari antaŭ sia forveturo hejmen ankoraŭ unu prelegon.

LA AFIKSOJ DE ESPERANTO

La afiksa sistemo de Esperanto estas unu el la plej grandaj elpensajoj de Zamenhof. Per la afiksoj — deko da prefiksoj, trideko da sufiksoj oficialaj, plus eble kvardeko da teknikaj kaj aliaj neoficialaj sufiksoj — per tiu afiksaro Esperanto havas elstaran rimedon por strukturigi la vortprovizon kaj tiel simpligi al la lernanto ĝian ekposedon. La plej evidenta rezulto de la afiksa sistemo, laŭ diro de Waringhien /Varengjén/, "estas la absoluta simpleco kaj regularco de la vortfarado, kio akre kontrastas kun la vario de la neregularco de la derivado en la ĉefaj eŭropaj lingvoj".

Kiel trafe oni povas ilustru tiun fakton? Ni komparu la situacion de tiu, kiu lernas Esperanton, kun la situacio de tiu, kiu lernas la anglan kiel duan aŭ fremdan lingvon. Ni supozu, ke ili jam lernis la ĉefajn elementojn de la morfologio de la koncerna lingvo; la lernanto de Esperanto bone posedas jam la afiksojn kaj la manieron uzi ilin. Li lernas — ekzemple — unu novan vorton, la verbon *manĝi*. Li scias, ke ĝi konsistas el radikoj *manĝ* kaj verba finaĵo. Tuj li povas produkti amason da aliaj vortoj, kies signifojn li eĉ ne devos lerni, pro iliaj logikaj interrilatoj. Li povas nomi la agon manĝi: ĝi estas *manĝo*. Tio, kion oni manĝas, estas memkompreneble *manĝaĵo*.

La alia lernanto, tiu kiu lernas la anglan, lernas la verbon *to eat*⁹. Tute simple (krom ke ĝi havas neregulan preteriton kaj partupon). Sed nun li devas lerni ankaŭ la vorton por manĝo: *a meal*¹⁰, kaj la vorton por manĝaĵo: *food*¹¹. Ili ne estas regulaj derivaĵoj, kreitaj el la verbo *to eat*⁹, sed havas formon tute arbitran. Sekve, li devas lerni ilin aparte.

La ripeta aŭ daŭra ago manĝi, la agado manĝi, prezentas problemon nek por unu lernanto, nek por la alia: *manĝado*, *eating*¹². La du¹³ lernantoj tuj povas cetere krei adjektivon kun la signifo “rilata al manĝo”, nome *manĝa* en Esperanto kaj *eating*¹² en la angla.

La nova esperantisto daŭrigas per regule formitaj *manĝejo*, *manĝujo*, *manĝilaro*. La lernanto de la angla ŝvitas por enkapigi la neregule formitajn *dining-hall*¹⁴ aŭ *canteen*¹⁵, *manger*¹⁶, *cutlery*¹⁷, *crocker*¹⁸. Por la esperantisto io povas esti *manĝebla*, *manĝinda* aŭ eĉ *manĝenda*; li mem povas esti *manĝema*. En la angla oni havas du vortojn por “manĝebla”: unu regulan, sed iom maloftan, *eatable*¹⁹, la alian neregulan sed oftan: *edible*²⁰. Nenio por esprimi la ideon “manĝinda”; por “manĝema” nur la forme senrilata *hungry*²¹.

Ĉiu parolanto de Esperanto povas daŭrigi: *manĝeto*, *manĝeti*, *manĝegi*, *manĝaĉi*. En la angla, kvar novaj lernendaĵoj — *a snack*²², *to nibble*²³, *to eat heartily*²⁴ (kvazaŭ “manĝi kore” aŭ “elkore”), *to guzzle*²⁵. Tiel lerni tiun lingvon ŝarĝas terure la memoron de la lernanto — kiu cetere baldaŭ devos fronti la problemon,

eknaĝi (aŭ droni) en la maro de idiotismoj, ekde *a square meal*²⁶ (kvazaŭ “manĝo kvadrata”, t.e. bona aŭ satiga manĝo) ĝis *to fall to*²⁷, *to tuck in*²⁸, kaj *to do justice to*²⁹ (“alfali, enfaldi, fari justecon al” — ĉiuj sinonimoj de *manĝi!*).

La lernanto de Esperanto scias, ke li povas krei vortojn, ekzemple *manĝinda*, kun certeco, ke tiu vorto ekzistas kaj estas korekta, ke ĝia signifo estas pli-malpli konjektebla, kaj ke li povos facile memori ĝin. La lernanto de la angla eble volus provi krei *eatworthy*³⁰ (manĝinda): sed bedaŭrinde tiu vorto ne ekzistas en la angla (ankoraŭ), kvankam kelkaj similaj formoj ja ekzistas.

John Wells. Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. — Rotterdam, 1978, p. 35-36. Mallongigita.

— Estas vere okulfrapaj ekzemploj. Cetere, ĉio ĉi dirita pli-malpli koncernas ankaŭ la rusan lingvon, same kiel aliajn naciajn lingvojn. Efektive, la afiksaro estas mirinda sistemo, kiu faras Esperanton ege fleksebla kaj ebligas ekposedi ĝin same kiel la gepatran lingvon. Dankon pro via prelego kaj bonvenon al nia klubo, kiam vi denove vizitos nian landon!

— Ni finu per eta satiro, kiu havas ritmon, ofte uzatan en por-infanaj versaĵoj.

Ŝtefo Urban³¹

KAKTO KAJ LACERTO

Kreskis Kakto
en dezerto,
venis al li
la Lacerto.

Kial, Kakto,
pro diablo,
kreskas vi ja
en la sablo?

Kakt' respondis:
Fulmotondro!
Por ke dormu
ci³² en ombro!

Esperanta antologio: Poemoj 1887-1981. —
Rotterdam, 1984, p. 480-481.

— La 18-an de marto en la klubo okazos superri-
gardo de Esperanto-gazetaro. Kaj ni aŭskultos kantojn
el Grekio en Esperanta traduko. Bonvenon!

KOMENTARO

1. *-esk-* — neoficiala sufikso, signifanta “laŭ la ma-
niero, la similo de”: vireska virino, japaneska pentraĵo.
2. *Oldino* estas fojfoje uzata formo por *oldulino* (si-
mile: *junino*, *belino* kaj aliaj).
3. János Nádasdi /Jánoš Nádašdi/.
4. Bonvenigi — afable saluti ĉe alveno.
5. Ebenajo — loko ebena, sen montoj kaj montetoj.
6. Danubo — granda Eŭropa rivero, kiu iras de Ger-
manujo al Nigra maro.
7. Motelo — hotelo ĉe vojflanko por aŭtomobilistoj.
8. Kampi — loĝi preterveture en kampo; kampa-
dejo — loko por kampi aŭ tendumi.
9. To eat /tu it/ — manĝi.
10. A meal /e mil/ — manĝo.
11. Food /fud/ — manĝaĵo.
12. Eating /ítin/ — manĝado.
13. La du = tiuj du = ambaŭ.
14. Dining-hall /dájnin-hol/ — manĝejo.
15. Canteen /kéntin/ — manĝejo.
16. Manger /méjnge/ — manĝujo.
17. Cutlery /kátleri/ — manĝilaro.
18. Crockery /krókeri/ — manĝilaro.
19. Eatable /ítebl/ — manĝebla.
20. Edible /édibl/ — manĝebla.
21. Hungry /hángri/ — manĝeto.
22. A snack /e snek/ — manĝeto.

23. To nibble /tu nibl/ — manĝeti.
24. To eat heartily /tu it hákli/ — manĝegi.
25. To guzzle /tu gازل/ — manĝaĉi.
26. A square meal /e skúéa mil/.
27. To fall to /tu fol tu/.
28. To tuck in /tu tak in/.
29. To do justice /tu du ĝástis tu/.
30. Eatworthy /ítűezi/.
31. Štefo Urban (1913-1974). Ĉeĥo. Esperantistiĝis
en 1950. Muzikisto.
32. La pronomo “ci” estas uzata tre malofte: en kru-
da parolo, en sinturno al besto aŭ objekto, kelkfoje en
poezio por traduki el nacia lingvo kaj en la esprimo: *ci-
diri al iu*.

LINGVA PRAKTIKO

Soleco. Parto 2

1. Trovu leksikajn apartaĵojn de la publikulino, babi-
lulino, narkotikulino.
2. Verku karakterizon pri unu el tiuj virinoj en la
nomo de la loka policisto aŭ en la nomo de najbarino.
3. Verku intervjuon pri la temo “Soleco” kun iu alia
tipo de virino, ekzemple: lernantino, pensiulino, bebino,
sportistino, ŝoforino, kelnerino, kosmonaŭtino, presiden-
tino, maljuna fraŭlino, vilaĝanino aŭ partoprenantino de
Esperanto-tendaro — krokodilino (preskaŭ ne parolanta
Esperante), elektita Belulino de la tendaro.

Hungario bonvenigas vin

4. Kiu estas la vidindaĵoj de Hungario, menciitaj en
la teksto? Kiujn aliajn tieajn vidindaĵojn vi konas?
5. Uzante informojn el la teksto, priskribu vian voja-
ĝon en Hungario (ekzemple, en formo de vojaĝnotoj aŭ
letero hejmen).

La afiksoj de Esperanto

6. Trovu en via gepatra lingvo tradukojn de la Esperantaj vortoj, donataj en la teksto kiel ekzemploj de vortfarado.

7. Kion vi opinias pri la Esperanta vortfarado kompare kun la vortfarado en via gepatra lingvo?

Kakto kaj Lacerto

8. Kiu estas la ideo de la versaĵo? Kiun rolon ludas Kakto?

9. Verku konversacion inter du bestoj pri iu temo.

10. Klarigu en Esperanto, kion signifas la subaj vortoj:

Ĉasejo, fosejo, babilejo, musejo, spektejo, redaktejo, koncertejo, agentejo, tondejo, tombejo, kaŝejo, doganejo.

11. De la vorto *fari* kreu kiel eble multe da sencohavaj vortoj.

12. Al la frazpecoj el la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu ne riskas,	tiu pagu.
Kiu ne petas,	tiu ne gajnas.
Kiu ne krimas,	rikoltas fulmotondron.
Kiu donis garantion,	tiu ne timas.
Kiu semas venton,	tiu ne ricevas.

13. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Pendi — penti, alta — olda, sorĉi — serĉi — ŝerci, modela — modera — moderna, aspiro — sopiro — spiro — spirito.

14. Laŭ la donitaj modeloj, elpensu frazojn kun transformoj:

La homo veninta (*kiu venis*) salutis nin. Veninte (*ki am li venis*), li salutis nin. La homo venis al ni kaj salutis nin (*la homo, veninta al ni, salutis nin*).

15. Faru kelkajn frazojn laŭ la modelo:

Ĉu mi (vi) ne ...as ...i? (la frazon oni povas plilongigi).

16. Temo por diskuto aŭ rakonto: Por ĉiu ago venas la tempo de pago.

17. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kiujn Esperanto-programojn redaktis Emiliĵa Lapenna?

b) Kiu fama Esperanto-revuo estis iam eldonata en Hungario?

c) Kial la afiksa sistemo de Esperanto estas unu el la plej grandaj elpensadoj de Zamenhof?

ĉ) Al kiu nacio apartenas Ŝtefo Urban?

d) Por kio estas uzata la pronomo *ci*?

LECIONO 7

— La 1-a de aprilo estas tutmonda tago de rido. La mondo vivas tro serioze, kaj almenaŭ por unu tago oni forgesu la zorgojn. En tiu tago oni ridu, humuru, satiru — unuvorte, oni gaju. En tiu sola tago en la jaro la nigramara urbo Odeso fariĝas tutmonda ĉefurbo de humuro, pri kiu ĝi havas glorajn tradiciojn. Ankaŭ ni en la klubo havas gajan programon. Unue ni konatiĝu pli proksime kun bona kaj gaja homo, kies verkojn konas absolute ĉiu persono, eĉ plej eta, en nia lando, sed li mem estas malpli konata ol liaj verkoj. Pri li parolas la ĵurnalisto Jurio Ŝĉekoĉihin.

TIU, KIU ELPENSIS ĈEBURAĈJON, ONKLON TEODORON KAJ LA CETERAJN

“Mi ŝatas amuzi homojn. Mia ŝatata leganto estas knabo naŭjara. Li frakasis vazon, faligis srankon. Kaj la patro volas frapi lin sur la pugeto. Sed la infano havas febron, kaj la patro, anstataŭ skoldi, legas al li libron. Kaj ili ambaŭ ridegas”. Tiujn vortojn foje diris la verkisto Eduardo Uspenskij — homo de mirinda ĉarmo kaj laŭmerita gloro.

Mi ne konas alian verkiston en nia lando, kiu elpensu tiajn heroojn, ke ties nomoj estus donataj al infanaj ripoztendaroj kaj glaciaĵejoj, al kinejoj kaj bombonoj. Eĉ pli! Mi konas seriozan kaj gravpostenan homon, kiun — laŭ la nomo de heroo el libreto de Uspenskij — oni nomas krokodilo Geĉjo, kaj tiu respondas, kvankam havas apartan kabineton en la laborejo kaj familion kun du infanoj.

Ĉiuj etuloj de nia lando, ĉiuj!, scias, kiuj estas Ĉeburaĉjo, virkato¹ Matroskin, Onklo Teodoro kaj krokodilo Geĉjo. Sed ja la plej interesa estas tio, ke la unuaj etuloj, kiuj eksciis pri liaj herooj el la libroj aŭ ekvidis ilin sur scenejo, iĝis mem patroj kaj patrinoj. Kaj jam superfluas diri, kiom da homoj vidis la animitajn filmobildarojn pri liaj herooj sur la blanka ekrano en kinejoj

aŭ sur la blua televizia en sia hejmo! Kaj tiujn, kiuj kreskis kaj kreskas kun liaj libroj, mi eĉ ne kalkulas.


Eduardo Uspenskij revis fariĝi ne verkisto sed inĝeniero. Kaj tiu revo evidente realiĝis: li finis instituton kaj eklaboris kiel inĝeniero. Povis eĉ esti, ke li nun jam iĝus ĉefinĝeniero aŭ eĉ direktoro de dolĉaĵa fabriko. Kaj li produktus bongustajn bombonojn. Sed kion ni ĉiuj perdus, se li, tamen, farus al si inĝenieran karieron! Li verkis fabelon, ĝi estis eldonita, kaj, kiel en fabelo, verkinte la unuan fabelon, inĝeniero Uspenskij iun matematikon vekigis kiel fama verkisto.

Sed la rakonto estis nure pri tio, ke foje en iu fabriko oni produktis, certe hazarde, difektitan ludilon, nekomprenoble kion prezentantan. Pro tio ke la ludilo neion similis, oni nomis ĝin Ĉeburaĉjo kaj, direble, elĵetis surstraten. Ĉeburaĉjo eksentis sin sola kaj komencis serĉi amikojn kaj trovis krokodilon Geĉjo, kiu laboris en zoo kiel krokodilo. Kaj ili komencis serĉi amikojn kune. Kaj finfine trovis milionojn da ili — ĉiujn infanojn de nia lando kaj ankaŭ iliajn gepatrojn.

Elpensi kaj donaci novan fabelan heroon agnoskatan de ĉiuj — tia feliĉo trafas ne ĉiun verkiston kaj ne en ĉiu jaro kaj eĉ ne en ĉiu jardeko! Vi mem kalkulu, kiom da fabelaj nomoj aperis — nu, almenaŭ en nia 20-a jarcento? Ĉe ni — Buratino, en Italio — Ĉipollino, en Anglio — Vinni-Pu, en Svedio — Karlsson. Nu, kiu ankoraŭ?

Jen-ĵus infanoj alĉutimiĝis al Ĉeburaĉjo kaj krokodilo Geĉjo kaj subite — ree novaj herooj venis al ili de libropagoj kaj poste ankaŭ de sur scenejoj kaj kino-telekranoj. Venis Onklo Teodoro, venis virkato Matroskin, venis poŝtisto Peĉkin, aperis nova geografia punkto sur la plej senfina geografia mapo, mapo de nia infanlando — vilaĝo kun la nomo Prostokvaŝino.

Oni ne permesis al knabo, kiun ĉiuj hejmanoj nomis Onklo Teodoro, havi hejme katon, kaj tial Onklo Teodoro forveturis de la gepatroj en vilaĝon Prostokvaŝino, kie li komencis tre feliĉe vivi kun siaj amikoj hundo kaj virkato Matroskin kaj iomete, certe, sopiri pri la gepatroj, kiuj ankaŭ tre sopiris pri sia Onklo Teodoro.



Mi ial komencis rerakonti la fabelojn de Eduardo Uspenskij, sed tio tamen ne estas farenda, pro tio ke Eduardo Uspenskij mem dume ne estas monumento, kaj li povas loĝigi en dekoj da Prostokvaŝinoj tiajn heroojn, kiajn nun ni eĉ ne povas imagi.

Sed jen pri kio mi pensas. Kial do Eduardo Uspenskij ekpovis jen tiel ĉarmi ĉiujn per siaj herooj? Mi rigardas atente liajn fotojn. Ne, ja eĉ profile Eduardo Uspenskij ne similas krokodilon Geĉjo, kaj liaj oreloj ne similas tiujn de Ĉeburaĉjo.

Sed ja estas io komuna! Estas!

Eduardo Uspenskij donis al siaj krokodiloj kaj katoj grandan homan animon, dotis ilin per noblaj agoj kaj plantis en ilin kredon je triumfo de humaneca, homeca interrilato.

Jurij Ŝeĉoĉiĥin. Kto pridumal Ĉeburaŝku, djadju Fjodora i ostalniĥ // Sputnik, 1987, N^o 8, p. 60-62. Mallongigita traduko.

— Dankon, Jurij Petroviĉ, pro via gaja rakonto! Kaj nun ni spektu sur la ekrano kinofilmon “Gajaj veturoj sur sia paro da kruroj”.

— Oni diras, ke sana estas la popolo, kiu kapablas ridi pri si mem, ĉar rido estas efika kuracilo. Ĉiuj homoj havas iujn mankojn kaj negativaĵojn. Ankaŭ la esperantistoj estas homoj, kaj nenio homa estas fremda al ili. Sed en la esperantista medio ekzistas specifaj negativaĵoj. Ilin gaje priridas tri konataj Esperantaj aŭtoroj, kies verkojn tuj prezentos niaj klubaj aktoroj Nikolao Miĥajlov, Antono Strogov kaj Damiro Vaĥitov.

Cezaro Rossetti²

SONĜO TERURAS, SONĜO FORKURAS

Je la oka mi iris al la Esperanta grupejo. Mi eniris la kunvenĉambron. Mi restis ĝis la deka horo, kaj mi iris hejmen kun forta sento de deprimado. La aĉa prononcado³, la manko de viveco kaj esprimkapablo, la multeco de Esperanta parolado⁴, la “buŝado”⁵ pri la interna ideo⁶ — dum mankis ĉia ideo pri la esenco de la lingvo: ĉio pezis mian koron.

En la hotelo mi manĝis aŭtomate, pensante pri la samideanoj⁷, kiuj nescie mokadis la lingvon. Ne temis pri lernantoj⁸ — mi mem estas lernanto, — temis pri io pli grava. Mankis sento pri la lingvo. Mankis konstato, ke ĝi ne estas nura kodo por balbuti kutimaĵojn. Mankis konstato pri ĝia esprimkapablo kaj plensanga viveco, matureco kaj digno. Mankis kompreno, ke ĝi devas esti prononcata laŭ siaj propraj reguloj, ne per mez- kaj sudanglaj misprononcoj, devenataj el malklera aroganteo. Jen kio incitis: la paralizanta memsufiĉo.

Mi ne povis endormiĝi. Mi turniĝis de flanko al flanko, sed la temo mueliĝis en mia cerbo, ĝis mi volis salti el la lito kaj kuri al la domo de ĉiu Plurtown’a⁹ esperantisto kaj krii proteste. Fine mi malkviete endormiĝis.

Mi sonĝis. Mi estis en Plurtown⁹. Mi sciis, ke ĝi estas Plurtown, sed iel ĝi aspektis kiel alia urbo. Policano staris en la mezo de la placo. Mi diris al li: “Ĉu vi

scias, kie estas la Esperanta kunvenejo?". La policano rigardis min, kvazaŭ mi estus¹⁰ freneza, kaj eksplodis en laŭta rido. "Ha, ha, he, he, hi, hi, ho, ho, hu, hu!" Mi rigardis la policanon konsternite. "Esperanto, Malesperanto!" li diris. "Ni provis starigi leĝon kontraŭ ĝi; sed oni decidis, ke ĝi estas tute ridinda por meriti konsideron. Vi ja volas iri al la kunveno? La kunvenejo estas tie, vidu: kie tiu esperantisto sidas sur la trotuaro".

"Kion li faras?" mi demandis.

"Ĉu vi ne scias? Li konstruas ian bazan Esperanton. Antaŭ li, sternita sur la trotuaro, estas teksto el la Originala Verkaro¹¹, literita per grandaj, disaj, lignaj literoj. Li deprenas ĉiujn esprimplenajn vortojn kaj jetas ilin flanken; sed se vorto aspektas kiel neologismo, li elprenas ĝin per tenajlo. Nun li prenas la r'ojn el kelkaj vortoj kaj metas ilin inter vortojn, kiuj finiĝas per vokalo, kaj vortojn, kiuj komenciĝas per vokalo. En la granda korbo apud si li havas amason da ŭ'oj kaj en multajn vortojn li metas unu el tiuj ŭ'oj post la o kaj kreas diftongon. El kelkaj vortoj li prenas la i kaj miksas ĝin kun e el la apuda korbeto, kaj la rezulto estas mallonga sono inter la du, simila al la angla i. Tiun alojan literon li remetas".

Alarmite mi kuris al la lingvofuŝanto. "Vi ne devas fari tion, la afero ne estas pardonebla", mi kriis.

"Ha, vi paroulas pe nejpaaĉoŭnebla fremda-r-akcentoŭ. Vi ĉiam proŭnoŭncas la r. Eniru en la ĉambron kaj aŭdu la pe'fektan proŭnoŭncadon".

Mi kuris en la ĉambron. Impona viro venis al mi kaj manpremis. "Mi boŭnvenigas ven. Ĉi tiej estas bona-r-esperantistoŭ, kju faros parouladon. Mi studis la lengvon dum kva'dek jaroj. Sidiĝu enter ni".

Mi ĉirkaŭrigardis. Ĉeestis deko da personoj sur seĝoj. Ili interparolis angle. Preskaŭ ĉiuj estis maljunaj. Ĉe unu flanko sur alte starigita benko sidis dek du viroj.

"Kiuj ili estas?"

"Ele estas la juĝantoj, kijuŭi prizo'gas, ke neniju estas kontraŭ nia kara lengvoŭ".

Mi prezentis min.

"Via noŭmoŭ soŭnas itale. Ĉu vi paroulas itale?"

Mi kapjesis. Miaj gepatroj ja estas itallingvaj svisoj. La viro komencis aĉe paroli itale. La juĝantaro ekstariĝis kaj diris angle per unu voĉo: "Parolu Esperante!"

La parolanto stariĝis antaŭ ni kaj komencis:

"Ĉu tiun vesperon mi voŭlas paroŭli pri stratoj de Plurtown. En Plurtown estas multaj stratoj, kaj ju pli grandiga la urboŭ, des pli da stratoj estas. Laboristoj..."

La juĝantaro stariĝis kaj diris angle: "Ne estas permesite paroli pri politiko".

"Pa'doŭnu men... Viroj konstruas la stratojn. En la stratoj estas doŭmoj, le'nejoj, preĝejoj..."

La juĝantaro leviĝis kaj diris: "Ne estas permesite paroli pri religio".

"Pa'doŭnu men... Estas doŭmoj, le'nejoj, sed ne preĝejoj".

"Bonege", diris la juĝantaro.

"Kaj en la stratoj estas lum-fostoj, kaj ĉiujvespere venas lante-"

La juĝantaro subite stariĝis kaj kun ŝokita mieno kriis angle: "Ve, fi — vi diraĉis neologismon! Lante¹² ne estas permesita".

"Sed mi celis diri: ... venas lanternisto por ekbruligi la lanternojn", defendis sin la parolanto.

La ĉeestantaro leviĝis kaj, fingromontrante al la juĝantaro, akuzis: "Vi faris nepa'doneblan pekon, vi diris neologismon".

Ĉiu juĝanto konsterniĝis, sidiĝis kaj longigis la kolon ĝis unu metro. Sen moviĝi de la benko ili fleksis la kolon kaj kaŝis la kapon sub la benkoj pro hontego.

La parolanto daŭrigis: "Nu, ĉiju doŭmoŭ estas farita el... el... CEMENT kaj el... el... BRICKS, kaj la... la... la... e... Mi vidas, ke ĉeestas unu knaboŭ, kiju nej kompreneblas nian karan lengvon, doŭ kun la pe'mesoŭ de ĉiju mi daŭrigos angle".

La knabeto protestis: "Mi bone komprenas".

La prezidanto patre frapetis la knabeton sur la kapo kaj diris: "Jes, vi pensas, ke vi kompreneblas, sed vi nej kompreneblas pri la Interna-r-Ideo de nia kara lengvoŭ".

Post la fino de la parolado la prezidanto komencis paroli angle. Li diris: "Kiel vi scias, ĉiu lernoklaso fias-

kis. Ordinare la lernantoj ĉeestas dum du-tri vesperoj kaj forlasas, antaŭ ol ni povas klarigi al ili pri la Interna Ideo. Dum la lastaj kvardek jaroj ni komencis la instruadon al miloj da lernantoj, sed pro ia nekomprenebla kaŭzo oni ne interesiĝis. Nu, ĉu iu povas sugesti kiel venigi ilin denove?"

Neniu respondis.

La prezidanto daŭrigis: "Bedaŭrinde, ni ne povas revenigi ĉiujn, sed tio ne estas nia kulpo, ĉar dum la daŭro de kvardek jaroj multaj mortis. Mi provis paroli al kelkaj ekslernantoj kaj eĉ salutis ilin per "Boŭnan tagon" aŭ "Boŭnan vesperon" por interesiĝi ilin, sed ŝajne ili jam estas tute kontraŭ Esperanto, eĉ pli ol tiuj, kiuj ne eklernis. La problemo estas ja malfacila, kaj mi proponas, ke ni lasu la solvon al la juĝantaro".

La juĝantaro elprenis la kapojn el sub la benkoj kaj iris en apudan ĉambron. Ĉiuj atendis. Post tri horoj ili revenis al la benkoj, kaj la gvidanto klarigis angle:

"Ni bone konsideris la problemon de ĉiuj flankoj, kaj post plena enketo ni venis al la konkludo, ke la miloj, kiuj eklernis, estas granda gajno por la Esperanta movado. Nome, ili naŭziĝis tiel funde pri Esperanto kaj universalaj lingvoj, ke ni povas resti certaj, ke ne estas danĝero, ke iu alia internacia lingvo povos varbi ilin. Sekve, ni konstruis fortegan digon kontraŭ Ido¹³, Bolak¹⁴, Volapük¹⁵, Interglossa¹⁶, Sorlesol¹⁷ ktp. Krom tio, ni povas fieri (kaj mi diras tion en plena modesteco), ke miloj da homoj en Plurtown scias diri "tabloŭ, sejĝoŭ, tasoŭ kaj libroŭ", kiuj estas (kiel vi ĉiuj certe konsentos) tre utilaj vortoj".

Ĉiuj laŭte kaj longe aplaŭdis, kaj mi vekigis. Necesis al mi iom da tempo por igi naturforma mian buŝon, kiu estis tute tordita.

Cezaro Rossetti. KREDU MIN, SINJORINO! — Scheveningen, 1950, p. 75-80. Mallongigita roman-fragmento.

*Julio Baghy*¹⁸

ESTAS MI ESPERANTISTO

Verda stelo¹⁹ sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
"Netuŝebla Fundamento"²⁰.
Tuŝu ĝin nur la Mefisto²¹;
estas mi esperantisto.

Polvkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro²².
Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazetojn ne abonas...
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:
"Bonan tagon! Ĝis revido!"
Ĝi sufiĉas por ekzisto²³;
estas mi esperantisto.

Pionirojn²⁴ mi kritikis,
la gvidantojn dorne pikas
kaj konspiras kun persisto²⁵;
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,
sed nenion mi oferas.
Mi ne estas ja bankisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado²⁶, organizo²⁷,
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento²⁸
el la buŝo Nova Sento²⁸.
Ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia
Staros "rondo familia"²⁸,
Nekrologos ĵurnalisto:
estis li esperantisto.

Esperanta antologio: Poemoj 1887-1981. —
Rotterdam, 1984, p. 137-139.

*Raymond Schwartz*²⁹

ESPERANTISTO, EKESTO KAJ MALAPERO

Gazetartikolo
Aŭ varba parolo.
Favora impresio,
Ekintereso.
Lernolibro,
Sankta vibro,
Propaganda miasmo;
Entuziasmo!
Samideano⁷,
(Je via sano!),
Kamarado,
Varbado,
Instruo,
En butontruo
Verda flago³⁰,
Gloro tago!
Plua ŝtupo:
Nova grupo.
Nova sento²⁸,
Facila vento²⁸
Kaj poemo
Pri sama temo!
Post hezito
Delegito³¹.
Laŭ bezono
Gazetabono,
Kotizoj
Kaj valizoj
Por kongreso.

Miraklimeso!
Fraka vesto,
Bala festo,
Naci-kostumo,
Amindumo.
Hispanino,
Korinklino
Kaj esperoj,
Amleteroj.
Mielo,
Ĉielo!...

.....
Edzino;
FINO!

Baza literatura krestomatio. —
Budapest, 1986, p. 110-111.

— Post semajno en la kunveno funkcios tradukista rondo. Ni vidos ekspozicion de libroj de verkistoj el Ĉeĥoslovakio, kiuj estas eldonitaj en Esperanto, ĉeĥa, slovaka, rusa kaj aliaj lingvoj. Krome ni konatiĝos kun kinofilmoj, kiun faris niaj klubanoj Jefimo Nekrasov kaj Lilia Iovleva en Prago.

KOMENTARO

1. La bestonomoj kutime signas bestojn sendepende de ilia sekso (aŭ oni povas subkompreni la viran sekson). Se oni deziras klare indiki la sekson de la besto, oni uzas la duonprefikson *vir-* aŭ la sufikson *-in-*: bovo — virbovo — bovino, hundo — virhundo — hundino, krokodilo — virkrokodilo — krokodilino, muso — virmuso — musino, cimo — vircimo — cimino.

2. Cezaro Rossetti / Ĉezáro Roséti/ (1901-1950). Svisano vivinta en Britio. Esperantistiĝis en 1928. Lia romano "Kredu min, sinjorino!" tradukiĝis en la lingvojn hungaran, japanan, polan kaj anglan.

3. Relegu pri prononc-eraroj de anglalingvanoj en la teksto "Bona kaj malbona prononcadoj".

4. Personojn, kiuj en la esperantista medio parolas nacilingve, oni nomas serĉe "krokodiloj" kaj uzadon de nacia lingvo inter esperantistoj oni nomas "krokodilado".

5. Buŝado: ĉi tie — babilado.

6. La interna ideo de Esperanto — "frateco kaj justeco inter la popoloj" (Zamenhof).

7. Samideano: ĉi tie — esperantisto.

8. Lernantoj: ĉi tie — personoj kiuj lernas Esperanton.

9. La agado okazas en la angla urbo Plurtown /Plúrtaŭn/.

10. La vorto *kvazaŭ* kutime postulas us-formon de la verbo.

11. "Originala Verkaro" — volumo de verkoj de Zamenhof.

12. Lante = malrapide.

13. Ido — projekto de internacia lingvo, kiun kreis en 1907 Beaufront /Bofrón/ kaj Coutjurat /Kutjurá/ surbaze de Esperanto. Havis ioman disvastiĝon.

14. Bolak — projekto de internacia lingvo, kiun kreis en 1899 Bollack /Bolák/.

15. Vidu la komenton 21 en la leciono 1.

16. Interglossa — projekto de internacia lingvo, kiun kreis en 1943 Hogben.

17. Solresol — projekto de internacia lingvo, kiun kreis en 1817 Sudre /Sjudr/ surbaze de muzikaj notoj.

18. Vidu la komenton 17 en la leciono 2.

19. Verda stelo — insigno de esperantisto (vidu la komenton 19 en la leciono 1).

20. Vidu la komenton 23 en la leciono 1.

21. Mefisto (Mefistofelo) — nomo de la diablo en la legendo pri doktoro Faŭsto.

22. SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) — organizo de laboristaj esperantistoj, celanta praktike utiligi Esperanton por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda. Fondita en 1921. SAT-vortaro — "Plena vortaro de Esperanto" (PV), eldonita de SAT en 1930. Poste SAT eldonis eĉ pli valoran verkon "Plena Ilustrita Vortaro

de Esperanto" (PIV), ĉefredaktoro Gaston Waringhien (unua eldono 1970).

23. Maldiligentajn personojn, kiuj scias en Esperanto nur simplajn esprimojn kiel "Bonan tagon!" oni nomas "bonantaguloj" aŭ "bonantagon-esperantistoj" aŭ eternaj komencantoj.

24. Pionirojn de Esperanto-movado.

25. Nenio homa estas fremda al esperantistoj, vere.

26. Oni ofte uzas la *movado* anstataŭ *Esperanto-movado*.

27. Organizaĵo de esperantistoj.

28. Aludoj al la versaĵo de Zamenhof "La espero" (himno de la Esperanto-movado). Nova sento — esperantismo, interna ideo de Esperanto (komento 6).

29. Raymond Schwartz /Rajmón Švrac/ (1894-1973). Franco. Esperantistigis antaŭ la Unua mondmilito. Humuristo kaj satiristo, majstro de vortludoj. Libroj: "Kiel akvo de l' rivero", "Vole... novele" kaj aliaj.

30. Vidu la lecionon 23.

31. Pli ol 2000 delegitoj (reprezentantoj) de UEA, en ĉiuj mondpartoj, pretas respondi al viaj demandoj pri praktike ĉiuj ajn fakoj, helpi vin, kiam vi vojaĝas ktp.

LINGVA PRAKTIKO

Tiu, kiu elpensis Ĉeburaĉjon, Onklon Teodoron kaj la ceterajn

1. Trovu en la teksto la frazojn, kiuj pro sia surprizeco efikas humure.

2. Via amiko, sciante, ke vi estas persona konanto de Eduardo Uspenskij, faras al vi demandojn pri la verkisto, kaj vi respondas ilin. Prezentu la demandojn kaj la respondojn.

3. Kial plenaĝuloj ŝatas animatajn filmobildarojn? Rakontu pri iu el viaj ŝatataj animataj filmobildaroj.

Sonĝo teruras, sonĝo forkuras

4. Donu al la fuŝitaj frazoj normalan formon.

5. Trovu la frazojn kun intencaj troigo-
rolon.

6. Priskribu, kiamaniere la esperantistoj
la trotuaro, konstruas ian bazan Esperanto-
li uzas? Kion novan li enportas en Espe-
lingvo bezonas tiajn reformojn? Kial?

7. Pri kio, laŭ la opinio de la juĝanta
permesite paroli? Kaj kial? Kion vi opinias
permesoj?

8. Nomu la "pekojn", kiujn la rakontanto
la Esperanto-klubo de Plurtown. Kiuj aliaj
tas aŭ estas imageblaj en Esperanto-klubo?

9. Faru laŭ la teksto scenaron de am-
donu al ĝi frapan titolon.

Estas mi esperantisto

10. Nomu la agojn, kiuj karakterizas
personon kiel fuŝesperantiston. Kiujn agojn
bona esperantisto?

Esperantisto, ekesto kaj mal-

11. Rakontu pri la esperantista vivo
Espo.

12. Formu vortojn kun la afikso -aĉ-
tio vortoj el la teksto "Songo teruras, sor-

13. De la radiko *grand-* formu laŭeble
toj, aldonante ĉiufoje po unu afikson; oni
cevi ion similan al la monstraĵo *malsanega*

14. Al la frazepecoj el la unua grupo
en la dua grupo:

Kiom da homoj,	tiom da voloj
Kiom da kapoj,	tiom da gutoj
Kiom da koroj,	tiom da juĝoj
Kiom da juĝantoj,	tiom da vokoj
Kiom da krokodiloj,	tiom da opoj

LECIONO 8

— Inter kelkaj miloj da personoj, menciitaj en la nom-indekso al la Plena verkaro de Vladimir Iljiĉ Lenin, la lasta vivanto restis eminenta persono, neordinara figuro en respektinda aĝo pli ol 90-jara: Lev Termen, homo de nekredeble mirinda sorto. Pri li hodiaŭ al ni rakontas Ruslano Danilov.

NE ĈESU ESPERI

La vivo de Lev Sergejeviĉ Termen estas konata. Mi elektos nur tion, kio taŭgas por preskaŭ duonfalsanta rakonto.

Estante kvinjara, li prenadis de sur breto de la patra biblioteko la orajn volumojn de Brockhaus kaj Efron¹ kaj, jam scipovante legi, serĉis tie artikolojn pri maŝinoj kaj speciale — pri la miriga tiutempe elektro. En la universitato li iĝis studento de samtempe du fakoj — fizika kaj astronomia, kaj krome vizitis lecionojn de violonĉelo en la konservatorio.

En 1921 li ricevis patenton por la “muzika aparato kun katodaj valvoj” (tiu fama *termenvokso*, “vox” — latine “voĉo”). En marto de 1922 Vladimir Iljiĉ Lenin ekdeziris konatiĝi kun la aparato kaj ĝia kreinto. Ĉe akompano de Lidia Aleksandrovna Fotijeva, Termen interpretis per sia muzikilo verkojn de Skrjabin, Saint-Saëns², Glinka.

Post la “Alaŭdo” — li rakontas, — Vladimir Iljiĉ rapide levis sin de la fotelo, aliris min kaj diris, ke li volus mem interpreti ion per la aparato. Mi komence timetis, ĉu li sukcesus eligi purajn sonojn kaj tial ekstaris malantaŭ Vladimir Iljiĉ, prenis liajn manojn en la miajn kaj montrinte, kiel necesas agi per ili, petis Lidia-n Aleksandrovna-n denove akompani por la “Alaŭdo”. Kompreninte, ke li povos luĝi sen mia helpo, mi poiozies forigis miajn manojn. Ĉe la komunaj aplaŭdoj li sukcese finis la melodion.

Termen ricevis senpagan jaran vojaĝbileton por ferovojo en ajnan angulon de la lando, por ke li povu propagandi sukcesojn kaj povojn de la elektro. 150 prelegojn-koncertojn faris Termen.

Li plu laboras en Fizika-teknika instituto ĉe Abram Fjodoroviĉ Ioffe, finplenumas sian klerigon, kaj lia diploma laboro estas “Ilo por la elektra televido”. La ĉefo de la Instituto estas tre kontenta. “La malkovro de L.S. Termen havas grandan kaj tuteŭropan skalon!” — li skribas en ĵurnala artikolo. La televida aparato estas montrata “plej supre”. Tie oni sekretigas ĝin, pensas, kiel ĝin uzi por militaj celoj.

En 1927, demonstrite antaŭ vizitantoj de la Internacia muzika ekspozicio en Frankfurto-ĉe-Majno, la termenvokso iĝas mondfama. Sukceso, koncertoj en la plej bonaj salonoj de Eŭropo. Kaj antaŭ la nova jaro 1930 la inventisto venas en Usonon por helpi laŭ peto de usonanoj pri arango de amasa produktado de la miraklaj aparatoj.

Li edziĝas al negrino, juna, gaja dancistino. Kaj nun, sidante antaŭ mi, kun siaj “pli ol naŭdek”, li plezure rememoras, ke “ili vivis kune tre felice” kaj ke “la negrinoj estas bonaj edzinoj”. Kiam en 1938 li estis revokita en Sovetion, oni ne permesis kunpreni la edzinon. Cetere, eble tiel estis pli bone — ŝi ne vidis, kiel ŝia edzo ekvojis ekskortata al Magadano³.

Li laboris en ŝtonminejo, ruladis pezajn ĉarumojn (inventante dum tio ion por faciligi la laboron). Sed baldaŭ li estis vokita en la sekretan konstrukciejon de Andreo Tupolev⁴ — oni kolektadis tien saĝkapulojn el la malliberejoj.

— Mi laboris tie, — li rakontas, — pri nova senpilota aviadilo. La modelo, imagu vi, komence devis esti elsegata el tavolligno. Oni donis al mi helpanton. Ankaŭ li estis malliberulo — Sergeo Korolov⁵.

Post la liberigo, post la rehabilito, Leo Termen ŝanĝis multajn laborlokojn, daŭre perfektigante sian muzikan aparaton, inventante la novajn. Kreskis du liaj filinoj, naskiĝintaj jam post la milito. Li pensiigis, sed ankaŭ nun ne povas esti sen laboro. Inter la anoj de la

katedro de akustiko en Moskva Ŝtata Universitato li estas unu el la plej disciplinemaj kaj akurataj.

Li havas multajn planojn. Unu el tiaj planoj, ŝajne, jam proksimas al realiĝo. Kvarfoje dum la vivo Lev Sergejeviĉ petis pri aliĝo al la Komunista partio. Kaj kvarfoje liaj petskriboj estis redonataj al li — jen la biografio estas “ne tia”, jen maljunas li, jen la akcepta kvoto elĉerpiĝas⁶. Sed nun, en antaŭnelonga partia kunveno Lev Sergejeviĉ Termen estis akceptita kiel kandidato por membreco en KPSU⁶.

— Kredu, — li diras, — tiuj unu-du horoj, kiujn mi pasigis kun Vladimir Iljiĉ, malkovris al mi lian grandegan ĉarmon, varmecon, bonkorecon. Ĝuste tiu malproksima renkontiĝo influis mian deziron esti en la partio. Mi pensas, ke mi ankoraŭ utilis por ĝi, kaj miaj fortoj sufiĉos por la socia laboro.

Decembro 1989.

R. Danilov. Ne ostavljaj nadeĵdi. //
Izvestija, 1990, N^o 1.

— Unu el la plej legataj Esperantaj verkistoj estas Lorjak⁷. Li estas majstro de distra, leĝera ĝenro. Liaj verkoj estas plenaj de surprizoj, kaj ĉe la fino, kiam ĉiuj surprizoj elĉerpiĝis, venas la plej granda surprizo, kiu kvazaŭ lanterno ĵetas novan lumon de sube supren, al la tuta verko, ĝis ĝia komenco. La romano “Mariagnes” (kunigo de du virinaj nomoj Maria kaj Agnes), kies agado okazas en Parizo, legiĝas komence kun peno pro troa abundo de neologismoj, sed poste la atentokapta intrigo plene absorbas la leganton ĝis la grandsurpriza fino.

Lorjak

MARIAGNES

Alia kongruo devis proksimigi ŝin al Roĝer Mellion. Revenante hejmen post la kafeja kunsido, ili plurfoje

konstatis, ke ili sekvas la saman vojon, ĉu paralele sur ambaŭ transstrataj trotuaroj, ĉu sur la sama kun varia interspaco. Ĝis la vespero, kiam li opiniis ridinda tiun afektan ignoron. Li decidis:

— Kara amikino! Tial, ke ni evidente uzas la samajn stratojn, ĉu ne preferindus, pli logike, ke mi akompanu vin? Unuflanke, komedii, ke ni estas fremduloj, estas stulte. Duflanke, dum la danĝeraj tempoj, kiujn ni travivas, la ĉeesto de ĉarma virino protektos min kontraŭ la noktaj atakoj de mon-avidaj amoristinoj. Vi estos mia gardistino. Mi sentos min pli sekura.

Ŝi ridis kaj daŭrigis la marŝadon ĉe lia flanko. Ili estis antaŭ la pordo de l' numero 4-a en la strato Marie-Rose⁸, kiam li rimarkigis:

— Ĉu tio ne imponas vin, vivi en domo de Lenin?

Ŝi ne komprenis.

— Kio?

— Ĉu vi ne scias, ke vi loĝas en la domo de Lenin? Vidu la skulptitan medalionon kaj la memorplaton.

Li legis:

— “En tiu ĉi domo vivis Vladimir Iljiĉ Lenin, de 1909 ĝis 1912”.

— Ne. Mi ne sciis. Mi jam videtis tiun platon, sed ankoraŭ ne atentis pri la teksto.

Tial, ke en la nokto da domfronto estis lumigata nur de malproksima stratlampo, ŝi devis, por kontroli, demeti siajn okulŝtopajn kolorvitrojn, kiujn ŝi svinge tenis distance de sia vizaĝo. Kaj la subita ŝanĝo de ŝia aspekto alportis al Roĝer Mellion la respondon al tiu demando, kiu ĝis tiam perpleksis lin. Kvazaŭ frapan iluminon:

— Nun mi komprenas tion, kio nebule konfuzis min. Vi prezentas eksterordinaran similecon al Agnes de Vitry⁹...

Unuatempe ŝi ŝajnis ne aŭdinta. Restis senmova, enpensiĝanta. Poste, ŝi forlasis Lenin-on, malrapide turnis la kapon al sia apudulo, kvankam ne rigardante lin. Kaj, per voĉo senkolora, ebena:

— Sed... *mi estas Agnes de Vitry.*

Lorjak. Mariagnes. — Budapeŝto, 1986,
p. 14-15. Roman-fragmento.

— La 14-an de aprilo 1917 en Varsovio, okupita de la germana armeo, mortis Ludoviko Zamenhof. Li estis plena de angoro pro ruiniĝo de siaj idealoj. Dum la tuta vivo li revis pri interkompreno de la homoj, pri paco, frateco kaj justeco inter la popoloj, li fordonis ĉiujn fortojn por konstrui pontojn inter ili, sed nun, kiam eksplodis la monda milito, la popoloj, la homoj, inter ili ankaŭ esperantistoj, troviĝis ĉe diversaj flankoj de la fronto kaj pafadis unuj kontraŭ la aliaj, eble, kun verda stelo sur la brusto. Lia malsana koro ne eltenis: “Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile...”

12 jarojn pli frue, la 21-an de februaro 1905, laŭ peto de la organizanto de la 1-a Universala Kongreso de Esperanto Alfred Michaux¹⁰, li rakontis pri sia vivo. Tio estis periodo de grandaj esperoj por Esperanto kaj por lia persona vivo, kiam la malfavoraj cirkonstancoj ŝajnis forpasi.

Ludoviko Zamenhof

PRI MIA VIVO

...Mi naskiĝis en Bialystok¹¹ la 15-an de Decembro 1859. Mia patro kaj mia avo estis instruistoj de lingvo. La homa lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto el la tuta mondo.

... En mia infaneco mi amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon; sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando nomas sin homoj, kiuj vidas en mi nur *senrajtan fremdulon*¹² (malgraŭ ke mi kaj miaj avoj kaj praaĵoj naskiĝis kaj laboris en tiu ĉi lando)...; mi vidis, ke ankaŭ ĉiuj aliaj rasoj loĝantaj en mia urbo sin reciproke ĉiuj malamas kaj persekutas... kaj mi multe suferis de tio ĉi, kaj mi komencis revadi pri tiu feliĉa tempo, kiam malaperos ĉiuj naciaj malamoj, kiam ekzistos lingvo kaj lando apartenantaj al *ĉiuj* siaj uzantoj kaj loĝantoj, kiam la homoj ekkomprenos kaj ekamos unuj la aliajn.




Gimnazio, en kiu lernis D-ro Zamenhof

En la jaro 1869 mi eniris en la Bialistokan realan gimnazion... kaj mi lernis kun grandaj sukcesoj..., mi estis ĉiam la unua en mia klaso... En 1873 miaj gepatroj transloĝiĝis Varsovion, kie mia patro ricevis la oficon de instruisto de germana lingvo... Mi eniris en la Varsovian 2-an filologian gimnazion, kiun mi finis en la jaro 1879. Tiam mi forveturis Moskvon kaj eniris tie en la medicinan fakultaton de la tiea universitato. Miaj Moskvaj kolegoj estis reprezentantoj de tre multaj plej diversaj rasoj, kaj tio ĉi fortikiĝis en mi la celadon al unuigita homa familio.

Baldaŭ la financa stato de miaj gepatroj fariĝis tre malbona, ili ne povis jam tenadi min en Moskvo, kaj tial en 1881 mi revenis Varsovion, eniris tie en la universitaton, kiun mi finis en la komenco de Januaro

1885. Mi forveturis tiam en la vilaĝo Vejseje¹³, por komenci kuracistan praktikon. Praktikante tie en la daŭro de 4 monatoj, mi konvinkigis, ke mi por la komuna¹⁴ medicina praktiko tute ne taŭgas, ĉar mi estas tro impresigema kaj la suferoj de la malsanuloj tro multe min turmentis. Tiam mi revenis Varsovion kaj decidis elekti por mi specialecon pli trankvilan, nome la malsanojn *de okuloj*...



Varsovia Universitato

Tiam mi konatiĝis kun mia nuna edzino Klara Zilbernik el Kovno¹⁵. La 9-an de Aŭgusto 1887 mi edziĝis. Al mia fianĉino mi klarigis la tutan esencon de mia ideo kaj la planon de mia estonta agado. Kaj mi demandis ŝin, ĉu ŝi volas ligi kun mi sian sorton. Ŝi ne sole konsentis, sed ŝi donis al mia dispono la sumon da mono, kiun ŝi posedis, kaj tio ĉi donis al mi la eblon, post longa vana serĉado de eldonanto, fine eldoni mem (en Julio 1887) miajn unuajn kvar broŝurojn¹⁶...



Presejo Kelter, en kiu oni presis la unuajn esperantajn librojn

Esperanto baldaŭ forglutis la pli grandan parton de la mono de mia edzino; la tutan reston ni baldaŭ formangiĝis, ĉar la enspezoj de mia kuracista praktiko estis terure malgrandaj. En la fino de 1889 ni restis sen kopeko!



*Domo Dzika, 9 en Varsovio, kie de 18
D-ro Zamenhof jam la aŭtoro de la Un
kaj Esperanto*

Tre malĝoja estis tiam mia vivo. Mi
Varsovion kaj serĉi mian panon en ia¹⁷ a
edzino devis forveturi kun mia infano al
mi veturis en la urbo Herson¹⁸... Sed mia
terure trompis: miaj tieaj enspezoj ne sole
mi eblon nutri mian familion, sed eĉ por *m*
sufiĉis: tre ofte mi restadis sen tagmanĝo
tiam ankoraŭ tro fieraj, por akcepti de iu m
tamen la malĝojeco kaj la insistaj petoj d
devigis min akcepti monan subtenadon de
kaj mi revenis Varsovion, esperante, ke
racista praktiko iros pli bone.



Laborejo de D-ro Zamenhof

Fine, dank' al la lasta streĉo de mia energio, la sorto komencis esti por mi pli favora. Baldaŭ mia kuracista praktiko komencis pli kaj pli grandiĝadi kaj jam en la jaro 1901 ĝi estis tiel granda, ke miaj enspezoj tute kovras miajn elspezojn. Mi estas savita. Post multaj jaroj de granda suferado kaj batalado mi nun fine ricevis pli trankvilan vivon, kaj havas tute sufiĉan panon por mia familio (kvankam kompreneble mi devas vivi tre modeste kaj kalkuli ĉiun kopekon)...

Mi havas nun 3 infanojn: unu filon kaj du filinojn¹⁹.

L.L. Zamenhof. Klopodis organizi, sed vane! — (Plena verkaro de Zamenhof, kajero 7). — Kioto, 1980, p. 26-36. Mallongigita.

— La rusa proverbo diras: la vivon travivi estas pli malfacile ol la kampon trairi. Tion ni vidas el la rakonto de Zamenhof. Tion preskaŭ ĉiuj ni pli-malpli scias proprasperte. Kaj tion esprimis poeziece Nikolao Kurzens, plendante pri la grizo, kiu envolvas la vivon, tamen ne perdante esperon pri io bona, kio venos. La versaĵon prezentas Gregoro Rogov.

*Nikolao Kurzens*²⁰

ĈU TIO DO — LA VIVO?

Ne, ne — ankoraŭ io devas veni.

Ankoraŭ devas fajri vera tago,
ankoraŭ devas nigri vera nokto —
ne povas ja de grizo ĉio pleni.

Ĉu vere nur por nin al tombo treni,
ĉu vere nur por morti ni naskiĝis?
Ĉu tio do — la viv'? Ne, ne! Neeble!
Ankoraŭ devas, devas io veni!

Nikolao Kurzens. *Mia spektro*. — Toronto, 1985, p. 37.

— Bonvolu rigardi atente la grandan ekspozicion pri la vivo kaj agado de Ludoviko Zamenhof.

— En la sekva merkredo ni faros superrigardon de la moskvaj revuoj "Ogonjok" ("Fajreto") kaj "Znamja" ("Standardo"). Literaturemuloj okupiĝos en literatura rondo. Por la aliaj okazos lernado de novaj kantoj. Kaj ni vidas ekspozicion de bildkartoj, kiujn ni ricevis el Brazilo.

KOMENTARO

1. Brockhaus /Brókhaus/ kaj Efron — eldonintoj de enciklopedia vortaro.

2. Saint-Saëns /Sen-Sans/ (1835-1921) — franca komponisto.

3. Do ankaŭ Leo Termen, same kiel milionoj da aliaj senkulpaj homoj, fariĝis “malamiko de la popolo”, estis reprezaliita kaj eskortita al punlaborejo en Ekstrema Oriento.

4. Tupolev Andrej Nikolajevič (1888-1972) — ĉefa konstruiciisto de aviadiloj, akademiano.

5. Korolov Sergej Pavlovič (1907-1966) — ĉefa konstruiciisto de kosmo-raketaj sistemoj, akademiano.

6. Ĝis la jaro 1989, kiam estis abolita la artikolo en la Konstitucio de USSR pri la gvida rolo de la Komunista partio (kio kondukis al multipartieco), tiu partio akceptis laboristojn senlime, sed la ceterajn (inĝenierojn, oficistojn, intelektulojn ktp) kun grandaj limigoj. Ankaŭ la personoj pli ol 40-jaraj preskaŭ ne havis ŝancon partianiĝi. Laŭ novaj reguloj, la kandidata periodo por aliĝi al la Komunista partio estis abolita. Ne plu ekzistis limigoj pro klasa deveno, profesio, posteno, nacieco, aĝo. Malgraŭ tio, la kvanto de la membroj de la Komunista partio ne plu kreskis. Male, post la 28-a Kongreso de KPSU komenciĝis amasa eliro el tiu partio. Samtempe en la lando aperis kaj aperas granda kvanto da novaj partioj. Post la konata puĉo, okazinta en Moskvo la 19-an — 21-an de aŭgusto 1991, la agado de KPSU estis ĉesigita.

7. Lorjak (pseŭdonimo de J.L. Mahé /Maé/). Franco. Kelkaj el liaj libroj: “Neologisme”, “Transe”, “Re-toj”.

8. Marie-Rose /Marí-Roz/.

9. Vitry /Vitri/.

10. Michaux /Miŝó/ (1859-1937).

11. Bialystok /Bjalístok/ — pola nomo de Belostoko.

12. Tiu ĉi teksto estas mallongigita formo de letero al A. Michaux. En la fino de la letero Zamenhof skribis: “Se Vi parolos pri mia nacieco, volu diri, ke mi nomas min Ruslanda hebreo”.

13. en la vilaĝon Vejseje (nun Litovio).

14. Prefere: ĝenerala.

15. En Kaunas (Kovno), en la strato Zamenhof ankaŭ nun staras la domo de Aleksandro (Sender) Zilber-

nik (1831-1906), la bopatro de Zamenhof, la unua mecenato de Esperanto. La domo nun apartenas al Litova Esperanto-Asocio. Rektaj prapranepoj de Aleksandro Zilbernik loĝas en urbo Ribinsk, Jaroslavlva regiono.

16. en la lingvoj rusa, pola, franca kaj germana.

17. iu.

18. en la urbon Ĥerson.

19. Dum la Dua mondmilito ĉiuj tri infanoj de Ludoviko Zamenhof — Adamo (1888-1940), Sofia (1889-1941), Lidia (1904-1942) — estis murditaj en germanfaŝistaj koncentrejoj. Saviĝis nur la nepo Ludoviko, kiu loĝas en Francio kaj havas du filinojn. En la tuta mondo restis nemulte da proksimaj parencoj de la aŭtoro de Esperanto. En Moskvo loĝas Zoja Miĥajlovna Zamenhof, doktoro de juraj sciencoj; ŝia avo Fabiano estis kuzo de Ludoviko.

20. Nikolao Kurzens (1910-1958). Multe tradukis el la latva kaj verkis originale versaĵojn.

LINGVA PRAKTIKO

Ne ĉesu esperi

1. Rerakontu la tekston per parola stilo en la nomo de Lev Termen.

2. Kion vi pensas pri tiaj homoj, kiel Termen?

Mariagnes

3. Donu titolon al la romanfragmento.

4. Elskribu el la teksto vortojn kaj esprimojn, kiuj al vi precipe plaĉis. Estus bone, se vi farus tion ankaŭ estonte.

5. Transformu la rakonton en teatran scenon.

Pri mia vivo

6. Imagu, ke dum la 1-a Universala Kongreso de Esperanto Ludoviko Zamenhof renkontiĝis unuafoje kun grupo da entuziasmaj esperantistoj, kiuj faris al li multe da demandoj pri lia vivo. Prezentu tiun konversacion.

Ĉu tio do — la vivo?

7. Trovu en la versaĵo ripetojn. Por kio ili servas?

8. Faru konkludon el la versaĵo.

9. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj:

Ĉasisto, fosisto, modelisto, violonĉelisto, optimisto, financisto, ekspedisto, turisto, redaktisto, rasisto, humoristo, insisto, tegmentisto, negocisto, interpretisto, humanisto, egoisto, sorĉisto, magiisto, ekvilibristo, mue-
listo, kaktisto.

Elpensu vortojn por neekzistantaj "istoj" kaj klarigu ilian sencecon (ekzemple, "intrigisto" — homo, kiu profesie intrigas).

10. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Penso — pensio, laŭdo — alaŭdo, amplekso — perplekso, inteligenta — intelekta, mieno — mino.

11. Al la frazpecoj el la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu havas oron,	havas la rajton.
Kiu havas nenion,	havas honoron.
Kiu havas la forton,	ĉiam malpravas.
Kiu forton ne havas,	iras facile.
Kiu iras trankvile,	estas nenio.

12. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kiam naskiĝis kaj mortis Ludoviko Zamenhof?

b) En kiuj universitatoj kaj laŭ kiu fakoj li studis?

c) Diru la antaŭnomon de lia edzino.

ĉ) Diru la antaŭnomojn de liaj infanoj.

d) Kiu Esperanta memoriga loko troviĝas en Kaunas?

e) En kiuj lingvoj komence aperis la Unua Libro?

f) Kies pseŭdonimo estas Lorjak?

g) Diru la titolon de la sola libro de Nikolao Kurzens.

13. Temo por diskuto aŭ rakonto: Riĉigas ne enspezo, sed prudenta elspezo.

14. Imagu, ke vi trafis en Parizon nur por unu tago. Kion vi tie faros? Se vi hazarde estas parizano, imagu ke vi trafis rusian vilaĝon.

— La akriĝintaj lastatempe naciaj rilatoj, kiuj fojfoje kondukas al konfliktoj, igas tiun temon tre aktuala. Sajnis, ke dum pli ol 70 jaroj post la Oktobra revolucio en 1917, la nacia demando estis solvita en nia lando. Sed evidentiĝis, ke la malsanon oni nur enpelis internen, kaj ĉe oportuna okazo ĝi elimpetis kiel ĝino el la botelo. Pri tiuj problemoj parolos hodiaŭ Leonido Ionin.

LA NACIA MEMKONSCIO KAJ NACIIISMO

Kiam homoj unuiĝas en grupon, kiu konscias sian unuecon, ili ellaboras koncepton pri valoroj, sur kies bazo ili unuiĝas. Ekzemple, filatelistoj unuiĝas surbaze de amo al poŝtmarkoj¹. La homo eniras la grupon kaj povas eliri el ĝi, kiam ekdeziros.

Sed estas grupoj, kie ni membras sendepende de nia volo, — la grupoj, al kiuj la homo estas ligita per la fakto de sia naskiĝo. Ĉiu naskiĝas kiel viro aŭ virino, ĉiu naskiĝas kiel litovo, ruso, hebreo aŭ tataro.

Kiam la nacia grupo ellaboras memkonscion, en ĝi formas sin la koncepto pri pozitivaj kaj negativaj valoroj. La "liveranto" de la pozitivaj valoroj kutime estas sia historio — reala aŭ fikcia. Sed kio koncernas la negativajn valorojn, ili kutime restas koncentritaj en la bildo de iu grupo, ofte nacia, kiu estas kulpigata pri ĉiuj malfeliĉoj de la popolo — kaj pasintaj kaj nunaj. En la ĉiutaga vivo, kaj ne nur en ĝi sed ankaŭ en la scienco — tia substituo nomiĝas "fenomeno de pro-peka kapro"².

Ekstremaj formoj de naciismo ne tuj aperas, sed ili formiĝas per "polarizo" de la bono kaj malbono: ju pli abomena (pli malpura, pli fia, pli malica) aspektas la alia popolo, des pli multe da puro kaj majesto estas atribuita al la propra popolo — entute kaj al ĉiu reprezentanto — aparte. Estas tre oportuna rimedo antaŭpravigi ĉiujn proprajn emojn kaj agojn. Oportuna kaj malkara, ne postulanta la penon de memperfektiĝo.

Tie ĉi estas farata kruda kaj danĝera falsajo: la fakto (de naskiĝo, de nacia aparteno) estas deklarata kiel kriterio de moraleco. Ĝuste tiel konstruis sian propagandon la nazioj³. Ilia argumento — sufiĉe ŝablona — estas facile rekonebla en la tendencoj al morala teroro, ekstermo de alipensmaniero, alivivmaniero.

La teoria rezonado ĉi-kaze konvinkas ne sufiĉe. Mi antaŭvidas la ĥoron de indignantaj voĉoj: sed ĉu ne estas vero, ke tiaj-jenaj (rusoj, hebreoj, kartveloj ktp) volas neniigi nian nacian originalecon, senigi nin je nia patrolingvo, tradicioj, entute je rajtoj vivi niamaniere, kiel ni deziras (estone, kartvele, ruse, abĥaze ktp)? Ĉu ne rajtas ĉiu popolo havi propran historion, propran kulturon, proprajn valorojn? Kaj ĉu la naciismo ne estas ĝusta vojo al renaskiĝo de la nacia memkonscio?

Mi respondas. Al la unua demando: ne estas vero. Neglekto de la specifeco de nacia ekzisto, kiu manifestiĝis en nia lando tiel krude, subpremo de la kultura kaj nacia diverseco — estas ne tiom rezulto de ekspansio de iu nacio, kiom produkto de politiko, kiu bazas sin sur la eksternacia totalisma ideologio.

Al la dua demando: certe, ĉiu popolo rajtas je propra lingvo, propra kulturo, propraj valoroj. Tamen (kaj ĉi tie ni jam estas respondontaj al la lasta, tria demando) oni ne povas akiri propran dignon ne respektante alies dignon. Oni ne povas iĝi libera, sklaviginte la alium. Oni ne povas akiri feliĉon, malfeliĉiginte la alium. Sed la naciismo estas strebo instali sin, sian popolon je la kosto de alia popolo.

La rajto de ĉiu popolo je aŭtonomeco kaj memdetermino estas neforprenebla parto de homaj rajtoj kaj liberoj. Same kiel la rajtoj de la individuo je aŭtonomeco kaj sendependeco. Kaj nia nuna batalo por la demokratio estas ankaŭ la batalo por la rajto de ĉiu popolo je elekto de propra sorto. Kiel tia, ĝi ne postulas naciisman baziĝon. Male, ĝi neas la naciismon.

Leonid Ionin. Demon nacionalizisma. //
Moskovskije novosti, 1989, N° 30,
p.13. Mallongigita traduko.

— Ĉu la mondo konstante progresas? Ve, ni povas konstati, ke almenaŭ en sociaj kaj moralaj demandoj ĝi ofte stagnas kaj eĉ regresas. Nun, ĉe la fino de la 20-a jarcento, ni kun konsterno relegas la flamajn, el la koro elŝiritajn vortojn de Ludoviko Zamenhof pri patriotismo, pseŭdopatriotismo, naciismo kaj ŝovinismo. Tiujn vortojn li eldiris komence de la jarcento, en 1907⁴; sed ili ŝonas hodiaŭ pli ol aktuale: enpeniĝu en ĉiun frazon. Ĉu vere la mondo esence ne ŝanĝiĝas?

Ludoviko Zamenhof

PATRIOTISMO KAJ PSEŬDOPATRIOTISMO

... La dua kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni, esperantistoj, estas malbonaj patriotoj. Ĉar tiuj esperantistoj, kiuj traktas la esperantismon kiel ideon, predikas reciprokan justecon kaj fratecon inter la popoloj, kaj ĉar, laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj, patriotismo konsistas en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro! Dum la pseŭdo-patriotismo, t.e. genta ŝovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas⁵. La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si. Ĉiu povas paroli al ni pri ĉiuspeca amo, kaj ni kun danko lin aŭskultas; sed kiam pri amo al la patrujo parolas al ni ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homoj — tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam

uzu la vorton "amo", ĉar en via buŝo la sankta vorto "amo" malpurigaŝas.

Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo⁶, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun neniu alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas: ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simile al multaj centoj da miloj da aliaj viaj filoj — aŭ ĉu tiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj aŭ sklavoj! Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluiĝi per sia tuta koro al tiu peco de tero, kiu lin naskis!

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin ĉiujn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de tiuj homoj, kiujn ni vidas en tiu ĉi ĉambrego kaj kies nomo, ankoraŭ tre malmulte konata kaj tre malmulte ŝatata, estas "esperantistoj".

L.L. Zamenhof. Por kaj kontraŭ reformoj
(Plena verkaro de Zamenhof, kajero 8). —
Kioto, 1980, p. 88-90. Fragmento.

— Estas vaste konate, ke Zamenhof dediĉis sian vivon al forigo de lingvaj konfliktoj. Estas malpli konate, ke li strebis ankaŭ al forigo de naciaj kaj religiaj kon-

fliktoj. Do estas interese konatiĝi kun liaj trafikaj pensoj pri naciismo, kiujn li surpaperigis la 30-an de junio 1914, unu monaton antaŭ la komencigo de la Unua mondmilito.

Ludoviko Zamenhof

PRI NACIONALISMO⁷

Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devas esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj — kiel natura sindefenda reago — estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala.

L.L. Zamenhof. Mortinta sed senmorta
(Plena verkaro de Zamenhof, kajero 9). —
Kioto, 1981, p. 403-404.

— En la literatura parto de nia kunveno ni ekscios pri aventuro, kiu okazis en iu totalisma lando, kie ekblovis ventoj de demokratio.

Glauco Rodrigues Corrêa⁸

LA NOVA NAJBARO

Mi surpriziĝis, kiam najbarino vizitis min kaj mallaŭte, sekrete flustris al mi en la orelon ion nekompreneblan. Ŝi murmuretis al mia orelo, sed kun atentaj

okuloj observis ĉiujn angulojn de la ĉambro, — kvazaŭ la muroj — ankaŭ ili — havus orelojn.

— Morgaŭ venos la nova najbaro — ŝi diris.

La najbarino pacience klarigis al mi la aferon. Ha! Temas pri la luebla domo apud la mia, finfine mi komprenis. Nova loĝanto morgaŭ venos kun siaj familio, meblaro, servistino, hundo kaj...

— Kial al mi vi rakontas tion?

— Ho, kara najbaro, pro tio, ke la venonto estas generalo.

— Sekve?

— La tuta najbararo forte timas, ke generalo venos loĝi tiel proksime al vi. Ni ne povas forgesi vian malgajan... kiel diri?... situacion.

Ĝis certa punkto ŝi pravas, mi pensis, sed la teruraj tagoj jam pasis, hodiaŭ oni pli libere spiras, oni komencis vivi en demokratia medio. Jam pasis la politikaj persekutadoj, arestoj de ĵurnalistoj, studentoj, laboristoj kaj aliaj kontraŭstarantaj la militistan reĝimon. Hodiaŭ la militistoj jam konsentas pri sia retiriĝo el la scenejo. Ĉion ĉi tion mi diris al la najbarino, por ke ŝi kaj la aliaj ne maltrankviliĝu:

— Mi estis arestita en militista malliberejo, sed tio ne plu gravas. Vidu: la nuna prezidento, kvankam li estas generalo, jam amnestiis ĉiujn politike kondamnitajn, do li faris la unuan paŝon al plena demokratio.

En al sekvanta tago frumatene haltis antaŭ la apuda domo kamiono, kiun malŝarĝis viroj, venantaj kaj revenantaj kiel diligentaj sed bruegaj formikoj. Post la tagmanĝo mi iris mian laborejon, kaj preterpasante la najbaran domon, krom la ŝarĝoportistoj mi vidis nur junulinon aspektantan kiel servistino, kiu observis min de la unuaetaĝa fenestro. La generalo eble komandis siajn oficirojn kaj soldatojn en la kazerno.

Ĉar mi ordinare restis hejme dum la matenoj, post la enloĝiĝo de la nova najbaro mi akceptis sinsekvajn vizitantojn — zorgemajn genajbarojn, kiuj konstante kaj akurate sciigis min pri la paŝoj de la generalo, kvazaŭ mi devus esti ĉiam informata pri la movoj de la mal-amiko.

— La nigra aŭtomobilo de la generalo ĉiutage venas akurate la sesan⁹ matene.

— La ŝoforo de la generalo estas forta viro, kaj mi opinias, ke li kaŝe portas revolveron.

— Hieraŭ vespere la generalo daŭre rigardis vian fenestron.

— Dum li atendis la generalon, la ŝoforo promenis tien kaj reen antaŭ via pordo.

— Evitu la generalon!

— Estus bone, se vi dormus en la hejmo de amiko almenaŭ dum kelka tempo.

Sensukcese mi petis miajn zorgantojn, ke ili ĉesigu la nenecesan gvatadon, sed ili daŭrigis siajn strategiajn manovrojn, ĝis kiam...

Mi matenmanĝis. Estis dek minutoj antaŭ la naŭa. Du ekscitiĝintaj najbaroj invadis mian kuirejon, kaj diris per tremanta voĉo:

— La aŭtomobilo ne venis!

— Kio? — mi demandis.

— La aŭtomobilo, la nigra aŭtomobilo ne venis. La generalo restas hejme!

— Sekve?

— Estas danĝere.

La restado de la generalo en la domo signifas, laŭ miaj najbaroj, baldaŭan atakon al mia fortikaĵo. Mi provis ilin trankviligi kaj ilin akompanis ĝis la pordo.

Estis la unua horo postagmeze, kiam alvenis alia najbaro tiel ekscitiĝinta, kiel la antaŭaj vizitintoj.

— La generalo emeritiĝis. Mi ĵus vidis lin en civilaj vestoj.

La okuloj de mia najbaro brilis pri ĝojo. Laŭ li, la emeritiĝo de la generalo forigas la danĝeron, kiu kvazaŭ glavo de Damoklo pendas super la kapo de la eksarestito politike. Mi eliris el la hejmo. Preterpasante, mi ne povis ne rigardi la ĝardenon antaŭ la domo de la generalo. Sur komforta ĝardenseĝo li sidis en la malvasta ombro de la sola arbo. Mi respektive kapsalutis lin, kaj li afable reciprokis mian saluton.

De tiam ni ĉiam reciproke nin salutis. De la kapmovoĵ ni baldaŭ atingis laŭvoĉan saluton:

— Bonan tagon, sinjoro generalo!

— Bonan tagon, sinjoro!

De tiaj respektoplenaj salutoj ni venis al pli familiaraj formuloj, akompanataj de varmaj mansignoj;

— Saluton, generalo!

— Saluton, najbaro!

La tuta najbararo, kiu komence gvatis la scenon de malantaŭ la duonfermitaj fenestroj, iom post iom ilin malfermis, kaj... ridetis. La viktimo estis savita. La turmentisto emeritiĝis.

Iun matenon la generalo eliris el sia domo kaj marŝis ĝis la stratangula vendejo, de kie li venis kun ĵurnalo kaj pansaketo, fiere marŝante, kiam du-tri paŝojn antaŭ la domo virina figuro aperis en la unuaetaĝa fenestro kaj ekkriis:

— Mankas butero, Epaminondo! Reiru la vendejon por ĝin aĉeti!

Kaj Epaminondo iom mallerte reprenis la vojon por plenumi la ordonon de ŝia generalina moŝto. La najbararo komence ridetis, poste... ridis. Iuj eĉ ridegis.

Hodiaŭ ĉiuj laŭtvoĉe salutas lin:

— Hola, Epaminondo! Kiel fartas la generalino?

Trezoro: La Esperanta novelarto 1887-1986.
Dua volumo. — Budapeŝto, 1989,
p. 662-666. Mallongigita.

— Sekvas plua versaĵo de la konata poetino.

Hilda Dresen

EN MOMENTO EKSCITA

En momento ekscita
de turmento subita
ne supozu,
ke jam ĉio perdita.

Kia ajn via stato
post kruela sort-bato,
ne almozu
kun humil' je kompatato.

Ŝtormajn ondojn tranagu,
firmu, spitu, kuraĝu,
ne ripozu,
ĝis ekstaros vi ree
sur la ter' senperece.

Hilda Dresen. Norda naturo. —
La Laguna, 1967, p. 137.

— Merkrede ni aŭskultos politikan informadon pri la situacio en la Proksima Oriento. Krome okazos ekspozicio de Esperanto-gazetaro. Kaj eble venos gastoj el Irlando.

KOMENTARO

1. Esperantistojn unuigas la internacia lingvo Esperanto kaj strebo al interkompreno, paco kaj kunlaboro inter popoloj.

2. Tiel oni diras pri homo aŭ homgrupo, kiun oni konstante akuzas pri ĉio.

3. kaj ankaŭ nun konstruas ĉiaspecaj ŝovinistoj kaj pseŭdopatriotoj.

4. "Post la Kembriga kongreso, la urbeŝtraro Londona oficiale akceptis Zamenhof kaj la tutan kongreson en la fama urbodomo "Guildhall" /Gildhol/. En la vasta kvazaŭ katedrala ĉambrego jam estis solene salutata pli ol unu gasto multe pli glora: fremda reĝo, venkinta generalo, prezidanto de respubliko. Sub altaj arkajoj de l' antikva festejo nun sonis unuafoje la voĉo modesta, sed tre decida, de simpla okulisto, granda per la celo, granda per genio. Neniun forton li prikantis, neniun batalon per armiloj. Pri brulanta temo de patriotismo kaj malamo li kuraĝis paroli delikate, sed klare, eĉ energie" (Edmond Privat /Edmón Privá/. Vivo de Zamenhof. — Rickmansworth, 1957, p. 87-88.).

5. Vidu la tekstojn de Korotič kaj Eroŝenko en la leciono 1.

6. La historia Litovujo, pri kiu parolas Zamenhof, havis pli vastan teritorion ol la nuna Litovio.

7. Nun oni preferas pli mallongan (kaj pli "Esperantan") formon *naciismo*.

8. Glauco Rodrigues Corrêa /Gláuku Rodrigues Corrêa/. Naskiĝis en 1929. Brazilano. Esperantistiĝis en 1980. Portugallingva verkisto kaj kritikisto. En Esperanto verkas kaj tradukas novelojn.

9. Prefere: je la sesa.

LINGVA PRAKTIKO

La nacia memkonscio kaj naciismo

1. Uzante la materialon de la teksto, prezentu disputon inter kelkaj personoj, kiuj okupas diversajn poziciojn pri la nacia demando.

Patriotismo kaj pseŭdopatriotismo

2. Trovu en la teksto lokojn, kiuj atestas, ke ĝi estas verko de oratoro, publika parolado.

3. Verku oratorojn, en kiu esprimu viajn personajn pensojn pri patriotismo, pseŭdopatriotismo, naciismo kaj ŝovinismo.

La nova najbaro

4. Rakontu, kiel evoluis la rilato de la aŭtoro al la generalo. Kiel tiu evoluo estas videbla laŭ la uzata leksiko?

En momento ekscita

5. Klare montru la temon de la versaĵo per unu frazo.

6. Trovu vortgrupojn kun verboj, havantaj la finaĵojn -u.

7. Formu vortojn kun la sufikso *-abl-* de taŭgaj por tio vortoj el la tekstoj de la leciono.

8. Al la frazepcoj en la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu multe babilas, ne estas danĝera.

Kiu multe minacas, maltrafas sian celon.

Kiu multon deziras, restas sen mango.

Kiu rigardas ĉielon, al si mem malutilas.

Kiu venis post la mango, nenion akiras.

9. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Febro — fibro, nacio — nazio, — nazo, ekstrema — eksterma, kontribui — atribui, konstanta — kostanta — konstata.

10. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kiam, kie kaj okaze de kiu evento Ludoviko Zamenhof faris sian faman paroladon pri patriotismo kaj pseŭdopatriotismo?

b) En kiu lando loĝas Glauco Rodrigues Corrêa?

c) Pri kio temas multaj versaĵoj de Hilda Dresen?

11. Temo por diskuto aŭ rakonto: Putrado de fiŝo komenciĝas de la kapo.

12. Faru planon de numero de Esperanto-gazeto.

LECIONO 10

— Malproksimiĝas la dato de forpaso de Vladimir Semjonoviĉ Visockij (1938-1980), bardo, aktoro de teatro kaj kino, sed la fenomeno de Visockij restas. Malfavorata de oficialuloj, li estis amata de la tuta popolo. Milionoj da kilometroj da magnetofona bendo portas lian pasian, raŭkan voĉon, kiu en la longa periodo de stagnado portis al la homoj veron, kuraĝon, bonan humoron. La popolo rekonis sin en liaj baladoj kaj satiroj. Dum siaj koncertoj Visockij ŝatis diri kelkajn frazojn al la publiko en paŭzoj inter kantoj. Ni aŭskultu iom el ili — ili estas kolektitaj en unu loko. En la fino de la kunveno ni aŭskultu registraĵojn de kantoj de Visockij kaj prezenton de liaj kantoj en Esperanta traduko.


Vladimir Visockij

PRI LA AŬTORA KANTO

Mi ne tre ŝatas, kiam miajn kantojn prezentas aliaj kantistoj, la estradaj. Ne tial, ke ili tion faras malbone. Male, ili kantas bone. Ili havas belajn voĉojn kaj ili lernas la kantadon dum kvin jaroj en la konservatorio. Sed inter la estrada kaj la aŭtora kantoj estas “du grandaj diferencoj”, kiel oni kutimas diri en Odeso. La estrada kanto supozigas orkestron, spektaklecon.

Rimarku, ke nenies kapon vizitas la ideo kunpreni magnetofonon al estrada koncerto por registri, ekzemple, Kobzon-on aŭ Magomajev-on, por kiuj mi havas tutan respekton. Simple, kiam oni revenas hejmen, la spektakleco foriĝas, kaj la kanto surbendigita perdas sian allogon. Tio okazas, ĉar estradaj aŭtoroj tre malmulte atentis pri la vortoj de kanto. La estrada kanto ja havas tri aŭtorojn: la komponiston, la teksto-verkinton kaj la kantiston, kiu interpreteblas la verkon. Nature, la emfazo estas je la muziko — la orkestro sonas ĉiam tre forte. La estrada prezento estas bone aranĝita, solida, porĉiama. Sed ion neatenditan vi neniam aŭdos.

Kaj se vi jam konas la kanton, ĝi ĉiam sonos laŭ la sama ŝablono.



La aŭtora kanto estas afero tute alia. Mi ĉion faras mem. Mi laboras nokte, mi kunkreas kaj la muzikon kaj la tekston. Foje verslinio venas en la kapon. Mi ŝaltas la magnetofonon, mi serĉas muzikan frazon, kiu akompanu ĝin. Poste mi eliras en la salonon antaŭ la publikon kaj mi sinjoras pri mi mem. La vortoj kantotaj estas miaj, tial mi publike traktas ilin laŭplaĉe. Okaze mi kelkion ellasas, kelkion enlasas. Ĉio dependas de la publiko. Laŭ mi, la aŭtora kanto estas afero pli vivovigla, pli vivkapabla. Kantojn tiaspecajn la homoj deziregas magnetofone registri por ankoraŭfoje aŭskulti ilin hejme kaj kapti la aŭtoran mesaĝon. Ĉar la emfazo ĉe tia kanto estas kompreneble je la vortumado, je la teksto.

...Ofte oni demandas al mi perletere, ĉu mi havas proprajn spertojn pri militado, navigado, suferado en karceroj, flugado, ŝoforado. Tial, ke preskaŭ ĉiuj miaj kantoj estas verkitaj en la unua persono. Tio tamen ne

signifas, ke mi ĉion spertis proprapersono, ĉion vidis kaj konas. Ne, por tio oni bezonus multe da vivoj. Simple, mi ŝatas aŭskulti alies rakontojn... Kaj, plej grave, mi deziras rakonti tion al vi — kompreneble, laŭ la kleo de mia propra alrilato kaj kompreno pri la temo. Guste tial mi riskas mi-diri. Ja la materialo estas tralasita tra miaj kapo kaj animo, kiel se ĉio ĉi estus okazinta al mi. Tial mi kantas en la unua persono, kaj miaj kantoj estas monologaj kantoj.

Preskaŭ el ĉiuj urboj vizititaj mi kunportas skizojn, impresojn aŭ simple disajn versliniojn tie naskiĝintajn. Miaj publikaj aperoj ne similas estradajn koncertojn. Ili pli similas amikan renkontiĝon, konversacion. Ja dekomence mi verkadis miajn kantojn por miaj tre intimaj amikoj. Ili estis miaj solaj aŭskultantoj. La kantoj estis rakontoj pri tio, kio min emociis, nur rimitaj kaj prezentataj kun la gitaro por pli granda efiko. La etoso estis amikeca, senĝena, libervola. La konfida etoso. Multaj jaroj pasis, sed tra ĉiuj tempoj kaj tra ĉiuj salonoj kaj haloj mi penas kunporti la senton, kiun mi iam havis, kantante ĉe amika privata hejmo. Povas esti, ke ĝuste pro tiu amikeca agordo la kantoj iĝis konataj.

... Al la aŭtora kanto mankas la spektakleco, kiu ĝin sublimus. Anstataŭe troviĝas en ĝi io alia. Ĝi estas improvizebila. Plie, ĉar ĝi estas konversacio, necesas konsideri, ke ĉiufoje venas malsamaj konversaciantoj. Se la artisto havas propran opinion kaj juĝon pri la vivo, li estas spektata kun pli da intereso ol tiu, kiu simple imitas iun aŭ ion.

Vladimir Visockij. Ob avtorskoj pesne. — Sovetskij ekran, 1988, N° 3, p. 11. Mallongigita traduko.

— La 7-an de majo en nia lando estas tago de radio kaj televido, kaj la 17-an de majo estas internacia tago de telekomunikado. Lige kun tio, ni ĝojas prezenti la parolon al nia malnova amiko, redaktoro de la Esperanto-redakcio de Pola radio Jerzy Uspieński /Jéji Uspénski/.

LA RADIO KONTRAŬ LA MALBENO DE BABELTURO¹

Ĉu vi estis iam en Babeltur-lando? Certe, jes, eĉ plurfoje, sed vi eble ne konsciis tion. Ĉiufoje, kiam vi manipulas ĉe radioricevilo, vi “vizitas” ĉi tiun imagitan landon. Manipulante radion, ni plej facile kaj okulfrape spertas, kio estas la lingvodiverseco, la lingvobaroj. Homoj penas eviti ilin, ĉirkaŭiri. En la radio vi plej ofte povas trovi plurajn programojn en via gepatra lingvo. Sed ili estas plejparte speciale preparitaj por samlingvanoj, por ilin influi, iam eĉ — manipuli. Kaj via elektoebleco estas limigita.

Kaj nun mi proponas, ke vi faru imago-ludon: sidante ĉe radioricevilo kaj turnante la agordilon, imagu, ke ĉiuj nekompreneblaj voĉoj aŭdataj subite ekparolus unu saman lingvon kompreneblan al vi kaj al ĉiuj. Kaj vi pripensu dum kelka tempo, kiaj estus rezultoj de tia “lingva revolucio”, nur en la radiofonio. Kaj en televido, gazetaro, aliaj homaj rilatoj?!

Nu, ĝuste tian situacion celas esperantistoj. Ni kredas, ke ĝi povas realiĝi en iu pli-malpli fora estonteco. Tamen multaj esperantistoj ne sufiĉe konscias, ke la procezo celanta enkondukon de unusola mondlingvo, almenaŭ en la radio jam realiĝis. Temas, kompreneble, pri la uzado de Esperanto en radiofonio. Jam nun, almenaŭ dum iuj semajno-tagoj, kiam Esperanto sonas eĉ 17-foje, tio estas sentebla. Ni povas *praktike sperti en la realo* la valorajn rezultojn de unulingveco en la radio. Ankaŭ la ĉiutagaj Esperanto-elsendoj de Varsovio kaj Pekino ebligas diversajn konkludojn.

Pri tio, kion donas la Esperanto-elsendoj, atestas la leteroj de la aŭskultantoj. Mankas nun loko por citi ilin. Mi do provos listigi kelkajn gravajn konkludojn, kiuj sekvas el la leteroj kaj aliaj observoj:

a) Esperanto en la radio ebligas ĉiutagan kontakton kun la lingvo. Tre gravas, ke estas la parola lingvo-formo, varia, diverstema, diversnivela;

b) Esperanto en la radio estas praktika demonstro de la lingvoegaleco. La programoj estas preparataj por

kaj aŭskultataj de vasta internacia publiko, de la homoj el diversaj sociaj medioj;

c) regula aŭskultado de Esperanto-elsendoj vastigas kaj profundigas la kulturan-edukan nivelon. Pro vastigo de la konoj kaj emocia travivado de la kulturtemaj programeroj: literaturaj, muzikaj, raportaj ktp;

ĉ) regula aŭskultado de Esperanto-elsendoj el unu lando permesas ekkoni ĝin pli bone. Tio iam instigas al plia profundigado de la konoj, kiujn oni eĉ aplikas en sia faka aŭ publika agado;

d) nur la elsendoj en la internacia lingvo ebligas specifan kontakton kun la vasta internacia medio. Nuntempe kun homoj el la tuta mondo, kiuj rekte aŭ malrekte (per siaj korespondaĵoj) partoprenas en la elsendoj. Tio vekas la sentojn de aŭtenta internaciismo, pac-amo, amikeco. Certe tial en Pola radio estas plej popularaj la "Koncertoj kun bondeziroj", en kiuj la aŭskultantoj bondeziras unuj al la aliaj, aŭ "Radio-Forumoj" (leteroj de aŭskultantoj kun ilia komentado);

e) Esperanto-elsendoj plifortigas la senton de ligiteco kun la vasta familio de samideanoj, do — kun Esperanto-movado en ties diversaj formoj. La aŭskultantoj plej regule ricevas la plej aktualajn informojn el Esperantujo. Tio faras pli videbla funkciadon de la movado kaj sekve faciligas kaj instigas kunagadon. Verŝajne tial esperantistaj aŭskultantoj apartenas al la plej aktivaj. Ili peradas informojn, surbendigas elsendojn, aŭdigas ilin en la kluboj, kursoj, sendas al amikoj ktp;

f) fine (sed ne lastsignife) mi volas emfazi, ke la aŭskultado de Esperanto-elsendoj simple *donas plezuron*. Pruvas tion la amikeco-sento, kiu ŝvebas sur "niaj" radio-ondo.

Resumante — la aŭskultado de Esperanto-elsendoj estas la plej facila kaj... malmultekosta utiligado kaj ĝuado de Esperanto kaj Esperantujo. Kiu ankoraŭ ne spertis tion, tiu provu. Eĉ hodiaŭ!

— Vere, kial ne hodiaŭ? Bonvolu reskribi de sur la anonctabulo detalojn pri esperantlingvaj radioprogramoj de Varsovio, Pekino, Vieno, Romo, Vatikano, Zagrebo,

Berno, Havano. Kaj aŭskult redakcio: diskutu, proponu danku, kritiku aŭ simple korigu gramu kaj la aŭdo-kvaliton. I ŝatas la voĉojn en Esperanto. la voĉoj plue aŭdigu kaj eĉ plu.
— La 8-an — 9-an de maj de venko super la faŝisma Ĉ homaro, kaj unuavice al la p rajn detruojn kaj malfeliĉojn alvoko: el Germanio ne plu milito. Kun la temoj de faŝi du literaturaj verkoj, kun kiu

Ēva Tófalvi kaj Oldřich K

KIUJ SEMAS

Pander silente observis ti dis, poste demandis per voĉo
— Junulo, ĉu vi bone prip

— Kompreneble, pripensis.

— La laboron komisiitan l de enorma fido flanke de la plenan paŭzon. — Vi jam se devo ellerni Esperanton. Tio kiel atestas via lingvokapable vizitadu la kurson. Jam en t kun multaj lernantoj, kio pro Atingu bonegan rezulton kaj maniere. Provu alhavigi la fid

Mia instinkto sugestis al plu:

— Por bone labori, vi nep toj troveblaj en neniuj prim Post longa paŭzo ni permes fondiĝon de la nuntempa Esp la esperantistoj, kiuj jam del tis niaj kontraŭuloj. Kiel do ulis ilin, instigis fariĝi mult

plimultiĝi por povi argumenti per la nombro — nome granda societo jam rajtas fondi asocion — kaj ni permesis, ke sub ilia flago kolektiĝu ĉiuj adeptoj, ke ni klare vidu, kun kiel nombra malamika aro kalkuli. Do, la celoj de ni ambaŭ proksimiĝas, ha-ha, — li cinike ridis pro la sukcesinta spritaĵo. — Kiam la nombro de aliĝintoj komencis stagni, tiam ni aprobis fondiĝon de la Ligo. La esperantistoj orgojle festis la atingon, kaj ankaŭ ni povas esti kontentaj — ni povas ilin ne nur kalkuli, sed ankaŭ pli oportune observi.

— Ĉu vi permesas unu demandon?

— Bonvolu! Kion fakte vi volis demandi?

— Nome tion, ĉu ĉiuj esperantistoj estas malamikoj.

— Ĉiuj esperantistoj estas niaj potencialaj malamikoj! Vi trovos inter ili ĉiuspecajn kontraŭulojn de la faŝismo. Ili ĉiuj per sia lingvo volas atingi iam friponan komunumon de la popoloj. Sed ni ne bezonas ĝin! Aŭ jes? Jes?

Li estis ruĝa pro ekscito.

— Ĉu vi jam vidas kaj komprenas, pri kio temas? Ke unu infaneca pola judo³ elpensis ian frenezaĵon, miksaĵon de diversaj lingvoj... nu, ĝis tiu punkto ni povus ĝin neglekti — cetere la judojn ni enordigos, kiam la potenco estos nia⁴ — sed neniam tiun impertinentan aserton, ke hibridon nomatan lingvo oni povas utiligi! Kaj pere de ĝi diversnaciaj komprenas unu la alian!

Li ŝajnis ricevi apopleksion pro tiu impertinento.

— Ni devas skrupule prepari nin por transpreni la potencon. Ni devas havi apartan dosieron por tiuj, kiuj jam hodiaŭ estas amikoj kaj apartan pri niaj malamikoj. La mezan vojon ni ne konas! La kontraŭulojn ni laŭplane kaj kruele ekstermos. Jes, kruele. Tion komprenu senpere, ne simbole. La neflekseblaj estos rompitaj kaj fariĝos niaj servutuloj. Ĉu komprenite?

— Nature. — Mi estis surprizita pro lia elokventeco.

— Koncerne la esperantistojn, Hitlero jam delonge genie rimarkis la danĝeran ligitcon inter la mondcivilitajn ideojn kaj Esperanto.

— Genia, antaŭvidema, — mi konfirmis entuziasme, supozante ke Pander atendas de mi laŭdon pri la Führer⁵.

— Post la fondo de la enlanda Ligo la verdstelanoj rajtis propagandi sian lingvaĉon eĉ en la gazetaro. Tion obstakli ni ne volas, eĉ ne povas. Kial oni suspektu, ke ni observas ilian agadon? Tamen *tion ĉi* ni devas fari konstante. Nia tasko estas kribri ilin, decidi, kun kiuj la kunlaboro estas ebla, kaj aliflanke subpremi la emon al la tiel nomata internaciismo. Ni havas por tio specialajn rimedojn... Sendube, vi scivolas pri viaj taskoj, ĉu ne?

— Ege, — mi respondis aŭtomate.

— Via tasko estos nur priesplorado. Nek pli, nek malpli. Konsideru via partia devo anonci ĉion, kio ŝajnas al vi grava el la vidpunkto de via misio, kion vi spertos en la grupo, al kiu vi formale aliĝos. Fari konkludojn estos jam nia tasko. Pri la politikaj aferoj vi ne rajtas eldiri opinion.

— Se iu hazarde blasfemos la partion, ĉu mi toleru?

— Kompreneble! Kaj anoncu tion. Tiamaniere ni povos konatiĝi kun la politikaj konvinkoj de la grupanoj.

Éva Tófalvi kaj Oldřich Kníchal.

Kiuj semas plorante... —

Rotterdam, 1984, p. 54-57.

Mallongigita roman-fragmento.

Kolomano Kalocsay⁶

EZOPA⁷ FABLO

La ĉeval' kaj bovo ie
Ekdisputis energie
Pri l' merito
En milito.

Diris la ĉeval' incite:
"Eh, malsprite
Estus dubi nian gloron
Kaj valoron.

La ĉevaloj
 Al bataloj
 Kuri ĉiam estis pretaj
 Je l' trumpetaj
 Sonoj,
 (Iom helpis ankaŭ spronoj)
 Kaj la ŝarĝon de l' kanonoj
 Tra abruptaj ŝtonoj
 kiuj trenis?
 Nur ni!" — la ĉevalo henis.

Bov' respondis dum remaĉo:
 "Ĉevalaĉo!
 Yi ja vane fanfaronas,
 Ĉar ni donas
 Tamen la plej grandan servon!
 Ja al si la cerbon
 La marŝalo vane rompas,
 Vane pompas
 La kurago,
 Se l' furago
 Mankas.
 Kaj al kiu dankas
 La viandon la soldat' malsata?
 Al la bovo malsatata!
 Via gloro sole ŝajnas,
 Ĉiun venkon bovo gajnas".

Paŝtis sin melankolie
 Ankaŭ la azeno tie.
 Ĝi malplaĉe aŭdis,
 Ke sin ili laŭdis.
 Ĝi iais
 Kaj balais
 La aeron per oreloj,
 Kaj ekkriis: "Bagateloj!
 Jen la vero:
 Sur la tero
 Se azenoj ne amasus,
 La milit' eĉ ne okazus!"

K. Kalocsay. Streĉita kordo. —
 Budapeŝt, 1931, p. 122-123.

— La vizitintoj de la 76-a Universala Kongreso en
 Norvegio sekvafoje rakontos pri tiu lando kaj pri la

kongreso. Okazos ankaŭ seminario pri la temo "Kiel
 rapide lerni lingvojn helpe de Esperanto".

KOMENTARO

1. Babelo (Babilono) — ĉefurbo de la antikva ŝtato
 Babilonio (sur nuna teritorio de Irako), kie, laŭ la Biblio,
 la homoj ekkonstruis turon ĝis la ĉielo. Por mal-
 helpi tion, Dio punis ilin per multigo de lingvoj, pro kio
 ili ne plu povis interkompreni kaj finkonstrui la turon.

2. Eva Tófalvi (Hungario) kaj Oldřich Kníchal
 /Óldrjiĥ Knířal/ (Ĉeĥoslovakio) estas geedzoj. Eva
 naskiĝis en 1947. Ŝi estas diplomito de Budapeŝta uni-
 versitato pri la hungara kaj Esperanta filologioj. Oldřich
 naskiĝis en 1939. Li estas historiisto kaj filologo, redak-
 toro, aŭtoro de kelkaj Esperanto-libroj. La agado de la
 romano "Kiu semas plorante..." okazas meze de la 30-
 aj jaroj en iu mezeŭropa lando, en kiu kreskas faŝismaj
 fortoj. La aŭtoroj montras, kiel homo povas erarvagi sub
 la influo de politika ideologio — ĉi-kaze naziismo — ĝis
 perfido kontraŭ siaj kunhomoj kaj eĉ intimuloj.

3. Judo = hebreo, precipe Eŭropa.

4. Dum la Dua mondmilito estis pereigitaj ses mil-
 ionoj da judoj, plejparto el vivintaj en Eŭropo.

5. Führer /fjurer/ — germane: Gvidanto (=diktato-
 ro), titolo de Hitler.

6. Kálmán (Kolomano) Kalocsay /Káloĉaj/ (1891-
 1976). Hungaro. Esperantistiĝis en 1917. Kuracisto.
 Ĉefredaktoro de la revuo "Literatura mondo" kaj ĉefa
 figuro en la tuta Esperanta poezio. Kelkaj el liaj verkoj:
 "Mondo kaj koro", "Streĉita kordo", "Lingvo, stilo, for-
 mo", "Rimportretoj", "Parnasa gvidlibro" (kun Waring-
 hien kaj Bernard), "Izolo", "Ezopa saĝo", "Sekretaj so-
 netoj" (sub la pseŭdonimo Peter Peneter), "Plena ana-
 liza gramatiko de Esperanto" (kun Waringhien). Li es-
 tas ankaŭ tradukinto de sennombraj verkoj el multaj
 lingvoj.

7. Ezopo — antikvagreka fablisto.

LINGVA PRAKTIKO

Pri la aŭtora kanto

1. Imagu, ke vi aŭskultis koncerton de Vladimir Vi-sockij kaj poste rerakontas al viaj amikoj tion, kion li diris en paŭzoj inter kantoj, samtempe komentante kaj esprimante viajn impresojn.

La radio kontraŭ la malbeno de Babelturo

2. Listigu avantaĝojn, kiujn donas regula aŭskultado de Esperantaj radioelsendoj.

3. Verku scenaron de radielsendo pri la temo "Esperanto en radio".

Kiuj semas plorante...

4. Donu al la romanfragmento bonan titolon.

5. Kiel la faŝisto Pander malkovras siajn konvinkojn? Kial li estas kontraŭ Esperanto?

6. Listigu en formo de ordoj la taskojn, kiujn donis Pander al la rakontanto.

7. Rakontu la enhavon de la teksto en la nomo de Pander.

Ezopa fablo

8. Imagu diskuton pri la temo "Kiu havas la plej grandan meriton en la milito?". Verku la reagojn de, ekzemple, soldato, generalo, generaledzino, kuiristo, trumpetisto, telefonisto, interpretisto, skribisto, pafilo, aviadilo.

9. Enkonduku en frazojn jenajn vortojn: Pripensi, pridiskuti, prisilenti, prilabori, priridi, pripagi, pridonaci, prisemi, priplendi, prilumi, pritondi.

10. Al la frazpecoj el la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Ju pli da havo,	des pli da amikoj.
Ju pli da honoro,	des pli alta prezo.
Ju pli da bruo,	des pli da pravo.
Ju pli da donoj,	des pli da ĝuo.
Ju pli da aĉetantoj,	des pli da laboro.

11. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Atenta — aŭtenta, ĝoji — ĝui, fabelo — fablo, potenco — potencialo, fideli — fidi — konfidi — perfidi.

12. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kio estas Babela turo?

b) Kiuj radiostacioj parolas en Esperanto?

c) Kiu verkis la romanon "Kiuj semas plorante...?"

ĉ) Pro kio Kolomano Kalocsay estas tre fama en Esperantujo?

13. Temo por diskuto aŭ rakonto: Se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo.

14. Verku por Pola radio leteron kun rakonto pri interesa evento en la vivo de via klubo aŭ asocio de esperantistoj. Sendu ĝin kaj atendu aŭdigon de via informo.

LECIONO 11

— En nia klubo hodiaŭ gastas Anne Tilmont el la belgia urbo Antverpeno. Ni petis ŝin koncize rakonti pri moroj de belgoj.

KELKAJ MOROJ EN BELGIO

Renkontado kaj salutado

Belgoj reputacie ne estas emoci-elverŝaj homoj. Ilia socia vivo estas grandparte famili-centra, kaj ili inklinas frekventi etan mondon de intimaj, dumvivaj amikoj. Tamen, kun pliiĝanta sinmoveblo kaj pli larĝaj profesiaj kontaktoj, ilia vivostilo grade ŝanĝiĝas. Ankoraŭ montriĝas multe da respekto por sociaj formalajoj kaj persona privateco, sed per iom da bonvolo kaj persista komplezado eblas akiri amikojn inter la belgaj najbaroj kaj kolegoj.

Ĉe sociaj kaj aferaj kunvenoj kutime kaj laŭmore estas saluti kaj adiaŭi ĉiun personon individue, per manpremo. Oni ankaŭ konsideras ĝentila alparoli iun per nomo aŭ per titolo ĉe alveno aŭ foriro. Kiam vi bone konas iun, vangokisado povas anstataŭi manpremadon — kiel en Francio kaj Italio. En Belgio, tamen, oni kisas trifoje, alternante la vangojn. Viroj povas kisi virinojn, kaj virinoj kisas aliajn virinojn, sed viroj kutime sole manpremas.

Lingvouzado en Antverpeno

En Flandrujo oni parolas la nederlandan lingvon, kiel en Nederlando. Tamen restas diferencoj (en prononco kaj vortotrezoro). Kaŭze de nia historia evoluo, la flandra ĉiutaga lingvo estas plenplena de francaj vortoj, kaj ie-tie oni ankoraŭ rekonas restaĵojn de nia "hispana" periodo, same kiel de forta juda influo.

Iuklasa elito en Antverpeno kaj la juda socio, kompreneble, ĝvon¹ kiel ĉiutagan lingvon.

Kiam vi trapromenas la *Pelika* ajn orelojn kaj notu la uzadon de sama loko.

Kiam vi povas manĝi e

Ĉiam!

Dum kiuj horoj ni povas v

Ĉu mi ne estis sufiĉe klara en

Nu ja, eble ne estas facile im estas Parizano aŭ Novjorkano), horoj serĉi — kaj trovi — malferm verpeno ne nur vivas dumtage, Imagu, ke je la oka matene vi kokinon en vinsaŭco, kiam aliaj Tiam la diferenco inter malfrua v matenmanĝo ne plu estas tiel klar

Sed eĉ se vi alvenos al la ele fermita pro ferio, ne paniku. Rig verŝajne, ke en cirklo de malpli d unu, du, tri aŭ eĉ pli da aliaj ebl

Se vi ne povas elekti, mi kon *Statiestraat* kaj *Breidelstraat*, du e maj de la stacidomo. Mi iam a posttagmezo, por kalkuli, kiom da viĝas tie. Jen la rezultoj; por tiuj en du mini-stratetoj:

- 15 ordinaraj trinkejoj;
 - 32 restoracioj entute: tio est belgaj kaj 7 rapidmanĝejoj;
 - 8 dancejoj;
 - 3 ludejoj-kazinoj;
 - kelkaj bakistoj, tabakvendis hoteletoj kaj la plej malnova seks-
- Vi evidente troviĝas en unu el taloj de la urbo. Agrabla por m

konsilus ĝin al vi por la dancejoj: ili havas sufiĉe agreseman reputacion. Krome mi malkonsilas al vi promeni tie sola dumnokte, malgraŭ la multaj homoj, kiujn vi renkontas.

Fragmentoj el du broŝuroj de Anne Tilmont:
Praktikaj informoj pri Antverpeno kaj
Abunde manĝi en Antverpeno. —
Antverpeno, 1982.

— Foje mi estis en Belgio, partoprenante Universalan Kongreson de Esperanto en Antverpeno. Efektive, la urbo estas plena de vidindaĵoj kaj kuriozaĵoj, ekzemple, bierejo, en kies menuo estas kelkcent specoj de biero. La kongresejo troviĝis apud vastega zoo kun multaj ekzotikaj bestoj kaj birdoj. Anne pravas: vendejoj, restoracioj kaj distrejoj estas senfine multaj, kaj oni sentas embarason ĉe elekto. Apud la grandega haveno troviĝas butikoj por maristoj kun tre malmultekostaj sed ne ĉiam bonkvalitaj varoj. Mi estis precipe impresita, kiam mi kun mia litova amiko trafis malfru-vespere la mirinde belan Grandan placon en Bruselo, sur kiu okazis mirakla koncerto de kolormuziko. La grandnombra publiko aŭskultis-spektis silente kaj atente, ne nur stare sed ankaŭ side kaj eĉ kuŝe sur la varmaj ŝtonoj de la pavimo.

— Dum tri kunvenoj ni konatiĝis kun elementoj de stilistiko. Ni prenos por tio du ĉapitrojn el la intereseega libro de Edmond Privat² "Esprimo de sentoj en Esperanto". Krome niaj klubanoj Albina Anikejeva, Rosislavo Piĉugin kaj Larisa Kirsanova kompilis tri studojn pri stilaj figuroj.

Edmond Privat²

ESPRIMO DE SENTOJ EN ESPERANTO

Estas konate, ke ĉiu lingvo servas por esprimi sentojn kaj ideojn, plej ofte ambaŭ kune. Jen ekzemple du frazaroj:

— Ŝi eliris el la vendejo je la deka. Mi estis atendinta ŝin ekstere de la naŭa kaj duono. La pluvo tre malsekigis min.

— Finfine ŝi aperis el tiu butikaĉo! Horojn mi atendis sub pluvo kaj estis dronigita ĝis ĉemizoj!

La unua frazaro estas tipo de lingvo intelekta, akurata, senpasia — simpla komuniko de faktoj. La dua estas tipo de lingvo senta, pasia, intencanta malpli la komunikon de la faktoj, ol la samtempan nereteneblan esprimon de forta malkontenteco kaj bezonon kompatigi aŭ indignigi la aŭdanton.

Komparante ambaŭ frazarojn aŭskulte, kiel ili sonas al la orelo, vi baldaŭ observos, kiujn rimedojn oni uzas por ion esprimi:

1. Sona emfazo de iu aŭ alia frazero. Rediru la unuan frazon sed pliemfazante la vorton "deka", jam tuj vi ricevos iom da sento en tiu simpla aserto.

2. Aranĝo de la frazo en iu aŭ alia ordo. Metu la esprimon "je la deka" al la komenco de la frazo. Ankaŭ tiel vi ricevas ioman diferencon favoran al sentesprimo. Kun aldono de sona emfazo, la diferenco estas tre sentebla.

3. Ripeto aŭ forigo de vortoj. Diru: "mi atendis, mi atendis, mi atendis". Tuj oni sentos kompaton al vi kaj simpation kun via sufero trafe esprimita. Ankaŭ forigo de vortoj efikas: "Dek minutoj, kvaronhoru, duonhoru. Fine ŝi!". La verbo malaperis, sed la sento kreskis. Se vi klopodas esprimi vian surprizon pri tio, ke sinjoro X fariĝis ministro kaj vian konvinkon, ke li estas nekapabla por tiu posteno, aŭdu, kiel efikas radikala ŝparo de vortoj: "Li? Ministro? Nu!" Kompreneble, aldono de vortoj — same kiel forigo — estas ankaŭ esprimrimedo: "Li? Ministro? Tia azeno? Nu, la respubliko havos belan kapon!"

4. Elekto inter ekzistantaj vortoj. Dirante "Je la deka ŝi eliris" kun pli forta emfazo de "deka", vi esprimas senton samtempe kun akurata konstato. Se vi preferis elekti la vorton "Finfine" anstataŭ "je la deka", tio montras, ke via indigno pri la longa atendado estas pli forta ol via deziro akurate informi. La ĝustan informon vi oferis al la impresa ekkrio.

Simile, dirante "horojn mi atendis", vi oferas ne nur la precizecon, sed eĉ la veron, ĉar eĉ la veron, ĉar fakte vi atendis nur duonhoron, sed tiuj 30 minutoj ŝajnis al vi horoj, kaj tion vi sentas kaj emas sentigi al via aŭdanto. Tiu mensogo estas nur speco de trograndigo, unu el la plej oftaj formoj de sentesprimo. Ĝi ne estas pli mensoga ol multaj koloroj kaj linioj de artisto, kiu vidas la naturon alia ol fotografilo. Same pri "dronigita" aŭ "malseka ĝis ĉemizo".

5. Kreo aŭ modifo de vortoj. Se vi diras "mi atendis longe", eĉ "tre longe", neniŭ sento vibras tie. Ĝi estas tro logika, tro intelekta. Sed atendeĝi almenaŭ sonas iom forte. La pligrandiga sufikso -eg- frapas tie pro neatenditeco. Ĝi respondas al via bezono pri trograndigo.

Via ega malkontenteco ne lasas vin aludi al la magazeneno (kie restadis la sinjorino) sub la trankvila teknika nomo. Brule necesas ankaŭ ĝin insulti pro indigno. Vi do nature elektas butiko anstataŭ vendejo, ĉar jam pli senvaloriga. Sed tie helpas vin la krea ebleco en la lingvo. Butiko ne sufiĉas. Devas esti butik-aĉo. Oportuna sufikso -aĉ-, kvazaŭ aldonebla kraĉo, taŭgas por esprimi furiozan senton kontraŭ la kulpa loko. Kiam la plej bonan magazenon en la urbo vi kolere nomis "butik-aĉo" nur pro momenta persona kaŭzo, tiam absolute ĥeniom da logiko restas en tia uzo. La aĉ-eco fakte kuŝas nur ĉe vi, en la pasia koloro ombrumanta vian rigardon al tiu respektinda vendejo.

Edmond Privat. *Esprimo de sentoj en Esperanto*. — Den Haag, 1957, p. 25-28. Mallongigita ĉapitro.

— Iam regis la opinio, ke pleje gravas por la Esperanta literaturo tradukoj de monde konataj klasikaj verkoj. Poste la prefero estis donata al originalaj verkoj. Kaj nur lastatempe oni ekkonsciis, ke krom seriozaj verkoj, estas bezonataj ankaŭ verkoj distraj, senpretendaj, kiujn oni povus legi senstreĉe antaŭ dormo aŭ en trajno, en metroo. Kaj tiaj libroj ekaperis. Ni jam menciis librojn de Valano. Jen ankoraŭ unu krimromano,

kies agado disvolviĝas sur Esperanta fono. Ĉu vi deziras sciigi pri la enigmo, fantoma Armeo Liberiga Esperantista? Trovu la libron kaj legu ĝin. En tiu ĉi fragmento speciale atentu la parolan stilon de la dialogoj.

*Corrado Tavanti*³

VARMAS EN ROMO

Ekstere ili trovis la pezan julian varmon kaj la saman stablon de la fiŝvendisto. La glacio preskaŭ tute fandiĝis, kaj la odoro de la putrantaj fiŝoj iĝis neelnebla. La ĵurnalisto ekrigardis la komisaron:

— Kiel vi povas permesi tion?

— Ĝi ne koncernas nin, sed la urbopolicon. Cetere, kiu obeas kiun en ĉi tiu benita lando?

Enirinte en la aŭton, De Angelis malfermis ĉiujn fenestrojn, sed tio ne mildigis la preskaŭ fornan aeron, kiun li trovis interne:

— Ni vidu, ĉu via ideo pri la klaĉulino montriĝos interesa.

Ili atingis la Nacian Bibliotekon post kvindek minutoj. La ena klimato ŝajnis al ili preskaŭ frida, dum bonodoro de presita papero ŝvebis ĉie. Cerri, kiu bone konis sian samideaninon, kondukis De Angelis en ne tro vastan legoĉambron, kontrolatan de Jolanda de Bonis. Ŝi sidis severmiene ĉe longa, malhela pupitro, kaj kiam ŝi ekvidis Cerri kun la komisaro, tuj komprenis, ke temas pri policano. Kaj ŝi kirligis sur sia seĝo, nerveze. Cerri proksimiĝis al ŝia pupitro, dum la komisaro restis je kelkaj metroj. Jolanda ekstaris kolemiene:

— Mi scias, kial vi venas, Danilo. Sed la persono, kiu akompanas vin, estas certe policano, kaj mi ne alparolas tiun, kiu kunulas kun sbiroj⁴.

— Restu trankvila, ĉar mi kunulas kun neniŭ. Sed oni murdis la povran Liberon, kaj tion mi ne povas facile forgesi.

La bibliotekistino pripensis:

— Bone, mi kredas vin. Mi foriros de ĉi tie je la kvina kaj duono. Venu min serĉi, sed sen tiu ulo, tiam. Ĉu komprenite?

— Kiel vi volas. Ĝis!..

Kaj li foriĝis kun De Angelis. Ekstere denove tiu damna, vere damna varmaĉo. La komisaro sekigis la frunton per pursilka naztuko:

— Do, kia novaĵo?

— Nu, pli bone estus ne konduki vin kun mi.

— Kial?

— Ĉar ŝi tuj komprenis, ke vi estas policano.

— Je la mortintaĉoj ŝiaj!⁵

De Angelis vere seniluziĝis, ĉar li ĉiam pensis, ke oni kredas lin diplomato.

— Kaj nun, kion vi faras?

— Ŝi fiksas al mi rendevuon je la kvina kaj duono, kiam ŝi foriros el la biblioteko. Sed, mi petas vin, ne venu kun mi, ĉar alie ŝi diros nenion. Lasu min fari, lasu min fari!

La komisaro enŝoviĝis en sian veturilon kaj, kondukinte Danilon Cerri al la redakcejo de lia gazeto, li atingis la Centran komisarejon.

Corrado Tavanti. Varmas en Romo. — Genève, 1986, p. 26-27. Mallongigita roman-fragmento.

— La 1-a de junio estas Internacia tago de defendo de infanoj. Al tiu tago dediĉas sian versaĵon nia gastino el Litovio.

*Inita Tamošiūniene*⁶

VOKO

Naskiĝis mi en kvardek kvina jaro.
En fino de aprilo. Dum milit'.
En akuŝejo kune kun bebaro
Kriegis mi kuŝante en la lit'...
Ne sciis ni, ke nia tero brulis,
Ke estis forgesita humanec'...

Nin nokte

fora kanonado lulis

En la komenco de la infanec'.

Sur ter'

ankoraŭ eksplodadis bomboj

Kaj sonis ĝemoj, ploro, kri' sen fin'.

Sur tero

abundegis

freŝaj tomboj,

Sed tio tute ne koncernis nin.

Kaj ne konante la militan flamon,

Sed laŭ denaska rajto per la kri'

Ni postulegis — malgraŭ ĉio — amon.

Ĉiaman pacon postulegis ni.

... Aŭskultu tra la tuta ter-surfaco! —

Ankoraŭ sonas memoriga vok':

Infanaj voĉoj petas — gardu pacon,

Ĉar maltrankvila estas la epok'.

Horizonto de Soveta Litovio, 1979, kajero 4, p. 11.

— Kaj jen venas la unua studo pri stilaj figuroj. Vere, ĝi estas iom seka, sed eble "malsekigos" ĝin ekzemploj, parte prenitaj el la jam konataj al ni tekstoj.

VORTFIGUROJ

Stilaj figuroj (aŭ simple *figuroj*) estas lingvaj procedoj, kiuj igas la penson frapa, reliefigante la esprimon. Ili estas de tri tipoj: vortfiguroj, parolfiguroj kaj sonfiguroj.

Vortfiguro (aŭ *tropo*) estas vorto aŭ esprimo, uzita en nereкта senco por atingi pli grandan esprimivecon⁷. En la bazo de tropo estas kunigo de du nocioj, kiuj apudas en nia konscio. Jen ĉefaj tropoj:

Komparo estas similigo de unu objekto al alia surbaze de eco, komuna al ili: Liaj paroloj estas dolĉaj kiel mielo. Lia parolo sonas kontinue, kvazaŭ fluus rivero. Ĉe la fino de la verko venas la plej granda surprizo,

kiu, kvazaŭ lanterno, jetas novan lumon de sube supren, al la tuta verko.

Metaforo estas kaŝita komparo, kiu enhavas nur la duan parton — tion, kun kio oni komparas. Tiamaniere oni nomas la duan objekton per la vorto de la unua objekto: Mielo gutas de sur liaj lipoj. Lia parolo fluas. Tio estas azenaĵo (=stulta ago). Sezono de amo. Tio estas plafono de miaj ebloj. Penu ĉiam meti oleon sed ne sablon inter la radojn de rilato. La senco de la salutparoloj de diverslandanoj estas komprenebla, sed la prononco ofte portas iun apartan "aromon", kio kune formas mirindan bukedon.

Figura epiteto diferencas de ordinara epiteto (ekzemple: bela parolo, la internacia lingvo) per sia esprimiva, metafora karaktero: Miela parolo. Flua parolo. La verda lingvo. Tio estas okulfrapa ekzemplo. Hungario donis al Esperantujo brilajn verkistojn. Azena ago.

Perifrazo estas figuro, per kiu oni nomas ideon, objekton aŭ personon ne rekte per la propra vorto, sed per aludo aŭ per karakteriza detalo: La kreinto de Esperanto (=Zamenhof). La eterna urbo (=Romo). La reĝo de bestoj (=leono). Vizitkarto de la lando (=poŝtmarko). La patro de ĉiuj popoloj (=Stalin). La lingvo de paco kaj amikeco (=Esperanto). La lando, kiu ne estas sur la mapo (=Esperanto-lando, Esperantujo).

Eŭfemismo estas speco de perifrazo, kiam oni uzas pli mildan vorton anstataŭ tabua (kruda aŭ intima) vorto: Li forpasis (=mortis). Ne elpensu (=ne mensogu). Li havas respektindan aĝon (=li estas maljuna). Malrestoracio (=necesejo).

Ironio estas esprimado de penso kontraŭa al tiu penso, kiun oni intencas komprenigi, tiel ke la aŭskultanto bone komprenas la kaŝitan mokon: Kion? Ĉu mi suferas pro soleco? Kara ĵurnalistino, ĉu vi bone fartas? — Televizio estas senseŝaĵo? Ha, kaj gazetartikoloj estas la supro de la saĝo, ĉu?

Personigo estas atribuo de ecoj de persono al neviva objekto aŭ fenomeno: Kakt' respondas: "Fulmotondro!" — Se la sufer' multvizage grimacas, la malespero vin kapti minacas, restu en stato atenda, ne cedu!

Hiperbolo estas evidenta troigo uzata por reliefigi la esprimivecon: Mi ne vidis vin dum cent jaroj. Mil pardonpetojn! Bukedo el miliono da rozoj.

— Post semajno ni havos superrigardon de Esperanto-gazetaro. Kaj ni aŭskultos kasedon kun registraĵo de argentina muziko, kiun interpretas la esperantista ensemblo "Bunta bukedo".

KOMENTARO

1. Judoj (hebreej) de Eŭropo kaj Ameriko parolas en la jida lingvo (aŭ en la jido), kiu estas parenca al la germana lingvo kaj subiĝis al forta influo de la rusa lingvo. Zamenhof en sia juneco (1879-1882) verkis unu el la unuaj gramatikoj de la jida lingvo, kiu estis publikigita nur en 1982 en la rusa lingvo (originalo) kaj kun paralela Esperanta traduko. En tiu verko li proponis por la jido latinlitteran alfabeton, similan al la estonta alfabeto de Esperanto. La ŝtata lingvo de Israelo estas la hebrea (ivrita) lingvo, kiu estas parenca al la araba lingvo, kaj estas revivigita kaj modernigita lingvo de la Biblio.

2. Edmond Privat /Edmón Privá/ (1889-1962). Sviso. Esperantistiĝis en 1903. Profesoro, verkisto, ĵurnalistino. Tiun 15-jaran junulon, brile parolantan en Esperanto, en la 1-a Universala Kongreso oni rigardis kiel la okan miraklon de la mondo. Estis prezidanto de UEA kaj redaktoro de la revuo "Esperanto". Aŭtoro de famaj verkoj "Historio de Esperanto", "Vivo de Zamenhof", "Esprimo de sentoj en Esperanto", "Tra 1' silento" kaj aliaj.

3. Corrado /Korádo/ Tavanti. Naskiĝis en 1919. Italo. Laboristo kaj oficisto de ĉokolada fabriko.

4. Sbiro — malestima kromnomo de policisto, fipolicisto.

5. Tiu ĉi estas individua sakro. Sakroj estas "vortoj aŭ frazoj uzataj por esprimi sian indignon aŭ koleron aŭ similan senton, ne alparolante rekte difinitan ho-

mon" (Renato Corsetti) /Korséti/. Vortoj en la sakroj ofte perdas plene aŭ parte sian kutiman sencon, esprimante nur la bolantan senton. Jen kelkaj ofte uzataj sakroj: Al cent (mil, ĉiuj) diabloj! Diable! Mil diabloj! Diablo prenu! Diablo manĝu! Kia diablaĵo! Damne! Damne kaj sakre! Fulmotondro! Ho dio! Ŝercaj sakroj: Rabato por rabito! Palavro de kadavro! Pluralo de singularo! Fundamenta Krestomatio! (aludo pri la samtitola libro, en kiun Zamenhof kolektis siatempe imitindajn bonstilajn verkojn). Aktoj de la Akademio! (aludo pri la samtitolaj libroj kun materialoj de la Akademio de Esperanto). Ata-ita! (aludo pri multjara diskuto de gramatikistoj pri uzado de la sufiksoj *-at-* kaj *-it-* en kompleksaj verboformoj).

6. Inita Tamoŝiŭniene /Tamoŝjúnjene/. Naskiĝis en 1945. Litovino. Esperantistiĝis en 1963. Inĝeniero.

7. *-iv-* — neoficiala sufikso, montranta, ke iu aŭ io kapablas fari ion: produktiva, pagiva, kreiva.

LINGVA PRAKTIKO

Kelkaj moroj en Belgio

1. Imagu, ke vi revenis post vojaĝo en Belgio kaj rakontas telefone al via amiko pri viaj impresoj.

Esprimo de sentoj en Esperanto

2. Donu viajn proprajn ekzemplojn pri ĉiuj kvin rimedoj por esprimi sentojn.

Varmas en Romo

3. Donu titolon al la romanfragmento.

4. La aŭtoro kelkfoje emfazas varmegon en la aero. Per kiu leksiko?

5. Kion vi povas diri pri ĉiu el la tri personoj? Kiamaniere ili estas ligitaj unu kun la alia?

6. Rakontu la tekston en la nomo de la policisto.

7. Provu verki daŭrigon de la teksto.

Voko

8. Trovu en la versaĵo la partojn, kiuj temas pri milito.

9. Kion, laŭ via opinio, oni devas fari por garantii tutmondan pacon?

Vortfiguroj

10. Pri ĉiu vortfiguro serĉu ekzemplojn en la studitaj tekstoj aŭ elpensu viajn proprajn ekzemplojn.

11. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj:

Ekrespekti, ekbaki, ekverŝi, ekstermi, ekfrapi, ekkoleri, ekkompati, ekzerci, ekkirli, ekplori, ekzili, ekluli, ekfulmi, eksalto, ekskurso, eksfianĉo, ekssbiro.

12. Elektu vorto(j)n laŭ via plaĉo:

Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen (kialo, moralo, falo, batalo, signalo). Matena horo estas plena de (laboro, angoro, doloro, memoro, amoro, ploro, oro, favoro, fervoro). Ne ŝovu la nazon en fremdan (kazon, bazon, emfazon, razon, vazon, frazon). Aliaj domoj, aliaj (legomoj, aromoj, fantomoj, homoj, diplomoj, nomoj, komoj). Al Dio plaĉu, sed pri diablo ne (kriaĉu, parolaĉu, kraĉu, klaĉu).

13. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Rajdi — rajti, kruda — kruta, ĝeni — ĝemi, fronto — frunto, diveni — deveni.

14. Trovu laŭeble multe da epitetoj kaj figuraj epitetoj al la vortoj: okuloj, voĉo, ĉevalo, kamelo, rozo, suno.

15. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kial pri Edmond Privat oni parolis kiel pri la oka miraklo de la mondo? Kiujn esperantologiajn librojn li verkis?

b) En kiu romano figuras Armeo Liberiga Esperantista?

c) Kio estas "Fundamenta Krestomatio"?

ĉ) Kie loĝas Inita Tamoŝiŭniene?

d) Ĉu en Esperanto ekzistas sakroj? Se jes, donu kelkajn ekzemplojn.

16. Temoj por diskuto aŭ rakonto: Bona estas Romo, sed tro malproksima de nia domo aŭ La enigmo solviĝas simple.

17. Elskribu el nacilingvaj ĵurnaloj titolojn de artikoloj kaj traduku ilin en Esperanton. Plibonigu tiujn, kiuj ne estas sufiĉe esprimivaj.

LECIONO 12

— Hodiaŭ ĉe ni gastas grupo da esperantistoj el Ĉinio¹, kiujn nia klubo invitis laŭ peto de nia kulturpalaĉo. Ili estas fakuloj pri diversaj ĉinaj gimnastikoj kaj lukt-artoj. Dum du semajnoj ili aranĝos seminariojn kaj trejnadon por loĝantoj de nia urbo. Kompreneble, ili instruos esperantlingve kaj ni interpretos ruslingven. Ankaŭ niaj esperantistoj estas invitataj partopreni en la trejnado. Hodiaŭ niaj ĉinaj kolegoj rakontos pri unu speco de gimnastiko.


LA ĈINA GIMNASTIKO TAJĜIĈJUANO

La praktikado en la lastaj jaroj pruvis, ke tajĝiĉjuano estas grava rimedo por sanigo kaj preventado de malsanoj. Ĝi postulas ne nur movadon de ĉiuj muskoloj kaj artikoj de la tuta korpo, sed ankaŭ egalritman profundan spiradon, movadon de la diafragmo kaj, precipe, altan koncentradon de la spirito. Tio havas bonan efikon por akceli funkciadon de la centra nerva sistemo, kaj tiel plibonigas ankaŭ funkciadon de aliaj organoj: sistemoj kardiovaskula kaj spira; ostaro, muskoloj kaj artikoj; metabolo de substancoj en la korpo; digesta sistemo.

La karaktero de tajĝiĉjuano:

1. Malstreĉiteco kaj mildeco: La teniĝo estas stabila kaj gracia. La movoj estas nerigidaj kaj konformaj al la homa fiziologia kutimo. Generale, ne troviĝas movoj, postulantaj eksplodan forton. Tial post ekzercado oni, kvankam iomete ŝvitante, malofte anhelas. Pro tio, ĝi estas praktikebla por homoj en malsamaj aĝoj, seksoj kaj sanstatoj, kaj prezentiĝas kiel bona fizika terapio por suferantoj de kronikaj malsanoj.

2. Kontinueco kaj egalritmeco: Ĉiuj movoj de tajĝiĉjuano, de la komenca teniĝo ĝis la fina teniĝo, estas kunligitaj sen rimarkebla interrompo. La movoj egalritmaj sekvas unu la alian, kiel akvo fluanta.



3. Rondmoveco kaj natureco: La brakoj de la ekzercantoj ĉiam moviĝas arke, kaj tio estas konforma al la natura fleksiĝo de la artikoj. Oni iam nomis ĝin “ronda movado”. La praktiko pruvas, ke la ekzercado per “ronda movado” utilas al fortigo de diversaj organoj de la korpo.

4. Harmonio kaj kompleteco: Ĉu en unuopaj movoj, ĉu en tutaj serioj de movoj, necesas harmonio inter la movoj de la diversaj korpopartoj kaj tiu inter la konscio kaj la movoj. Dum la ekzercado oni devas preni la talion kiel akson, por konduki movojn de la membroj en akordon.

Tajĝiĉjuano havas sian propran karakteron kaj stilon. Ĝi bone efikas por plifortigi la korpon, nur se la ekzercanto donas plenan atenton al ĝia karaktero kaj faras ĉiujn pozojn kaj movojn laŭ la postuloj.

Generale, la ekzercado per tajĝiĉjuano havas tri stadiojn. En la unua stadio oni devas lertiĝi en unuopaj movoj de la piedoj, kruroj, manoj, torso kaj rigardo kaj

fari la pozojn ĝustaj, paŝojn stabilaj, movojn graciaj kaj mildaj. En la dua stadio oni devas bone koni la karakterizaĵojn kaj ŝanĝiĝojn de la movoj por fari ilin harmonie kunligitaj kaj naturaj. En la tria stadio oni devas emfaze sin ekzerci pri forto-uzo kaj natura akordigo inter la konscio, spirado kaj korpa movado, por ke la movoj estu facilaj, stabilaj kaj harmoniaj.

Tajĝiĉjüan. — Pekino, 1986, p. 1-21. Mallongigita.

— Ni daŭrigas konatiĝon kun la libro de Edmond Privat.

Edmond Privat

LOGIKO KAJ SENTO

En la antaŭa ĉapitro ni donis liston de diversaj rimedoj uzataj por esprimi sentojn. Nu, tiuj samaj rimedoj povus esti uzataj ankaŭ por esprimi logikan ideon. Fakte, ĉiu ajn lingva rimedo povas servi al unu aŭ la alia kaj plej ofte al ambaŭ samtempe.

1. Sona emfazo de iu aŭ alia frazero. Jen senkolora frazo: “Li venis je la oka”. Diru nun kun forta akcento: “Je la oka li venis” (ne je la naŭa). Tiu emfazo certe montras logikan distingon kaj insiston pri akurata fakto. Se vi diras nun: “Je la oka? Vi frenezas. Mi bezonas rimpozi dimanĉon matene”, tiam vi sentas evidente kaj aŭdeble indignon. Tie estas ne nur plilaŭtigo, sed vere alitonigo, kiu transformas la frazon kvazaŭ en demandon, duone indignan, duone mokan.

2. Ŝanĝo en la ordo de la frazo. Se vi diras: “Vi aĉetu tian skatolon, ne alispecan”, la emfazo jam efikas. Tamen la ŝanĝo de la ordo en la frazo ankoraŭ pli impresas: “Tian skatolon vi aĉetu, ne alispecan”. Tie temas pri ordono kun senco ĉefe logika. Sed se vi, reveninte, aŭdas la komisianton ekkrii: “Tian skatolon vi kuragiĝis aĉeti!”, tiam certe vi tuj komprenas lian senton

pri miro kaj malkontenteco, esprimitan per frazarango kaj emfazo samtempe.

3. Forigo aŭ ripeto de vortoj. Ni prenu la forigon de vortoj: "Skatolon? Ne. Keston preferi!" Jen kvazaŭ telefona interparolo. Ĉiuj verboj, pronomoj ktp mankas. Tie la forigo de vortoj antaŭ ĉio helpas logikon. La celo estas precizigo teknika. Sed aŭdu alian telefonan parolon: "Min, prezidanto? Neniam!" Tie la forigo de vortoj havas akre sentan signifon, kaj vi tuj komprenas, kun kia malplezuro la parolanto sin defendas kontraŭ nedezirata elekto.

4. Elekto inter ekzistantaj vortoj. Elektu, ekzemple, la vortojn paroli kaj bleki. Jen tute logika uzo: "Homoj parolas, bestoj blekas". Tio estas scienca konstato. Se vi nun ekkrias en diskuto: "Neeble paroli! Vi nur blekas kaj insultas!", tiam certe la elekto de la vorto blekas havas malpli logikan intencon ol nereteneblan sentan signifon. Sub tiu ĉi kategorio vi povas ekzameni ĉiujn bildojn, uzatajn en la lingvo. Ju pli nelogikaj, eĉ mallogikaj ili ŝajnas, des pli forta estas la sento esprimata.

Por kompreni, kial vi ĵus povis nomi elefanto vian ĉarman delikatan filineton, necesas ekscii, ke ŝi renversis tason da teo kaj marŝis sur vian plej belan silkan robon! Tiam oni ekkompatas vian senton, forte esprimitan.

En Esperanto, kiel en plej multaj aliaj lingvoj, oni diras "forta kiel leono", nomas malican knabon "diab-letto" aŭ priskribas malbonan junulon kiel "sentaŭgulo- lon". Sed ĉiu Esperanto-parolanto kreas proprajn bil- dojn laŭbezone aŭ ripetas tiujn, aŭditajn de ceteraj ho- moj.

5. Kreo aŭ modifo de vortoj. Sub tiu kategorio de rimedoj envenas la riĉa produktado per vortkombinoj kaj ĉefe per prefiksoj kaj sufiksoj. Ilian uzon por logikaj celoj instruas ĉiu gramatiko. Se vin informas kompeten- tuloj, ke "la fosistoj malkovris romanon vazegon malfac- ile transporteblan", vi ja ne aŭdus el la uzitaj sufiksoj ion alian ol pure logikan. Sed se vi priskribas iun kiel "Azenego! Neaŭskultebla ulo!", vi certe montros nek admiron, nek ŝatan senton al tiu malplaĉanto, kaj oni

povos konstati, ke vi uzis la sufiksojn malpli logike ol subjektive.

Edmond Privat. *Esprimo de sentoj en Esperanto*. — Den Haag, 1957, p. 31-35. Mallongigita ĉapitro.

— Bonega ĉapitro! Estas dezirinde tralegi la tutan li- bron, tio alportos kaj utilon, kaj ĝuon.

— Nun ni konatiĝu kun fragmento el aŭtobiografia romano de Spomenka Ŝtimec². Spomenka estas konata al partoprenantoj de Universalaj Kongresoj, ĉar tie ŝi gvidas konversaciajn kursojn de Esperanto. Ŝi estas or- ganizanto de la Pupteatraj Internaciaj Festivaloj (PIF) en Jugoslavio. Krome ŝi verkas prozon kaj redaktas lib- rojn.

Spomenka Ŝtimec²

OMBRO SUR INTERNA PEJZAĜO

Li laciĝis de nia kunvivado. Mi ne. Jen la tuta saĝa- ĵo. Mia eterna kaj stulta revo pri samtempeco: dum li... mi... Dum li tajpas siajn leterojn, mi lavas puloveron. Tiu "dum" subite efikis disige. Kaj kion mi volis? Ke li interrompu la tajpadon kaj venu trempi siajn manojn en mia lavujo? Kvar manoj sub ŝaŭmo. Jen estas imago pri komuna vivo antaŭ ol ĝi komenciĝas.

Iun matenon vekigis fremdulo sur mia kuseno. Lia kiso enpenetris nur tra plej maldika tavolo de mia haŭ- to. Li ekmalĉeestis. Unue li komencis malaperi tiel. Pos- te li ankaŭ fizike foriros.

Mi emis veni hejmen. Mi dum tiom longa tempo es- tis senhejma. Ĉe la enmeto de la ŝlosilo enseruren, mi jam sciis, ke mi trovos la domon malplena. Li dum la lasta tempo emis vagi ien. Eĉ kiam li ĉeestis, li ne ĉees- tis. Tiam la voĉo, por gajigi la vesperon, lanĉis tiun diagnozon:

— Li ekmalĉeestas! Ekmalĉeestas! Vidu kiel bela vor- to! Kvazaŭ azteka³! — Mi devis rideti pri la klopodoj de

mia voĉeto. Tio estis kvazaŭ karesprovo. Sed ĝia spritaĵo mallonge daŭris. La tristo kapablis reinvadi:

— Kie mi fuŝis? — demandis mi mian vizaĝon enspegulan. Kaj mi ne povas memori⁴ ion ajn.

La fakto ke ni kunvivis tiom da tagoj ne tedis min. Ses jaroj al mi ne sufiĉis. Mi povus refari samajn vojaĝojn kaj renkonti kun li samajn homojn.

Ĉu al li ŝajnis ke jam ĉio okazis? Ĉu lin ĝenas ke mi scias tro pri li? Mi per mia nevola sento por detalo enkapigis scenojn el lia infanaĝo same detalriĉe, kiel ĉiujn aliajn liajn travivaĵojn. Mi konis pli bone ol li repertuaron de liaj ŝercoj kaj kapablis foje memori lin, dum estis lia vico por rakonti. Ĉu tio estas signo de disfalo?

Foje ni parolis pri unuaj amoj. Mi devis korekti lin: pardonu, vi transsaltis tiun japaninon. — Kiun japaninon? — Tiun, kiam vi estis soldato! — Fakte, vi pravas. Mi devos baldaŭ demandi vin, kiel nomiĝis hundo de mia praavino.

Ni ridis. Tiumomente tio ŝajnis sprita. Nur poste ĝi doloris. Mi simple aŭskultis dum li parolis. Poste kiam mi komencis dividi mian vivon de la alia, mi komprenis, kiom el lia arkivo mi devas elĵeti. Ŝajnis al mi, ke aŭtomate miaj trezorejoj malpleniĝas.

Kiam li foriris, li forportis nenion krom tajpilo. Kiam li fermis la pordon post si, mi sentis min komplete priŝtelita.

Kial mi estis pli eltenema ol li? Ĉu ĉar nian rilaton antaŭis jaroj de soleco, dum kiuj mi akumulis neelĉerpeblan paciencon por kunvivado?

Duopa vivo kapablas esti tre bela. Tion scias nur tiuj, kiuj ankoraŭ ne havis ĝin. Aŭ jam ĝin perdis.

Mi dum jaroj de perkoresponda amo tiom ĝojis pri la fakto, ke iam lia dentobroso staros ĉiutage apud la mia, ke tiu starado ankoraŭ post ses jaroj ne amarigis min.

Li estis tuŝebla ĉiutage. Post ses jaroj mi havis tro bonan memoron pri la tempo, kiam mi nur volis, ke estu tiel. La deziro ne eluziĝis.

Spomenka Ŝtimec. Ombro sur interna pejzaĝo. —
Pizo, 1984, p. 11-13.

— Oni diras, ke la homoj feliĉas simile, sed malfeliĉas malsimile. Tion ni vidas laŭ du apudaj beletraĵoj — de Spomenka Ŝtimec kaj de Vladimir Samodaj⁶. Tamen ajnokaze la homo ne devas perdi esperon kaj kuraĝon, li/ŝi batalu por pli bona vivo, kiel belege esprimis tion Hilda Dresen en siaj versaĵoj “Ne cedu!” kaj “En momento ekscita”⁵. Vladimir Vladimiroviĉ, bonvolu prezenti vian versaĵon.

Vladimir Samodaj⁶

JAROJ KURAS, JAROJ FLUGAS

Jaroj kuras, jaroj flugas,
Jaroj pasas, ne revenas.
Frunton mian sulkoj plugas,
Sur tempioj blank' fadenas.

L' infanaĝo min ne flatis,
Ne karesis min juneco.
Sorto min sufiĉe batis
Per batil' de ĉiu speco.

Mi infane dum milito,
Orfe tra l' hejmland' vagadis
Kaj pro manĝo-deficito
Jam al morto kandidatis.

Poste dronis mi komplete,
Sed feliĉe (se ne male)
Oni savis min senpete —
Vivi damnis min banale.

La onklin' regalis multe
Per bastono kaj malsato,
Vortoskurĝis min insulte —
Tenis min en sklava stato.

Sed ĉi-ajoj bagatelas
En komparo kun aliaj:
Batoj amaj plej kruelas —
Sangas kore vundoj miaj.

Tamen vivo estas vivo,
Ĝi jen mordas, jen karesas,
En konstanta ofensivo
Nin agresi ĝi ne ĉesas.

Do, ĉu indas plore plendi,
Larmi pri kruelo sorta?
Sciu homo sin defendi —
Batoj faras homon forta.

Esperanta antologio: Poemoj 1887-1981. —
Rotterdam, 1984, p. 655-656.

— Kaj jen sekvas la dua studo pri la stilistiko, verkita en nia klubo.

PAROLFIGUROJ

Parolfiguroj estas procedoj uzataj por aranĝi la paroladon, tiel ke ĝi estu pli esprimiva aŭ konvinka. Jen ĉefaj parolfiguroj:

Stila ripeto estas ripeto de la sama vorto, vortero, vortgrupo aŭ frazo por reliefigo de esprimiveco: Jes, jes, mi prenas sur min plenan respondecon por tiuj vortoj! — Kaj tiel ĉiutage, ĉiutage, ĉiutage! — Mi sentis min senkorulo seniganta senhelpan hometon je la plej ŝatata havaĵo. — Ni devas fari tiel, ke ne estu malriĉuloj. Kaj pleje gravas, ke ne estu malriĉuloj en spirito.

Sinonima akumulo (speco de ripeto) estas sinsekvo de lingvaj aŭ kuntekstaj sinonimoj: Gaja, ĝoja, festa humoro. — Mi rimarkis, ke la lingvo ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion.

Gradacio estas sinsekva vicigo de nombrataj ideoj laŭ ordo de ilia kreskanta aŭ malkreskanta interna forto: Cezaro venis, vidis, venkis. — Mi estis tre ekscitita; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono; mi scias, kia

sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko; mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon; sed mi ne povis forlasi la ideon kaj... mi transiris Rubikonon.

Paralelismo estas la sama aŭ simila aranĝo de du apudaj frazoj aŭ frazeroj: Bona prononco estas tiu, kiu ebligas interkomprenon inter esperantistoj de malsama etna lingvo. Ĝi estas tiu, kiu faciligas interkomunikigon per internacia lingvo.

Antitezo estas kontraŭmeto de du malaj vortoj, ideoj, nocioj: Tion montras la versaĵo malgranda laŭ amplekso sed granda laŭ enhavo. Faru tion urĝe sed ne testudmaniere! Aktivulojn ni bezonas en la movado unuavice sed ne pasivulojn. Malfeliĉo venas are, ne ere.

Eksklamacio estas ekkrio, per kiu parolanto esprimas fortan senton (indignon, miron, koleron, timon, admiron kaj simile); ofte ĝi komenciĝas per iu interjekcio: Kia feliĉo! Kiel magra estas la rezulto! Jen kiel bonŝanca la esperantistoj! Ve, ili ne antaŭvidis, ke tiu malsano ne estas evitebla!

Inversio estas ŝanĝo de la kutima vortordo, ĉe kio la plej avantaĝaj pozicioj estas la komenco aŭ la fino de la frazo: Venis finfine la trajno. — Ĵinon kun ĵako vi surmetu hodiaŭ. — La estraro decidis lin el la partio eksigi.

Elipso estas forigo de unu aŭ kelkaj vortoj facile subkompreneblaj aŭ restarigeblaj laŭ la kunteksto: Melonon? Prefere citrolon. — Nun ni lernu de ĉiuj — nenio timinda. — Ne supozu, ke jam ĉio perdita. — Ekzemplo lia — tre instrua.

Retorika demando estas aserto en formo de demando: Ĉu ĉiutagaj sloganoj povas alporti ian utilon? — Ĉu eblas al homo normalkora aliri la gefilojn kaj diri: "Baldaŭ mi foriros. Baldaŭ via patro forlasos ĉi tiun domon por ĉiam...?"

Retorika alparolo estas alparolo de personoj, kiuj ne ĉeestas, aŭ de senvivaj objektoj: Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via. — Vi staras antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi. — Ho, hirundo, kiam vi alportos la printempon?

— La 10-an de junio ĉe ni gastos muzikistoj el Danlando, kiuj koncertos en nia urbo. Ili instruos al ni siajn Esperanto-kantojn. Krome ni aŭskultos Esperanto-novaĵojn el la lando kaj el la tuta mondo.

KOMENTARO

1. Ĉinio estas Azia lando kun la plej granda en la mondo loĝantaro (ĉefurbo Pekino).

2. Spomenka Ŝtimec. Naskiĝis en 1949. Jugoslavino. Esperantistiĝis en 1964. Profesia esperantistino ĉe Internacia Kultura Servo en Zagrebo. Libroj: "Vojaĝo al disiĝo", "Nesenditaj leteroj al Japanio" k.a.

3. Azteko — ano de indiana popolo iam vivinta en Meksikio.

4. prefere: rememori.

5. Vidu la lecionojn 5 kaj 9.

6. Samodaj Vladimir Vladimiroviĉ. Naskiĝis en 1935. Esperantistiĝis en 1958. Tradukisto kaj ĵurnalisto. En diversaj tempoj kunfondinto de SEJM (vidu la tekston "Esperantaj memorigaj lokoj en Moskvo. Parto 2" en la leciono 5), vicprezidanto de Esperanto-komisiono de SSOD, membro de Internacia Komitato de MEM (Mondpaca Esperantista Movado), vicprezidanto de ASE, prezidanto de la restarigita SEU. Redaktis multajn Esperanto-eldonojn.

LINGVA PRAKTIKO

La ĉina gimnastiko tajĝiĉjuano

1. Rakontu pri utilo de gimnastiko.

2. Kompilu komplekson de gimnastikaj ekzercoj, kiuj al vi plaĉas (se eble, el iu orienta gimnastiko).

Logiko kaj sento

3. Donu viajn proprajn ekzemplojn, similajn al tiuj en la teksto.

Ombro sur interna pejzaĝo

4. Donu titolon al la romanfragmento.

5. Kiomfoje renkontiĝas en la teksto la verbo *ekmalĉeesti*? Analizu ĝian konsiston. Kiun rolon ĝi ludas?

6. Pri kiuj trezoroj temas en la frazo: *Ŝajnas al mi, ke aŭtomate miaj trezorejoj malpleniĝas?*

7. Trovu la leksikon, kiu respegulas la animan staton de la virino.

8. Rerakontu la tekston en la tria persono kun viaj komentoj kaj aldonoj.

Jaroj kuras, jaroj flugas

9. Faru prozan rerakonton de la versaĵo en la unua persono.

Parolfiguroj

10. Pri ĉiu parolfiguro serĉu ekzemplojn en la studitaj tekstoj aŭ elpensu viajn proprajn ekzemplojn.

11. La tuta teksto "Ombro sur interna pejzaĝo" estas konstruita sur la antitezo "li — mi". Donu ekzemplojn.

12. Enkonduku en frazojn jenajn vortojn:

Konstruado, brozado, anstataŭado, invado, naĝado, pafado, estrado, huraado, kanonado, ondado, balado, reĝado.

13. Al la frazpecoj el la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu flatas al ĉiu,	al tiu oni malfermas.
Kiu frapas,	tiu oni dankas per bastonoj.
Kiu ĉe l' vojo konstruas,	plaĉas al neniu.
Kiu mem sin laŭdas,	tiu ĉi instruas.
Kiu regalas per ŝtonoj,	tiu neniu aplaŭdas.

14. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Agordo — akordo, alarmo — larmo, amo — amaro — amoro, morti — mordi — murdi, flari — flati.

15. Kvizo pri Esperantaj temoj:

- a) Pri kio estas konata Spomenka Ŝtimec?
b) Poezio de kiu periodo estas reprezentita en "Esperanta antologio"?
c) Kiu estis la unua prezidanto de la refunkciigita SEU?
ĉ) Kio estas MEM?

16. Temo por diskuto aŭ rakonto: Se mi scius, kion mi ne scias, ĉiuj saĝuloj min envius.

17. Imagu, ke vi estas vokita en policejon kiel atestanto de iu okazo. Priskribu viajn informojn de atestanto.

LECIONO 13

— La ĵurnalisto Maksimo Knjazjkov antaŭ nelonge revenis el Usono, kie li laboris dum kelkaj jaroj. Hodiaŭ li parolos en nia klubo pri usonaj aŭtovojoj.

HIGHWAY¹ ESTAS LA VIVMANIERO

Sur la ponto trans Harlem antaŭ la okuloj rondodancas ĉiaj montriloj. Mi febre serĉas perokule la necesan ciferon. Nu, finfine! Ŝajne, ĉi tien, do mi plonĝas kun mia "Plimuto"² en la nigran fenestron de la tunelo.

La kontinua torento de aŭtoj certece kaj brue hastas antaŭen. Hastas persiste, ĉiam pelante per koleraj signaloj tiujn, kiuj konfuziĝis, malfruis aŭ ekhezitis en tiu ankoraŭ nova por si lando — Highway-lando¹.

La ponto finiĝis, oni devas esti atenta. La tutlandaj kaj lokaj vojoj, kolektitaj unuece en ĝia mallarĝa gorĝo, tuj elŝiriĝas en liberon kaj disflugas diversflanken, kvazaŭ kolomboj el malvasta kaĝo. Kelkaj dekoj da metroj — kaj la multstria vojnodo finiĝas. Antaŭe estas tri vicoj da betonvojo, gladita per miloj, milionoj da radoj kaj barita de ambaŭ flankoj per malalta fera barileto.

Jes, estas ĝi, jam multfoje prikantita verse kaj proze *highway* — tio estas strado aŭ ŝosea rapidvojo, fariĝinta unu el simboloj de la nuntempa Usono.

Ĝi efektive estas por la usonanoj io integra, neantaŭigebla, kvazaŭ ero de ilia vivmaniero. Kaj verŝajne ne nur tial ke en tiuj vojoj-beluloj enkorpiĝis la viva inĝeniera penso, laborkapablo kaj krea inĝenio de la popolo. Ili iĝis kvazaŭ respegulo de ĝia spirito, ĝia pasio al ŝanĝo de lokoj kaj ŝanĝoj entute, de ĝia energio kaj aspiro antaŭen.

Kia vojo, krom *highway*, ankoraŭ estus kapabla tralasi la neimageble kreskintan lastatempe gregon da usonaj aŭtomobiloj? Kie ankoraŭ la plenŝtopitaj kamionoj povus tiel hastegi al la celpunktoj? Fojfoje ŝajnas, *highway*-voj-

oj en Usono estas io simila al arterioj en ho-
se oni ŝtopos ilin, la tuta organismo estos m-

... La kajo en Davenport³ — negranda l-
urbeto. De la akvo, kvankam varma kiel
lakto, tamen iras malvarmeto. Kaj verŝajne
ĝento Steve⁴ Linn haltigis sian patrolan aŭto
ferminte ambaŭ pordetojn, apogis sin al la
sidejo.

Mi singarde enrigardis en la malfermita
kaj atentis, ke sur la loko, kie en ordinara aŭto
radioricevilo aŭ magnetofono, briletas griza
vidigilo. Kaj tie, kie devus esti tenilo de rap-
klavaro. Komputilo en polica aŭto!

Steve rapide rimarkis mian scivolemon
detis:

— Tiun aĵon oni instalas al ni nur an-
Tre oportune.

Kaj li geste invitis min sur la liberan
stre.

— Ĉu, eble, vi tiamaniere povas kontroli
de ajna aŭto? — mi demandis.

— Principe, jes, — Steve kapjesis. — Ka-
numeron, sed ankaŭ la aŭtistan legitimilon.
donita en nia ŝtato (provinco), la respondo
tike tuje. Sed se ekster la ŝtatlimoj — do ku-
krasto.

— Nu, do kontroli tion ĉi. — Mi donis
aŭtistan legitimilon, ricevitan antaŭ kelkaj
ŝtato Nov-Jorko.

Steve fingrumis la etan plaston karteton
tis klavojn. Proksimume post dudek sekunde-
do estis ricevita. La komputilo desegnis sur
adreson, kie mi iam loĝis en Nov-Jorko, m-
sen okulvitroj konduki aŭton al mi estas
kaj en la fino deklaris, ke la polico dum-
min!

— Post duonjaro, interalie, la validotemp-
gitimilo finiĝos. — Steve revenigis min al la

... Trans la fenestreto trafulis la elirvo-
sekva estos mia, la kvara. Cetere, ĝi estos

klubaj kunvenoj oni legas la plej interesajn leterojn, montras ricevitaĵajn fotojn, bildkartojn, turistajn prospektojn.

Klubanoj-fakuloj prelegas pri novaĵoj de scienco kaj tekniko, pri protektado de naturo. Grandan intereson elvokas prelegoj pri enlandaj kaj eksterlandaj artistoj⁵ kun uzo de reproduktaĵoj⁶ kaj muzikaj registraĵoj, kun interpreto de artverkoj.

Multe da atento dum klubaj kunvenoj oni donas al problemoj de la Esperanta kulturo: prelegoj pri interlingvistiko kaj pri kreado de diverslandaj Esperanto-verkistoj, pridiskuto de novaj libroj, konatigo kun atentindaj verkoj, superrigardo de la Esperanto-gazetaro ktp.

Kaj, certe, por ĉiuj klubanoj allogaj estas la aranĝoj, celantaj plialtigon de la lingva nivelo: paroligaj kursoj, lingvaj ludoj, diskuto pri subtilaj demandoj de vortuzado, kursoj de tradukistoj, lingvoperfektigaj kursoj, lingvaj ekzercoj.

Parto de la tempo, destinita por kunvenoj, estas uzata por informoj el Esperantujo, por lernado de novaj Esperantaj kantoj, por kantado laŭ gitaro aŭ piano, por "neprogramita" senpera komunikiĝo de la klubanoj.

La enkluba laboro, t.e.⁷ la laboro de la klubanoj por si kaj por aliaj klubanoj, ne limiĝas je regulaj planitaj kunvenoj.

Ĉar inter la esperantistoj ne ekzistas lingvaj baroj, multaj el ili korespondas kun diverslandaj amikoj. Per la internacia korespondado ili kontribuas al la paco, interkompreno kaj amikeco inter popoloj, interŝanĝas konojn kaj kulturajn valorojn. Al korespond-amikoj oni sendas beletran, socipolitikan, lernan, esperantologian literaturon en Esperanto, eldonatan en sia lando. Por aranĝo de ekspozicioj estas sendataj eksterlandan materialoj pri sia regiono, pri sia urbo: bildkartoj, fotoj, afiŝoj, gazetoj ktp, sur kiuj oni skribas klarigojn en Esperanto. Komprenoble, la internacia korespondado estas tre utila por kolektantoj.

Multaj esperantistoj hobbias pri verkado kaj tradukado, precipe de versaĵoj kaj kantoj. La plej valoraj verkoj estas publikigataj en landaj kaj eksterlandaj Esperanto-

gazetoj, en klubaj muraj kaj manskribaj gazetoj, eldonataj libroforme.

En Esperanto aperas ĉirkaŭ centoj da gazetoj, pluraj el ili estas aboneblaj. Plejparto de la esperantistoj estas libroŝatantoj, multaj havas grandajn Esperantajn bibliotekojn, akirante librojn aĉete kaj interŝanĝe.

En ĉiuj Esperanto-kluboĵoj oni plezure okupiĝas pri amatora arta agado: kantoj, teatraĵetoj, versaĵoj, muzikado. Inter la esperantistoj estas multe da ŝatantoj de magnetofonaj registraĵoj, kiuj surbendigas Esperanto-koncertojn. La tendaroj kaj renkontiĝoj de esperantistoj estas eternigataj per fotoj kaj slajdoj, kinfilmoj kaj videofilmoj.

Multaj klubanoj estas pasiaj turistoj: ili ofte eksterurbigas, skias, ekskursas. Precipe en tiaj kondiĉoj estas agrable iom sporti, festi naskiĝtagon aŭ alian eventon. Tiaj aranĝoj solidarigas klubanojn kaj ebligas plian lingvan praktikon.

Kutime esperantistoj multe okupiĝas pri memklerigo, studante literaturon pri interlingvistiko, historio de Esperanto, Esperanto-literaturo, Esperanto-instruado. Iuj uzas tiujn konojn por trapasi instru-raĵtan ekzamenon⁸, por partopreni en sciencaj kaj fakaj konferencoj kaj eĉ por verki disertaciojn.

Por ke la vivo en Esperanto-klubo estu interesa, necesas ĉiam diversigi kaj renovigi formojn de laboro, ebligi al ĉiu klubano okupiĝi pri ŝatataj aferoj, evoluigi siajn kapablojn.

— Vere, la studo estas profunda kaj interesa. Ĉu ĝi estas utiligita por la laborplano de nia klubo?

— Jes, ĝi estas utiligita por la duonjara plano, kies presitajn ekzemplerojn vi povas preni de la klubara sekretario Natalia Belova.

— Ĉu vi intencas prelegi pri la sama temo antaŭ neesperantistoj?

— Jes, mi havas interkonsenton, ke mi prelegos en baldaŭa konferenco de kultur-klerigaj laborantoj. Oni proponis al mi aldoni materialon pri la eksterkluba laboro: rilatoj kun amaskomunikiloj⁹, kunlaboro kun urbaj

sociaj organizaĵoj, prelegoj pri Esperanto, vesperkunvenoj antaŭ komenco de nova Esperanto-kurso, instruado, ekspozicioj, prelegoj en studentaj konferencoj.

— Dankon pro la ege interesa prelego kaj utilaj klarigoj!

— La personeco de Tibor Sekelj¹⁰ estas neforgesebla. Kiam oni rigardis lin, oni apenaŭ povis kredi, ke tiu modesta, afabla, nealta kaj, eble, neforta homo travojaĝis kaj trapaŝis la tutan mondon, komunikigis en diversaj lingvoj kun lokanoj, kreis Esperanto-grupojn en triamondaj landoj, estis motoro de agado por praktika utiligo de Esperanto, fondis kaj prezidis Esperantlingvan Verkistan Asocion (EVA), atingis ke Unesko¹¹ akceptis favoran rezolucion okaze de la centjariĝo de Esperanto. Lia libro "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo", verkita en Esperanto, estas tradukita en dudekon da lingvoj.

Tibor Sekelj¹⁰

LA PLEJ DANĜERA BESTO DE LA PRAARBARO

Subite ni ekaŭdis de malproksime murmuron, kvazaŭ pluvo ekfalus sur la foliaron. Kumeŭaŭa eksidis kaj aŭskultis. Mi rimarkis maltrankvilon sur lia vizaĝo. Ni ambaŭ samtempe ekrigardis teren. Iom granda serpento preterrampis nin je duonmetra distanco, en granda hasto. Ankaŭ aliaj bestoj panike rapidis, ĉiuj en la saman direkton, eĉ ne rimarkante nian ĉeeston. Intertempe la stranga murmuro fariĝis pli forta.

— Kio okazis, Kumeŭaŭa? — mi demandis.

— Venas la soldat-formikoj. Ankaŭ ni devas forkuri.

Mia unua penso estis rapide surgrimpi arbon, por savi nin, same kiel ĉe la alveno de la aproj. Sed apenaŭ mi komencis grimpi, la knabo donis al mi mansignon, ke mi descendu.

Li klopodis depreni la porkon de la fajro, sed li ne sukcesis, ĉar ĝi estis peza kaj varmega. Ĝi enfalis en la fajron. Mi volis helpi al li, sed jam estis tro malfrue. Ni jam eksentis sur niaj kruroj rampantajn formikojn. Per

siaj dolorigaj pikoj ili igis nin eksalti. Tiam la knabo ekkriis, ke mi lin sekvu.

Li kuregis inter la arbustoj tiel rapide, ke apenaŭ mi sukcesis sekvi lin. Ni jam troviĝis je nur kelkaj metroj de la riverbordo, sur la loko, kie ni lasis nian pirogon. Antaŭ ol eniri la boaton, mia amiko forpuŝis ĝin de la bordo kaj ligis ĝin al subakva trunko. Sidante en la pirogo, de kelkmetra distanco, ni povis vidi, kiel la trunkoj, branĉoj kaj folioj, same kiel la herbejo kaj la tero, kovriĝas per milionoj da formikoj. Ĉio fariĝis nigra, kvazaŭ nevidebla peniko sternus nigran farbon sur la tutan pejzaĝon. La spektaklo estis akompanata de murmuro, kiu nun kreskis al surdiga tamburado.

Subite mi rimarkis, ke ankaŭ la riverbordo antaŭ ni kovriĝis per maldika sed dense nigra kovrilo. Tiuj soldat-formikoj montris, ke ili eĉ la fajron ne timas. Ili ĝin atakas kiel ardan malamikon. Komprenoble, la unuaj dudek aŭ kvindek mil formikoj forbrulas, sed trans la cindron de iliaj kadavroj pasas multaj milionoj da kunuloj. Ŝajnas, ke ili marŝas en difinitan direkton, transirante ĉiujn obstaklojn kaj neniigante antaŭ si ĉiun vivan estaĵon.

Ĉiam pli kaj pli da ili amasiĝis ĉe la riverbordo, je kelkdek metroj de ni. Ŝajnis al mi, ke ili preparas atakon kontraŭ ni. Mi ekrigardis la knabon, kaj lia trankvila sinteno ankaŭ min trankviligis.

Kaj nun okazis io, kion mi ne povis kredi, malgraŭ ke ĝi okazis antaŭ miaj konsternitaj okuloj. Multaj milionoj da formikoj kuniĝis sur malgranda spaco kaj kunpremis sin en grandan bulon. Komence ĝi havis grandecon de piedpilko, sed la insektoj de la arboj kaj la tero iom post iom alvenis por pligrandigi per siaj korpoj la pilkon, ĝis la alteco de mezstatura viro.

Tiam, kiam eĉ ne unu formiko estis plu videbla sur la arboj, la pilkego, kvazaŭ movita per magia forto, ek-ruliĝis en la akvon.

La nigra bulo ruliĝis direkten al la mezo de la rivero, dum samtempe la akvo fluo ĝin portis rivermalsupren. Kiam ĝi atingis la mezon, la pilkego daŭrigis la antaŭeniron, ĝis kiam ĝi atingis la kontraŭan riverbordon.

Ni mute rigardis la eksterordinaran vojaĝon de la vivanta pilkego. Pro emocio ni eĉ ne vorton interŝanĝis.

Ni eliris sur la teron. Nur nun mi rimarkis, ke niaj kruroj estas kovritaj de vezikoj pro la formikaj pikoj.

Alirinte al nia fajrujo, nur amason da cindro ni trovis. Sur ĝi kuŝis la skeleto de nia apro, tute blanka, purigita de la etaj sovaĝbestoj.

Tibor Sekelj. Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo. — Antverpeno — La Laguna, 1979, p. 56-59. Mallongigita fragmento.

— Kiel kutime, en la literatura parto de nia kunveno estas ankaŭ versaĵo. Ĝin prezentas la aŭtoro.

Boris Kolker¹²

AFRODITA¹³

Vekiĝe, vi rigardis ĉiam ŝin,
Rigard' de l' statueto vin intrigis:
La trajtoj de l' antikva bel-diin'
Al vi alies trajtojn memorigis.

Post rendevu', en sun-subira hel'
konversaciis vi kun violono,
Dum junulino de aktikva bel'
Muzik-ridetis vin en unisono.

Jes, tiel estis...
Malfermiĝis pord'.
Al mur' premiĝis via korpo-ŝarĝo.
Jen violono.
El streĉita kord'
Kor-ŝiran melodion tiris arĉo.

Silente rigidigis statuet'.
Kord-vibris la despero kor-kaŝita...
Mutigis arĉ'.
Svingiĝis kun impet'.
Kaj fale
Frakasiĝis
Afrodita.

— Kaj fine estas nia lasta studo pri la stilistiko.

SONFIGUROJ

Sonfiguro estas lingva rimedo por reliefigi iujn vortojn per speciala kombino de iliaj sonoj. Inter la sonfiguroj ni konsideru nur du ĉefajn.

Aliteracio estas ripeto de la samaj aŭ similaj konsonantoj: El streĉita kord' korŝiran melodion tiris arĉo. — Kord-vibris la despero kor-kaŝita. — Kaj fale frakasiĝis Afrodita.

Rimo estas samsoneco inter du aŭ pluraj vortoj, de la vokalo akcenta kaj de sekvantaj son-elementoj. Por klasifikado de rimoj ni uzu la studon de K. Kalocsay "La Esperanta rimo":

La rimojn mi dividas en kvar grupojn:

1. Pura rimo estas sameco de ĉiuj akcentaj kaj postakcentaj vokaloj kaj konsonantoj: reĝo-seĝo, ardobardo, ventro-pentro (simpla pura rimo); bruo-truo (apogita rimo); kaptisto-kantisto (apogita sufiksrimo); deklami-reklami, blondulin'-respondu lin (superrimo); venu jam-komprenu jam (transrimo); sendita-vendita (pseŭdosuperrimo); manĝadas-trinkadas (adasismo¹⁴, sen apoga konsonanto kaj sen transrimo, nepre vitinda).

2. Rimoido¹⁵ estas sameco de ĉiuj akcentaj kaj postakcentaj vokaloj, pli-malpli granda malsameco de konsonantoj: suĉi-ruĝi, polvo-orfo, vigla-nigra, kadro-patro, montri-tondri (parencrimo); veo-tombejo, ondo-tondro, sanga-angla (pluskonsonanta rimo); hieraŭ-fieran, morgaŭ-zorgaj (preskaŭrimo); li atentos-en la tendo (transkura rimo); patro-karto (inversa rimo); cindro-fingro (kombina asonanco); knabo-tago (milda asonanco).

Parencrimo, pluskonsonanta rimo kaj kombina asonanco estas sengene uzeblaj anstataŭ pura rimo. La ceterajn rimoidojn oni uzu ŝpare, nur en ekstrema neceso.

3. Agordo estas sameco de ĉiuj rimelementoj escepte la akcentitan vokalon: arbo-korbo, reĝo-paĝo, ombro-decembro.

4. Radikrimo estas pura interrimado de la radikoj, vokala kaj konsonanta malsameco de la finaĵoj: bela-anĝeloj, lando-grandaj, miele-pelas, fali-palajn. Tiajn kompatindajn rimstumpojn ofte oni renkontas precipe ĉe rusaj poetoj. La radikrimo ne estas rimo.

La pura rimo kaj rimoido povas esti ina (akcento sur antaŭlasta silabo: granda-landa) kaj vira (akcento sur lasta silabo: pord'-kord', dum-sum', min-destin').

Oni ne timu uzi eĉ kuragan rimoidon, se per ĝi oni gajnas fidelecon, naturecon de esprimo. Sed oni gardu sin de¹⁶ trouzo, ĉar la tro multaj nepuraj rimoj donas surdan muzikon, lignosonan, tedan knaron, senharmonian poezion. Kaj la idealo devas esti ĉiam la pura rimo kaj la forta parenkrimo.

— Kompreneble, ne estas speciala bezono (krom se vi serioze intencas verki poeziaĵojn) memorfiksi ĉiujn specojn de rimo; sufiĉas distingi inter pura rimo, rimoido, agordo kaj radikrimo. Oni denove atentu, ke evitindaj estas adasismoj kaj radikrimoj.

— Mi deziras aldoni, ke lastatempe poetoj ofte verkas per blankaj (senrimaj) versoj. Tio donas grandan liberon en esprimado de pensoj kaj sentoj, kiun ne ĝenas nepra unimado, sed parte perdiĝas la muziko de la lingvo. En niaj kunvenoj sonis senrimaj versaĵoj de Nadija Andrianova (leciono 5) kaj Mikaelo Ternavski (leciono 3).

— Oni demandis iun personon: “Kiom da tempo vi okupiĝas pri Esperanto?” — “Tri monatojn.” — “Do montru al mi viajn versaĵojn”. Vere, multaj personoj ekde siaj unuaj paŝoj en Esperanto decidis riĉigi la Esperantan poezion per siaj verkoj originalaj kaj tradukaj. Sed oni memoru, ke minimumaj postuloj al la poeto estas perfekta lingvoscio, bona kono de la stilistiko kaj poezia tekniko (rimo, ritmo). Nu, kaj la cetero, kiel oni diras, venas de Dio. Krome, verkado estas ne nur plezuro, sed ankaŭ laboro. Sed se vi sentas, ke vi nepre

devas verki en Esperanto, ke vi nepre devas provi viajn fortojn, ekverku, ne hezitu. Kredante je viaj ebloj, ne opiniu, tamen, ke vi jam atingis la pinton de Parnaso kaj ne ofendiĝu kontraŭ redaktoroj kaj eldonistoj, se ili ankoraŭ ne opinias vin klasikulo.

— En la sekva kunveno okazos seminario, en kiu ni pridiskutos verkojn de niaj klubanoj, originale verkitajn en Esperanto. La tradukista rondo okupiĝos pri problemoj de tradukado de scienc-teknika literaturo en Esperanton kaj el Esperanto. Krome ni povos spekti videofilmon pri Kanado.

KOMENTARO

1. Highway /hájuej/.
2. Plimuto — marko de aŭtomobilo.
3. Davenport /Déjvenport/.
4. Steve /Stiv/.
5. Artisto — persono, kiu praktikas unu el la artoj: literaturon, muzikon, pentradon, skulptadon, teatron, kinon ktp.
6. Reprodukti — produkti objekton similan al alia objekto.
7. t.e. — tio estas.
8. Oni povas trapasi instru-raĵtan ekzamenon kaj ricevi konforman ateston ĉe la Ĉefa Atesta Komisiono de REU.
9. Amaskomunikiloj — gazetaro, radio, televido.
10. Tibor Sekelj (1912-1988). Jugoslavo. Esperantistigis en 1929. Kelkaj liaj libroj: “Nepalo malfermas la pordon”, “Premiitaj kaj aliaj noveloj”, “Mondo de travivaĵoj”, “Elpafu la sagon”.
11. Unesko — Organizaĵo de Unuiĝinta Naciaro pri Edukado, Scienco kaj Kulturo.
12. Kolker Boris Grigorjeviĉ. Naskiĝis en 1939. Esperantistigis en 1957. Kandidato de filologiaj sciencoj (Okcidenta ekvivalento — doktoro pri sciencoj), defendinta la disertacion pri esperantologia temo. Pedagogoj kaj tradukisto de scienc-teknika literaturo. Aŭtoro de tri Esperanto-lernolibroj, interlingvistikaj artikoloj, recenzoj

pri Esperanto-libroj. En diversaj tempoj — kunfondinto, estro de diversaj fakoj, vicprezidanto, prezidanto de SEJM, prezidanto kaj vicprezidanto de ASE, vicprezidanto de SEU kaj REU, prezidanto de la instru-metodika komisiono de ASE, SEU kaj REU, komitatano de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA, komitatano de IUEF (Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj), kunfondinto kaj membro de EVA.

13. Afrodita — diino de belo kaj amo ĉe la antikvaj grekoj.

14. Adasismo estas sufiksa rimo; la vorto “adasismo” (ad-as-ismo) estas sprita elpenaĵo de Antoni Grabowski /Grabóvski/ (vidu la komenton 8 en la leciono 26).

15. -oid- — neoficiala sufikso, signifanta objekton, similan al la objekto, esprimita per la radiko, al kiu ĝi estas almetita: metaloido, negroido.

16. Prefere: gardu sin kontraŭ.

LINGVA PRAKTIKO

Highway estas la vivmaniero

1. Priskribu, kion vi vidas kaj sentas, se vi veturas en via luksega aŭtomobilo sur la plej altklasa strado.

Ĉefaj formoj de la enkluba laboro

2. Verku trimonatan planon de kunvenoj de Esperanto-klubo aŭ prelegeton pri formoj de eksterkluba laboro.

La plej danĝera besto de la praarbaro

3. Trovu ĉiujn vortojn, kiuj signas realaĵojn (bestojn, plantojn, objektojn), rilatantajn al ĝangalo.

4. Elektu verbojn, kiuj karakterizas agojn de la formikoj.

5. Trovu la leksikon, kiu montras kreskon de bruo, kaj dismetu ĝin laŭ la kreskanta gradacio.

6. Trovu vortkunojn kun nombroj. Kiun rolon ludas la nombroj?

7. Rerakontu la tekston en la nomo de formik(ar)o.

Afrodita

8. Kiujn nemenciitajn sentojn kaj agojn simbolas la statueto kaj la violono?

Sonfiguroj

9. Klasifiku la rimojn en la laste studitaj versaĵoj: “Ezopa fablo”, “Voko”, “Jaroj kuras, jaroj flugas”, “Afrodita”.

10. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj: Arbustaro, muskolaro, novelaro, eraro, terminaro, prezaro, serpentaro, kamparo, komparo, afiksaro, azenaro, amaro.

11. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Citrono — citrolo, arko — arĉo, espero — despero, komuti — komputi, stato — statuo — staturo.

12. Ĉu ne ŝajnas al vi, ke la sekvaj propraj nomoj estas Esperantaj vortoj? Se jes, provu klarigi ilian signifon:

Marko, Modesto, Julio, Romano; Klara, Flora, Roza, Marta, Frida, Ada, Ida; Leonido, Leonardo, Gustavo, Gregoro, Gastono, Ernesto, Teodoro, Filipino, Emilo; Amalia, Oksana, Elvira; Homero, Priamo, Voltero, Bonaparto, Salomono.

13. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kiom ofte okazas Universalaj Kongresoj de Esperanto?

b) Kio estas EVA?

c) Pro kio la nomo de Tibor Sekelj estas fama en Esperantujo?

ĉ) Kiu Esperanto-libro estas tradukita en dudekon da lingvoj?

d) Kiu estas la aŭtoro de tri Esperanto-lernolibroj, eldonitaj en Sovet-Unio?

e) Kio estas TEJO?

f) Kio estas adasismo? Kiu elpensis tiun vorton?

14. Temo por diskuto aŭ rakonto: Vi varmigis serpenton, ĝi al vi enpikos la denton.

15. Rakontu pri via vivo en ĝangalo, se vi transloĝiĝus tien por kelka tempo.

LECIONO 14

— Post sufiĉe longa restado en Francio Vladimiro Bolŝakov havas multe da impresoj. Hodiaŭ li parolos en la klubo pri unu trajto de francoj.

LAŬ LA KODEKSO DE L' "POLITESSE"¹

En la Pariza Bulonja arbaro, ĉe la enirejo de l' familia restoracio "En la olda farmbieno", la vizitantojn salutas, el malantaŭ latbarilo, la tuta bestaro nepre sur kampara korto. Estas kaprinoj kaj hundo, kaj kunikloj kaj kokinoj. La plej granda rimarkindaĵo, tamen, estas ansero Oskaro. Ne tuj mi komprenis, kial la birdo siamaniere, ansere afablas al unuj vizitantoj, sed celas pinĉi aliajn je maleolo. La mistero senvualigis, kiam trans la barilon pasis maljunuleto kaj diris: "Bonan tagon, Oskaro! kiel vi fartas? Ĉu bone? Dankon, ankaŭ mi bonfartas". Montriĝas, ke bonkora vorto plezurigas ankaŭ la anseron. Oskaro akceptis mankareson, lasis la olduleton pluri senhandikape al la trinkejo kaj revenis al la barilo instrui aliajn vizitantojn pri la "politesse"¹, kiu tradukiĝas ne sole kiel "ĝentileco", sed ankaŭ kiel "edukiteco". En ĉi lasta senco, verŝajne, kaŝiĝas la sekreto de civiliza konduto.

En ajna infanejo de Parizo, la edukistoj dum la matena renkontiĝo jam ĉe l' enirejo interŝanĝas unu-du afablajn frazojn kun ĉiu sia edukato. En la infanĝardeno oni nepre kisas "sian" etulon ĉe adiaŭo, dum en la lernejo oni manpremas aŭ enbrakumas ŝin/lin. Persona estimo estas montrata al la personeto, kaj la personeto repagas centoble. La aŭtoritato de adoltoj, precipe la gepatroj, estas tre alta. En Francio ĉiuj samopiniis, ke, se vi respektas la rajtojn de aliu, la aliu respektos viajn rajtojn. Pri tiu principo oni instruas ekde la infanaĝo. En la familia rondo la gepatroj ĉiam paciencie finaŭskultas la infanon. Kaj jen la rezulto: 66 procentoj de la enketitoj en la aĝogrupo de 15 ĝis 20 jaroj diras, ke la gepatroj komprenas ilin.

El kio originas tiu interkompreno ĉe la francoj? Jen ekzemplo. Etulo sidas kaj desegnas, poste li timeme prezentas sian kreaĵon al la juĝo de la plenaĝuloj. Nek en la lernejo, nek tiom pli en la hejmo oni neglektos lian/sian desegnaĵon, oni ne malatentos ĝin per senrigarda forĵeta gesto. Kiel ajn febla kaj fuŝa ĝi estas, ĝi meritas kuragiĝan komenton: "Mirige! Kia imagopovo!" Aŭ, se la temo tute ne kompreneblas: "Kia kolorsenco! Superba pentraĵo!", kaj oni tuj alkroĉas ĝin surmuren apud similajn eksponaĵojn kun nomindikoj pri la aŭtoroj. La estonta Picasso² ridetas ĉe tio, sentante sin samkiel adolta pentristo antaŭ la pordo de sia unua persona ekspozicio. Kiel profite tio kompensiĝas poste!

La *politesse* estas nocio vasta, multŝtupa. Dum oni iom-post-iome adoptadas ĝin, oni ellernas ne nur ĝustan uzadon de manĝilaroj (ĉe iuj pri-metoj de la tablo ili nombras je dekoj), ne nur kutimiĝas ne enŝovi la buŝtukon malantaŭ la kolumon kaj ne manĝi ŝmace. Oni ellernas ankaŭ decan konduton en la societo, la arton sin vesti kaj eĉ skribi leterojn en formo afabla.

La decoj en Francio signifas ne nur bonajn kondutmanierojn, protokolon. Unuavice ili signas respekton por rajtoj, opinioj, sentoj kaj emocioj de la ĉirkaŭuloj. Krome, la bonvolan respektadon de la moroj kaj reguloj de l' komuna vivado. Survoje — ankaŭ observadon de trafikreguloj. Se iu malatentas la trafikregulojn en Parizo, du-tri ŝoforoj nepre signalos al la regulrompinto. Kaj ĉe aparte akcidentminaca delikto oni almetos fingron al la tempio kaj turnos ĝin kun subkomprena implico. Neniu faros similan geston, tamen, se oni eldiras opinion diferencon de l' aliaj, vestas sin siamaniere aŭ ekstravagance, ekokupas sin pri desegnado, kantado, versado. Toleremo estas konsista parto de la franca *politesse*.

Sufiĉe baldaŭ vi alkutimiĝas al ĉio ĉi. Vi ne plu miras, kiam en vendejo oni dankas vin pro aĉeto, kaj la poŝtisto dankas pro via kvita subskribo kontraŭ la sendaĵo, kiun li liveris rekte al via hejmo. Iom post iom vi mem asimilas elementojn de l' *politesse*. Por diri al la konatoj ĉe renkonto: "Bonan tagon! Kiel vi fartas? Viaj infanoj, ĉu ili ne malsanas? Kaj via aŭto, ĉu ĝi ku-

radas normale? Ĉu la lasta fiŝkapta ekskurso estis sukcesa?" Kaj diri tion kvazaŭ interalie — leĝere, sentrude, interesite kaj kun rideto. Same ĉe adiaŭo — la ceremonio, pri kiu estas ellaborita tuta ritaro: "Nu, ĝis baldaŭa revido! Ĝis renkontiĝo! Mi deziras ĉion bonan al vi! Estu la tago (mateno, vespero, semajnfino, festotago ktp) sukcesplena kaj plezura por vi!" Sen tiaj ĝentilaj paroloj ne eblas eniri aŭ forlasi vendejon aŭ kafejon, kie oni vin konas kaj salutas. La *politesse* devigas. Profitas pro tiu "*politesse*-efekto" kaj unuopa persono, kaj la tuta socio — ne nur psike-morale, sed ankaŭ ekonomie.

Ne estas tro peniga tasko adopti la arton de *politesse*. Simple, necesas konstante klopodi pri ĝia asimilado. Aŭ, ĉu eble sencas portempe lui de la francoj la anseron Oskaro?

V. Bolŝakov. Po zakonom "politesa". // Pravda, 13.06.1988. Mallongigita traduko.

— Ĉarma rakonto! Baldaŭ kvaropo de niaj klubanoj — Vanda Genina, Demetro Bulavin, Aleksandro Tarasov kaj Nonna Minajeva — partoprenos Esperantokursejon en Francio. Necesas, ke ili trovu temperon por konatiĝi kun tiu fama ansero Oskaro. Kaj ĝenerale, estos agrable konatiĝi pli proksime kun la civilizita kaj gaja franca popolo.

— En niaj kunvenoj jam kelkfoje estis menciita profesoro Jevgenij Aleksejeviĉ Bokarjov — patriarko de la postmilita Esperanto-movado en Sovetio. Hodiaŭ ni aŭdu pri li pli detalan rakonton.

Nikola Aleksiev

EŬGENO BOKARJOV — ESPERANTISTO,
SCIENCISTO, PACBATALANTO
(1904-1971)

Mi konatiĝis persone kun profesoro Eŭgeno Bokarjov en 1963, kiam li venis al Sofio por partopreni la 48-an

Universalan Kongreson de Esperanto. Li estis estro de la sovetia 35-membra delegitaro. La kongresanoj kun granda atento aŭskultis lian salutparoladon en la nomo de la sovetia esperantistaro. Li estis membro de la Akademio de Esperanto³, kaj multaj konis lin kiel perfektan esperantiston.

Bokarjov fariĝis esperantisto jam en sia junaĝo kaj aktive eklaboris por disvastigo de la Internacia lingvo en Rostov-ĉe-Dono. Li gvidis kursojn kaj organizis kelkajn rondojn de esperantistoj. Pro lia granda aktiveco, oni elektis lin delegito al la unuaj Esperanto-kongresoj en la juna Soveta lando kaj membro de Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU)⁴.

Bokarjov estas la persono, kiu faris plej multe por la renesanco de la sovetia esperantista movado post la malfeliĉa stagno pro la kulto de personeco⁵. Li prezentis al la Prezidio de la Sovetia Scienc-akademio raporton "Pri la internacia lingvo en la scienco"⁶ kaj favorigis al Esperanto gravajn rondojn. Li estis konata al siaj kolegoj en tiuj medioj kiel bonega konanto de multaj kaŭkazaj lingvoj, kiel unu el la specialistoj de la scienca branĉo interlingvistiko kaj pli speciale de esperantologio. Al liaj bonege argumentitaj tezoj estis malfacile kontraŭstari⁷.

Bokarjov iniciatis ankaŭ la fondon de Komisiono por internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj⁸, kies prezidanto li restis ĝis sia morto. La komisiono per sia agado preparis grundon por kreo de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE)⁸.

Li estis ege modesta, simpla, bonanima homo sed kun firma karaktero. Lin hardis ankaŭ la partopreno kiel volontulo en la Patrolanda milito, kie li servis en armeo, defendanta Leningradon, kaj tie estis grave vundita. Elirinte el la fajrego de la milito, li kun la sama abnegacio daŭrigis sian sciencajn laborojn kaj sian agadon favore al Esperanto⁹. Rekono de tio estis la scienca grado "doktoro de filologiaj sciencoj" kaj la posteno de vicdirektoro de la Instituto de lingvoscienco de la Akademio de sciencoj de USSR.

Sian bonegan scienc-filologian erudicion Bokarjov manifestis ankaŭ en du fundamentaj vortaroj rusa-es-

peranta kaj esperanta-rusa¹⁰. Liaj prelegoj dum Universalaj Kongresoj de Esperanto estis inter la plej interesaj kaj amase vizitataj.

Profesoro Bokarjov havis firman pozicion rilate la socian rolon de Esperanto. Li skribis tiurilate: "Nia Esperanto-movado ebligas al ĉiuj pacamaj popoloj interkompreniĝi, bone interŝanĝi pensojn, sentojn kaj kulturajn valorojn, ĝi kreas kondiĉojn por firmigo de amikeco kaj fido, kontribuas al disvolviĝo de ideoj pri paco inter la homoj, sendepende de ilia sociordo, politikaj kaj religiaj konvinkoj".

Tiu nobla humanisto, nature, tre ŝatis la agadon de MEM (Mondpaca Esperantista Movado) kaj faris ĉion eblan por faciligi la laboron de sovetiaj MEM-anoj. Li instigis eldonadon de porpacaj revuoj. Li estis membro de la Internacia Komitato de MEM kaj ĉiuflanke subtenis ĝian agadon. Dum kelkaj jaroj li estris ankaŭ la kulturan komisionon de MEM.

Nikola Aleksiev. Pioniroj kaj veteranoj de MEM. — Sofio, 1983, p. 21-24. Mallongigita artikolo.

— Ni denove renkontiĝas kun Johán Valano. La agado de la romano "Ĉu ni kunvenis vane?" okazas en la ĉefurbo de Kazahio Alma-Ato. Dum internacia konferenco okazis murdo. Detektivoj organizas enketadon. Ĝoja (la edzino de unu el la detektivoj) entreprenas propran enketadon.

*Johán Valano*¹¹

ĈU NI KUNVENIS VANE?

— Kiel vi povas scii, ke ili ne estas el la konferenco? — ŝi demandis, aludante la grupon, al kiu ili aliĝis en la muzeo.

— Laŭ la vizaĝoj. Estis turista grupo usona. Internacia turismo komencas disvolviĝi ĉi-regione.

— Kial vi diris: “laŭ la vizaĝoj”? Ĉu vi konas ĉiujn vizaĝojn de la konferencanoj?

— Eble ne ĉiujn, sed la plimulton. Mi kompreneble ne scias, kion faras tiu aŭ alia persono. Ekzemple, mi scias, ke vi estas delegitino, sed el kiu lando, mi ne povas diri.

— Estas eksterordinare! Pli ol cent landoj estas reprezentitaj ĉi tie, kaj ĉiu delegitaro havas minimume kvin membrojn, multaj havas ĝis dek aŭ dek du. Devas esti 700 delegitoj, plus la interorganiza sekretario, plus la sovetiaj helpantoj! Kiel vi povus koni tiom da vizaĝoj?

— Estas nia profesio, ĉu ne? Ni lernas havi specon de fotografia memoro. Fakte ni studis la fotojn de la ĉeestantaro dum pluraj semajnoj antaŭ ol veni Alma-Aton.

— Ĉu vere oni povas lerni memori vizaĝon?

— Ho jes! Ne nur vizaĝon, sed la tutan korpon. Ni lernas analizi la trajtojn dum rigardado. Tio fakte fariĝis reflekso, kaj oni trejnas nin ilin memori. Finfine, ne estas pli malfacile ol lerni parkere frazon de poezio aŭ de kanto.

— Mirinde! Mi ne sciis pri tio, — mensogis Ĝoja, kiu perfekte konis tiujn teknikojn, plurfoje menciitajn de la edzo. Kaj ŝi aldonis: — Via laboro estas plena je respondecioj. Fakte devas esti nefacile.

— Vi pravas. Multaj ne suspektas la amplekson de niaj respondecioj.

— Kaj kiam okazas krimo, kiel ĉi-foje...

— Des pli strange impresas, efektive. Tion bone sciis mi. Kiam tio okazis, estis mia vico deĵori ĉe la enirejo de la koridoro, ĉe kiu troviĝas la ĉambro, kie s-ro Kertsch¹² estis murdita.

— Ĉu vere? Terure! Ĉu tio ne malhelpas vin dormi?

— Feliĉe, ne. Mi havas tre bonan dormon. Eble ĉar mi scias, ke mi povis nenion fari por malebligi la krimon.

— Tamen...

— Jes, kompreneble, mi pensas pri tiuj posttagmezo kaj vespero pli ofte ol pri aliaj. Sed...

Dum li lasis ŝvebi la frazon nefinita, Ĝoja ekhavis ideon.

— Mi admiras vian egalanimecon, — ŝi diris. — Por mi estus ege maltrankvilige, sciante pri la sovetia kontrolmanio...

— Tion oni ne troigu, — la norvega gardisto konsilis, kun rideto memfida.

— Tamen, la ideo, ke televida kamerao rigardas ĉiun vian movon... — Ĝoja mensoge prononcis.

Ŝi vidis lin paliĝi.

— Kion vi celas? — li demandis, unuafoje perdante iom el sia aplombo.

— Nu, vi scias, ĉu ne?, ke en la muro, kiu rigardas al la enirejo de la gravula koridoro, troviĝas kamerao, kiu ebligas al la sovetiaj aŭtoritatoj kontroli, kio tie okazas. Tiel ke se la gardisto forlasas sian postenon...

Ĉi-foje, li iĝis kadavre pala, tiagrade, ke Ĝoja sentis glacian sensacon laŭ la spino; ŝi ne imagis, ke ŝia ruzo donos tian rezulton.

— Se gardisto forlasas la lokon... — li murmuris kun tremanta voĉo.

Johán Valano. Ĉu ni kunvenis vane? — Antverpeno
— La Laguna, 1982, p. 76-78. Roman-fragmento.

— Kaj en la fino estas versaĵo de la majstro de Esperanto-poezio.

*Kolomano Kalocsay*¹³

KISOJ

Mi kisas vian manon:
Patrinon kisas fil'...
Estim'. Respekto pia.
Humil'.

Jen kis' al viaj haroj:
De patr' al filinet'...
Dorlot'. Fier' naiva.
Kviet'.

Mi kisas vian frunton:
Fratinon kisas frat'...
Fidela ŝirm'. Kareso.
Kaj flat'.

Jen kis' al viaj vangoj
El kamarada kor'...
Komunaj zorgoj, ŝercoj,
Humor'.

Mi kisas vian buŝon...
Mallumo. Fulm'. Destin'.
Turmento. Rav'. Komenco
Kaj Fin'.

K. Kalocsay. Streĉita kordo. —
Budapest, 1931, p. 93.

— Mi havas anoncon. En nia klubo oni povas aranĝi abonon de pluraj Esperanto-gazetoj por la sekva jaro. Respondecaj pri la abonado Zinaida Neĵdanova. Ne prokrastu la abonadon!

— La 15-an de julio ni havos en la klubo esperantologian seminarion pri la temo "Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto". Krome niaj gastoj el Nederlando rakontos pri la sistemo de maŝina (komputila) tradukado, en kiu Esperanto okupas centran lokon. Ni aŭskultos ankaŭ diskojn kun Esperantaj kantoj, kiuj lastatempe aperis en nia lando.

KOMENTARO

1. Politesse /polités/.
2. Pablo Picasso /Pikáso/ (1881-1973) — fama pentristo.
3. Celoj kaj taskoj de la Akademio de Esperanto: 1. Konservi kaj protekti la lingvon Esperanto laŭ ĝia Fundamento kaj kontroli ĝian evoluon; 2. Esplori ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton; 3. Kritiki

verkojn el lingva vidpunkto; 4. Defendi Esperanton kontraŭ ĉiaj konkurencoj.

4. Pri SEU vidu la tekston "Esperantaj memorigaj lokoj en Moskvo. Parto 1" (leciono 4).

5. "Kulto de personeco" estas eŭfemismo por ne paroli rekte pri la amasa teroro en Sovetio dum la regado de Stalin. Pri persekutoj kontraŭ Esperanto kaj esperantistoj en Sovetio (same kiel en Germanio kaj en kelkaj aliaj landoj) tre detale rakontas la riĉe dokumentita libro de Ulrich /Ulriĥ/ Lins "La danĝera lingvo". La libron aperigis en Esperanto la Moskva eldonejo "Progreso".

6. Tio okazis somere de 1967. La raporto poste estis publikigita en la ruslingva libro "Problemoj de interlingvistiko". Reveninte post tiu raporto, Bokarjov rakontis, ke kelkaj akademianoj, famaj en siaj fakoj, bombaste eldiris siajn opiniojn, kiuj atestis plenan neinformitecon pri tiu ĉi problemo. Nur en 1973 la Prezidio de la Akademio de sciencoj de USSR komisiis al la Instituto de lingvoscienco studi la problemon de helpa lingvo por la internacia komunikigo.

7. Bokarjov kolektadis ĉiujn eblajn objektojn kaj antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto. En iu konversacio li diris: "Mi multe donus por almenaŭ unu serioza argumento kontraŭ Esperanto. Sed inter ĉiuj argumentoj neniu estas serioza".

8. Pri tio legu en la teksto "Esperantaj memorigaj lokoj en Moskvo. Parto 2" (leciono 5).

9. Meze de 1955 Eŭgeno Bokarjov, ricevinte subtenon de la konataj lingvistoj Viktoro Vinogradov, Viktoria Jarceva, Levo Ĵirkov, Klara Majtinskaja, Boriso Se-rebrennikov, faris sensukcesan provon fondi Esperanto-Asocion kadre de la Akademio de sciencoj de USSR.

La 24-an de januaro 1956 en la Instituto de lingvoscienco okazis diskuto pri la raporto de profesoro Eŭgeno Bokarjov "La nuna stato de la problemo de la internacia helpa lingvo", kiun partoprenis konataj lingvistoj Viktoria Jarceva, Maria Gufiman, Viktoro Borkovskij, Nikolao Andrejev, Klara Majtinskaja, Levo Ĵirkov, Boriso Gornung, Aleksandro Reformatskij. Tiu diskuto

iniciis lingvistojn en la interlingvistikon. La raporto poste aperis en la libro "Problemoj de interlingvistiko".

En 1956 laŭ iniciato de Mikaelo Paŝenko estis kunvokita kunveno de malnovaj esperantistoj, kiu decidis refunkciigi SEU kaj elektis profesoron Bokarjov prezidanto de SEU. La supera partia instanco nuligis la decidon.

10. Estante grandaĝa kaj nesana, Bokarjov ege multe da fortoj fordonis al la laboro pri la Esperanto-rusa vortaro, pri kio li okupiĝis hejme ekster la ofica tempo. Li diris aŭtune de 1969: "Mi nenion fidas blinde, mi ĉion zorge kontrolas. Rezulte, mi trovis amason da fuŝaĵoj ne nur en Esperantaj vortaroj, sed ankaŭ, ekzemple, en la franca-rusa vortaro de Gansina. Mankas tempo verki pri tio artikolon. Sed mi penas fari la vortaron perfekta. Se iam mi havos la trian infarkton kaj mortos, do pro la laboro pri la Esperanto-rusa vortaro". Bedaŭrinde, tiel vere okazis. La laboro pri la vortaro restis nefinita. Ĝi aperis nur en 1974 sub redakto de Viktoro Grigorjev.

11. Vidu la komenton 11 en la lesiono 3.

12. Kertsch /Kerĉ/.

13. Vidu la komenton 6 en la leciono 10.

LINGVA PRAKTIKO

Laŭ la kodekso de l' politesse

1. Imagu, ke vi gastis ĉe amikoj en Francio. Reveninte, vi rakontas en via familio pri kelkaj moroj de tiu lando, uzante la tekston kaj aldonante viajn konojn kaj supozojn. Viaj familianoj de tempo al tempo faras al vi demandojn.

Eŭgeno Bokarjov — esperantisto, sciencisto,
pacbatalanto

2. Uzante ĉi tiun tekston kaj aliajn materialojn de la lernolibro, rakontu pri la vivo kaj agado de Eŭgeno Bokarjov.

Ĉu ni kunvenis vane?

3. Donu titolon al la romanfragmento.

4. Kiomfoje en la teksto renkontiĝas la vorto *vizaĝo*? Kial?

5. Pri kio okupiĝas dum la konferenco tiuj du interparolantaj personoj? Kiel vi imagas la profesion de homo, specialisto pri vizaĝoj? Kial li ektimis, aŭdinte pri televidkamerao?

6. Trovu demandajn kaj eksklamaciajn frazojn. Por kio ili estas uzitaj?

7. Klarigu la metaforojn *fotografia memoro, kadavre pala*.

8. Streĉu vian fantazion kaj provu iom daŭrigi la rakonton.

Kisoj

9. Laŭ la versaĵoj parolu en la nomo de viro pri diversaj specoj de kisoj. Aldonu viajn konsiderojn.

10. Formu vortojn kun la sufikso *-ec-* de taŭgaj por tio vortoj el la tekstoj de la leciono.

11. Ĉu ne ŝajnas al vi, ke la sekvaj geografiaj nomoj estas Esperantaj vortoj? Se jes, provu klarigi ilian signifon:

Sudano, Kataro, Panamo, Irlando, Maroko, Senegalio, Aŭstrio, Florido, Kolorado; Kuriloj, Dono, Nemano, Kaspio; Limo, Armaviro, Samaro, Bendero, Tirano, Amano, Manilo, Dublino; Montrealo, Karakaso.

12. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronoj:

Adepto — adopto, etikedo — etiketo, kulto — kulpo, konduki — kondukti, sento — senso — sensacio — senco — esenco.

13. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) En kiu postmilita Universala Kongreso de Esperanto unuafoje partoprenis sovetia delegacio?

b) Kio estas Akademio de Esperanto?

c) Kiu estas la aŭtoro de la libro "La danĝera lingvo"?

ĉ) En kiu jaro okazis sensukcesa provo refunkciigi SEU?

d) Kiujn Esperanto-vortarojn kreis Bokarjov?

e) En kiu lando estas ellaborita sistemo de maŝina tradukado kun uzo de Esperanto?

14. Temo por diskuto aŭ rakonto: Li celis anseron, sed trafis aeron.

15. En ĉiuj tekstoj de la leciono trovu stilajn figurojn kaj klasifiku ilin. Laŭeble faru la samon ankaŭ pri sek-vaj lecionoj.

LECIONO 15

— Nian hodiaŭan kunvenon komencas prelego de la psikoterapiisto Anatolo Dobroviĉ. Sendube, lia temo inter-teresos ĉiujn.

KAPTILOJ DE L' ENAMIĜO

La vivon de l' enamiĝintoj embuskas pluraj kaptiloj.

Kaptilo de l' mutuala aktorado. La rilatoj inter Nikolao kaj Irena evoluis dekomence kvazaŭ en kleo romantika. Nikolao ludis la rolon de kavaliro de-sapontiĝinta kaj Irena — tiun de fragila sed fiera esta-ĝo... La ludado ilin tute absorbis; estis jam malfacile el-iri el la kutima bildo. Krome, iliaj parencoj kaj amikoj estis ravitaj de ilia neordinara amo... Superba parol! Vere, antaŭ la pordo de la geedziĝ-registrejo Nikolao perdis la kuragon: "Kion mi faras?" Tamen ĉu decas al kavaliro, eĉ seniluziĝinta, retiri sin?! En ĉi tiu kaptilo estis unuflanke libida altiriĝo kaj mutuala plaĉo, insti-gantaj la gejunulojn al troa aktorado; aliflanke estis la cirkonstancoj eksteraj — la opinioj de la ĉirkaŭantaro kaj la neeblo vanigi iliajn atendojn. Rezultis el tio geed-zigo nepravigebla.

Kaptilo de la komunaj interesoj similas la unuan. Jurio kaj Svetlana ŝatas la poezion, ili membras en la sama literatura rondo. La komuna ŝatokupo ŝajnas esti parenceco spirita: "Neniu komprenas min tiel bone kiel li!" Enamiĝo ekardas; la gejunuloj prenas la mutualan altiriĝon por "spiritaj ligoj nerompeblaj". La geedziĝo estas kontraktita... Poste, kiam ekestas ĉiutaga vivopro-zo — ĉu eblas eviti ĝin! — evidentiĝas, ke ili estas ho-moj fremdaj, ne komprenantaj unu la alian.

Kaptilo de l' vundita memamo. Andreo havis ĉiaman sukceson ĉe junulinoj. Nur Alla malatentis lin. Andreo seniĝis je trankvilo, li povas pensi pri neniu krom ŝi. Liaj sentoj fine komunikigas al Alla, am-intrigo estas miskomprenata kiel amo. Nupta festo... Post kelkaj monatoj jen venis resobriĝo: "Kion mi trovis en ŝi?" Iufoje kazo ĉi-tipa banalas kiel virina ruzajo: ja Alla

lerte “algulis” al si la memaman fraŭlon... Vere, ankaŭ ŝi ne trovis feliĉon en la geedziĝo.

Kaptilo de l' malplivaloreco. Natalia kutimis opinii sin malbela: “Oni ne enamigas al tiaspecaj fraŭlinoj”. Subite Vjaĉeslavo komencas amindumi ŝin. La junulino videble disfloras. La flamo de ŝiaj sentoj ekkaptas Vjaĉeslavon, kiu jam antaŭe ek-ideis pri ŝi kor-inkline. Mutuala enamigo evidentas, sed oni prenas ĝin por plensenta amo. Plue — kiel en la kazo antaŭa: “Kion mi trovis en li?”

Kaptilo de l' seksa sukceso. Viktoro havas ioman sperton en am-aferoj, sperton pli malgajan ol bravurmemoran... Sed foje en subita impulso li intimiĝis kun preskaŭ nekonata ĉarma virino, kaj... la seksa povreco malaperis kvazaŭ magie. Viktoro konkludas, ke fine li eltrovis “sian” virinon. Sekvas geedziĝo, kaj post kelka tempo venas resobriĝo... Jes, oftokaze junulo aŭ junulino pretas senpripense edz(in)iĝi al homo, kiu unufoje igis ilin senti sin “vera viro” aŭ “vera virino”. Cio ĉi bonas, tamen pli-malpli baldaŭ ankaŭ la bezonoj de l' animo kaj de l' menso memorigos pri si!..

Kaptilo de l' dankemo aŭ de l' ŝuldata kompatato. “Ŝi oferis tiel multe pro mi”, — Boriso pensas. Li opinias sia morala devo edziĝi al Galina. Poste li tristigas en la ligiloj de Himeneo: ja Galina kaj li havas nenion komunan.

Kaptilo de l' profit-cela decido. Katarina indiferentas pri Olego. Tamen ŝi konsideras: ja li havas loĝejon, aŭton, decan salajron. Praktiku paciencon kaj vi gajnos rekompencan! Toleru pagota per ormonero! Poste, post jaro, Katarina vidas, ke neniu komforto povas anstataŭi la ĉefan gajneblajn en la geedziĝo — homon amatan kaj intiman.

... Jen paradokso: ne ĉiam senharmonia privata vivo, sed nemalofte ankaŭ... vera amo komenciĝas per tiaj kaptiloj de l' enamigo. La geedzoj “alguiĝas” unu al la alia: ilia alianco firmiĝas, ĝin fundamentas la feliĉa komuneco de opinioj, nefalsita anim-varmo, sincera reciproka prizorgado, ĉiam renaskiĝanta amoro.

Anatolij Dobroviĉ. Lovuŝki vlublennosti // Nedela, 1988, N^o 1, p. 20-21. Mallongigita traduko.

— Do pri fuŝa geedza vivo ne nepre kulpas la kaptiloj de l' enamigo?

— Certe, ne nepre. Kio do kulpas? Plej ofte — la egoismo. Estas afero malfacilega ĝin venki. Necesas, por ekzemplo, alpreni jenan mensan starpunkton: “Estas mia kulpo pri ĉia malbono okazanta en nia familio”. Kaj ne ruli barelon kontraŭ la parulon, nek konsenti la kvazaŭ kompetentan opinionon de la konatoj, kiuj emas kategorie verdikti: “Forlasu finfine ĉi tiun kanajlon!”.

— Kiam oni aŭdas pri tiom da kaptiloj de l' enamigo, oni ekdubas pri tio, ĉu ekzistas la amo. Sed jes ja, ĝi ekzistas, kvankam ĝi ne ĉiam estas feliĉa. Ni aŭskultu rakonton pri la lingvo de okuloj. Ne, ĝi ne estas nomo de vica nova projekto de internacia lingvo. Tamen per tiu lingvo eblas paroli. La lirikan novelon legas nia amatora aktorino Maria Meleŝova.

Aldona Krusz¹

LA LINGVO DE OKULOJ

Pensoj, maltrankvilaj pensoj, kvazaŭ akraj ponardoj, tranĉas kaj tranĉas. Pentras ili profunden, en la koron mem. Ĝi deziras esti apartenanta al neniu, esti libera kaj nesubpremata. Tamen la morna realo per siaj senkompataj fingroj, forte enpremite en sian manplaton, ĵetas ĝin en la supersaturitan vivon.

— Kaj pro kio vi ĉi tie jelpadas? Kion ankoraŭ vi bezonas? Etendiĝu, disvolviĝu en la nuno. Vidu, ĉio tie ĉi estas via. Cio, pri kio antaŭe vi ne kuraĝis eĉ revii, dum vi vivis sub basko de la drinkulo edzo. Ĉiuj pensas, ke vi estas naskita sub favora stelo. Ĉiu envias vin. Ne unu² belulino dezirus esti en via loko — apud interesa, riĉa edzo, okupanta solidan pozicion en la socio. Li neniam faros al vi honton, ne ofendos, ne kolerigos, ne venos ebria, ne stinkos je tabakfumo, per kiu antaŭe estis trasorbataj eĉ ĉiuj viaj vestoj.

— Ho, realeco! Ĉu vi komprenas? Al mi ĝi bonodoris, tiu tabakfumo. Bonodoris kiel la plej multekosta bulgara rozoleo! Ĉiuj gazetoj povis kriĉadi pri ĝia malu-

tilo, sed mi ne timis tion — mi sciis, mi sentis, ke tio estasodoro de mia edzo, odoro, kiu elvokis en mi teneran, mildan tremeton, apenaŭ li eniris la ĉambron. Kaj miaj okuloj ekbriladis per nepriskribebla bono, kiam ili renkontis liajn profundajn ĉiaman printempon radiantajn okulojn. Ni ne bezonis vortojn. Ni parolis per okuloj, ni sentis unu la alian.

Sed kio okazis nun? Mi forgesis la lingvon de okuloj... Mi jam ne deziras paroli per okuloj. Ho, kia peza, kiel neelteneble peza estus la lingvo de okuloj, se mi devus paroli per ĝi la duan fojon en la vivo! Ne! Ne! Mi ne povas. Pli facile nun estas paroli per vortoj. Kaj ni parolas per vortoj, trankvile, logike, ĝentile. Kaj al vi ŝajnas, ke ĉio estas en ordo, la vivo ridetas kaj dancas... Vi alĝvidis min al la kastelo, ĉirkaŭis per riĉo kaj prizorgo, do, kial mi devus maltrankviliĝi?

Tamen... Tamen pardonu, kara mia. Riĉo kaj prizorgo ne estas ĉio. Vi ja ne scipovas la lingvon de okuloj. Vi parolas per vortoj. Vortoj reeĥas en spaco kaj frakasigas, ili forgesatas. Neforgesebla estas nur la lingvo de okuloj. Nur en la lingvo de okuloj torentas la fortuno, kiu vokas, tiras nur al li, ĉiam, ĉiuhore, ĉiuminute dum dekoj da jaroj, sopiranta nur lin, tian simplan, tian neeminentan por la aliaj.

— Forgesu la fabelon, tiuj okuloj estas jam estingiĝintaj, antaŭlonge mallumaj.

— Mallumaj? Sed ili lumas al mi, mi vidas ilin, sentas kaj sopiras, ili gvidas min tra krucvojoj de la vivo, ili gardas, ke mi ne falu, ke mi ne vundu min, kaj surverŝas min kvazaŭ per riproĉo, kiam vi ĉirkaŭprenas miajn ŝultrojn. Bone, ke vi ne scias, kia nefacila estas por mi via mano, mi sentas ĝin, ĝi bruligas min dum ĉiu tuŝo. Sed mi ne sentis la manon de tiu, kiu scipovis la lingvon de okuloj. Kia ĝi estis facila, dum ĝia ektuŝo mi solvigadis kaj ĝi nerimarkeble kunfandiĝadis kun mia korpo, iĝante ĝia parto.

Unufoje vi, verŝajne, rimarkis la lukton, pasantan en mi.

— Diru al mi, kara, kio premas vin, — ekparolis vi trankvile kaj aferece. — Mi ne deziras penetri en vian antaŭan vivon, — vi daŭrigis, — sed al mi ŝajnas, ke vi

ne devas ĝin bedaŭri, la morto savis vin el ungoj de frivolulo.

— Ĉu savis? Ho! Kiel domaĝe, ke vi, vivanta ĉiam laŭ etiketo, eĉ imagi ne povas, kiel estas agrable esti iam frivola, senzorga kaj libera, ridi kun vento kaj iri por dormo ĉe la dua krio de kokoj... Riĉo ne estas ĉio, ordeca vivmaniero ankaŭ ne estas ĉio. Ĉio estas tio, kiam iu, sen apudesto, ankoraŭ akompanas vin per sia rigardo kaj parolas per muziko, komprenata nur al vi sola — per lingvo de okuloj.

Trezoro: La Esperanta novelarto 1887-1986.
Dua volumo. — Budapeŝto, 1989,
p. 797-799. Mallongigita.

— La 26-an de julio estas festo en Esperanto-lando. Ĝi estas naskiĝtago de Esperanto: tiutage en la jaro 1887 aperis la Unua Libro³. Tiun daton ni celebras per ekspozicio de malnovaj, oni povas eĉ diri antikvaj, esperantaĵoj kaj per aŭskulto de du verkoj. La unua venas el la plumo de profesoro Eŭgeno Bokarjov kaj estis verkita okaze de la centjariĝo de la aŭtoro de Esperanto. La dua estas inspira, aforismeca, "programa" versaĵo de Ludoviko Zamenhof. Ĝin deklamos nia klubano Paŭlo Molĉanov.

Eŭgeno Bokarjov

ESPERANTO, LA LINGVA KREAĴO DE ZAMENHOF

Inter diversaj projektoj de lingvo internacia, Esperanto sola fariĝis larĝe uzata. Tiu fakto ordinare estas klarigata per pure sociologiaj kaŭzoj. Jam dekomence Esperanto fariĝis instrumento de praktika interkompreniĝo en pli-malpli granda kolektivo kaj estis traktata de ĝiaj adeptoj de tiu vidpunkto, sed ne kiel objekto de teoriaj diskutoj. Aliaj lingvoprojektoj, kontraŭe, restis precipe objektoj de teoria studado kaj diskutado.

La reprezentantoj de aliaj sistemoj de lingvo internacia precipe atentis ne tiujn trajtojn, kiuj karakterizas lingvon internacian kiel instrumenton kaj esprimrimedon, sed tiujn, kiuj reprezentas iun teorian principon, tute ne plej gravan el praktika, funkcia vidpunkto. La t.n.⁴ naturalistoj (adeptoj de Occidental⁵, Interlingua⁶ ktp), ekzemple, ĉiam diskutis pri kriterioj kaj gradoj de natureco. Atentante unuavice la similecon de internacia lingvo al la naturaj lingvoj, ili similas homojn, kiuj penas taksi iun sistemon de aeroplano ne laŭ ĝiaj teknikaj, strukturaj kvalitoj, sed laŭ grado de ĝia simileco al natura birdo⁷.

Ni analizu kelkajn trajtojn de Esperanto, kiuj karakterizas ĝin kiel principe pli taŭgan rimedon de interkompreno, ol multajn aliajn proektojn de lingvo internacia.

1. Oni devas opinii tre grava por lingvo internacia la eblecon krei laŭbezzone novajn vortojn pere de produktivaj vortderivaj elementoj. Kaj la sistemo de vortderivado en Esperanto devas esti alte taksata de tiu vidpunkto⁸. Unue, ĝi tre faciligas la studadon de la lingvo kaj ebligas al ĝia uzanto kvante tre riĉan vortformadon anstataŭ studado de multaj pretaj kliŝaĵoj. Due, samtempe ĝi estas granda avantaĝo, ĉar ĝi ebligas al ĝia uzanto formi novajn vortojn, kiam aperas neceso pri tio. La sistemo de vortfarado en Esperanto faras la lingvon morfologie tre diafana. Kontraŭe, la "naturalismaj" projektoj estas tre limigitaj je vortderivaj eblecoj, ĉar en ili precipe estas uzataj nur tiuj derivitaj vortoj, kiuj jam ekzistas en la naciaj lingvoj.

2. Tre grava el la funkcia vidpunkto estas ankaŭ la sintaksa diafaneco de lingvo internacia, kiu ebligas tujan komprenon de sintaksa frazstrukturo, de uzata sintaksa modelo. En Esperanto tion ebligas precipe specialaj karakteriziloj de ĉefaj morfologiaj vortklasoj: substantivo, adjektivo, verbo, adverbo. Tiuj karakteriziloj helpante larĝan vortderivon (ekzemple: telefono, telefona, telefoni, telefone), pliriĉigas la lingvon. Due, ili cementigas la propozicion, farante ĝian sintaksan modelon preciza kaj tuj komprenebla; se eĉ iuj vortoj en propozicio ne estas komprenitaj, specialaj vortfinaĵoj kompreni-

gas ĝian ĝeneralan kaj abstraktan signifon: ...a ...isto ...e ...as ...aĵon de ...aj ...oj.

3. De l' funkcia vidpunkto estas ankaŭ grava la libera vortordo en propozicio, ĉar ĝi ebligas la uzadon de inversa vortordo⁹ por pliriĉigo de senca enhavo de parolo, por intensigo de iuj sencaj nuancoj kaj kromsignifoj. Tion kaŭzas en Esperanto ne nur la vortkarakteriziloj, sed ankaŭ la akuzativo kaj varieblaj adjektivoj.

4. Ankaŭ la fonetika ortografio en Esperanto devas esti alte taksata el la funkcia vidpunkto. Male, la tradicia ortografio de la "naturalismaj" projektoj ne povas esti defendata, ĉar ĝi tute kontraŭas al la raciaj principoj de planlingvo.

Do ne nur sociologiaj, sed ankaŭ pure lingvistikaj kaŭzoj destinas al Esperanto larĝan praktikan utiligon kaj disvastiĝon.


Memorlibro pri la Zamenhof-jaro. —
Londono, 1960, p. 30-31. Mallongigita.

Ludoviko Zamenhof

LA VOJO

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek moko de l' homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la vojo' elektiita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, P' obstino kaj la pacienco, —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.



4. Trovu en la teksto ĉiujn detalojn, kiuj rilatas al la antaŭa vivo de la heroino kaj ŝia nuna vivo. Komparu ilin.

5. Kio, laŭ via opinio, estas preferinda: kvieto, estimo kaj senzorgeco aŭ malordo, eksplodoj kaj kvietiĝoj kaj "lingvo de okuloj"?

Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof

6. Listigu sociologiajn kaj lingvistikajn kaŭzojn de disvastiĝo kaj praktika utiligo de Esperanto.

7. Kio al vi persone pleje plaĉas en Esperanto?

8. Ĉu vi opinias la praktikan vidpunkton grava? Kial?

La vojo

9. Diru la ĉefan ideon de la verko.

10. Trovu en la versaĵo aforismecajn esprimojn.

11. Trovu ripetojn de la samaj aŭ samspecaj vortoj kaj vortgrupoj, kiuj pliigas la emocian forton de la versaĵo.

12. Elskribu la rimojn el la versaĵo kaj klasifiku ilin. Tiun taskon vi povas plenumadi ankaŭ por aliaj versaĵoj.

13. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj:
Fingreto, ansereto, kamioneto, alumeto, buleto, rade-
to, rideto, giĉeto, etiketo, monteto, vojeto, societo, sone-
to, suneto, ruzeta, varmeta, sekreta, beleta, puŝeti, aĉe-
ti, piketi.

14. Al la frazpecoj el la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu donas rapide,	ricevas nenion.
Kiu bati deziras,	donas duoble.
Kiu diras la veron,	trovas bastonon.
Kiu dormas longe,	havas suferon.
Kiu elektas tro multe,	vivas mallonge.

15. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paroni-
moj:

Sorbi — absorbi, admono — demono, kompensi — re-
kompenci, barelo — barilo — borilo, akcepto — recepto
— percepto — koncepto — escepto.

16. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kiu verkis la novelon "La lingvo de okuloj"?

b) En kiu dato aperis la Unua Libro? Kiun titolon ĝi
havis?

c) Kiu estis kreinto de Occidental?

ĉ) Kiu organizaĵo kreis Interlingua-n?

d) Kiu kriterio estas la plej grava en la naturalismaj
lingvoprojektoj?

e) Kiu verslinio en la versaĵo "La vojo" estas emfa-
zita?

17. Temo por diskuto aŭ rakonto: Pli helpas guto da
feliĉo, ol barelo da saĝo.

18. Skribu leteron al la heroino de la novelo
"La lingvo de okuloj".

LECIONO 16

— Meze de Eŭropo troviĝas unu el la plej belaj kaj bonstataj landoj — Svislando. Iam mi estis tie, partoprenante la Universalan Kongreson en Lucerno. Hodiaŭ por mi mem estas nekredeble, ke mi vagis en stratoj de Genevo, Berno, Zuriko, admiris longegajn intermontajn pur-akvajn lagojn, Alpojn, la monton Pilatus kun la plej kruta en la mondo dentrada fervojeto, la antikvan horloĝo-turon, templojn antikvajn kaj templojn novajn, supermodernismajn... Kaj ĉie afablaj, laboremaj homoj. Verŝajne, la plej karakteriza trajto de svisoj estas akurateco, ordemo, precizemo ĝis neimagebla grado. En Svislando ekzistas ŝerco: “Se via trajno devas veni je la oka horo kaj kvin minutoj, kaj sur via horloĝo nun estas la oka kaj ses minutoj sed la trajno ne venis, do aŭ la trajno ne estas svisa, aŭ via horloĝo ne estas svisa”. En tiu lando neniu transiras straton ĉe ruĝa lumsignalo, sed se iu persono surpaŝis la pavimon, ĉiuj aŭtoj haltas, ĉar la valoro de la homo superas la valoron de ĉio ajn. En tiu lando neniu ĵetas cigaredstumpojn surstrate. Mi devas haltigi miajn rememorojn, ĉar mi eldiris ilin nur enkonduke al la rakonto de Arthur /Artur/ Baur pri la lando, kie la homoj vivas kune dum 800 jaroj!

SVISLANDO: UNUECO KAJ DIVERSECO

La estiĝo de Svislando estis ebla dank' al la kombino de du elementoj, kiuj interdependas: la naturo de la lando kaj la karaktero de ĝia popolo. Sen la montaro ne ekzistus Svislando. La montoj postulas daŭran batalon kontraŭ lavangoj, ŝtonfaloj, inundoj kaj streĉan laboron por certigi modestan vivon. Tial ili devigas la montaranojn al atentemo, diligenteco, laboremo. Aliflanke, la montoj donas protekton. Kiu loĝas en la montaro, ne estas facile venkebla.

La politika talento de la enloĝantoj de tiu sovaĝa kaj malriĉa regiono kreis en 1291 la konfederacion, kiu per la alianco de la homoj vivantaj en pli mildaj regionoj,

kie kreskas pano kaj prosperas metioj, larĝigis sian ekonomian bazon.

La popolo tute ne estas unueca, ĝi eĉ ne posedas komunan lingvon, kaj tamen ĝi estas nacio. La svisa koncepto de nacioj estas sendependa de lingvoj; ĝi estas politika, tiel ke nacio kaj ŝtato estas nedisigeblaj.

Ni havas ne nur kvar lingvojn, sed ankaŭ du konfesion, ni havas malriĉajn montarajn regionojn kaj prosperajn industriajn, ni havas grandajn kaj etajn kantonojn, progresemajn kaj konservemajn ktp. La limoj inter lingvoj kaj konfesioj ne estas identaj, kaj ili same ne koincidas kun la limoj de la kantonoj.

La kompromiso ĝenerale konvenas al la svisa karaktero, ĉar ni ne multe ŝatas batali pri principoj kaj idealoj havante pragmatan pensmanieron. La svisa pragmatismo ebligas ne nur, ke la ŝtato funkcias, sed eĉ, ke ĝi funkcias bone.

Kvankam la volo de la plimulto decidas pri leĝoj kaj konstituas la solan veran suverenan aŭtoritaton, la malplimultoj — negrave kiel malgrandaj ili estas — havas neperdeblajn rajtojn.

Oni povas rimarki konkrete la apartaĵojn de Svislando apenaŭ transirinte la landlimon. Oni vidas, aŭdas, flaras, sentas, ke la atmosfero estas alia. Tuj rimarkeblaj estas la denseco de la enloĝado, la pureco de la domoj kaj stratoj, la kvieteco de la popolo, la sinteno kaj parolmaniero de la homoj, la manko de mizero, mallonge — la ĝenerala ordo...

Esperanto ĉiam havis fervorajn anojn en Svislando. Jam la 2-a Universala Kongreso post Bulonjo estis organizita en Genevo, en 1906. Tiam Edmond Privat jam estis esperantisto de post tri jaroj. Kun sia amiko Hector Hodler¹ li baldaŭ ekludis gvidan rolon en Esperantujo. Hodler estis la unua direktoro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj redaktoro de la revuo “Esperanto”. Privat lin sekvis kiel redaktoro kaj prezidanto de UEA.

Svislando ankoraŭ kvinfoje akceptis la Universalan Kongreson. La kongreso de 1947 markis la komencon de radioelsendoj de Svisa Radio Internacia en Esperanto.

La Svisa Esperanto-Societo seninterrompe laboris por Esperanto kaj eldonis regule sian organon "Svisa Esperanto-Revuo". Apude laboras tre dinamike la Kultura Centro Esperantista (KCE), kiu posedas kelkajn domojn. Ili servas kiel gastejo por la kursoj de la Internacia Altlernejo por Esperanto. La urba biblioteko posedas unu el la plej riĉaj kolektoj de Esperantaj libroj kaj de materialo pri aliaj planlingvoj. Al la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds², kie funkcias KCE, estas filiigita la Centro de dokumentado kaj studoj pri la internacia lingvo.

Arthur Baur. La fenomeno Svislando. — Bern, 1979, p. 5-10, 142-143. Mallongigitaj fragmentoj.

— Mi aldonu, ke en Svislando aperas la revuo "Literatura foiro", tre ŝatata en intelektulaj rondoj.

— Ni venas al Esperanto-lando per diversaj vojoj. Kaj kiam oni jam estas tie, estas interese ekscii, kiel venis al Esperanto aliu. Hodiaŭ ni ekkonos la vojon, per kiu venis dano Lorenz Friis /Lórenc Fris/.

KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Mi tute ne volis esti esperantisto. Mi malŝatis la ideon de artefarita lingvo. Mi argumentadis kontraŭ ĝi, diskutante kun mia amiko kaj kolego, fervora esperantisto.

Li volis konvinki min pri la alta kvalito de Esperanto kaj pri la neceso de neŭtrala lingvo internacia. Sed, laŭ mi, Esperanto estas nur surogato kaj ne kapabla esprimi delikatajn sentojn — kaj ĝi ne taŭgas kiel lingvo de scienco, diplomatio kaj poezio. Tiel mi argumentis energie kaj brave kontraŭ mia amiko kaj klopodis ridindigi la objekton de lia granda amo.

Li brave defendis sian aferon, sed mi, ne konante la faktojn, evidente "sciis" pli bone ol li.

Jam longe mi miris pro tio, ke li — prudenta homo kaj inteligentulo — deziras okupi sin pri tiom naiva ideo kaj perdi sian valoran tempon por tia stultaĵo.

Tion mi diris al li, diskutante, kaj mi konsilis al li forĵeti sian absurdan ideon de artefarita lingvo: "Tia lingvo ja ne vivas; ĝi ne havas jarmilan evoluon kiel naciaj lingvoj. Al ĝi mankas la forto kaj la suko de vivo... kaj ne kredigu min, ke dek ses simplaj reguloj povas krei lingvon plene kapablan esprimi ĉion, kion pensas la homa cerbo..."

"Vi parolas pri io, pri kio vi scias nenion. Vi pensas, ke Esperanto estas tia, kia vi diras. Vi diskutas pri afero, pri kiu vi scias nepre nenion. Oni povas diskuti nur pri temoj *konataj*. Tial mi petas vin kunpreni ĉi tiun lernolibron kaj ĉi tiun broŝuron pri Esperanto. Tralegu ambaŭ. Post tio revenu. Tiam ni havos bazon por diskutado".

Tiel parolis al mi mia amiko antaŭ multaj, multaj jaroj. Tuj la vortoj ŝokis min, ĉar verdire, li pravis, dirante, ke oni povas diskuti nur tion, pri kio oni scias almenaŭ iom. Tro ofte oni emas esprimi sian "pretan" opinion, kvankam oni ankoraŭ ne havis eblon por studi kaj pripensi la temon.

Tiuj vortoj antaŭ multaj, multaj jaroj fariĝis mia sorto, ĉar mi akceptis la inviton je vortduelo kaj prunteprenon de la proponitaj libretoj.

Hejme mi eksidis por fervore kaj energie studi la materialon. Mi prenis krajonon en la manon por noti multajn punktojn de kritiko kaj kondamno. Mi volis pre-
pari min por vigla diskuto kaj komplete konvinki lin, ke ne li, sed mi pravas.

Sed... mia kraĵono nenion notis, nenion kondamnis. Ju pli mi legis, des pli kaptis min la strukturo de la lingvo kaj la genia konstruo de la gramatiko. Mirigis min la sistemo de vortfarado, la simplaj tempoformoj de la verbo, la praktika solvo de la akuzativo, la korelativa sistemo³ ktp.

Unu horo pasis post la alia. Komence mi nur observis, sed poste mi ankaŭ lernis, studis, klopodis memori. Ne daŭris longe, ĝis mi komencis entuziasmiĝi pro la

lingvo mem... kaj poste ankaŭ pro la interna ideo. Saŭlo fariĝis Paŭlo, malamiko fariĝis amiko⁴.

Pasis unu semajno, eble kelkaj tagoj pli. Mia amikokolego kaj mi renkontiĝis laŭ interkonsento. Mi tuj rekonis al li la librojn. La enhavon de la lernolibro mi jam sciis. Li miris, kiam mi petis rigardi lernolibron por progresantoj. Li bezonis kelkajn tagojn por plene kompreni, ke mi efektive fariĝis esperantisto kaj... ke mi intencas stari ĉe lia flanko en la paca batalo por devastigi Esperanton kaj la scion pri ĝi.

Kaj vere: tiel okazis. Strange: kelkajn jarojn poste li fariĝis malpli aktiva, kaj post kelkaj pliaj jaroj li ne plu okupis sin pri nia afero. Ofte oni miras, ke io tia estas ebla; ke flamo, tiom arde brulante, povas estingiĝi... sen ia videbla kaŭzo! Mi suspektas, ke kaŭzo estas lia edzino... ĵaluzo. Poste mi spertis, ke ofte ĵaluzo de edzinoj aŭ edzoj kaŭzis malaktivigon, aŭ eble eĉ, ke li aŭ ŝi tute forlasas la movadon.

Io tia ne okazis al mi, ĉar mi edziĝis al samideanino, kiu estis ne nur aktiva, sed ankaŭ entuziasma por nia afero. Kaj ĉar ŝi estis eksterlanda, ni interparolis nur Esperante. Tiel ni spertis, ke Esperanto taŭgas ankaŭ kiel hejma, kiel familia lingvo⁵.

Kiel sekretario de nia landa Esperanto-instituto, kies ĉefa celo estis inviti eksterlandajn Cseh-metodajn⁶ geinstruistojn kaj organizi iliajn kursojn, mi havis la taskon kontakti ĉiujn persone, kaj plej ofte tio okazis en nia hejmo. Kia feliĉo, ke mi havas edzinon, kiu estas samideanino, kaj kiu povas perfekte kaj flue konversacii kun ĉiu verdstela gasto. Ni gastigis en nia hejmo esperantistojn el preskaŭ ĉiuj landoj, el preskaŭ ĉiuj kontinentoj. Imagu, kiom riĉa sperto paroli kaj diskuti kun anoj el tiom da nacioj! Nur per Esperanto ni havis tiun riĉan sperton. Nur per Esperanto tio estas ebla.

L. Friis. Eldonisto konfesas. //
Sub la signo de la verda stelo. —
Åbyhøj, 1964, p. 7-9. Mallongigita.

— Mi ne dubas, ke la sekvan rakonton ĉiuj sekvos atente: ja estas interese ekscii, kiel vivis niaj malproksimaj prauloj. Nu, temas ne nur pri pratempoj.

*Johan Hammond Rosbach*⁷

MODERNIĜO EN LA KAVERNO

El la densa arbaro venis Ŝton Ŝtonid, maljuna viro preskaŭ nuda. Ĉirkaŭ la koksoj li havis linkan felon, tio estis lia sola vestaĵo, eĉ la piedoj estis nudaj. Li havis belan barbon kaj densan hararon. Sur la ŝultroj li portis mortintan cervidon.

“Ho, ho”, li laŭte ridis, “estos ĝojo en la kaverno, kiam la infanoj ekvidos mian cervidon! Ho, ho, estos odoro en la kaverno, kiam Ŝtonin pretigos la mangajon. Ho, ho!”

Kiam li atingis la grandan riveron Ŝtonej, li demetis la cervidon kaj eksidis. Li aŭskultis. La susuro de la venteto en la arbaro kaj la ondobatoj kaj muĝo de la rivero sonis en liaj oreloj kvazaŭ dolĉa muziko. Kaj jen blekoj de la gruoj sur la marĉo.

“Ho, ho, la vivo estas bona, la mondo estas bela”, diris al si Ŝton. “Sed mi soifas”. Kaj li remetis la cervidon sur la ŝultrojn kaj iris en la riveron. La torento estis fortega, sed li eĉ ne unu momenton hezitis — rekte antaŭen li iris. Kiam la akvo atingis lian buŝon, li trinkis, trinkegis. Post tio li daŭrigis — el la rivero — sur la marĉon. Ĉiu paŝo postulis multe da forto, ĉar la peza viro kun la besto sur la ŝultroj profunde eniĝis en la ŝlimon de la marĉo: ŝvap, ŝvap, ŝvap, diris la marĉo sub liaj piedoj. Kaj tiu sono estis agrabla al liaj oreloj.

“Ho, ho, vere bela estas la mondo kaj ĝia muziko”, li diris, “bedaŭrinde nur, ke la homoj ne povas mem fari belan muzikon, la mondo ankoraŭ ne estas sufiĉe moderna. Nur unu estas pli bona ol la muziko, kaj tio estas mangajo — kaj mangajon la homoj povas bone fari. Bone, ke hodiaŭ mi prenis la klabegon, sen ĝi mi ne havus la cervidon nun, kaj la cervida viando estas la plej bona. Feliĉa estas mi, kiu vivas en nia moderna

tempo! Ni havas ŝtonajn ilojn. Kompatindaj homoj, kiuj vivis antaŭ ni — ili eĉ ne ekpensis pri tio, ke la ŝtono estas uzebla! Ho, ho, ho! Sed mi deziras, ke ni povu eĉ pli modernigi nian kavernon!”

Ŝvap, ŝvap, ŝvap — la marĉo estas longa. Sed nun li fine atingis la ŝtonan deklivon, kaj raŭkvoĉe li laŭte kantis dum li suprengrimpis al la hejma kaverno. La infanetoj aŭdis la voĉon de sia patro kaj rapidkrure kuris por vidi, kion li kunportas hejmen.

“Nu, etuloj — ĉu vi atendis?”

“Ho jes, paĉjo — ni estas tre malsataj”.

“Sed hodiaŭ mi havas cervidon, kaj cervido ne estas ĉiutaga manĝaĵo. Ĉu estas festo hodiaŭ? Ne. Do mi ne havas manĝaĵon por vi hodiaŭ. Ho, ho, ho!”

“Tamen estas festo hodiaŭ, paĉjo! Vi vidis, kiam vi venos hejmen!”

“Kio estas, etuloj? Diru, diru!”

Sed la infanoj ne diris.

Ekster la kaverno sidis Ŝtonin, la ĉarma edzino de Ŝton Ŝtonid; ŝi feliĉe ridetis bonvenon al la granda viro kun la cervido. Li salutis ŝin. Ankaŭ ŝi havis nur felon ĉirkaŭ la koksoj kaj en la cetero estis nuda. Sed ŝi havis ne la kutiman linkan felon. Ŝi havis belan neĝ-blankan koksfelon. Ŝton subite haltis: ĉu la infanoj diris veron? Ĉu estos festo? Kio okazos? Kial Ŝtonin havas la festan pelton?

Aperis subite el la kaverno Ŝtoner, la plej aĝa filo, kiu havis dudek jarojn.

“Ho, saluton, ĉu vi estas hejme! Kiu bona feliĉo kondukis viajn paŝojn al la gepatra kaverno? Ĉu vi estas la kaŭzo de la celebrotita festo?”

“Jes, paĉjo! Mi ne estas kondukita ĉi tien per la bona feliĉo, sed mi mem kondukis la feliĉon ĉi tien!”, respondis Ŝtoner.

Ŝton staradis ekster la kaverno, la cervidon li ankoraŭ portis sultre. Li eĉ nenion komprenis, ĝis aperis apud Ŝtoner fremda juna knabino.

Ŝton ekkomprenis. Li rigardis ŝin, ŝian belan vizaĝon, ŝiajn longajn harojn kaj ŝian strangan koksfelon, kiu estis pli mallonga ol ordinare. Li rigardis ankaŭ la belan globetaron, kiu pendis de ŝia kolo sur ŝia brusto.

Li turnis sin al sia filo kaj demandis:

“Kie vi trovis ŝin?” Kaj li kape montris al la junulino.

“Apud la maro”.

“Ĉu apud la maro troviĝas homoj?”

“Jes”.

“Ĉu apud la maro estas tiaj belaj globetoj?”

“Jes, estas sukceso, speco de malmola, diafana, fosilia rezino”.

“Ĉu apud la maro la homoj havas tian koksfelon?”

“Jes, estas felo de foko, besto, kiu vivas kaj en la akvo, kaj sur la tero”.

“Nu, la sukceso estas bela, la fokfelo estas bela, la knabino estas bela. Ho, ho! Nu, filo mia — estas ja via afero!”

“Dankon, paĉjo!”

Kaj li kaj ŝi ekbrilis.

“Kiel vi nomiĝas?”

“Dagni”, ŝi respondis.

“Ĉu vi ne havas ŝtonan nomon?”

“Ne, patro, ni ne plu vivas en la ŝtonepoko. Ni uzas metalajn ilojn, kiuj estas multe pli bonaj ol la forĵetindaj ŝtonaĵoj”.

Ŝton iris en la kavernon kaj demetis la cervidon de sur siaj ŝultroj.

“Estos hodiaŭ edziĝfesto en la kaverno”, li diris.

“Jen la cervido, kiu estas festmanĝaĵo. Vidu — ankaŭ la forĵetindaj ŝtonaĵoj taŭgas por mortigi la rapidan cervidon, ho, ho, ho! Nun estos festo!”

Ŝtonin komencis prepari la cervidon, kaj baldaŭ alloga odoro disvastiĝis en la kaverno.

“Ĉu vi estas feliĉa?” demandis la maljunulo al sia bofilino.

“Jes, patro, mi volas kisi mian novan patron”. Kaj ŝi flankenigis la longajn barbharojn de la maljunulo kaj kisis lin, dum la etularo mire ĉirkaŭstaris.

“Kio estas tio?” demandis la maljunulo.

“Ĉu vi ne scias? Ho, vi vivas en tro malmoderna tempo; vi certe ne scias. Estas kiso — la signo de la amo”.

“Ĉu vi estas tiom terure modernaj ĉe vi?” la maljunulo grumblis. “Do certe ŝajnas al vi vera anakronismo veni ĉi tien al la ŝtonepokuloj!”

“Paĉjo, kio estas anakronismo?” demandis la eta Ŝtonulin, metante la mallongajn brakojn ĉirkaŭ la haran kolon de sia patro.

“Ho, etulino mia, tio estas tro moderna aŭ tro malmoderna afero en tempo, al kiu ĝi ne apartenas. Se mi komencus uzi ilojn de miaj praaĵoj, estus anakronismo. Sed nun temas pri modernigo en la kaverno. Ankaŭ troa modernigo estas anakronismo, ekzemple, se ni komencus uzi alumetojn anstataŭ niajn fajrigilojn”.

La du gejunuloj ekridis.

“Ho patro, vi mem estas vera anakronismo! Kiel vi povas paroli pri alumetoj — alumetoj ja ankoraŭ ne ekzistas! Memoru, ke ni vivas dudek mil jarojn antaŭ la naskiĝo de Kristo! Troa modernigo certe ne estas bona. Imagu, se la homoj jam nun havus atombombon!”

“Ni ne parolu pri tio. Ni estas sufiĉe feliĉaj. Troan modernigon ni ne volas en la kaverno”.

Johan Hammond Rosbach. Bagatelaro. — Oslo, 1951, p. 29-33.

— Ĉar jam ektemis pri la amo, do estu ankoraŭ versaĵo pri-ama!

Kolomano Kalocsay

LA AMO

La am' ne estas ludo,
Sed forta sorta trudo,
Ĝi svingas sian vipon,
Al lip' pelante lipon.

Ni timas ĝian baton,
Kapricon, senkompaton,
Sub ĝia jug' ni svenas,
Sed tamen ĝin ni benas.

K. Kalocsay. Streĉita kordo. — Budapeŝto, 1931, p. 76.

— Nia bibliotekisto havas anoncon.

— En la kluban bibliotekon venis kelkaj artikolaroj pri interlingvistiko, utilaj por prepariĝi al la instru-raĵta ekzameno: “Gvidlibro por supera ekzameno”, “Antologio de la tutmonda interlingvistiko”, “Problemoj de la internacia helpa lingvo” kaj ĉiuj volumoj, aperintaj en la serio “Interlinguistica Tartuensis”⁸ en Tartua universitato (Estonio). Venis jenaj poeziaj libroj: Julio Baghy “Pilgrimo”, Victor /Viktor/ Sadler “Memkritiko”, Raymond Schwartz “La stranga butikoj”, Lajos Tarkony /Lájos Tárkony/ “Soifo” kaj krome — “Baza legolibro por komencantoj”.

— En la sekva merkredo okazos seminario pri terminologio. Krome ni diskutos pri direktoj de laboro de Esperanto-kooperativoj. Kaj ni spektos slajdojn pri Hindio.

KOMENTARO

1. Hektor Hodler /Héktor Hódler/ (1887-1920). Filo de la fama svisa pentristo Ferdinand Hodler. Esperantistiĝis en 1903. En 1908 fondis UEA. Edmond Privat skribis pri li: “Al tio, kion iniciatis la genio de Zamenhof sur kampo lingva, li aldonis la necesan bazon sur la kampo socia”.

2. La Chaux-de-Fonds /La Ŝo-de-Fon/.

3. Tabelo de korelativaj vortoj: kiu, tiu, ĉiu, neniu, iu ktp.

4. Aludo al la Biblio.

5. En la mondo ekzistas multe da internaciaj familioj, en kiuj la komuna lingvo estas Esperanto. En internaciaj (kaj ne nur internaciaj) familioj infanoj denaske parolas Esperante. Tiajn infanojn oni nomas denaskaj esperantistoj aŭ denaskuloj kaj la fenomenon mem oni nomas denaskismo. La denaska scio de Esperanto kreskigas en la homo intereson al la mondo, internaciismon, emon studi lingvojn, geografion kaj aliajn objektojn.

6. Cseh (Ĉe)-metodon iniciatis en 1920 Andreo Cseh /Ĉe/ (1895-1979). Esperantistiĝis en 1910. La principoj de la metodo: a) neuzado de lernolibroj; b) neuzado de

nacia lingvo, sed klarigo de la novaj vortoj per la jam instruitaj; c) komuna ĥora respondado de la kursanoj; ĉ) riĉa aplikado de humuro; d) instigo al tio, ke la lernantoj mem eltrovu la regulojn de la lingvo kaj ke ili mem konstruu la gramatikan sistemon.

7. Johan Hammond Rosbach /Rósbach/. Naskiĝis en 1921. Norvego. Esperantistigis en 1938. Filologo. Aŭtoro de multaj libroj: "Bagatelaro", "La mirinda eliksiro", "Disko", "Fajrejo", "Verda robo", "Fianĉo de l' sorto", "Unumane", "Vibraĵoj".

8. Interlinguistica Tartuensis /Interlingvistika Tartuensis/ — Tartua interlingvistiko.

LINGVA PRAKTIKO

Svislando: unueco kaj diverseco

1. Imagu, ke vi partoprenis en Internaciaj Esperanto-kursoj en Svislando; revene vi rakontas pri tiu lando kaj ties Esperanto-movado en via Esperanto-klubo.

Kiel mi fariĝis esperantisto

2. Trovu en la teksto argumentojn, kiujn oni prezentas kontraŭ Esperanto. Aldonu aliajn eblajn argumentojn kaj montru ilian senbazecon.

3. Verku pri la temo "Kial mi lernis Esperanton kaj kial mi plu estas esperantisto" (pri vi aŭ pri via konato).

Moderniĝo en la kaverno

4. Elektu "ŝtonradikajn" nomojn kaj vortojn. Kiun rolon ili ludas en la teksto? Kial la fianĉino ne havas ŝtonan nomon?

5. Trovu la vortojn, kiuj signas realaĵojn de la ŝtonepoko.

6. En kiu geografia loko okazas la agado de la novelo? Kial vi tiel opinias?

7. Kial la aŭtoro uzas anakronismojn?

8. Imagu, ke vi venis per tempomaŝino en la ŝtonan epokon kaj observas ĉion, kio okazas en la novelo. Ra-

kontu pri tio per propraj vortoj kun viaj komentoj kaj aldonoj.

La amo

9. Priskribu la bildon de la Amo, kiel vi imagas ĝin laŭ la prezento en la versaĵo kaj laŭ via fantazio.

10. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj:

Barbego, marĉego, klabego, ŝtonego, prelego, tralego, ungego, norvego, kanajlego, pordego, kolego, stultega, naivega, grandega, povrega, muĝegi, manĝegi, drinkegi, ravegi, treege.

11. Al la frazpecoj el la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu frue leviĝas, sian barbon submetas.

Kiu rabi eliras, malbone odoras.

Kiu supren kraĉon ĵetas, facile riĉiĝas.

Kiu mem sin gloras, mensogas sentime.

Kiu mensogas kutime, ofte nuda revenas.

12. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Medio — metio, cerbo — cervo, filo — filio, foiro — foriro, palto — pelto.

13. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kiu estis fondinto de UEA?

b) Kie troviĝas Kultura Centro Esperantista?

c) Kio estas Ĉe-metodo?

ĉ) Kiujn librojn aŭtoris Rosbach?

d) Kio estas "Interlinguistica Tartuensis"?

e) Kio estas denaskismo?

14. Temo por diskuto aŭ rakonto: Rusto manĝas la feron, kaj ĉagreno — la koron.

15. Elskribu la rimojn el la versaĵo "La amo". Provu verki novan versaĵon laŭ tiuj rimoj (versaĵo, kunmetita laŭ la donitaj rimoj, nomiĝas burimeo). Se vi sukcesos, provu verki etajn versaĵojn ankaŭ en sekvaj lecionoj. Eble, vi tiel lertiĝos, ke povos verki eĉ akrostikon (akrostiko estas versaĵo, en kiu aro de la unuaj literoj de ĉiu verso formas vorton, nomon ktp).

La profesioj de vendisto, frizisto aŭ kelnero ĉi tie estas perceptataj kiel okupoj ne malpli prestiĝaj, ol la laboroj de piloto, ŝaktisto aŭ metalurgiisto.

La japana priservado havas ankaŭ ombrajn flankojn. Unue, ĝi iĝis tre multekosta. Grandegaj elspezoj de homa laboro en la sfero de priservado kaj komerco kompensigas per alta kosto de la servoj. Due, la labor-kondiĉoj en la sfero de priservado estas konsiderinde malpli bonaj, ol en la sfero de produktado: pli longa labortago, malpli da ripoztagoj, pli malmulte da ferioj, malpli altaj salajroj kaj pensioj, pli da dependo de arbitro de la mastroj.

I. Latišev. Servis po-japonski. // Pravda,
18.05.1987.

— Ni havas hodiaŭ ankaŭ eksterlandan gaston. Li estas Herbert Mayer /Májer/ el Aŭstrio. Li parolos pri unu el la ĉefaj fajrujoj de Esperanto, kiu senbrue plenumas tre utilan laboron.

IEMW: LA UNIVERSALA BIBLIOTEKO DE ESPERANTO

En la centro de Vieno rezidas unu el la plej tradici-havaj Esperanto-institucioj — IEMW (La Internacia Esperanto-Muzeo en Wien /Vin/, t.e. Vieno). Ĝi dankas sian ekziston al iniciato de Hugo Steiner /Ŝtajner/, kiu ĝin fondis en 1927. Jam en 1929 la Aŭstria Nacia Biblioteko transprenis la kolekton kaj garantiis pluan prizorgadon de la konstante kreskanta libraro kaj de la ekspoziciaj objektoj. En 1939, post la okupo de Aŭstrio flanke de la nazia armeo, oni fermis la muzeon, sed la fakto, ke ĝi estis en ŝtata posedo, malhelpis detrudon de la materialo. Post reinaŭguro en 1947 IEMW ekloĝis en Hofburg (Imperiestra Kortega kastelo), kie ĝi daŭrigas sian dokumentadan, kolektan kaj informan laboron ĝis hodiaŭ.

Esperanto ne havas “nacian bibliotekon”, sed ĝi posedas la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno, kiu estas la plej granda funkcia Esperanto-biblioteko en la mondo. Multaj homoj utiligas ĝiajn servojn, konsultante la vere unikan materialon. Tiel IEMW fariĝis la centro por esplor-laboroj, kiuj rezultigis jam plurajn doktoriĝajn tezojn, esperantologiajn kaj interlingvistikajn verkojn.

Viva, funkcia biblioteko devas daŭre plenumi jenajn taskojn:

- konstante pliampleksigi la kolektendan materialon;
- katalogi ĝin laŭalfabete kaj laŭteme;
- konvene stoki kaj protekti ĝin kontraŭ perdoj;
- disponigi ĝin al interesata publiko;
- respondi dokumentadajn informpetojn;
- malhelpi pereon de kaduka materialo per konservado;

— fari esploran kaj publikigan laboron.

Kaj ĉiujn ĉi taskojn IEMW grand-dimensie plenumas.

Apud tiuj temporabaj bibliotekaj laboroj, IEMW agas al ekstero. Kiel muzeo, ĝi estas ĉiujare vizitata de kelkaj miloj da turistoj, grandparte neesperantistoj, kiuj volas havi bazajn informojn pri Esperanto kaj ties utileco. Do, pacience la deĵorantoj klarigas, respondas demandojn, senfundigas antaŭjuĝojn... kaj tio en pluraj lingvoj. Volonte ili informas ankaŭ pri la diversaj landaj asocioj, tiel metante interesatojn en kontakton kun la Esperanto-movado.

IEMW estas *via* biblioteko, ĝiaj servoj estas je *via* dispono:

- Vi povas veni kaj studi surloke.
- Vi povas peti telefone aŭ skribe informojn pri la havaĵo de IEMW.
- Vi povas en Eŭropo pruntepreni librojn, sed nur pere de *vialandaj* universitataj aŭ naciaj bibliotekoj, kiuj kunlaboras kun la teleprunta reto internacia.
- Kontraŭ pago vi ricevas fotokopiojn aŭ filmojn.

Por ke IEMW povu plue ludi sian fruktodonan rolon de universala Esperanto-biblioteko, ĝi bezonas *vian* helpon. Kiel vi povas helpi? Jen kelkaj sugestoj:

— Sendu ĉion, kio koncernas Esperanton aŭ aliajn planlingvojn al IEMW.

— Fariĝu membro de la asocio de la amikoj de IEMW. Vi ricevos informilon, kiu raportas pri la evoluo de IEMW kaj pri ties publikigaj laboroj.

— Sendu *nacilingvan* informmaterialon, kiun oni povas doni al vizitantoj el via lando.

— Kompreneble, IEMW ricevas ankaŭ mondonacojn. Vi povas, ekzemple, pagi aliĝ-kotizon al samideanoj, kiuj ne povas transsendi monon.

— Informu pri la laboro de IEMW. Helpu, ke la esperantistoj konsciu, ke IEMW estas *ilia* muzeo, *ilia* biblioteko.

Pluajn informojn donas: Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, A-1010 Vieno, Aŭstrio.

Esperanto, 1989, N^o 1, p. 7-9.
Mallongigita.

— Kiel ni vidas, IEMW posedas la plej riĉan kolekton de libroj kaj aliaj materialoj ligitaj kun Esperanto kaj la internacilingva problemo. Onidire, ĝi posedas unu absolute unikan libron. Kiu estas tiu libro kaj kiel ĝi aperis, ni ekscios el jena historio.

*Louis Beaucaire*²

ZOZO, LA DEK-SEPA REGULO DE LA FUNDAMENTO³

Foje f-ino⁴ Regultri, la tria regulo de la Fundamento, diris al sia kolegino f-ino Regulsep:

— Venu, ni iru iom promeni!

F-ino Regulsep hezitis:

— Ni ne rajtas forlasi la Fundamenton. Vi scias, ke s-ro d-ro Lavojo⁵, la prezidanto de la Akademio⁶, malpermesis tion.

— Ba⁷, s-ro Lavojo⁵ estas malsana kaj kuŝas en fora sanatorio. Ni profitu lian maleston kaj ĝuu la liberecon!

F-ino Regultri malfermis la pordon de la Fundamento kaj eliris, ŝin sekvis ĉiuj reguloj ekde f-no Regulunu ĝis f-ino Reguldekses.

Post kelkaj mejloj ili renkontis fremdan regulon, kiu afable salutis ilin:

— Bonan matenon, koleginoj! Kien vi iras?

Ili haltis kaj respondis:

— Ni nur iom ekskursas en la ĉirkaŭaĵo de la Fundamento.

— Ho, mi bone konas la Fundamenton kaj volonte apartenus al ĝi.

F-ino Regulses, la plej granda, rimarkigis:

— Bedaŭrinde, ni rajtas esti nur dek ses, ne pli.

— Kiu ordonis tion?

— Nia patro, d-ro Zamenhof.

— Ba⁷, d-ro Zamenhof mortis antaŭ multaj jaroj. Se li ankoraŭ vivus, li certe adoptus min kiel dek-sepan filinon.

— Kion do vi kapablas fari?

— Per mi Esperanto estus ankoraŭ pli facila. Oni nomas min Zozo. Kial? Tial ke oni povas en frazo anstataŭigi per *zozo* ĉiun nekonatan aŭ forgesitan vorton. Mi funkcias kiel jokero⁸ en ludo. Ni supozu, ekzemple, ke iu forgesis aŭ ankoraŭ ne lernis la vorton "ombrello". Li simple diras: "Kiam pluvos, mi prenas mian zozon". Se li ne konas la verbon "fumi", li diras: "Mi zozas cigaredon".

Ĉiuj aplaudis krom f-ino Reguldekses, kiu energie protestis:

— Ne, ne! La tuta mondo scias, ke Esperanto havas dek ses regulojn. Mi estu por ĉiam la lasta regulo de la Fundamento!

Post mallonga silento Zozo proponis:

— Se mi vere ne povas fariĝi f-ino Reguldeksep, eble malgrava regulo de la Fundamento devus cedi al mi sian lokon.

Ĉies rigardoj turnis sin al f-ino Regulnaŭ. Zozo severe demandis ŝin:

— Por kio vi servas en la Fundamento?

F-ino Regulnaŭ balbutis:

— D-ro Zamenhof konfidis al mi la gardadon de jena leĝo: “Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita”.

Zozo rikanis:

— Mi ja respektas d-ron Zamenhof, sed li estis verŝajne laca, kiam li inventis tiun superfluan regulon. Kial li ne preskribis same: “Por paroli Esperanton, oni malfermu la buŝon” aŭ “Por lavi siajn piedojn, bona esperantisto demetu siajn ŝuojn”?

Tiom da sprito tiel ridigis la ceterajn regulojn, ke ili senkompatate forlasis f-inon Regulaŭ en angulo de arbaro kaj transdonis sian lokon al la fremda, senhonta regulo.

Zozo persvadis siajn naivajn koleginojn tuj reiri en la urbon kaj komisii al presisto la eldonadon de nova Fundamento. Sekve multaj homoj tiam eklernis sensuspekte la dek ses regulojn, inkluzive la nezamenhofan naŭan: “Kiam parolanto de la lingvo Esperanto ne scias vorton, li simple uzu anstataŭe la radikon zoz, kiu memstaran signifon ne havas”.

Kio baldaŭ okazis? Babelo⁹ inter la esperantistoj mem: la Lingvo Internacia, la plej klara lingvo en la mondo, fariĝis nenomebla ĵargonaĉo, terura galimatio, ankoraŭ pli nekomprenebla ol Volapük¹⁰. Neniu lernanto penis parkerigi vortojn. Ĉiu ĉiam ĉie ĉiel uzis la lingvan ĵokeron⁸.

Iu procesis kontraŭ iu, pretekste ke tiu lin insulte nomis zozego.

Aŭtoj karambolis, tial ke neniu sciis, ĉu “zoza” signifas “ruĝa” aŭ “verda”, “dekstra” aŭ “maldekstra”.

Policano enkarcerigis pasanton, kiu kriis: “Zozu la prezidanto!”

Komercistoj bankrotis, ĉar ili ricevis mendoleterojn, kiuj tekstis proksimume: “Estimata zozo, zoze zozinte vian zozon de la 3-a de aprilo, mi zozas tujan prizozon de alia zozajo”.

Feliĉe, la zoza periodo de Esperanto daŭris nur du monatojn. La kompatinda forĵetita regulo de Fundamento petveturis al la fora sanatorio de d-ro Lavojo. Kiam la resaniĝanta prezidanto de la Akademio ekvidis f-inon Regulaŭ, li preskaŭ sufokiĝis:

— Kio? Vi ĉi tie? Sola? Kie estas viaj kunulinoj?

F-ino Regulaŭ murmuris:

— Ili eksigis min.

La prezidanto demetis sian pijamon, surmetis sian akademian uniformon, kaptis valizon per la maldekstra mano, f-inon Regulaŭ per la dekstra mano kaj galopis al la stacidomo.

Dumvojaĝe li petis de ŝi detalan raporton pri la katastrofa situacio. Liaj okuloj fulmis, kaj li senĉese grumblis:

— Oni vere ne rajtas malsaniĝi. Ha, idiotinoj! Ha, perfidaj porkinoj!¹¹

La kunveno en la granda salono de la Fundamento restos por ĉiam unu el la plej tumultaj momentoj en nia historio. La prezidanta voĉo tondris kaj tremigis la murojn. Zozo kaŝis sin malantaŭ la hontoplenaj, teruritaj, plorgemantaj reguloj kaj provis piedpinte eskapi merititan punon, sed d-ro Lavojo haltigis ŝin:

— Vi! Jes, vi! Alproksimiĝu!

Zozo paliĝis.

— Vi profitis mian maleston por konfuzi la harmonian aranĝon de nia Esperanto. Fi al vi! Tuj malaperu!¹² aŭ vi ricevos piedbaton sur vian, sur vian...

Ŝi nesage balbutis:

— Sur mian zozon?

Kun ruĝa vizaĝo li furioze blekis plengorĝe:

— Sur vian postajon!

Zozo forkuris. La Lingvo Internacia iom post iom reakiris sian kutiman klarecon. Okaze de la Librotago¹³ oni ĵetis en grandan ĝojofajron ĉiujn ekzemplerojn de la falsa Fundamento, krom unu, kiun pie konservas la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

Fabeloj de la verda Pigo, kolektitaj de Louis Beaucaire. — Antverpeno — La Laguna, 1981, p. 83-91.
Mallongigita.

— La nomo de Louis Beaucaire estas vaste konata en Esperantujo. Krom “Fabeloj de la verda Pigo”, li publikigis du librojn: “Kruko kaj Baniko el Bervalo” kaj

“El la vivo de Bervalo sentaŭgulo” (Bervalo estas imagita urbo, Kruko kaj Baniko estas bervalanoj). La unua entenas anekdotojn, la dua — novelojn. Kaj tio kaj alio estas spritaj, ne tute decaj (sed ne vulgaraĵoj) historietoj, verkitaj per brila lingvaĵo, la eventoj ofte okazas sur Esperanta fono. Mi konatigis kaj amikiĝis kun Beaucaire dum la Universala Kongreso en Antverpeno. Li evidentiĝis tute deca persono, afabla kaj vivoĝoja — vera franco. Li diris, ke en lia tablo kuŝas manuskripto de nova libro. Ve, nia amikeco daŭris nelonge, ĉar baldaŭ li forpasis.



— En nia konscio Bulgario kaj Esperanto estas firme ligitaj. Nadija Andrianova, kiu hodiaŭ ĉeestas nian kun-

venon, deklamos sian versaĵon, dediĉitan al ambaŭ tiuj temoj.

Nadija Andrianova

REMOMORO PRI VARNA KONGRESO¹⁴

Serpentumas la vojo montara,
nudaj rokoj alkuras al voj'.
Jen alternas la strio arbara.
Kaj ekkantas la koro pro ĝoj'.

Kara lando bulgara, gefrata,
ree vidas mi vin en real'.
Aridetas homgrupo surstrata,
konturiĝas Balkan'¹⁵ en vual'.

Jam postrestas belega Sofio,
“Oraj pontoj” kaj Vitoŝa-mont'¹⁶.
La plej festa, agrabla ferio —
Esperanta Kongres' de l' tutmond'.

“Verda land”¹⁷, “Bastion' Esperanta” —
nomas vin tuta mond', Bulgari'.
Brila pruvo — Kongreso giganta,
alta pint' en Movad-histori'.

Tiujn tagojn forgesi ne eblos,
restos ili en kor' kaj memor',
dum la longaj jardekoj videblos —
ĝis la lasta malĝoja vivhor'.

Nadija Hordijenko-Andrianova. Vagante tra la mondo maltrankvila. — Budapeŝt, 1987, p. 27.

— En la kluba kunveno, kiu okazos la 26-an de aŭgusto, ni seminarios pri metodoj de instruado de Esperanto, spektos amatorajn kinofilmojn pri la ĵusaj

someraj Esperanto-tendaroj kaj akceptos gastojn el Rumanio.

KOMENTARO

1. Librotenado — dokumentado de financaj operacioj.
2. Louis Beacaire /Luí Bokér/ (1925-1983). Franco, dum multaj jaroj loĝinta en Okcidenta Berlino, kie li estris francan librejon. Esperantistigis en 1941.
3. Vidu la komenton 23 en la leciono 1.
4. F-ino — fraŭlino.
5. Aludo al la versaĵo de Zamenhof "La vojo" (leciono 15). S-ro — sinjoro. D-ro — doktoro.
6. Pri la Akademio de Esperanto vidu la komenton 3 en la leciono 14.
7. Interjekcioj estas ekkrioj, kiuj esprimas sentojn. Jen la listo de multaj interjekcioj: aĉ! (malkontento), aĥ! (miro aŭ bedaŭro), aha! (ekrimarko de io), aj! (subita sufero aŭ tre viva ĝojo), ba! (nekredemo), brr! (frostiĝo aŭ abomeno), ĉit! (silentigo), eh! (alvoko de atento; bedaŭro, riproĉo), ehe! (ekkompeno), ej! (dubito aŭ milda malaprobo), ek! (alvoko al komenco de ago), fi! (naŭzo aŭ mallaŭdo), fu! (laciĝo), ha! (ekmiro), ha ha! (kompreno, viva doloro, ironio, rido), ha lo! (telefona alvoko), he! (alvoko de atento aŭ ironia kontraŭdiro), hm! (dubo, pripensemo), ho! (viveco de sento), ho-la! (alvoko de atento), hop! (subita salto), hu! (ektimo aŭ tediĝo), hot! (antaŭenirigo de ĉevalo), huj! (subita sufero), hura! (tre viva ĝojo kaj aprobo), nu! (instigo al parolo), nu-nu (miro aŭ dubo), ol! (viveco de sento), oj! (bedaŭro aŭ subita sufero), ts! (silentigo), ve! (bedaŭro, doloro).
8. Jokero — kroma ludkarto, ofte senemblema, konsiderata kiel laŭvola anstataŭaĵo de ajna ludkarto.
9. Vidu la komenton 1 en la leciono 10.
10. Vidu la komenton 21 en la leciono 1. En Esperanto ekzistas proverbo "Tio estas por mi volapukaĵo".
11. Ŝajnas, ke lia prezidanta moŝto estas bonega konanto de Esperantaj insultoj. "Insultoj estas vortoj, uzecblaj por ofende alparoli homon aŭ ofende priskribi

ajon aŭ situacion" (Renato Corsetti). Ni pliriĉigu la vortaron de s-ro d-ro Lavojo per iom da insultoj por ofende alparoli homon: aĉulo, fiaĉulo, fi-homo (kontraŭ homo pro fizika aŭ morala malboneco), arogantulo (pro troa memfido), azeno, fojnkapulo, kreteno, malsaĝulo, sencerbulo, stultulo, ŝtipo (pro stulteco), babilulo (pro troa parolemo), bandito (pro rabemo, eksteleĝaj agoj), besto (pro krudeco, malklereco, stulteco), bird-timigilo (pro ĝeneco, tedemo, malbelega aspekto), bruto (pro krueleco), ĉarlatano (pro trompado de la publiko), ĉiesulino, putino (kontraŭ virino pro malmorala konduto), faŝisto (pro reakciaj politikaj ideoj), fi-lertulo (pro trompemo), fiulo (pro fia konduto), frenezulo (pro neracio), fripono (pro ruza trompemo, malico), fuŝulo, sentaŭgulo (pro malkapablo), huligano (pro kontraŭsocia konduto), hundaĉo (pro fienco), kanajlo (pro malnobla friponeco), klaĉulo (pro disbabilado pri aliaj homoj), monstro (pro malbeleco, krueleco), murdisto (pro krueleco, krimeco), naŭzulo (pro naŭzeco), parazito (pro paraziteco, fienco), rabisto (pro krimaj agoj), ruzulo (pro ruza elturniĝemo), serpento (pro malico, perfidemo), ŝovinisto (pro troa glorado de sia popolo), volapugisto (ŝerca insulto kontraŭ homo pro ties stulteco, kombino de volapukisto kaj pugo). Nu jen, vi fariĝis fakulo pri insultoj. Se, tamen, ili al vi ne sufiĉas aŭ estas tro molaj aŭ tro malmolaj, vi povas fantazii kaj elpensi novajn insultojn aŭ uzi la universalan vorton "zozo".

12. Tiel kompetenta konanto de Lingvo Internacia, kiel prezidanto de la Akademio de Esperanto, povus espimi sin pli bildece: Iru al la diablo! For! Putru for! Forlavu vin! Forbalau vin! Forblovu vin! Ruliĝu! Ruliĝu kolbase! Eĉ viaodoro ne estu ĉi tie! Dissaltu kiel obstinaj baroj de miljaroj! (aludo al la versaĵo de Zamenhof "La espero").

13. La 15-a de decembro, la tago de naskiĝo de Ludoviko Zamenhof, estas konsiderata ankaŭ la Tago de Esperanta libro. Estas bona okazo por aĉeti aŭ donaci bonan Esperantan libron, pridiskuti literaturajn novaĵojn. En la historio pri Zozo la Librotago estis uzita por tute alia, unika ago.

14. La 63-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Varna somere de 1978 kun ĉirkaŭ 4500 partoprenintoj. Inter ili estis multaj sovetianoj, atendantaj kun espero baldaŭan kreiĝon de ASE.

15. Balkanoj — montaro en Bulgario.

16. Sur la monto Vitoŝa apud Sofio estas kelkaj ŝtonaj riveroj, la plej bela el ili havas la nomon "La oraj pontoj".

17. Kvankam Bulgario estas vere tre verda lando, ĉi tie estas aludo pri amasa bulgara Esperanto-movado.

LINGVA PRAKTIKO

Priservado laŭ la japana maniero

1. Imagu, ke vi troviĝas en Japanio turiste. Prezentu scenetojn, kiel vi estas priservata en diversaj lokoj.

2. Imagu, ke vi estas direktoro de granda, moderna Internacia Esperanto-Centro, kiu inkluzivas hotelon, lernejon, bibliotekon, presejon, restoracion, magazenojn, banejon, basenon, dancejon, monŝangejon, trafikajn kasojn, bufedojn, kinosalonon, kuracejon, riparejojn ktp. Kompreneble, ĉie estas uzata nur Esperanto. Priskribu la nivelon de servoj, kiun vi subtenas.

IEMW: la universala biblioteko de Esperanto

3. Imagu, ke vi ekskursas en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, faras demandojn kaj ricevas respondojn de ties direktoro.

Zozo, la dek-sepa regulo de la Fundamento

4. Trovu ĉiujn verbojn kaj adjektivojn, kiuj karakterizas la Regulojn kiel vivajn estaĵojn.

5. Trovu en la teksto la leteron kun uzo de zozaj vortoj. Provu doni kelkajn variantojn de tiu letero, ans-tataŭiginte zozajn vortojn per plensencaj vortoj.

6. Trovu la antitezon pri Esperanto kaj Volapük.

7. Ĉu Esperanto povas evolui, se ĝia Fundamento estas neŝangebla?

8. Laŭ la enhavo de la novelo, verku scenaron por animitaj filmbildaroj.

Rememoro pri Varna kongreso

9. Kiujn detalojn el sia vojaĝo rememoras la aŭtorino? Kial Esperanto-kongreso forte efikas al la sentoj?

10. Trovu en la tekstoj de la leciono la vortojn kun la sufiksoj *-ant-*, *-int-*, *-ont-*. Formu surbaze de taŭgaj vortoj el la tekstoj vortojn, finiĝantajn per *-anto*.

11. Elektu vorto(j)n laŭ via plaĉo:

Aperas (diligento, atento, invento, sento, konsento, silento, prudento, argumento, serpento), kiam pasis la momento. Por sia (laboro, memoro, humoro, oro, traktoro, ploro, koridoro) ĉiu estas sinjoro. Li komprenas predikon, kiel bovo (logikon, publikon, teknikon, grammatikon, fizikon, matematikon, muzikon, politikon, retorikon, lirikon, Ludovikon). Se la edzino (telefonas, bastonas, demonas, ordonas, kanonas, friponas, fanfaronas, admonas, violonas), la domo ordon ne konas. Ricevis (parazito, elito, bandito, rabito) laŭ sia merito.

12. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Afero — ofero — oferto, priskribi — preskribi, premo — premio — premiso, cirko — cirklo — ciklo — cirkulo, idioto — idiotismo.

13. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kio estas PVZ?

b) Kie troviĝas Internacia Esperanto-Muzeo? Kiam ĝi estis fondita?

c) Kiujn librojn verkis Louis Beaucaire?

ĉ) Kiom da reguloj havas la Fundamento?

d) Kiel tekstas la naŭa regulo de la Fundamento?

Ĉu, eble, vi hazarde scias, kiel tekstas la unua regulo? En kvizo dum iu Universala Kongreso neniu povis respondi tiun demandon.

e) Kiam kaj kiel estas celebrata la Tago de Esperanta libro?

f) Kiu grava esperantista arango okazis en Varna en 1978?

14. Temo por diskuto aŭ rakonto: Li estas preskaŭ mia frato: nepo de kuzo de onklo de konato.

15. Klačante pri via najbar(in)o, rakontu pri li/si la plej nekredeblajn aferojn.

16. Rakontu gajan anekdoton. Se vi havas sufiĉan rezervon da anekdotoj, vi povas rakonti ilin en ĉiu leciono. Penu laŭeble doni al anekdotoj Esperantan fonon.

LECIONO 18

— En nia klubo gastas hungara geofizikisto András Lukacs (Ándraŝ Lúkaĉ). Ni petis lin rakonti pri tiu scienco.

APLIKATA GEOFIZIKO

Geofiziko estas scienco pri la fizikaj fenomenoj kaj procezoj sur la tuta Tero kaj ene de ĝi. Ĉi tie temas nur pri tiu parto de tiu ĉi vastega scienco, kiu okupiĝas pri la terkrusto.

La metodoj de aplikata geofiziko baziĝas sur la studado de fizikaj kampoj (gravita, magneta, elektra, temperatura kampoj kaj tiuj de elastaj vibradoj kaj nukleaj emisioj) sur la surfaco de la Tero, super tiu surfaco, krome en borajoj (aŭ bor-truoj), minejoj kaj en la maroj. Tiuj ĉi metodoj estas uzataj por diversaj celoj: esplorado de kuŝejoj de nafto kaj tergaso, determinado de proprecoj de erc- aŭ karbo-kuŝejoj, mapado de subteraj akvoj, pristudado de tektonikaj procezoj, solvado de medio-protektaj problemoj ktp. Ni mallonge trarigardu la ĉefajn metodojn de geofizika esplorado.

Ekzamenante la gravitan kampon de la Tero en diversaj lokoj, oni ricevas informojn pri la distribuiteco de masoj kun malsama denseco en la terkrusto. Ekzemple, per *gravita esplorado* oni povas trovi gravitan anomalion, kiu indikas la ĉeston de kupro-ercio pli densa ol la ĉirkaŭantaj ĝin rokajoj.

Jam de pluraj jarcentoj la homoj scias pri la "stranga" konduto de la magneta kompasoj apud erckuŝejoj. Kompreneble, en *magneta esplorado* oni uzas ege sensivajn kaj precizajn mezurilojn por detekti magnetajn anomaliajn.

La elektrokonduktanco (aŭ rezistanco) de la diversaj rokajoj ege diferencas unu de la alia, depende de la kemia konsisto, fizika stato kaj aliaj parametroj de la koncerna rokajo. Guste tiun ĉi fenomenon utiligas la

elektra esplorado, kiu baziĝas sur la studado de naturaj kaj artefaritaj elektromagnetaj kampoj.

La aplikado de la *sisma esplorado* baziĝas sur la studado de la disvastiĝo de artefarite ekscititaj ondoj en la terkrusto. El la ekscitpunkto la ondoj disvastiĝas ĉiudirekten kaj reflektiĝas aŭ refraktiĝas sur diversaj malhomogenaĵoj. Sekve de tiu ĉi fenomeno la elastaj ondoj parte revenas al la tersurfaco, kie oni povas registri ilin helpe de specialaj instrumentoj. Determininte la tempon de la propagiĝo de la ondoj kaj la karakteron de la vibrado de la grundo, oni konkludas pri la profundo, formo kaj kelkfoje eĉ pri la konsisto de la geologiaj formacioj.

La natura radioaktiveco de multaj rokaĵoj kaj ankaŭ la ebleco fari multajn esplorojn helpe de artefarita radioaktiveco ebligas evoluigon de la *nuklea geofiziko*. Ekzemple, mezurante per registriroj la gama-radiadon de la plej supraj tavoloj de la terkrusto, geofizikistoj povas riveli koncentriĝojn de utilaj mineraloj.

Pro tio ke preni provpecojn el boraĵoj estas tre malfacila kaj multekosta afero, kaj ankaŭ por ricevi gravajn kromajn informojn pri la proprecoj de la terkrusto apud la koncerna boraĵo, oni preskaŭ ĉiam uzas ankaŭ geofizikajn metodojn en la boraĵoj. La *boraĵa geofiziko* utiligas ĉiujn fizikajn kampojn, menciitajn supre, sed, nature, en iom modifita maniero.

András Lukacs. Ekipite per la plej moderna tekniko (Aplikata geofiziko). // Endre Dudich. Ĉu vi konas la Teron? — Budapest, 1983, p. 107-117. Mallongigita.

— Hodiaŭ ni okupiĝos pri diversaj aspektoj de tradukado. Unue ni konatiĝu kun malfacila laboro de interpretisto, buŝa tradukisto.

István Nemere

LA INTERPRETISTO

Oni alvenis por li je la sesa frumatene. Eĉ en la aŭtomobilo li plu dormis. La mateno estis decembra, nebul-neĝa.

Tra la arbaro kondukis vojo kavoplena. Malantaŭ li la viroj silentis kun duraj vizaĝoj. La ŝoforo estis juna, li kredis, ke ĉiujn kavojn eblas transsalti perrade. La veturilo ĝemis. Jam heliĝis, la arboj staris silente.

Kiel palaceto en fabelo, la ĉasista domo kaŝstaris en valo. De sur la tegmento preskaŭ defluis la neĝo. La fenestroj varmlume flavis malproksimen. Apude etaj punktoj — pelantoj kaj ĉasistoj.

Antaŭ la enirejo longa, plata veturilo kvazaŭ enmergiĝis en la neĝon. "La niaj jam alvenis" — diris iu viro ŝajniganta gravulon, kun nigra kravato. Vere, li ekvidis kelkajn vizaĝojn, konatajn el televido. Manpremoj, seninterese demando: "Jes, vi estas nia interpretisto...?"

Poste motorbruo, novaj nigraj veturiloj. Unue elsaltadis la korpardistoj, kaj iu el ili elŝiris¹ la pordojn de la plej longa aŭtomobilo. Elpaŝis la Fremdulo, kun ride-to frostinta sur la vizaĝo; li disdonis siajn manpremojn. Ankaŭ li ricevis tion. "Mi estas via interpretisto, sinjoro". "Bonege. Ni eniru, ĉi tie malvarmas".

En la salono atendis ilin la matenmango. Salmo, kapreolviando, konjako, vinoj. Li mangis malmulte, oni sidigis lin apud la Fremdulon, konstante li devis traduki; toŝtoj, festparoloj, ŝercoj, konsiloj. Vetero, ĉasbestoj, neĝo, spuroj, ĉasistoj, armiloj. Kelkfoje ĉiuj vizaĝoj ĉirkaŭ la longa tablo turniĝis al li. Krono de vizaĝoj. El lia buŝo rapide elfluis la vortoj en ambaŭ lingvoj.

Poste ĉiuj veturis al la valo, li ricevis sian lokon apud la Fremdulo, kune kun la ĉefarbaristo. Li ne spertis pri ĉasado, sed sciis: en la arbaro certe tiu ĉi estas la plej bona ĉasluko. Du korpardistoj restis tie; kun elstaraj mentonoj, dikaj femuroj ili staris, unu mano ĉiam en poŝo, tiel ili observis la arbaron.

Li sentis malvarmon. La Fremdulo parolis malmulte, li aŭskultis la proksimiĝantajn bruojn. Iom poste vulpo saltis el inter la arboj, la ĉefarbaristo montris ĝin per etendita brako. La Fremdulo kaptis sian fusilon, sed la vulpo malaperis inter la arbustoj. Ili ankoraŭ foje vidis la ruĝiĝantan hararon, ĝis ĝi malaperis definitive. La ĉefarbaristo malkontente lipmienis.

Post iom da tempo ekaperis apro. La Fremdulo pafis, la besto, vundita, stertoranta, glitis al ili. La interpretisto senvole paŝis malantaŭen. La Fremdulo turnis sin, kaj la fusilono donis al la ĉefarbaristo.

La ĉasado finiĝis posttagmeze. La aprojn oni ĵetis sur ŝargaŭtomobilojn. En la brilanta, plata aŭtomobilo estis varme, la ŝoforo portis blankan ĉemizon.

En la ĉasdomo oni jam altabligris la tagmanĝon. El la kuirejo flugetisodoro de sovaĝviando, knabinetoj en popvestoj alportis florojn. Manpremoj, protokolkiseto, fotobrilumoj. Ĉiam pli multe da viando, kaviaro, trinkaĵoj. La interpretisto apenaŭ trinkis.

Multaj turnis sin al li: "Bonvolu demandi nian gaston...", "Mia demando al sinjoro prezidanto: kion li opinias pri la problemoj de inflacio...", "La rolo de internaciaj monopolfirmaoj...", "La sindikatoj... La volo de laborista klaso... ĝiaj aspiroj..."

Ekstere jam malheliĝis. En la salono oni disdonadis donacaĵojn, manpremojn, nenio-ridetojn, nenio-promesojn. Vigladis la ĉefo de protokolo, la korpgardistoj melankolie manĝadis en la apuda ĉambro, sed la interan pardonon ili tenis malfermita. En la kuirejo silente kuŝis la aproj, iliaj rigidaj piedoj krutis al la malhelo.

Poste la adiaŭvortoj. La fotografistoj brillumadis, iu ŝovis longan stangetmikrofonon sub la nazojn de la granduloj. Lastaj manpremoj, "Mi dankas... dankas...". Ankaŭ mi. La Fremdulo eniris la aŭtomobilon, eklumis la reflektorojn, korpgardistoj tumultis, fine ili ĉiuj malaperis. La Fremdulo ankoraŭ mansvingis malantaŭ la kirasita vitro. Morgaŭ samtiel li faros al televidkameroj en la flughaveno.

Kaj denove alvenas la aŭtomobilo de arbaristoj; kun laca ŝoforo, kiu enveturos en ĉiujn kavojn. Malrapide li forlasas la arbaron. En la lumo de la reflektoroj la interpretisto vidas leporojn — timegante ili fuĝas antaŭ la veturilo. "Almenaŭ ĉi tiuj restis vivantaj" — li pensas, la kapo zumas, fermiĝas la okuloj. Morgaŭ mi devos prezenti la fakturon — li pensas ankoraŭ, lace, kaj endormiĝas en la rapideganta aŭtomobilo.

István Nemere. La naŭa kanalo. —
Budapest, 1981, p. 28-29.

— Konata bildo. Ankaŭ en nia lando en la periodo de stagnado (tiel oni nomas la ruinigon de la lando sub gvido de Brejnev) prosperis tiaj ĉasadoj. Onidire, ne plu. Eble.

— Kvankam en niaj kunvenoj ni konatiĝas kun verkoj, kreitaj originale en Esperanto, oni ne devas neglekti la tradukadon. Do por la komenco iom da konsiloj, kiujn donas sperta tradukisto de Esperanto-literaturo el Hispanio Fernando de Diego.

KONSILOJ PRI TRADUKADO

En sia bela kaj instrua eseo "La traduk-arto" War-inghien² donas tre bonajn regulojn al la tradukontoj. Unue, kompreni la tradukotaĵon, al kio li aldonas la jenan korolarion: antaŭ ol traduki tekston, havigu al vi fidindan eldonon de ĝi, se eble kun notoj kaj komentoj, kaj la necesajn laborilojn (gramatiko, filologia vortaro), kiuj ebligas al vi trovi la ĝustan sencion de la malfacilaj lokoj. Due, povoscii Esperanton, kun la korolario: neniam publikigu tradukon, kiun vi ne kontroligis per klera alilingva esperantisto. Trie: traduki ne la vortojn, sed la sencan, kun la korolario: por elprovi viajn fortojn, traduku pecojn jam tradukitajn de famaj esperantistoj kaj komparu, detalon post detalo, vian laboron kun ilia verko: nur per imito akriĝas kvalito!

Mi kuraĝas aldoni: se la tradukotaĵo aperis jam en aliaj lingvoj, kaj la tradukonto scipovas ankaŭ ilin, li havigu al si la koncernajn tradukojn. La atenta komparo de la originalo kun aliaj nacilingvaj versioj donas la senkomparan avantaĝon analizi ĉiun vorton, esprimon kaj frazon de la originalo tra la prismo de tri aŭ kvar diversaj interpretoj. Kaj tiel okazas, ke, kio en la originalo ŝajnas netradukebla parolturno, tio trovas feliĉan — esperantigeblan — solvon en unu aŭ alia el la naciaj tradukoj.

Tia komparo de la originalo kun ties diverslingvaj tradukoj tre utilas koncerne la sencan fidelecon kaj la redonon de aparte malfacilaj parolturnoj. Sed aliaj ele-

mentoj pure formalaj, apartenantaj al la stilistiko, devas esti traktataj laŭ nur originalo. Sekvi ankaŭ ĉi-rilate la ritmon aŭ kadencon de stilo de la aliaj nacilingvaj tradukoj estus erare, ĉar en bona Esperanta traduko devas reflektiĝi ne nur la atmosfero psikologia kaj idea de la originala verko, sed kiom estas eble en nia lingvo, ankaŭ ĝia fizika korpo kaj ties diversaj proporcioj kaj materialaj kvalitoj.

Bona tradukanto devas speciale atenti la feblajn punktojn de la Esperanta stilistiko por laŭeble ne peki per ili. Por ekzemplo, oni klopodu eviti la uzon de *esti*. Ekzistas diversaj rimedoj: uzi anstataŭe aliaj sinonimojn: stari, sidi, kuŝi, troviĝi, stati, situi...; ekzili la kompleksajn verboformojn kaj utiligi ilin nur en okazo de ekstrema neceso; rekte verbigi substantivojn kaj adjektivojn... Ne malofte la simpla ŝanĝo de *esti* al aliaj formoj donas al la teksto surprizan fluon kaj vivantecon.

Kiel ajn oni verŝu el la diversaj lingvoj en Esperanton, oni ĉiam memoru, ke nia lingvo, pro sia aspiro fariĝi tutmonda interkomprenilo, devas esti, antaŭ ĉio, klara kaj elasta.

Fernando de Diego. Pri Esperanta tradukarto. — Saarbrücken, 1979, p. 54-57. Mallongigita fragmento.

— Mi deziras aldoni, ke en la tradukoj oni evitu akumuliĝon de la sama prepozicio, precipe de la prepozicio “de”.

— Kiel ni vidas el tiuj konsiloj, tradukado estas nefacila laboro kaj eĉ arto. Do oni ne devas rilati al ĝi facilanime. Precipe malfacila tasko estas traduki poezion. Por ilustriti tion, ni prenu kvin tradukojn de la sama fragmento el la fama vers-romano “Eŭgeno Onegin”.

Aleksandro Puŝkin

EŬGENO ONEGIN

(la unua strofo)

“Nu, mia onklo agis sprite,
tuj, kiam ekmalsanis li,
li min servigis senevite,
elpensi li ne povis pli;
Ekzemplo estas tre instrua,
Sed, dio, kia trud’ enua
nun flegi lin en ĉiu hor’
sen eblo paŝon fari for!
Ho kia fia hont-malico
mortanton agrabligi jen,
jen zorgi flate pri kusen’
kaj pri medikament’ laŭ vico
kun pens’ sekreta sen afabl’:
Ho, kiam prenos vin diabl’!”

Tradukis Nikolaj Nekrasov, 1931.

“Ĝentilas multe onklo mia,
se li malsanas en danger’ —
min respektigas ago tia,
laŭdinda estas la afer’.
Respekton mi sendube kredas,
sed, mia Dio, kiom tedas
kun malsanulo sid-deĵor’
en taga kaj en nokta hor’!
Kaj kia estas stult-mizero
amuzi lin en hipokrit’,
prizorgi pri kusen’ kaj lit’,
kuracon helpi kun tolero,
kaj pensi en koler-obstin’:
Forprenu la diablo vin!”

Tradukis Sergej Rublov, 1964.

“La onklo, honestul’ modela,
trafinte liton en turment’,
min damnis al respekt’ fidela
kaj pli ne havis da invent’.
Aliajn servu ĉi instruo;
Sed, dio mia, jen enuo:
dejori apud invalid’
sen paŝo for de lia lit’!
La duonvivan flegi, distri
kanajla estas ja malic’,
medikamenti lin laŭ vic’,
kusenojn triste administri,
sed kaŝe pensi en sufer’:
Do kiam prenos vin infer’!”

Tradukis Isaak Ĥoves, 1968.

“La onklo — mem honestegulo,
malsaniĝinte en serioz’,
min igis sia obeulo,
ne atendente pri kurioz’.
Edifas lia leciono,
sed Dio! Kia monotona
tagnoktoj sidi ĉe dejor’,
sen povi paŝon fari for...
Malico kia fimalnobla —
amuzo de duonmortant’,
kusenpufigo en konstant’,
gutado de mikstur’ multobla
kun grumblo en enu’ sen son’:
Ĉu baldaŭ prenos vin demon’!”

Tradukis Nikolaj Danovskij, 1986.

“Bon-moras ege onklo mia:
dum lit-katenis lin malsan’,
li venis al ide’ genia —
respektu lin la tuta klan’!
Ekzemplo lia tre instrua;
sed, dio!, kia dev’ enua:
sidaĉi apud malsanul’
dum tagoj-noktoj sen kalkul’!
Ho, fias ĉi kondukt’ insida —
duonkadavron distri jen,
jen pri pocioj kaj kusen’
zorgadi kun mien’ acida
suspiri, pensi en spontan’:
Do, kiam prenos vin satan’!”

Tradukis Boris Kolker, 1990.

— Bonvolu rigardi la ekspozicion de verkoj de Puŝkin en Esperantaj tradukoj.

— Morgaŭ ekfunkcios Esperanto-kurso por komecantoj. Ĝi okazos dufoje en semajno.

— En la sekva merkreda kunveno okazos konsultiĝo por tiuj, kiuj prepariĝas al la instru-rajta ekzameno. Ni ankaŭ spektos videofilmon pri San-Marino. Ĝin faris niaj klubanoj, kiam ili vizitis tiun miniaturan landon okaze de la lasta sesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino (AIS), kies laborlingvo estas Esperanto.

KOMENTARO

1. Ĉi tie: malfermis ŝire, per abrupta movo.
2. Waringhien /Varengjén/ — vidu la komenton 3 en la leciono 21.

LINGVA PRAKTIKO

Aplikata geofiziko

1. Trovu en la teksto terminojn de geofiziko, geologio kaj fiziko kaj donu, laŭeble, iliajn difinojn.

La interpretisto

2. Trovu la leksikon, kiu emfazas oficialecon de ĉio, kio okazas en la rakonto.

3. Trovu la leksikon, kiu montras luksecon de la priksribita aranĝo.

4. Rakontu la enhavon de la teksto en la nomo de la Fremdulo.

Konsiloj pri tradukado

5. Listigu konsilojn pri tradukado; aldonu, laŭeble, viajn proprajn konsilojn.

Eŭgeno Onegin

6. Zorge komparu la tradukojn inter si (se eble, ankaŭ kun la originalo aŭ nacilingva traduko), trovu trafajn kaj maltrafajn lokojn, proponu pli bonajn (laŭ vi) variantojn.

7. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj:

Mezurilo, lumilo, balailo, pafilo, fusilo, ŝtopilo, tondilo, voĉdonilo, aliĝilo, komputilo, babilo, frizilo, fajrilo, dormigilo, krokodilo, reflektilo, rivelilo, analizilo, glitilo.

8. Al la frazpecoj en la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu kapon posedas,

Kiu komencis kuiri,

Kiu konstante lokon ŝanĝas,

Kiu levis la piedon,

Kiu ludas kun koto,

devas ekpaŝi.

kombilon trovos.

malpurigas la manojn.

tiu ne forkuru de l' fajro.

neniam sin aranĝas.

9. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Verŝo — verso — versio, kapro — kapreolo, detekto — detektivo, glui — gluti — gliti, stagno — stango — stando.

10. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kiu versromano de fama rusa poeto estas tradukita en Esperanton?

b) Kio estas AIS?

c) Diru la nomon de sperta tradukisto de Esperanto-literaturo el Hispanio.

11. Temo por diskuto aŭ rakonto: Okazon kaptu ĉe l' kapo, ĉar la vosto estas glita.

12. Rakontu pri via fako (profesio) aŭ pri temo, kiu vin precipe interesas.

LECIONO 19

— La hodiaŭan kunvenon ni komencas per aŭskulto de magnetofona registraĵo kun samtempa interpreto en Esperanton. La intervjuon prenis kaj registris magnetofone Vladimiro Suñoj.

ALBERT EINSTEIN¹ PER LA OKULOJ DE PROKSIMULO

En la usona urbo Prinston, kie vivis kaj laboris Albert Einstein¹, estas domo, en kiu estas kolektita preskaŭ ĉio verkita de li kaj pri li. Fotoj de la sciencisto pendas sur ĉiuj muroj. La mastrino de tiu domo Lilia Kaler dum la lastaj 15 jaroj de Einstein estis lia granda amiko, helpis al li pri lia vasta korespondado.

— *Kiam kaj kie vi konatiĝis kun Albert Einstein?*

— Fugante de la naziismo, en 1939 mi venis en Usonon el Germanio. De tempo al tempo en nia hejmo oni aranĝis amikajn vesperojn. Dum unu el ili mi konatiĝis kun Albert Einstein. Tio okazis aŭtune de la jaro 1939.

— *Kia restis en via memoro la 6-a de aŭgusto de la jaro 1945 — la tago de la Hiroŝima atoma tragedio?*


— En la jaro 1939 Einstein skribis leteron al Roosevelt², kiu poste kreis specialan komitaton. Ili tre timis, ke la germanoj sukcesos krei la atoman bombon. La 6-an de aŭgusto de la jaro 1945 ni aĉetis ĵurnalon kaj eksciis la ŝokan novaĵon pri tio, ke la atombombo estas faligita sur Hiroŝimon. La 8-an de aŭgusto mia edzo leteris al Einstein: “La atombombo eksplodigis nian ĉitician idilian vivon. Tage kaj nokte ni estas en terura ekscitiĝo, kiu obsedas ĉe la nura penso, ke tia bombo estas nun donita en homajn manojn”.

— *Interalie, kiel Einstein rilatis al leteroj, kiujn li ricevadis en neimageblaj kvantoj? Mi iam legis, ke la granda sciencisto penis respondi ĉiujn leterojn.*

— Tio sendube estas legendo. La nuro, kion mi scias ĝuste, estas, ke Einstein ĉiam respondis leterojn de infanoj.

— *Ĉu vi parolis kun Einstein pri la teorio de relativeco?*

— Foje li komencis klarigi al mi la teorion de relativeco, uzante la analogiojn kun lifto kaj vagonaro, sed ĉio ĉi estis ne por mia menso, ĉar, kiel mi opinias, nur trejnita menso de fizikisto povas efektive percepti la teorion de Einstein.



— *Ĉiuj samopinias, ke Einstein estis ne nur granda sciencisto, sed ankaŭ brila, neordinara persono. Ĉu vi konsentas?*

— Jes, li estis neordinara persono. Li estis konata ne nur kiel tutmonde fama sciencisto, sed ankaŭ kiel bonkora, milda, singena homo. Foje preterpasanto, haltiginta Einstein-on surstrate, demandis lin: “Profesoro, ĉu vere tiu ĉi mondo estas destinita pereji en la estonta atoma milito?” Einstein respondis: “Tio estus tre domaĝa, ĉar ni perdis eblon aŭskulti Mozart-on³”. (Einstein tre ŝatis muzikon, la violonludo estis por li grandega plezuro).

— *Oni scias, ke Einstein estis tute senpretenda al sia vestaro. Multaj memoras lin ne en gladita ĉemizo kun kravato, sed en kotona svetero...*

— ... kiu estis aĉetita por li ĝuste de mi. Mi sciis, ke li malŝategas lanon. Mi venis en armean butikon kaj aĉetis por li malhelbluan sveteron el pura kotono. Li tiom kutimiĝis al ĝi, ke portis ĝin dum tutaj semajnoj. Tia li estas sur multaj fotoj.

— *Kaj kiel Einstein rilatis al gloro?*

— Trankvile. Li simple penis ne rimarki ĝin. Sed, aliflanke, se li komprenis, ke lia fameco, lia aŭtoritato povas almenaŭ iom helpi al la alia, li agis sen heziti eĉ minuton. Li skribis rekomendajn leterojn, subtenis novajn iniciatojn⁴.

— *Bonvolu rakonti pri la lastaj tagoj de Einstein.*

— La lastaj tagoj de Einstein plenplenis de batalo por la paco. Tio ne estas pompa frazo, tio estas vero. Li neniam pensis, ke lia formulo trovos tian tragikan aplikon. Mi memoras, kiel li diris al mia edzo: “Ekde tiu tempo, kiam mi skribis al Roosevelt, mia mano flamas kvazaŭ en fajro”. En la jaro 1955 Einstein subskribis la alvokon de Bertran Russel⁵ — la alvokon, kiu iniciatis la movadon de sciencistoj por la paco.

Kiam Einstein mortis, en unu el usonaj ĵurnaloj aperis desegnaĵo de nia planedo Tero, ŝvebanta en spaco de la kosmo, kun subskribo: “Tie ĉi vivis Albert Einstein”.

V. Suŝoj. Zatvornik iz Prinstona.
Albert Ejnŝtejn glazami blizkovo jemu ĉeloveka. //
Pravda, 16.06.1989.
Mallongigita traduko.

— En kelkaj kunvenoj ni parolis pri elementoj de stilistiko. Ankaŭ la nuna temo iomgrade rilatas la stilistikon.

Atanas Atanasov⁶

SINONIMOJ EN ESPERANTO

Ĉiu, kiu konas Esperanton kaj uzas ĝin, scias kaj sentas, ke al ĝi ne mankas sinonimoj — ili donas eblojn por nuancataj kaj subtilaj esprimoj. En certa direkto, precipe dank’ al afiksoj, Esperanto povas disponigi tre multajn sinonimojn kun specialaj nuancoj:

akceli — aktivigi — agigi — kuraĝigi — sproni — entuziasmigi ktp;

speciale — aparte — precipe — ĉefe — pleje ktp.

Dum la aplikado kaj evoluo de Esperanto formiĝis kaj stabiligis la signif-ampleksoj de ĝiaj vortoj, stabiligis ankaŭ sinonimoj, kiuj riĉigis ĝian esprimopovon.

Estas kategorio de *absolutaj sinonimoj*, kiuj havas plene saman signifon kaj estas uzeblaj unu anstataŭ la alia. Tiaj estas, ekzemple, *lingvistiko* kaj *lingvoscienco*. Ofte la uzo de unu aŭ de alia el ili baziĝas sur ilia aparteno al tiu aŭ alia *stilistika tavolo* (konversacia lingvaĵo, scienca, literatura, poezia, kancelaria, ekonomia, vulgara ktp).

Ekzistas ankaŭ kategorio de *gramatikaj sinonimoj* de la tipo: *patra domo* — *domo de patro*, *plezure* — *kun plezuro* k.s.⁷ La signifoj koincidas, oni povas rajte uzi ĉu tiun, ĉu alian. Gvido ĉe elekto povas esti, interalie, sento pri belsoneco de la tuta frazo, en kiu oni uzas tiun esprimon.

Mi tamen haltigos nun nian atenton al la pli granda kaj interesa grupo de sinonimoj: tiuj, kiuj ne plene kongruas en siaj signifoj. Tio estas precipe *plursignifaj vortoj*. Tiaj vortoj formas *sinoniman vicon*. En tiu ĉi vico ili povas diferenci inter si ĉu per pliigo de la grado de la esprimata nocio, ĉu per esto aŭ malesto de figura aŭ de emocia flanko. Plursignifa vorto havas unu centran (kernan) signifon kaj ĉirkaŭ ĝi kromajn signifojn aŭ nu-

ancojn. Kun la ceteraj vortoj de la sinonima vico ĝi povas esti sence proksima per iu el siaj signifoj — ĉu per la kerna, ĉu per kroma. Jen unu sinonima vico:

ricevi — akiri — profiti — gajni.

Ilia komuna kerna signifo rilatas al tio, kio venas en posedon de la priparolata subjekto. Sed ĉiu membro de la ĉeno havas ankaŭ ion plian, ion specifan, kio diferencigas ĝin de la ceteraj.

Unu vorto — membro de la sinonima vico — per iu el siaj signifoj povas aparteni al unu vico, per alia signifo — al la alia vico; la ceteraj vortoj de la unua kaj de la dua vicoj ne estas sinonimaj inter si. Alivorte, la sinonimaj vicoj povas en unu punkto trakruĉiĝi: tiu ĉi punkto estas la vorto komuna al la du vicoj. Jen ekzemploj:

intereso:

1-a vico: sciemo — scideziro.

2-a vico: utilo — profito — gajno — bono ktp.

absoluta:

1-a vico: sendependa — memstara.

2-a vico: tuta — plena — senkondiĉa — nekontesteb-la — senescepta — nepra.

La ĝusta konkreta signifo de vorto manifestiĝas plej klare en ĝia ligo kun aliaj vortoj, kun kiuj ĝi formas *vortajn kompleksojn* — ĉu ordinarajn, ĉu frazeologiajn. Per la vortkompleksoj, donataj kiel ekzemploj ĉe la interpreto en la vortaroj, oni plej trafe povas difini la signifojn de vorto kaj diferencojn inter sinonimaj vortoj.

Atanas Atanasov. La lingva esenco de Esperanto. —
Rotterdam, 1983, p. 109-112.
Mallongigita eseo.

— Jam komenciĝis aŭtuno. Tial nia gasto elektis el sia verkaro por la hodiaŭa tralego elegian pri-aŭtunan novelon.

*Julian Modest*⁸

AŬTUNA RENDEVUO

Aŭtunkrepusko tegas la kancelarion. Pluvas. Ĉiuj silente laboras ion⁹. Subite eksonoras la telefono. Kati levas la parolilon kaj post kelkaj vortoj ŝi afable diras:

— Pol, iu serĉas vin.

Pol ekstaras sendezire.

— Ha lo! Kiu estas? — demandas aferece Pol.

— Mi. — respondas ina voĉo.

— Kiu?

— Pol, nur ne diru, ke vi forgesis mian voĉon, — rimarkas iom ofendite la virino.

— Lina... — prononcas Pol kaj eksilentas konsternita.

Ĉion li atendis, sed neniam li supozis, ke ĉi-matene iu telefone serĉos lin kaj tiu estos Lina.

— Pol, mi estas ĉi tie.

— Kie? — demandas stulte Pol.

— Ĉi tie, en la urbo. Ĉi-vespere, je la sesa horo, mi atentos vin en hotelo "Metropolo".

Minuton Pol senmova staras kun la parolilo en la mano, poste lante lasas ĝin kaj kiel somnambulo revenas al sia skribotablo. Nun jam tute li ne havas humoron por labori.

... Fora, fora vintro... En nigra mantelo, kun lernosako en la mano, Lina revenas el la lernejo. En la silenta urba parko, sub la neĝaj branĉoj de la arboj, Pol varmigas per sennombraj kisoj ŝiajn etajn frostajn fingrojn.

"Pol, mi amas vin" — ridetas Lina kaj sur ŝiajn blondajn harojn, kiel steloj, falas neĝeroj.

"Pol, mi amas vin".

Sub la silka robo, ŝiaj maltrankvilaj mamoj varmas kiel du bulketoj, ĵus bakitaj:

"Pol, mi amas vin".

Amike kaŝas ilin la vespero. Kiel du streĉitaj kordoj estas iliaj adoleskaj korpoj. Liaj kisoj superŝutas ŝiajn lipojn, brovojn, vangojn. El iliaj brustoj, la koroj kvazaŭ forflugos kiel du alaŭdoj, sed ŝi peteme flustras:

"Pol, ne nun, poste, poste..."

... Pol jam ne memoras, ĉu L ne plu ŝin serĉis, sed tiu "poste"

Pol forlasis la urbeton, kie li diris, ke ankaŭ Lina edziniĝis kaj fanoj, ŝi restis loĝi en la urbo, kie

Pol sencele alrigardas la fenestruojn pluvas... Post laboro, Pol devis tiri tante panon kaj viandon, sed ĉiutage "Metropolo" kiel vermo boras lian

Kiel Lina trovis lian telefonnumeron, kien ili iru kaj kio por vespermanĝo en iu eleganta restoracio. Tamen la kelkaj monbiletoj, kiuj Pol havis, ne ebligis al li tian teko, eĉ por unu vespermanĝo ne nur ĉiutage, sed nek aŭton, nek loĝejon, sed ĉiutage ke li prosperis, ke li ne plu estas en la parko, longe, longe kisis ŝin

Pol elspiras. Delonge li ne povas Nesenteblo, ŝtele kvazaŭ en lia reĝimo, lia koro ie, kvazaŭ vekigis kaj eliris de la amo.

Post longa meditado kaj hezitemonon de sia kolego kaj amiko Lina, Pol niam tiel lante rampis, sed Pol havis nenon.

... De iu strata telefono, li sciis, ke lia oficejo estos eksterordinara kaj fruos. La trompo estis tre ŝablona kaj kredis, ĉar preskaŭ neniam li mal-

La pluveroj monotone frapas sur la tero. El proksima magazenvitro, Pol detas lia laca, kulpesprima fizionomia brunvizaĝa, nigrahara, li aspektas verŝajne ĉu li jam ne malfruis por la vivo? Kiel simple estus, se li revolu la malsekan pluvmantelon, surmetus la eta sed agrable varma ĉambrakoton antaŭ la televidilo.

Pol eĉ pretas ĵeti la bukedon sur la bite, antaŭ li, ekfajras la neonrel-

Sed Pol prenas sian pluvmantelon kaj foriras.

Julian Modest. *Mistera lumo*. — Budapeŝt, 1987,
p. 41-46. Mallongigita.

— Kaj por la fino — versaĵo, kiun ni dediĉu al niaj
gepatroj, ĉar la amo de la gepatroj al siaj infanoj estas
senfina.

*Marjorie Boulton*¹⁰

PAĈJO

La filinet' kontuzas sian frunton
kontraŭ la seĝo; via filo falas;
akre priplendas la malican grundon;
larĉoj en okuletoj tuj kristalas.

La senanima mondo tiel duras!
Kaj tiel pretas, ĉiam por atakoj!
"Ho, paĉjo, paĉjo!" — la geknaboj kuras,
stumble, ekplore, tuj al viaj brakoj.

Vi tenas tiun varman rozbukedon,
Konsolas ilin, simple kaj sagace;
ĉar paĉjo ĉiam konas la rimedon:
"Domaĝe! do, mi kisu ĝin kurace!"

Magia patra kiso tuj balzamas
vundetojn de l' infanoj; plenkontentaj
ili forkuras, ĉar vi vere amas
kaj ŝirmas kontraŭ vundoj akcidentaj...

Sur mia vango io tremas brile,
rigardu min, ho paĉjo!, ĉar mi ploras...
Ve, kara paĉjo! Kisu min simile,
ĉar mia koro, mia kor', doloras!

Esperanta antologio: *Poemoj 1887-1981*. —
Rotterdam, 1984, p. 520.

— En la vica kluba kunveno, kiu okazos la 23-an de
septembro, ni havos superrigardon de la moskvaj gaze-
toj "Argumenti i fakti" ("Agumentoj kaj faktoj"),
"Druĵba narodov" ("Amikeco de la popoloj") kaj "So-
vetskij sport" ("Sovetia sporto"). Ni spektos slajdojn pri
pentraĵoj de meksikaj pentristoj. Funkcios ankaŭ tradu-
kista rondo.

KOMENTARO

1. Albert Einstein /germana prononco: Ajnŝtájjn,
angla prononco: Ajnstájjn, rusa kaj jida prononco: Ejnŝ-
téjn/ (1879-1955) — unu el la fondintoj de la moderna
fiziko, kreinto de la teorio de relativeco, laŭreato de
Nobel-premio. Al li apartenas jenaj vortoj: "Por la in-
ternacia komunikado la internacia interkompreniĝo hel-
pe de la internacia lingvo ne estas nur neceso, sed
memkomprenebla afero... Esperanto estas la plej bona
solvo de la ideo de la lingvo internacia".

2. Vidu la komenton 2 en la leciono 2.

3. Mozart /Mócart/ (1756-1791) — Áŭstria kompon-
isto.

4. Ekzemple, Albert Einstein estis honora prezidanto
de la 3-a kongreso de SAT (laboristaj esperantistoj) —
vidu la komenton 22 en la leciono 7.

5. Bertran Russell /Rásel/ (1872-1970) — angla sci-
encisto kaj socia aganto. Interesiĝis pri problemoj de in-
ternacia lingvo el filozofia kaj logika vidpunktoj.

6. Atanas Atanasov (ADA) (1892-1981) — veterano
de la bulgara Esperanto-movado. Esperantistiĝis en
1908. Unu el la plej bonaj popularigantoj de la esperan-
tologio.

7. k.s. — saj simile.

8. Julian Modest (pseŭdonimo de Georgi Miĥalkov).
Naskiĝis en 1952. Bulgaro. Esperantistiĝis en 1973. Liaj
libroj: "Ni vivos!", "Maja pluvo", "D-ro Braun vivas en
ni", "La ora Pozidono".

9. Prefere: laboras pri io.

10. Vidu la komenton 10 en la leciono 4.

LINGVA PRAKTIKO

Albert Einstein per la okuloj de proksimulo

1. Rakontu, kion vi scias pri Albert Einstein.

Sinonimoj en Esperanto

2. Rakontu, kion vi scias pri sinonimoj, donu kelkajn proprajn ekzemplojn.

Aŭtuna rendevuo

3. Per kiuj rimedoj la aŭtoro kreas melankolian etoson?

4. Trovu sinonimojn al kelkaj vortoj el la teksto. Laŭeble faru la samon kun aliaj beletraj tekstoj.

5. Faru konkludon el la novelo.

6. Rakontu la novelon en la nomo de Lina.

Paĉjo

7. Trovu la leksikon, kiu montras doloron de la infanoj.

8. Trovu la leksikon, kiu montras teneron kaj amon de la patro.

9. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj:

Pajlero, teero, ĉenero, lanero, letero, herbero, polvero, pluvero, kolero, kulero, sango, penso, salero, sukero, fiero, tabakero, glaciero, tolero, vespero, kaviarero.

10. Elektu vorto(j)n laŭ via plaĉo:

Kio vendiĝas kaŝite, vendiĝas (subite, spirite, hipokrite, apetite, invite, profite, hezite, deficite, bandite). Se ne plaĉas la najbaro, ne plaĉas ankaŭ lia (gitaro, eraro, knaro, deklaro, faro, flaro, repertuaro, kaviaro). Rigardi kaj (diri, admiri, aspiri, sopiri, suspiri, deziri, konspiri) ne devigas akiri. Akvo kaj (bano, divano, pa-

no, lano) servas al sano. Kiso publika estas (romantika, komplika, teknika, klasika, politika, praktika, muzika, amika, malamika, unika, indika, efika, pika, cinika, aŭtentika, tragika).

11. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Lana — lanta, koto — koton, tragedia — tragika, adolta — adoleska, metro — metro(politen)o — metropolo.

12. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) En kiu Esperanto-kongreso Albert Einstein estis honora prezidanto?

b) Kio estis Atanas Atanasov (ADA)?

c) Kies pseŭdonimo estas Julian Modest?

13. Temo por diskuto aŭ rakonto: De ŝafo senlana eĉ lanero taŭgas.

14. Rakontu pri la ekologia situacio en via regiono.

LECIONO 20

— Ni jam konatiĝis kun du verkoj de Claude Piron sub la pseŭdonimo Johán Valano¹. Hodiaŭ li prezentas sian vidpunkton pri la fenomeno, kiun li nomas “bona lingvo”. Atentulo, ke, kontraŭe al la normo, li skribas la vorton *Esperanto* ne majuskle, sed minuskle.

Claude Piron¹

LA BONA LINGVO

Mi havas bonan, ĉiutagan kontakton kun la lingvo, tia, kia la ordinaruloj ĝin uzas. La konkludo, al kiu tiu sperto min kondukas, eble aperos al vi plej banala: esperanto ekzistas.

Kion tio signifas? Ke ĝi estas *reala lingvo*, matura, firmiĝinta en kolektivo, kiu ĝin uzadas tute kontentige. Ke ĝi estas fleksebla, forta, kapabla. Ke ĝi estas komparebla kun la franca kaj la indonezia, la nederlanda kaj la hebrea, lingvoj tre malsamaj, ĉiu kun propraj mankoj (kiuj kaŭzas suferojn de la tradukistoj!), sed ĉiu kun sufiĉaj rimedoj por respondi al la normalaj bezonoj de komunikado. En tiu reale uzata esperanto radikas la lingvo, kiun mi nomas *bona*.

En ĝi kuŝas mia normo. Mi rifuzas serĉi normon ĉe aŭtoritatoj, ĉar mi kredas esperanton esence demokratia. Zamenhof ja rezignis posedrajton super la lingvo², li al ĝi ne donis nomon³, li rifuzis, ke oni nomu lin kreinto de la lingvo, sed akceptis nur la titolon “iniciatinto”; krome, estas klare, ke li fidis la ĝustecon de kolektiva, anonima disvolvo. Li diris ekzemple, ke la lingvo “devas trarabati al si la vojon ne per ia potenca dekreto, sed per laborado de amasoj”.

Tiu laborado de amasoj okazis, kaj ni nun disponas lingvon, antaŭ kiu, miaopinie, la plej konvena sinteno estas respekti ĝin. La opinioj de Zamenhof estas estimindaj kaj multon ni povas ĉerpi ĉe li, sed li ne plu estas aŭtoritato, en tiu senco, ke oni severe sekvu lian lingvouzon. La lingvo ja ŝanĝiĝis. Ekzemple, li ĝenerale diris *evolucio*. Sed la kolektivo tiusence nun preskaŭ ĉi-

am diras *evoluo*, kaj sentas ĉi-lastan formon pli tipe esperanta ol la malnoviĝinta *evolucio*. Tial *evoluo* estas por mi, nuntempe, pli bona formo. Pro la sama kialo mi preferas *komenti* al la zamenhofa *komentarii*, *rezulto* al lia *rezultato* kaj *spontana* al la oficiala *spontanea*. Kiam du formoj ŝajnas al mi egale uzataj en la kolektivo, mi alprenas la pli mallongan.

Nur la sumo de la spontanaj decidoj de tiuj, kiujn Zamenhof nomis la *amasoj*, fakte difinas la lingvon. Nun la lingvo evoluas ne plu en kabinetoj de homoj kun skribilo enmane, sed dum ide-inter-ŝanĝoj en la mil cirkonstancoj, en kiuj la lingvo hodiaŭ uziĝas. De pli ol dudek jaroj mi registras tiel ŝprucantajn esprimojn. Ili definitive mortbatas la opinion, ke la normala esperanto estas malriĉa. Jen kelkaj ekzemploj. Provu laŭvorte traduki ilin vialingven, kaj tuj evidentiĝos, kian riĉecon esperanto havas:

Oni nun pli simple *frazas*. — La fenomeno de *denaskismo*⁴. — Levu la manon, kiuj protestas... Nun levu la manon, kiuj *malprotestas*. — De ĉi tiu stacio la diversaj tramlinioj *disbrakas*. — Ili utilis por *eldomigi* fumon. — Ili vivas kun *pratimo* al ĉio fremda. — Vi ne estas tre *muzeema*, ĉu? — La ĉielo *bluegas*. — Karaj *alprelegotoj!* — Esperantoj, tioj estas *antoj*, kiuj esperas. — Jam *dekas* (jam estas la deka horo). — Ni *sentabuigu* la historion de la Movado! — La maro, kiu *gamas* tiujn nuancojn de bluo kaj verdo. — Eble formalismo, burokratismo, *senrimedismo*, *samgrupismo* fermas horizontale la universalecon de UEA.

Milojn da similaj ekzemploj mi kolektis. Dekoj povas ŝpruci en nur unu horo, kaj ofte, la koncernatoj ilin eĉ ne rimarkas. Se ni farus slipon por ĉiu el tiuj spontanaj formaĵoj kaj verkus el ili vortaron de parola esperanto, ni atingus nivelon de riĉeco, kiu kompareblus kun la plej dikaj vortaroj nacilingvaj.

La leganto proprasperte scias, kiel riĉa la ordinara lingvo estas en la formo, en kiu ĝi nature prezentigas ĉe uzado. Jes, ankaŭ el vidpunkto de esprimopovo, esperanto estas *bona lingvo*.

Claude Piron. La bona lingvo. — Vieno — Budapeŝto, 1989, p. 15-22. Mallongigita.

— Tio estas tre bona konsilo! Aŭskultu, kiel parolas esperantistoj, kaj trafajn esprimojn surslipigu. La samon oni povas fari, legante literaturon, gazetaron kaj eĉ ordinarajn leterojn. Vi eĉ ne imagas, kiom da ĝuo vi sentos, kiam vi konscie atentis kaj notos, surslipigos originalan, trafan vorton, esprimon, eĉ aforismon ne rimarkitan de la aŭtoro mem. Tiele per komuna laboro ni kompilos vortaron de la uzata Esperanto.

— Ni konatiĝu kun versaĵo, kiu gloras la arton.

Aleksandro Logvin⁵

AKVARELO

Surstrate
 ĉe stablo
 Sur tolo
 jen
 de mia Moskvo bel-abunda.
 Respeguliĝas
 en la pentraĵo
 Ho, kia ĉarmo ĉiopova
 en tiu arto ombra-hela!
 Ne gravas,
 aliformiĝos
 ĉi tiu bildo
 eterne
 Kaj ravos nin
 en viv-ĥaoso

pentristino juna
 kun paletro bunta.
 pejzaĝo suna
 vivo nova
 akvarela.
 ke la tago nuna
 al paseo,
 fruaŭtuna
 vivos
 dank' al kreo.
 en viv-ĥaoso

ĉi tiu
 simpla
 akvarelo
 per la intima
 goj-etoso
 de l' neripetiĝema
 belo!

Esperanta antologio: Poemoj 1887-1981. —
 Rotterdam, 1984, p. 639-640.

— Ni rememoru la versaĵon “Homarano” (leciono 1). Ĝia aŭtoro Vasilij Eroŝenko estas la plej legendeca figuro en Esperantujo. Multo en lia vivo ne estas konata ĝis nun, kaj versaĵe io skribita pri li ne estas ĝusta — tio rilatas ankaŭ al la prezentota prelego, kiun Kalocsay faris en Budapeŝta Esperanto-klubo. Ekzemple, estas dubinda la epizodo pri la nevino de la instruistino, kiu instruis Esperanton al Eroŝenko. Oni scias, ke Esperanton instruis al li Anna Nikolajevna Ŝarapova (1863-1923), kiu estis en proksima kontakto kun Leo Tolstoj pri aferoj koncernantaj Esperanton.

Bedaŭrinde, en Esperanto ne ekzistas libroj pri Eroŝenko. Aliflanke, estas tre bonaj libroj en la rusa (Aleksandro Ĥarjkovskij “La homo ekvidinta la mondon”, Vladimiro Lazarev kaj Viktoro Perŝin “Impulso de Eroŝenko”) kaj en la ukraina lingvo (Nadija Andrianova “Ekbruligis mi fajron en kor”). Restis neeldonita (eble, eĉ ne finverkita) la ruslingva libro de Ivano Sergejev “Kivio — senflugila birdo”, kies manuskripton mi iam bonŝancis legi. Krome, ni povas atendi novan libron el la plumo de Alberto Polakovskij.

Okaze de la 100-jara datreveno post la naskiĝo de Vasilij Eroŝenko la sovetia poŝto eldonis koverton kun lia portreto kaj rusa-esperanta surskribo: “Rusa sovetia verkisto kaj klerigisto, esperantisto V.J. Eroŝenko (1890–1952)”. En lia naskiĝloko kreiĝis muzeo. Estas produktita dokumenta kinfilmo “La verda stelo de Vasilij Eroŝenko”.

Estas malmulte esplorita la vivo de Eroŝenko en Sovetio post la reveno el eksterlando. En la makabra Stalina epoko, lia vivo certe estis malfacila. Oni imagu la situacion de blindulo, pri kiu estas konate, ke li multe vagis eksterlande (krimo), kontaktas eksterlandanojn (krimo!), publikigas verkojn eksterlande (krimo!!), scias multajn lingvojn (ankaŭ tio estas krimo!!!), krome li estas esperantisto (krimego nepardonebla). Kaj se aldoni al tiu bildo, ke Eroŝenko havis sendependan, senkompromisan karakteron, kaj ĉiam eldiris rekte siajn opiniojn, oni povas nur miri, kiel li evitis reprezaliojn.

Onidire, sian bibliotekon li testamentis al loka blindula societo, kie ĝi pereis. Lia lasta libro-manuskripto (nekonate, en kiu lingvo), sendita al konatino en Moskvo (blinda esperantistino Zinaida Ŝamina), perdiĝis kaj ne atingis la adresaton. Sed la verkoj de Vasilij Eroŝenko en diversaj lingvoj vivas kaj portas ĝojon al la homoj.

Kolomano Kalocsay

EROŜENKO, LA BLINDA MONDMIGRULO

Legante la nomon de Eroŝenko⁶, aperas en mia memoro la figuro de tiu blindulo-poeto⁷. En 1923, en la Nurnberga kongreso, kun decidaj paŝoj suriris la podion tiu alta, rekta viro kun abundaj, helblondaj haroj, fermitaj palpebroj, melankolia rideto sur iom pala vizaĝo. Li deklamis, kun tre sugestia voĉo, sian poemon⁸ "Antaŭdiro de la ciganino". La aŭdantaro estis surprizita kaj tute konkerita, tiel ke la juĝantaro, gvidata de Edmond Privat, donis al li la unuan premion de la plej bona Esperanta prononco.

Vasilij Jakovlevič Eroŝenko (Jeroŝenko) naskiĝis en 1890 en la rusa vilaĝo Obuĥovka, Kurska gubernio⁹. En sia kvina jaro li blindiĝis sekve de malsano. Sed li ne rezignaciis je tio, ke lia blindeco lin malhelpu en la libera moviĝado: li iradis sola sur la kampoj, en la arbaro.




*V. Eroŝenko antaŭ forveturo al Sud-Orienta Azio.
Tokio, 1916*

Naŭjara, li venis en Moskvan blindul-lernejon por esti instruata pri skribo-lego-kalkulo. En tiu blindul-lernejo Eroŝenko komencis verki poemojn⁸ kaj fabelojn, lernis ankaŭ ludi violonon kaj gitaron. Li havis absolutan aŭdon kaj tre agrablan voĉon.

Forlasinte la blindul-lernejon, li fariĝis restoracia muzikisto. Sed tio ne kontentigis lin, li deziris lerni pli. Li konatiĝis kun instruistino, ŝi konsilis al li iri Lon-

donon, kie tiam plej elstara estis la eduko de blinduloj per novaj, modernaj metodoj. La 15-jara nevino de la instruistino proponis al li, ke ŝi instruos al li Esperanton. Komenciĝis la lecionoj. La knabino surprizite vidis, ke ŝia disĉiplo havas neimageblan memorkapablon. En du monatoj li lernis la lingvon perfekte.

Kaj nun malfermiĝis antaŭ li la mondo. Li plektis viglan korespondadon kun anglaj esperantistoj. Kaj en 1912 li ekvojaĝis per sia ŝparita monsumeto al Londono. En Londono, Eroŝenko, ĉiam helpate de siaj esperantistaj korespondantoj, lernas la anglan lingvon kun tia sama mirakla rapideco kiel Esperanton, studas en instituto¹⁰ por blinduloj.




Kun Fukuoka Seiiti

Komence de 1914 li revenas en Ruslandon, sed jam en aprilo de ĉi tiu jaro li vojaĝas al Japanujo. En Japanujo li studis kuracmasaĝon laŭ japana maniero en

blindula lernejo de Tokio, kaj Esperanton inter la blindaj studentoj vojaĝis al Siamo¹¹ kaj fondis. Poste li daŭrigis sian migradon la lasta jaro de la unua mondmilito kaj de tie li volis hejmenveni, ruĝan agenton, transportis lin. Sed li sukcesis eskapi el la ŝipo.

En 1919 li venis tra Ŝanhajon ne posedante la japanan lingvon, tajn rakontojn por geknaboj kaj dan famon kiel verkisto.



Kun Lu Sin, P

En 1921, pro partopreno en la demonstracio de la unua de majo, li estis arestita kaj ricevis elpel-ordonon. Tiam li revenis Ĉinion, kaj en 1922 prelegis lekcionojn pri la rusa literaturo en la Pekina universitato¹².

Tiam li interamikiĝis kun Lu Sin¹³, kiu tre amis kaj respektis ĉi tiun multevagan blindulon. Ankaŭ la muzika talento de Eroŝenko plezurigis lin, volonte li aŭskultis lian artan violonludon kaj lian kantadon kun la propra gitar-akompano. La baladon pri Stepan Razin, aŭditan en la prezento de Eroŝenko, Lu Sin tradukis en la ĉinan lingvon.

En 1923 li revenis al Eŭropo, tiam li vizitis la Nurnbergan kongreson¹⁴. Poste li funkciis en Moskvo kiel blindul-instruisto kaj kiel interpretisto (li parolis plimalpli dek lingvojn). Li estis kelkatempe direktoro de infangardeno por blinduletoj. La poeto iam bluokula, muzikisto, esperantisto Vasilij Eroŝenko mortis en 1952. Kaj la blinda mondmigranto ripozas jam en la hejmvilaĝa tombejo, sub maljuna betulo.

K. Kaloscay. Dek prelegoj. — Budapeŝt, 1985, p. 71-77. Mallongigita eseo.

— Ni konatiĝu kun unu ĉarma fabelo de Vasilij Eroŝenko.

Vasilij Eroŝenko

TURO POR FALI

1

Ie sur tiu ĉi tero iam sub griza ĉielo vivis du grandaj nobluloj: la nomo de unu estis "Granda Lumo de Sudo" kaj la nomo de la alia estis "Granda Lumo de Nordo". Laŭ volo de mistera sorto ili estis najbaroj, laŭ favoro de blinda ŝanco ili estis du la plej riĉaj homoj en la lando, kaj laŭ deziro de iliaj fieraj koroj ili enviis kaj malamamis unu la alian. Se ili estus du virhundoj, ili sen-

dube tuj ĵetus sin furioze unu sur la alian kaj per dentoj provus pruvi sian superecon; se ili estus du ĉinaj generaloj aŭ du ĉinaj provincestroj, ili sendube tuj ekmilitus por montri sian potencon unu al la alia kaj sian malsaĝecon al la tuta mondo; se ili estus du eŭropaj politikistoj, ili sendube ankoraŭ unu fojon surprizus la tutan mondon per sia malico, ruzeco kaj malnobleco; sed "Granda Lumo de Sudo" kaj "Granda Lumo de Nordo" feliĉe estis nek virhundoj, nek ĉinaj generaloj, nek eŭropaj politikistoj, ili estis nur du plej riĉaj homoj en sia provinco.

Ili tiel malamamis unu la alian, ke ekzemple "Granda Lumo de Sudo" neniam eĉ volis rigardi la flankon, kie troviĝis posedaĵoj de la najbaro, kaj se li turnadis sian vizaĝon al tiu flanko, tio estis nur por kraĉi tien; "Granda Lumo de Nordo" konsideris sian najbaron eĉ ne inda por kraĉado: tiel noblaj, tiel fieraj ili estis.

"Granda Lumo de Sudo" havis unu filinon: oni nomis ŝin "Floro de Sudaj Ĝardenoj". "Granda Lumo de Nordo" havis unu filon: oni nomis lin "Gloro de Nordaj Ĉieloj".

"Granda Lumo de Sudo" neniam vidis kaj neniam eĉ pensis vidi la filon de sia najbaro, sed li ĉiam parolis pri li kiel pri monstro de l' lando; "Granda Lumo de Nordo" neniam vidis aŭ eĉ pensis vidi la filinon de sia najbaro, sed li ĉiam nomis ŝin "Kriplulino de l' Mondo". Tiel noblaj kaj tiel riĉaj ili estis.

La simpla popolo, preterpasante la palacon de "Granda Lumo de Sudo", kriadis en laŭta voĉo la nomon de la posedanto de la palaco kaj parolis en mallaŭta voĉo la nomon de lia kontraŭulo; preterpasante la palacon de "Granda Lumo de Nordo", la kamparanoj respektive rigardis ĝin, sed fiere levadis sian nazon, kvaŭzaŭ ili flarus rostitan porkaĵon, kaj rigardis kun moko la flankon de lia kontraŭulo; kaj "Granda Lumo de Sudo", aŭdante sian nomon, sonantan tiel laŭte, ĝojegis; li pensis, ke la kampara popolo konsideras lin pli nobla, pli riĉa ol lia najbaro; la samon pensis ankaŭ "Granda Lumo de Nordo" kaj ridetis. Ho, tiu kampara popolo sciis bone, kie kaj kion diri, kie kaj kion moki!

Sed malgraŭ mokoĵ de "Granda Lumo de Nordo", "Floro de Sudaj Ĝardenoj" estis tre bela, pli bela ol iu knabino en la najbarajo; la filo de "Granda Lumo de Nordo" estis ankaŭ bela. Ĉar tiuj knabino kaj knabo estis solaj infanoj de siaj gepatroj, ili estis edukataj kaj zorgataj pli bone ol iaj lulilaj infanoj en iu nobla familio.

De la lulila aĝo ili jam lernis ami nur sin mem, mal-estimi la malriĉajn, malami laboron kaj laboristojn, ordoni kaj regi ĉiujn kaj ĉion; ho, ili estis veraj nobeloj fieraj kaj noblaj; ili estis gloroj de la popolo.

Unu tagon "Floro de Sudaj Ĝardenoj" ekvolis nepre, almenaŭ per unu okulo, vidi "Gloro de Nordaj Ĉieloj". Ŝi iris ŝtele al la plej malproksima limbaro, kiu dividis landojn najbarajn. La saman tagon "Gloro de Nordaj Ĉieloj" ankaŭ ekvolis kaj ankaŭ nepre, almenaŭ per unu okulo, ekvidi "Kriplulino de l' Mondo"; ankaŭ li iris ŝtele al la plej malproksima limbaro; kaj ŝi vidis lin, belan, noblan, fieran, malestimantan ĉiujn kaj ĉion; kaj li vidis ŝin, ĉarman, sed ankaŭ fieran, al kutimintan ordoni aliajn.

Post tio "Floro de Sudaj Ĝardenoj" ne povis plu dormi trankvile. Ho, se li estus simpla vilaĝa knabo, certe ŝi sciis tiam, kiel kaj kion fari: ŝi sciis kiel igi lin tiri ŝian malgrandan, belan rikŝon¹⁵, kiel igi lin ŝanceli hamakon, kie ŝi kuŝus, kiel igi lin ventumi ŝin per ventumilo el pavaj plumoj; ŝi sciis, kiel igi lin kanti kaj fajfi, kiel igi lin rakonti belajn fabelojn, kaj kiam li tedus ŝin, ŝi sciis, kvankam ŝi estis deksepa¹⁶, kiel eljeti lin el sia palaco. Ho, se li estus nur vilaĝa knabo, ŝi sciis bone, kion kaj kiel fari, sed nun, kion fari nun? Li ja estas "Gloro de Nordaj Ĉieloj". Ŝi ne povis trankvile dormi.

Ankaŭ "Gloro de Nordaj Ĉieloj" ne povis plu dormi, ne povis plu ludi senzorge; li ĉiam nur pensis kaj revis vagante en sia ĝardeno. Ho, se ŝi estus kampara knabino, kvankam li estis deksepa¹⁶, li certe sciis, kiel kaj kion fari: li sciis tiam, kiel igi ŝin ridi ĝojege aŭ rideti sensone aŭ respekte admiri lin; jes, multajn aliajn, li

sciis, kiel igi ŝin fari, kaj kiam ŝi fariĝus tre teda, li sciis, kiel ŝin sendi ree kamparon. Jes, li sciis tiam bonege, kiel esti riĉa kaj nobla. Sed nun, "Floro de Sudaj Ĝardenoj" ne estas kampara knabino. Li revis kaj pensis vagante en sia ĝardeno, ne povis dormi trankvile.

(daŭrigota)

— Ĉi-dimanche ni aranĝos en la klubejo muzikan vesperon, kiun gvidos niaj muzikistoj Valenteno Fedin kaj Lidia Laletina. Kaj merkrede okazos konkurso de sinkrona interpretado. Ni lernos novan kanton. Kaj ni viduos ekspozicion de ĉinaj poŝtmarkoj.

KOMENTARO

1. Vidu la tekstojn "Terura novaĵo" (leciono 3) kaj "Ĉu ni kunvenis vane?" (leciono 14).

2. Zamenhof skribis en la Unua Libro: "Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi".

3. La lingvo komence estis nomata "la Lingvo Internacia proponita de doktoro Esperanto". Jen kie estas la solvo de la enigmo, kial Zamenhof uzis la esprimon "lingvo internacia", sed ne "internacia lingvo", kvankam kutime en Esperanto la adjektivo staras antaŭ la substantivo. Por li la vorto *Internacia* fakte estis la nomo de la lingvo (same kiel lingvo Volapük). Li konservis en sia uzo tiun esprimon ankaŭ poste, kiam la lingvo (ekde 1888) eknomiĝis Esperanto. Do en tiu inversio oni ne serĉu influon de la pola lingvo, la kaŭzo estas pure Esperanta.

4. Vidu la komenton 5 en la leciono 16.

5. Logvin Aleksandr Porfirjeviĉ (pseŭdonimo Liljer) (1903–1980). Esperantiĝis en 1923. Aŭtoro de la libro "Sur la vivovojo".

6. Prefere: Kiam mi legas la nomon de Eroŝenko...

7. Eroŝenko verkis nur kelkajn versaĵojn. La cetero estas prozo, precipe fabeloj; sed ĝi estas tiel poezieca, ke en Japanio oni nomis lin poeto.

8. Oni ofte uzas la vorton "poemo" anstataŭ "versaĵo", kio ne estas aprobinda.

9. Nun Belgoroda regiono.

10. lernejo.

11. Nun Tajlando.

12. En la Pekina universitato li instruis ankaŭ Esperanton.

13. Lu Sin (1881-1936) — ĉina verkisto. Al li apartenas jena opinio: "Esperanto delonge plaĉis al mi. Antaŭ pli-malpli dudek jaroj mi traktis ĝin tre favore. La kaŭzo estas tre simpla. Unue: ĉar helpe de Esperanto oni povas kunligi diversajn homojn, precipe subjugatajn; due: precipe en mia propra profesio, mi opinias, ke helpe de la internacia lingvo oni povas interŝanĝi literaturajn verkojn kun ĉiuj popoloj; kaj fine, ĉar mi mem havis konatajn esperantistojn, kiuj morale superis aliajn homojn per manko de hipokriteco kaj egoismo". Multaj verkoj de Lu Sin aperis en Esperanta traduko.

14. En 1923 en Nurnbergo okazis la 15-a Universala Kongreso de Esperanto kun rekorda nombro de la partoprenantoj — ĉirkaŭ 5000.

15. Rikŝo — orienta veturilo tirata de unu viro.

16. deksejara.

LINGVA PRAKTIKO

La bona lingvo

1. Kion la aŭtoro de la teksto opinias pri Esperanto?
2. Kie oni serĉu la normon por Esperanto?
3. Trovu al elpensu ekzemplojn de freŝa, neordinara vortuzado.

Akvarelo

4. Priskribu, laŭ via imago, la pentraĵon, kiun kreis la pentristino.

Eroŝenko, la blinda mondmigrulo

5. Preparu prelegeton pri Eroŝenko, kiun vi intencas fari antaŭ neesperantistoj.

Turo por fali. Partoj 1-2

6. Rerakontu la unuan parton de la fabelo ne per fabela, sed per neŭtrala, senpasia tono.

7. Trovu en la tekstoj de la leciono la vortojn kun la sufikso *-aj-*. Surbaze de taŭgaj vortoj el la tekstoj formu vortojn kun la sufikso *-aj-*.

8. Elektu vorto(j)n laŭ via plaĉo:

Aŭ ĉio, aŭ (io, tio, nenio, abnegacio). Al fiŝ' (bakiĉa, fritita, kuirita, peklita, formanĝita) jam akvo ne helpas. De unu (lupo, krokodilo, kamelo, bovo, ŝafo) oni du felojn ne deŝiras. Al bona ĉasisto iras mem la (vulpo, leporo, kapreolo, cervo, apro, leono, besto, turistoj). Amo kaj ĵaluzo estas (genepoj, genevoj, geonkloj, gekuzoj, gefratoj). Por gasto nepetita mankas (seĝo, glaso, telero, kulero, forko, lito, pano, akvo, salo, kaviaro).

9. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Tolo — tolero — telero, pavo — pavimo, stampo — stumpo — stumblo, rezigni — rezignacii, paso — pasio — paseo.

10. Kvizo pri Esperantaj temoj:

- a) Kiel nomiĝas la verslibro de Aleksandro Logvin?
 - b) Kial la vivo de Vasilij Eroŝenko estis neordinara?
 - c) En kiuj landoj li vojaĝis?
 - ĉ) Kun kiu granda ĉina verkisto li amikiĝis?
11. Temo por diskuto aŭ rakonto: Nin ĉiam tio ravas, kion ni ne havas.

12. Priskribu detale vesperon pri Esperanto antaŭ la komenco de nova Esperanto-kurso.

LECIONO 21

— Ni daŭrigas legadon de la fabelo. Atentu, ke ans-tataŭ la neasimilita formo “kuli” estas uzebla la asimili-ta formo “kulio” (dungita laboristo).

Vasilij Eroŝenko

TURO POR FALI

3

Baldaŭ post tio “Granda Lumo de Sudo” mortis, mortis malgraŭ siaj sennombraj riĉaĵoj, malgraŭ sia senlima fiero; tuj poste sekvis lin ankaŭ lia najbaro. En tiu ĉi ŝanceliĝanta mondo eĉ la plej riĉaj, eĉ la plej noblaj devas morti, kvazaŭ ili estus mizeraj “kuli”. Pensante pri tio, oni eĉ povas suspekti, ke dioj en siaj ĉieloj estas pli demokrataj ol estas necese aŭ eĉ dece. “Granda Lumo de Sudo” estis metita en belan argentan ĉerkon; la funebra procesio estis majesta: ĉiuj ploris, ĉiuj estis en malespero senkonsole, kaj post la enteriga ceremonio ĉiuj estis dividitaj laŭ laŭteco de siaj ploroj, laŭ la grandeco de sia malespero, kaj ĉiuj festis la festenon funebran kun okuloj plenaj de larmoj, kun poka-
loj plenaj de vino.

“Granda Lumo de Nordo” estis metita en oran ĉerkon; la funebra procesio estis ankoraŭ pli majesta, kaj, ĉar ĉiuj ĵus havis praktikon en plorado kaj malesperado kaj spertis ĝiajn sekvojn ĉe festenaj tabloj, ĉiuj nun ploris ankoraŭ pli laŭte, ĉiuj estis ankoraŭ pli malesperaj, kaj la elspezoj de la funebra festeno estis duoblaj. Tiu popolo sciis, kiel plori kaj malĝoji siajn noblulojn.

4

Nun “Floro de Sudaj Ĝardenoj” restis sola kun siaj riĉaĵoj. Kiel riĉuloj de tiu ĉi mondo kaj kredeble de ĉiuj aliaj mondoj, ŝi lernis ami nur sin mem; kiel ĉiuj viri-

noj de tiu ĉi mondo, ŝi pensis nur pri vestoj, ornamoj kaj pri edziniĝo, jes, ŝi pensis pri li kaj ne povis dormi, kion fari por igi lin edziĝi je ŝi. Kaj ŝi diris al si mem: “Mi konstruos grandegan palacon el blanka marmoro, mi igos lin miri mian riĉecon, kaj certe li petos min esti lia edzino”. Tiel pensis “Floro de Sudaj Ĝardenoj”, kaj baldaŭ aperis majesta palaco el blanka belega marmoro: oni ĝin nomis “Blanka Miraklo de Sudo”.

Vidinte tiun ĉi palacon, “Gloro de Nordaj Ĉieloj” ekpensis: “Mi devas superi ŝin en riĉeco, alie ŝi neniam konsentos veni al mi”. Kaj li konstruis palacon pli grandan ol tiu de “Floro de Sudaj Ĝardenoj”. Li konstruis ĝin el blua marmoro, kaj kiam ĝi estis finita, ĝi ŝajnis miraklo veninta el blua maro. Oni nomis ĝin “Blua Miraklo de Nordo”. Kaj la popolo diris: “La palaco de “Floro de Sudaj Ĝardenoj” estas bela, sed la palaco de “Gloro de Nordaj Ĉieloj” estas belega”. La nobla knabino estis kolera dum tago kaj malĝoja dum nokto. Nun ŝi diris al si mem: “Mi priplantigos ĝardenon kun lago en mezo, kun belaj fontanoj, kun ĉarmaj aleoj. Jes, mi ĉarmos lin...” Kaj ŝi invitis ĝardenistojn de nordo kaj sudo, de oriento kaj okcidento. Kaj oni komencis labo-
ron.

Neniam neniu vidis ion pli ĉarman ol tiu ĝardeno. En ravaj aleoj zefiro petolis kun sorĉaj belaj floroj, en la branĉoj de strangaj bonodorantaj arboj kantis pri amo najtingaloj, la belaj fontanoj el purpura marmoro murmuris ĉiam pri feliĉo, dum tago la suno baniĝis en la pura akvo de ĉarma lageto en la formo de koro, dum nokto baniĝis la luno kun steloj. Oni ĝin nomis “Songo de Suda Nokto”.

“Gloro de Nordaj Ĉieloj” nun pensis: “Neniam ŝi venos al mi el tia belega ĝardeno”. Kaj li invitis duoblan nombron da ĝardenistoj de nordo kaj sudo, de oriento kaj okcidento; kaj nova, pli granda, pli bela ĝardeno estis priplantita kun pli mirindaj arboj kaj floroj, kun pli ravaj aleoj, fontanoj kaj lago.

La popolo diradis: “La ĝardeno de “Floro de Sudaj Ĝardenoj” estas mirinda, sed la ĝardeno de “Gloro de Nordaj Ĉieloj” estas nekomparebla”. Oni ĝin nomis “Revo de Norda Mondo”.

Kiu ajn vidis tiujn ĝardenojn, sentis feliĉon en la koro, sentis admiron al iliaj posedantoj, nur la posedantoj ne estis feliĉaj, ne sentis ĝojon en la koro: ambaŭ sopiris en sia ĝardeno, en kiu fontanoj el purpura marmoro murmuris pri la feliĉo, en kiu zefiro petolis kun sorĉaj belaj floroj, en kiu kantis najtingaloj pri amo, kaj kie dum tago la suno baniĝis en la pura akvo de ĉarma lageto en la formo de koro, dum nokto baniĝis la luno kun steloj.

Nun "Floro de Sudaj Ĝardenoj" diris al si mem: "Nun mi konstruos turon centmetran en alteco, de tie mi povos rigardi miajn posedaĵojn, de tie ankaŭ admiros "Revo de Norda Mondo"". Kaj baldaŭ la turo aperis centmetra en alteco. Oni ĝin nomis "Vojo al Sudaj Stelaroj". Vidinte ĝin, pensis "Gloro de Nordaj Ĉieloj": "Neniam ŝi venos al mi, neniam almenaŭ dum mi ne konstruos la turon pli altan". Kaj li konstruis turon ducentmetran en alteco: oni ĝin nomis "Vojo al Nordaj Stelaroj".

5

Dum ili konstruis palacojn, dum ili priplantigis belajn ĝardenojn, dum ili starigis fierajn turojn, pasis multe da jaroj. Kaj kiam estis finita "Vojo al Nordaj Stelaroj", ili trovis multajn blankajn harojn sur sia kapo, sed feliĉo estis malproksima de ili, same kiel ĝi estis antaŭe.

Unu nokton "Floro de Sudaj Ĝardenoj" staris malĝoje sur sia turo fieraj kaj rigardis la stelojn sur nokta ĉielo; subite ŝi vidis, ke stelo la plej bela falis abismon; ŝi ekkriis kaj etendis la manojn por savi la stelon falantan, ŝiaj piedoj ekglitis, kaj ŝi falis abismon de la centmetra bela turo. La sama okazis en "Revo de Norda Mondo". "Gloro de Nordaj Ĉieloj" staris sur sia ducentmetra bela turo, ankaŭ li rigardis la ĉielon kaj vidis la plej belan stelon fali senfundan abismon; ankaŭ li ekkriis, ankaŭ li etendis la manojn por savi la stelon falantan kaj ankaŭ ekglitis kaj falis abismon de la ducentmetra bela turo...

En "Songo de Suda Nokto" oni enterigis "Floro de Sudaj Ĝardenoj"; en "Revo de Norda Mondo" oni enterigis "Gloro de Nordaj Ĉieloj". Tie la fontanoj el purpura marmoro ĉiam murmuris pri la feliĉo, la najtingaloj en strangaj arboj kantis pri amo, en la ravaj aleoj zefiro petolis kun sorĉaj belaj floroj, kaj dum tago la suno baniĝis en la pura akvo de sorĉaj lagetoj en la formo de koro, dum nokto baniĝis la luno kun steloj.

"Floro de Sudaj Ĝardenoj" kaj "Gloro de Nordaj Ĉieloj" ne estis kaj estas la unuaj, kiuj elspezis sian junecon kaj tutan vivon en la konstruado, kiuj konstruis la turojn por fali de tie, kiuj konstruis grandegajn palacojn por ke oni festenu tie la postmortan festenon, kiuj priplantigis belegajn ĝardenojn por ke oni enterigu ilin tie. Multaj elspezas sian junecon kaj tutan vivon en la sama maniero; mi mem estas unu el tiaj: mi starigis altan turon kaj falis de tie, konstruis palacon por ke ĝi ruiniĝu; feliĉe en la falo mi ne mortigis min mem, la palaco en sia ruiniĝo ne ruinigis min; sed ĉu vi divenas la kaŭzon de tia miraklo? Se ne, mi diros al vi ĝin: la turo kaj palaco estis, almenaŭ por tiu ĉi fojo, konstruitaj en la aero.

V. Eroŝenko. Lumo kaj ombro. — Tayonaka, 1979, p. 59-66.

— Studante elementojn de stilistiko, ni parolis pri aliteracio (teksto "Sonfiguroj" en la leciono 13). Ni rigardu, kiel lerte povas ĝin uzi majstroj de poezia tekniko.

Julio Baghy

RANKVARTETO

Dediĉata al la plendantaj nenifarantoj

Sub tegmento staris kuvo
dum somera densa pluvo,
sed tegmento baris pluvon,
pluvo falis apud kuvon,
ĉar el pluvo kuv' ne havis,
pro l' soifo ranoj kvakis:

Kvavak kvavak kvak kvak¹
akva kuvo, akva kavo
kvak kvak kvak
kvakas ni al Akvoavo
kvak kvak kvak
kvar kvakantoj kvardekvoĉe
kvartet-vakas plenriproĉe
pro mankhav' de l' kava kuvo
en la akvokuv' sen pluvo
kvak kvak kvak!!!

Kvavak kvavak kvak kvak
kava kuvo vane vakas
kvak kvak kvak
kvankam ni por pluvo kvakas
kvak kvak kvak
kvodlibet' de ĥor' kvakanta
en la kuva kav' vakanta
kvakas kvere: Akvoavo,
akvon al la kuvokavo
kvak kvak kvak!!!

Tio pravas: se dum pluvo
staras sub tegment' la kuvo,
ranoj vane kvaki povas,
se je salto sin ne movas.
Do ne kvaku kiel ranoj,
karaj gesamideanoj!

Julio Baghy. Pilgrimo. — Budapeŝt, 1926, p. 87-88.

— En nia tempo oni ĉiam pli kaj pli interesiĝas pri
racia nutrado. Pri tiu temo hodiaŭ prelegos Inna Litv-
ina.

KIEL, KIAM KAJ KIOM MANĜI

Bedaŭrinde, en multaj familioj etaj konfliktoj, kiuj
akumuliĝis dum la tago, iĝas kaŭzo por kvereloj dum

komuna vespermanĝo. Tamen estas necese, ke ĉe la
mangotablo estu eldirita eĉ ne unu malafabla vorto. Oni
devas manĝi kun atento kaj plezuro kaj restigi ĉiujn
zorgojn de la tago ĉe la sojlo de la manĝoĉambro.

Sendube, oni tre nocas sin, kiam oni manĝas sen-
orde ĉion unu post la alia, nur por satiĝi pli rapide. La
homoj, kiuj vivas, aplikante ĉefajn legojn pri kongruo
(kunigeblo) de nutraĵoj, ne scias, kio estas pezo en la
stomako, pirozo, obtuzaj doloroj en la intestaro.

Gravan rolon ludas ankaŭ la temperaturo de la man-
ĝaĵo. Joganoj avertis, ke nocaj estas kaj la malvarma
kaj la varmega manĝaĵoj.

Pro regula nutrado per viando kun pano, kaĉo kun
lakto kaj sukero, dolĉaj kukoj ktp infanoj ofte suferas
lakson, konstipon, gastriton, febron, alergion.

Kiam ni manĝu? Oni devas atabliĝi nur ĉe apero de
la sento de natura malsato, sed ne de apetito.

Ekzistas tri ĉefaj reguloj de nutrado, kiujn apliku ĉiu
homo — kaj sana kaj malsana:

1. Manĝu lante kaj maĉu la manĝaĵon zorge.
2. Manĝu nur trifoje en diurno.
3. Cesu manĝi antaŭ la eksento de plena satiĝo.

Oni neniam manĝu ĉe doloroj, mensa trostreĉiĝo,
malbona fizika farto, alta temperaturo. Malsanulo devas
ricevi neniun manĝaĵon ĝis normaligo de la temperaturo
kaj aperos sento de malsato.

“Komencu la tagan nutriĝon de sukaj fruktoj, for-
manĝu dum la tago almenaŭ unu grandan porcion de
salato el freŝaj legomoj, uzu nuksojn kiel ĉefan fonton
de proteino, uzu grasojn en modera kvanto, evitu ani-
malajn nutraĵojn” — tiel vortumis la bilancon de nutra-
do Shelton /Ŝelton/.

Penu tiel plani vian tempon kaj organizi la vivon, ke
vi preparu rezerve por kelkaj tagoj kiel eble malpli da
manĝaĵo. Tre difektiĝas la nutraĵoj ankaŭ pro revarmi-
go.

La viandon, fiŝaĵon kaj birdaĵon manĝu prefere freŝ-
preparitaj. La viandon oni manĝu kun kiel eble pli
granda kvanto da verdaj legomoj kaj herboj, kio konsid-
erinde plifaciligas ĝian digestadon.

La griaj kaĉoj povas komence ŝajni nebongustaj, sed ju pli oni ilin maĉas, des pli ili iĝas bongustaj kaj aromaj.

La legomojn oni prefere baku en bakujo (eblas en staniolo) aŭ kuiru super vaporo en ŝelo, por ke multaj mineralaj substancoj ne foriru en la akvon kaj ne malaperu. La legomajn pladojn oni preparu ne pli ol je unu horo antaŭ ekmanĝo.

Grasoj estas tre bezonataj por la homo — ja tio estas fonto de energio. Sed ĉe la temperaturoj, aperantaj en patoj (ĉirkaŭ 200°), ĉiuj oleoj malkombiniĝas² kaj transformiĝas en nocajn kombinaĵojn². Kompreneble, vegetalaj oleoj estas uzataj kiel spicaĵoj por salatoj kaj diversaj pladoj. Fakuloj pri nutrado precipe avertas kontraŭ noco de rafinitaj oleoj. Trouzado de animalaj grasoj kondukas al tio, ke la sanga fluejo obstrukciĝas per vaksosimilaj eroj, kiuj precipitiĝas sur la septoj de la arterioj. Do la arteriosklerozo venas ne kun aĝo, sed kun nutrado.

Inna Litvina. Tri polzi. // Knijnaje obozrenije, 1989, N° 51, p. 8-9. Mallongigita traduko.

— Oni povas multe paroli pri valoro aŭ malvaloro de tiu aŭ alia nutraĵo, tiom pli ke opinioj de diversaj diet-fakuloj ne ĉiam koincidas. Sed estas sendube, ke la pomo estas la ĉefa, plej facile akirebla kaj tial la plej valora frukto de la meza zono de nia lando. La pomoj donas ĉion, kion bezonas la organismo. Oni diras: kiu formangas ĉiutage almenaŭ du pomojn, tiu ne bezonas kuiraciston.

— Okaze de la 100-jariĝo de Esperanto kelkaj esperantologoj faris superrigardojn pri ĝia vojo. Hodiaŭ ni konatiĝos kun superrigardo de la persono pli ol kompetenta.

Gaston Waringhien³

KAJ TAMEN NI ĜIN ATINGIS!

Kiam, en 1917, mi konatiĝis kun Esperanto, mi estis frapita de ĝia facileco kaj fekundeco, sed tute ne zorgis pri ĝia eventuala estonteco. Kaj nun, kiam de la alto de miaj 70 jaroj de esperantisteco, mi rerigardas ĝian pasintecon, mi estas frapita de alia fenomeno: kontraŭe al aliaj sociaj novaĵoj, kiuj iom post iom konis senskuan kaj kontinuan disvastiĝon, la historio de nia lingvo, jam de la komenco, abundis je katastrofoj, kiuj normale devus ĝin pereigi.

Apenaŭ la unua gazeto *La Esperantisto* komencis varbi kelkan centon da abonantoj, la cara cenzuro tuj en 1895 malpermesis ĝian eniron en Rusujon⁴ kaj praktike metis finon al tiu vastigado.

Kiam, post la persista propagando de germanaj, anglaj kaj francaj intelektuloj, la movado ŝajne konkeris iom vastan publikon kaj oni rajtis esperi, ke la grandioza kongreso en Parizo en 1914 donos al ĝi deziratan konsekron, tiam la unua mondmilito eksplodis, rompante la samideanajn rilatojn interne de la esperantistaro.

Post tiuj mallumaj kvar jaroj ja estiĝis kvazaŭ renaskiĝo de la movado kaj renesanco de nia literaturo, sed tre baldaŭ ilin frapis proskripcio de Esperanto en Germanujo, en Sovet-Unio kaj en aliaj diktatoraj regnoj kun, kiel natura sekvo, la dua mondmilito.

Sed al tiu serio da sortobatoj ne limiĝas la elprovado de Esperanto. Pli gravaj eble montriĝis la internaj malfaciĝoj, kiuj dividis kaj foje metis secesion en niaj vicoj. Tuj de la komencaj jaroj W.H. Trompeter, kies malavareco subtenis la eldonadon de *La Esperantisto*, ĉesigis sian apogon, kiam Zamenhof ne akceptis la lingvajn modifojn, per kiuj li volis pligermanigi Esperanton. Li cetere estis la unua de longa serio de reformatoroj, kiuj esperis akceli la triumfon de Esperanto per enkonduko de plibonigoj, unuj pli definitivaj ol la aliaj. Beaufront-Couturat⁵ sekvis Trompeter, von Wahl⁶ sekvis Beaufront, A. Gode⁷ sekvis von Wahl, kaj tiujn sekvis kaj sekvas la kohorto de la senĉapeligistoj⁸, kiuj persiste

prilaboris rebakadon de la vortaro, dum, malantaŭ ilia dorso, la fabrikantoj de komputiloj disponigis al sia klientaro ĉiujn diakritajn signojn⁸.

Kaj ĉu necese aludi la personajn konfliktojn, kiuj neniam mankis inter la “pacaj batalantoj”!

Kaj tamen ĉiujn tiujn krizajn horojn ni supervivis, tamen tiun centjarigon ni atingis; kaj tion — kion oni povas kredi miraklo — ni ŝuldas al du esceptaj faktoroj.

Unue, la silenta fido de la granda plimulto de la esperantistoj al la leciono kaj ekzemplo de Zamenhof, kiu sciis deteni sin kontraŭ ĉia tento plibonigi tiun aŭ alian detalon de sia verko, tiel konvinkita li estis, ke por iu ajn lingvo la *kontinueco* kaj la *unueco* “estas multe pli necesaj, ol ĉiu ŝajna aŭ eĉ vera perfekteco”. Tion neniam forgesu niaj posteuloj kaj ili gardu al Esperanto la ekvilibron, kiun ĝia iniciatoro donis al ĝi, jam en la “Plena Gramatiko” de 1887, inter la du ekscetoj de memstarismo kaj de naturalismo.

Due, la sento, pli aŭ malpli konscia laŭ la temperamentoj, ke la komuneco de unu neŭtrala lingvo donas al ĝiaj diversnaciaj parolantoj kontentigon de tiu deziro pri malfremdiĝo, pri altiriĝemo, kiu dormetas funde de la homa koro, ĉu oni nomas ĝin karitato, frateco, filantropio, solidareco aŭ, kiel Zamenhof, homaranismo. Estas facile al realistaj spiritoj ironii pri la “interna ideo”: ili tamen atentu, ke la malsukceso de la ceteraj projektoj de lingvo internacia estis grandparte ŝuldita al la skeptika aŭ malamika sinteno de iliaj aŭtoroj kontraŭ tiu aspekto de la problemo. Kaj ili ankaŭ konsideru, ke tiu aspekto alprenis pli kaj pli da graveco en mondo submetata al la konstanta minaco de satelitaj atombomboj.

Certe, la Esperanta mondo povas fari malmulton por kuraci tiun angoron, sed tiun malmulton fari estas nia devo.

Jubileo. Jarcento de Esperanto. —
Rotterdam, 1988, p. 20-21.
Mallongigita.

— Kiel vi scias, en la pasinta dimanĉo en la klubo okazis konkurso de kuirarto. Ne nur virinoj sed ankaŭ viroj preparis siajn plej ŝatatajn pladojn. Tio estis vera festo. La ĵurio anoncas la venkintojn de la konkurso: Valentena Sidorova, Veronika Borisova, Tamara Pervuŝina, Nadeĵda Vagner kaj Aleksandro Galin.

— Dum la merkeda kunveno ni seminarios pri tio, kiel verki gazet-artikolojn pri Esperanto kaj agado de esperantistoj. Ni aŭskultos magnetofonan registraĵon de tendaraj koncertoj. Kaj ni atendas gastojn el Israelo kaj Hispanio.

— Mi faras anoncon pri kelkaj libroj, kiuj venis en la kluban bibliotekon. Interlingvistikaj verkoj: Sergeo Kuznecov “Teoriaj bazoj de la interlingvistiko” kaj Aleksandro Duliĉenko “Internaciaj helpaj lingvoj”. Ankaŭ tre bonaj prozaj beletraĵoj: Hendrik Bulthuis /Búlthojs/ “Idoj de Orfeo”, Konisi Gaku “Vage tra la dimensioj”, Karolo Piĉ “La Litomiŝla tombejo”, Jean Ribillard /Jan Ribijár/ “Vivo kaj opinioj de majstro M’ Saud”, Kelnm Sturmer “Por recenzo”, Endre Tóth /Tot/ “Lap-par, la Antikristo” kaj “33 rakontoj: La Esperanta novelarto”.

KOMENTARO

1. “Onomatopeoj estas vortoj imitantaj la sonon de difinitaj bruoj aŭ bestaj blekoj” (Renato Corsetti). Jen pluraj onomatopeoj: be! (bleko de ŝafo), bum! (bruo de kanono, tamburo, falego, obtuza frapo), gak! (bleko de ansero), glu-glu! (bruo de fluanta akvo), grr! (grumblado de hundo, urso ktp), grun! (bleko de porko), i-a! (bleko de azeno), i-ho-ho! (bleko de ĉevalo), klak! (bruo de man-kunfrapado), kluk! (bleko de kokino), knar! (bruo de knaranta rado), kokeriko! (krio de koko), krak! (bruo de rompiginta trabo), ku ku! (bleko de kukolo), kvak! (bleko de rano, anaso), kvivit! (bleko de pasero), la-la-la!, tra-la-la! (sono de danc-ario), lu-lu! (por luli infanon), mek! (bleko de kapro), miaŭ! (bleko de kato), mu! (bleko de bovo kaj bruo de vento), mur! (bleko de kolomboj kaj ĝenerale murmurado), paf!

(bruo de pafu), pep! (bleko de malgrandaj birdoj), pip, pip! (bleko de musoj, kokidoj, anasidoj), ronk! (ronkado), ta-ta-ta! (bruo de rapidega parolado), tik-tak! (bruo de horloĝo), tin-tin! (bruo de sonorileto), vaf! (bleko de hundo), zum! (zumado de abelo, vespo, burdo), zzz! (flugado de muŝo).

2. Kombinaĵo — ĥemia kombinaĵo de substancoj. Malkombiniĝi — disiĝi kaj difektiĝi.

3. Gaston Waringhien /Varengjén/. (1901-1991). Franco. Esperantistiĝis en 1917. Profesoro. La plej eminenta esperantologo. Eksa prezidanto de la Akademio de Esperanto. Kelkaj el liaj libroj: "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto", "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto" (kun Kalocsay), "Parnasa gvidlibro" (kun Kalocsay kaj Bernard), "Lingvo kaj vivo", "1887 kaj la sekvo", "Kaj la ceter' — nur literaturo", "Libro de amo" (dua parto sub la pseŭdonimo Georgo Peterido Penter), "Duonvoĉe" (sub la pseŭdonimo Georgo Maŭra).

4. Tio okazis pro publikigo de artikolo de Leo Tolstoj.

5. Pro tio ke Beaufront /Bofrón/, kiu estis konsiderata la dua persono post Zamenhof, sekrete perfidis Esperanton kaj Zamenhofon, lia nomo fariĝis insulto kun la signifo "perfidulo". Vidu la komenton 13 en la leciono 7.

6. von Wahl /fon Val/, vidu la komenton 5 en la leciono 15.

7. Vidu la komenton 6 en la leciono 15.

8. Senĉapeligistoj — proponantoj de reformita alfabeto por Esperanto sen supersignoj ("ĉapeloj" super la literoj ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ). Diakrita signo = supersigno.

LINGVA PRAKTIKO

Turo por fali. Partoj 3-5

1. Trovu en la tuta fabelo paralelismojn.
2. Trovu gradaciojn.
3. Trovu stilajn ripetojn. Kiun rolon ili ludas en la teksto? Kio okazos, se oni ilin forigos? Provu fari tion.

4. Trovu ironiojn kaj penu klarigi, en kio konsistas la esenco de tiu procedo.

5. Kiamaniere la konkluda parto ŝanĝas la sencon de la tuta fabelo?

6. Prezentu la ĉefan enhavon de la fabelo, foriginte detalojn.

Ran-kvarteto

7. Trovu ĉiujn aliteraciojn, kiuj simbolas kvakadon de ranoj.

8. Elpensu frazojn kun aliteracio, kiu simbolas blekon de besto aŭ bruon de traktoro.

Kiel, kiam kaj kiom manĝi

9. Kiel vi rilatas al la rekomendoj, donataj en la teksto? Kiun reĝimon de nutrado vi havas kaj kiun vi deziras havi?

Kaj tamen ni ĝin atingis!

10. Nomu ĉefajn sortobatojn, kiujn devis elteni Esperanto dum sia centjara historio.

11. Kiuj estas la ĉefaj kaŭzoj, ke Esperanto supervivis malgraŭ eksteraj kaj internaj katastrofoj?

12. Kion vi opinias pri la interna ideo de Esperanto?

13. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj:

Insulano, provincano, paradizano, kastelano, esperantujano, slogano, kavernano, komitatano, sindikatano, kolektivano, satano, internideano, jogano, zamenhofano, spontano, ŝipano, ŝtatano, veterano, policano, aliancano.

14. Laŭ la modelo: sen+R(radiko)+ig+isto (ekzemple: senĉapeligisto), kreu kelkajn vortojn.

15. Elektu vorto(j)n laŭ via plaĉo:

Se amiko petas, li neniam (impetas, trumpetas, ripe-tas, dekretas, ploretas). Kiu amas ĝuon, amu ankaŭ (bruon, truon, detruon, instruon, konstruon, evoluon,

enuon, tabuon, gluon). Al kuko kaj (glaso, taso, klaso, kolbaso, kaso) ĉiam venas amaso. Inter generaloj parolu pri (idealoj, ĵurnaloj, ĉevaloj, bataloj, marŝaloj, tribunaloj, najtingaloj). Saĝo abunda, sed ne (senfunda, hunda, profunda, fekunda). Se decidas la sorto, helpas nenia (sporto, eskorto, komforto, pasporto, forto, kohorto, vorto).

16. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Festo — festeno — festivalo, afekto — afekcio, procezo — procedo — proceso — procesio, maso — amaso — anaso — ananaso, kaĉo — kaŝo — kaso — kazo — okazo.

17. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Pro kio estas fama en Esperantujo Gaston Waringhien?

b) Kiam kaj kial pereis la gazeto "La Esperantisto"?

c) Kial ne okazis la Universala Kongreso, kiu devis malfermiĝi en Parizo la 1-an de aŭgusto 1914?

ĉ) Kiun subtenon donis al Ludoviko Zamenhof W.H. Trompeter?

18. Temo por diskuto aŭ rakonto: Rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo.

19. Verku planon de laboro por pli ampleksa enkonduko de Esperanto en la vivon de la socio.

LECIONO 22

— Foje ni parolis en la klubo pri usonaj aŭtovojoj. Sed tio ne sufiĉas por imagi la socian vivon de tiu lando. Do hodiaŭ Aleksandro Ŝalnev, kiu laboris en Usono, kurte parolos pri kelkaj ĝiaj sociaj aspektoj.

USONANOJ VIDATAJ DE PROKSIMO

Jen simpla kompar-testo: mi certas, ke, vidante fremdlandan turiston, vi kvazaŭ aŭtomate deziras agi tiel, ke li/si pli bonfartu sur niaj stratoj, en niaj vendejoj, en la spektejoj. Starante en atendovico, vi kompleze allasos al li ekstervican servon, vi klarigos al li plej detale la vojon al dezirata loko. Mi certas ankaŭ pri alio: sur la stratoj de Vaŝingtono aŭ Nov-Jorko vi estos traktataj same sendistinge, absolute sendistinge, kiel iu ajn preterpasanto. Ĉu ekstervica priservo? Ho, ne! La publikaj moroj tion ne toleras. Usono estas lando de enmigrintoj, la vizitantaj fremdlandanoj ĉi tie preskaŭ identas kun la loka loĝantaro, tial oni traktas ilin egale. Aŭ malpli bone.

Usono ne ceremonias kun siaj propraj landanoj, eĉ malpli kun la alialandanoj. Sed ĝi ĉiam smajlas. Absolulte ĉiam, eĉ kiam kolero bolas en la smajlanto. Aŭ indigno. Aŭ ĉagreno. Do ne eblas senmaskigi tiujn negativajn sentojn. Ankaŭ telefonadoj ĉi tie okazas laŭ speciala etiketo. Oni ne rekroĉas la aŭskultilon subite pro kolero aŭ malŝato, sed, je la fino de interparolado, kiu iris je altaj tonoj kaj abundis je pikaĵoj kaj ofendoj, oni nepre diros: "Dankon! Bonan tagon al vi!" Kaj oni smajlos. Vi simple per-orele sensas la smajlon ĉe la alia fino de la drato. Klik — smajlo. Klik — la smajlo estas for, la aŭskultilo rekroĉita.

Laŭvoĉa popolo! Iufoje mia lango jukas pro la deziro diri: "Ĉu ne eblas iom malpli laŭte?" Ne eblas. Oni ne kutimas en Usono riproĉi liajn/ŝiajn kondutajojn, se, kompreneble, la konduto restas ene de la kadro de leĝaj limigoj. Ne ŝovu vian nazon en mian vazon, se la

leĝo permesas miajn okupojn kaj agadon. Ĉi tio estas mia privata vivo, bonvolu ne enmiksiĝi.

Iom pri la vestoj. Kvankam ekzistas en la angla lingvo la esprimo *Sunday best*¹, t.e. "la plej bona kostumo portata dimanĉe", ĝi ne kongruas al la nuntempa usona realo, ĉar semajnfine, t.e. sabat-dimanĉe, kaj ankaŭ en festotagoj la usonanoj preferas surhavi la plej modestan el tio, kion ili havas en siaj ŝrankoj. Oportunas! Sed dum labortagoj la usonanoj vestas sin parade. Ne por paradi antaŭ siaj gekolegoj — pli ekzakte, ne nur por tio — sed ĉefe por digne reprezenti la firmaon, en kiu ili laboras. Kaj tial — akurateco kaj eleganteco. Ĉu pantalono sakforma? Neniuokaze! Ĉu ĉemizo portata pli ol du sinsekvajn tagojn? Nepre ŝanĝenda. Ĉu ŝuoj nepoluritaĵ? Ne eblas!..

Mi volas rakonti, kion oni disponas en la usona kuir-rejo. La fridujo tre ampleksa, kun eg-spaca frostigilo kaj, memkompreneble, kun la sistemo de aŭtomata degelado. La aŭtomata manĝilar-lavmaŝino — oni kutimas uzi ĝin ne nur post festeno, kiam amasiĝas malpuraj aĵoj kaj iloj, sed ankaŭ post kiam la familio simple trinkas teon kun pokaj² sandviĉoj. La fornelo, plej ofte elektra, sed se gasa, ĝi estas bruligebla sen alumeto. La bakujo kun tre larĝa gamo de laborreĝimoj, plus ultra-onda bak- kaj rostujo, en kiu manĝaĵo estas revarmiĝebla en la daŭro de netaj tridek-kvardek sekundoj. La aŭtomata kafokuirilo — vespere oni programas ĝin, sekvamatene ĝi enŝaltiĝas aŭtomate, boligas la akvon entenatan kaj vekas la mastron per ŝalto de la enkonstruita radioricevilo.

La elektra malfermilo por ladskatoloj kun konservaĵoj. La sukpremilo — kvankam plej diversspecaj sukaj abundas kaj akireblas en la vendejoj, multaj usonanoj preferas sukcon memfaritan tuj antaŭ trinko, tiom pli ke freŝaj fruktoj abundas dum la tuta jaro, kaj la sanprikzorgado rangas la dua sur la prioritat-listo de la averaĝ-statistika usonano tuj post la dolar-akirado. La aŭtomata kuirkombajno, kiu tranĉas, muelas, knedas, "tondas" viandon, legomojn, k.s. La elektrotranĉilo, kiu kapablas tranĉi ĉion ajn ŝpareme je plej maldikaj pecetoj...

Ekster la ofica medio la usonano estas tre komunikiĝema, li bonvolas helpi al malpli sukcesaj homoj kies fortoj elĉerpiĝis — se, kompreneble, ili ne estas potencialaj rivaloj al li mem. Probable, neniu alia lando ekster Usono havas tiom da ĉiuspecaj filantropiaj, karitataj kaj aliaj bonfaradaj societoj. Notindas, ke la impostpolitiko favoras la filantropion: la asignoj kaj subvencioj tiucelaj ne estas imposteblaj.

Laŭ miaj observoj, la usonanoj sportas multe pli serioze, kun pli da engaĝiĝo, ol ni. En neniu alia lando mi vidis tiom multe da ĉiuspecaj sportpalacoj kaj sportejoj kiel en Usono.

...Pensindas, ke ni malkovras Amerikon denove kaj ekscias pri ĝi la faktojn kiuj ankaŭ pli frue estis sciindaj, sed ignorataj de ni, ĉar ili neniel integriĝis en tiu falsa bildo pri Usono, kiu daŭre fabrikiĝis sur la oficiala nivelo en nia lando. Bone, ke ni nun provas agi aliel...

A. Ŝalnev. Amerikanci vblizi. //Nedela, 1988, N^o 38, p. 10-11. Mallongigita traduko.

— Ni jam parolis pri la konversacia lingvaĵo. Sed estas iom alia afero, kiel estas prezentata la konversacia lingvaĵo en la literaturo. Pri tio parolos hodiaŭ antaŭ ni tre interesa gasto el Skotlando³.

*William Auld*⁴

KONVERSACIA LINGVAĴO EN NIA LITERATURO

Tre gravaj estas la iom pli longedaŭraj renkontiĝoj de la esperantistoj, ĉar ili donas eblecon vivi en la medio de la lingvo kaj daŭre konversacii en Esperanto. Kompreneble, kiam ajn samideanoj renkontiĝas, ili volonte kaptas la okazon por ekzerci la parolan lingvon, kaj tre rapide eĉ nesperta esperantisto fluigas en tio. Efektive, la pli spertaj esperantistoj parolas la internaci-

an lingvon tiel same facile kaj perfekte kiel ili parolas sian nacilingvon.

Ĉiulingvaj verkistoj nepre devas krei iluzion ĉe la leganto, ke la paroloj estas "el la vivo prenitaj", kvankam tiaj ili vere neniam estas. Tamen la kreado ĉe esperantistaj verkistoj ĝis nun devis esti pli konscia kaj pli krea ol ĉe iliaj nuntempaj kolegoj. Ilia tasko ĝenerale estas prezenti lingvaĵon tia, *kia ĝi verŝajne estus, se nur Esperanton ĉiutage parolus milionoj da homoj*. Ekzemple:

"De supre sur la deklivo venis la voĉo de la arbotrenisto:

— Hot⁵, mia bela! Ekla!⁵ Jaj⁵, mia brava! Tiru, dol Vidu, la vireto bezonas ja lignon!

Barto ridetis al mi:

— Dan instigas sian ĉevalon — li diris.

Subite la voĉo de Dan ŝanĝiĝis.

— Huj, vi straba bovido! Kion vi faraĉas, somnambulo! Atentu do vian ĉevalon! For, for de la krutaĵo! Se la arbo misglitos, tiam kun la ĉevalo... Pigra porko vi! Ĉu tion vi nomas trenaĵo?! Mi vidis ja korvon traflugi kun pli ol tiom en la ungoj por neston fari! Vi kota kapo — al pli stulta la Dio ne enblovis ankoraŭ la vivon! Kristo krevigu vin!

Barto ridetis:

— Nun li krias al sia filo".

(Reto Rossetti⁶. El la maniko, p.89).

Per citaĵoj mi eble povas ilustrati tri apartajn facetojn de la problemo: slango, dialekto (aŭ difekta parolo) kaj uzado de indigenaj esperantaĵoj.

Ferenc Szilágyi⁷ havas apartan talenton krei iluzion de aktualeco de la parola esprimmaniero. Ekzemple, inter ĵurnalistoj:

"— Ĉu vi scias, kie loĝas tiu tratatulo-bum-bum, tiu Toma, kiu hodiaŭ turmentis la ĉefurbon en la koncertejo...

— Mi mem intervjuis lin en Kontinental.

— Ĉu li elspulis ion pri si mem?

— Ne, estis nur rutin-kvakado. Sed li estas interesa kaj simpatia. Ĉion, kion mi skribis pri li, jam oni povis legi en la anglaj sterkpaperoj".

(Mistero minora, p.57).

En la romano de Julio Baghy "Sur sanga tero" rolas iu ĥino⁸, kiu parolas tre karakterize⁹. Oni demandas al li: "Ĉu via hundo?", kaj li respondas:

"— Ne!.. Hundo... hundo boji, kapitano pafi. Hundo ne apalteni al Lio Fu Peng. Lio Fu Peng esti ĉe la patlo kaj polti mangajo al li. Kapitano veni, pafi, hundo mol-ti" (p. 9).

Fine, jen Cezaro Rossetti¹⁰. Vidu, kiel li lerte spicas la parolon per proverboj prenitaj el la zamenhofa proverbaro, tiu iom tro neglektita trezorujo de pitoreskaj esprimoj:

"— Aranĝite, knaboj! — diris Benzo. — Nu kio? Iom da tondro kaj hajlo en la policejo, sed tio tuŝis min kiel akvo anseron. Nun ja ili transprenis la zorgon, kaj ĝi donis al ili urtikon en la kalsonon! Kion fari? Ili devis eltiri la leonon kun helpo de cirkaj dresistoj, kaj ili loĝigis ĝin ĉe la cirko. Tamen la besto ja restis mia! Tion ili ne povis ŝanĝi. Ili akuzas min pri rompo de l' paco; mi kontraŭakuzis, ke ili senrajte forprenis mian propran. Diable, tio mutigis ilin! Ili estis inter martelo kaj amboso — ne sciis, kion fari. Mi vidis ilin danceti kiel kato sur fornoplato. Fine mi konsentis intertrakti, kaj ili vendis la leonidon al la zoo — kredu, mi bone remburis la prezon! Jes, knaboj, lasu min fari: mi scias min aranĝi. En mja cerbo ne kreskas herbo. Kiu min tuŝas, min sentas!"

(Kredu min, sinjorino!, p. 193).

Tiuj malmultaj ekzemploj celas montri, ke literaturaj konversacioj estas pli realecaj ol realaj. Tamen, ili povas reciproke influi la vivajn konversaciojn. Niaj plej viglaj parolantoj lerte plektas en siajn parolojn belajn frazojn kaj parolturnojn, ĉerpitajn el la fikcio, kaj tiel evoluigas kaj maturigas ankaŭ la "ĉiutagan Esperanton".

William Auld. Pri lingvo kaj aliaj artoj. — Antverpeno — La Laguna, 1978, p. 197-200. Mallongigita.

— Kiel ni vidas, indas kolekti ne nur esprimojn el vivaj konversacioj, sed ankaŭ el la literaturo. Neniu lernolibro povas doni tiom da konoj.

— Uzante la okazon, ke William Auld estas en nia klubo, ni petu lin ankaŭ deklami iun sian versaĵon.

William Auld

NATURA ĈIRKAŬAĴO

Sur monteta supraĵo mi haltis,
kaj rigardis al suba eben':
tie aŭtoŝoseoj asphaltis
kaj svarmadis la homa aren'.

Mi konfesas ke, malgraŭ la sento
pri l' graveco de l' urba kultur',
min momente delogis la tento
de la tiel-nomata "natur".

Sur montetoj sin paŝtas la ŝafoj
kaj tagmeze scintilas la lum';
montaranojn ne glutas la lafoj
de trafiko, bruaĉo kaj fum';

Viv' kampara aspektas trankvila
en komparo kun urba rapid',
kaj izolo ja ŝajnas azila
al la ĝene pelata urbid'.

Sed ne estas mi fil' de "naturo",
baldaŭ tedeas min vivo en sol':
post moment' mi descendas en kuro
al instiga svarmad' de l' popolo'.

William Auld. Humoroj. — La Laguna, 1969, p. 59.

— Tuj ni ekscios, kiuj gravaj eventoj okazis en pra-tempo sur la insulo Atlantido. Kiel ili memorigas eventojn nunajn!

*Sándor Szathmári*¹

LA FALSA AŬGURO

La grandmonarko de Atlia sendis voki sian intimulon Serva, la ĉefon de la kortega konsilio.

— Nun — li diris, — kiam la popolo de nia lando festas la dekan jaron de nia regado, oni nepre intencas omaĝi al ni donacojn grandiozajn. Sed tion vi scias pli bone ol ni.

— Ho jes. La Templon de la Dankodiro, la Obeliskon kaj vian Statuon.

— Ni dankas, ne daŭrigu. La planojn ni konas bone. Ni vokis vin tial, ĉar ni sentas, ke ankaŭ nia patra koro devas iom rekompenci la popolon por ĝia fideleco kaj donacemo. Ĉu ne?

— Via popolo jam nun fermis vin en sian koron, ho reĝo, filo de la dioj!

— Nu jes, tion ni scias. Sed des pli konvene estus, ke ankaŭ ni donacu ion al la popolo.

— Ĉu vi pensas pri ia speco de monumento aŭ templo, reĝo dio-generita?


— Eh, ne pri tiaĵoj, kiuj kostas multan monon. La popolon jam pli ol sufiĉe ŝarĝas ĝiaj propraj donacoj. Kial ĝin ŝarĝi ankaŭ per la niaj?

— Senlima estas la boneco de via koro, ho diogenerita reĝo!

— Ni pensas pri amnestio al la malliberuloj.

— Kiel do, grandmonarka moŝto! — timiĝis Serva. — Ĉu vi liberigus eĉ vian kuiriston, kiu ŝtelis vian orpokalon?

— Nu, kompreneble, ni ne pensis pri li. Ĝuste tial ni sendis voki vin. Ni volas vin komisi, ke vi priesploru en la ŝtataj malliberejoj, kiu, kial kaj kian punon ricevis. Ni vin komisiis priesplori per via saĝo kaj fidelo, kiu povos ricevi amnestion aŭ pun-malpliigon. Sed ni pen-



— Mirinde, kiel tiu novelo memorigas pri antaŭnelongaj tempoj, kiam la regantoj, timante, ke ŝanceliĝos ilia ĉiopermesa potenco, ke ŝanceliĝos kredo de la homoj “je la hela futuro”, defendante ŝtoniĝintajn dogmojn kaj kondukinte la landon al rando de abismo, kruele persekutadis disidentojn pro tio, ke ili aŭdacis pensi aliel, kaj penis malebligi ajnajn menciojn pri ties ideoj. Feliĉe, la epoko de glasnosto radikale ŝanĝis tiun situacion.

— En la sekva kunveno okazos diskuto pri la internacia situacio, ni konatiĝos kun Esperanto-novaĵoj kaj rigardos fotojn, faritajn dum la 77-a Universala Kongreso de Esperanto en Aŭstrio.

KOMENTARO

1. Sunday best /sándi best/.
2. Pokaj = malmultaj.
3. Skotlando — parto de la Brita insularo, administra-politika parto de Britio (ĉefurbo Edinburgo).
4. William Auld /Ŭíljam Old/. Naskiĝis en 1924. Instruisto. Esperantistiĝis en 1937. La plej signifa nuntempa Esperanto-poeto. Aŭtoro de multaj libroj (poezio, kritiko, eseoj, tradukoj, lerniloj). Redaktoro de pluraj revuoj, literaturaj kaj movadaj verkoj. La plej gravaj verkoj: “Spiro de l’ pasio” (versaĵoj en “Kvaropo”), “La infana raso”, “En barko senpilota”, “Paŝoj al plena posedo”, “Esperanta antologio” (redaktoro). Eksa prezidanto de la Akademio de Esperanto.
5. Interjekcioj por antaŭenigi ĉevalon.
6. Reto Rossetti /Roséti/. Naskiĝis en 1909. Sviso loĝanta en Anglio. Esperantistiĝis en 1928. Kelkaj liaj verkoj: “Oazo” (versaĵoj en “Kvaropo”), “El la maniko”, “Pinta krajono”.
7. Ferenc Szilagyí /Síladi/ (1895—1967). Hungaro loĝinta en Svedio. Esperantistiĝis en 1924. Redaktoro de la literatura revuo “Norda prismo”. Kelkaj liaj libroj: “Koko krias jam!”, “La granda aventuro”, “Trans la Fabeloceano”, “Inter sudo kaj nordo”, “Mistero minora”.
8. Prefere: ĉino.

9. Vidu la komenton 7 en la leciono 3.
10. Vidu la komenton 2 en la leciono 7.
11. Sándor Száthmari /Sándor Sátmari/ (1897—1974). Hungaro. Esperantistiĝis en 1912. Inĝeniero. Kelkaj liaj libroj: “Vojaĝo al Kazohinio”, “Maŝinmondo”, “Perfekta civitano”.
12. Atlantido.

LINGVA PRAKTIKO

Usonanoj vidataj de proksimo

1. Imagu, ke vi revenis post vojaĝo en Usono. Surbaze de tiu teksto verku eseon por ĵurnalo, uzu propran stilon, proprajn komentojn kaj aldonajn informojn.

Konversacia lingvaĵo en nia literaturo

2. Transformu la cititajn pecojn el parola en neŭtralan (eble, eĉ en oficialan) stilon.
3. Elektu fragmenton el iu studita lernolibra teksto kaj reverku ĝin en parola stilo, uzante konformajn leksikon, demandojn, eksklamaciojn, elipsojn, hiperbolojn, interjekciojn, onomatopeojn ktp. La samon vi povas apliki ankaŭ al tekstoj en postaj lecionoj.

Natura ĉirkaŭaĵo

4. Kiel la aŭtoro perceptas la kamparon kaj kial li, tamen, ne povas forlasi la urbon? Kion vi pensas pri la problemo “urbo — kamparo”?

La falsa aŭguro

5. Trovu la leksikon, kiu atestas pri rilatoj de superruloj al subuloj kaj inverse.
6. Kiel la lasta frazo ĵetas novan lumon al la senco de la tuta novelo?
7. Parolu pri la juĝsistemo en Atlia kaj diru vian opinion pri ĝi. Ĉu nun ekzistas io simila?

8. Verku por Esperanto-gazeto recenzon pri ĉi tiu novelo.

9. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj:

Kolerema, paradema, bojema, blasfema, ĝenema, ĝeniĝema, mordema, pikema, krimema, sentema, erarema, rompiĝema, tedema.

10. Finu la frazojn:

Aĝo tro matura ne estas El malplena telero vane ĉerpas Eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne De la majesta ĝis la ridinda estas nur unu Kapo majesta, sed cerbo Por malfrua gasto restas nur Se vi prenis la violonon, prenu ankaŭ la La plej bona gvidilo estas la Ankaŭ al nia nesto venos iam la Kiu aŭskultas, kie li ne devas, tiu aŭdas, kion li ne

11. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Lingvo — lango, difekto — defetismo, konsolo — konsilo — konsilio, paro — parado — paradizo, korbo — kordo — korto — korpo — korvo.

12. Kvizo pri Esperantaj temoj:

- a) Pro kio estas fama en Esperantujo William Auld?
- b) Nomu kelkajn verkojn de Reto Rossetti.
- c) Kiun literaturan revuon redaktis Ferenc Szilágyi?
- ĉ) Nomu kelkajn librojn de Sándor Száthmari.

13. Temo por diskuto aŭ rakonto: Sidu la lango malantaŭ la vango.

14. Se vi farus ekspozicion pri Esperanto, kion vi metus tien? Priskribu detale.

LECIONO 23

— En nian klubon venis letero, en kiu nia eksterlanda korespondanto demandas: “Kion signifas la ruĝa standardo, kiu estas la historio de ĝia origino?” Laŭ nia peto, Alekseo Dubinin preparis respondon. Bonvolu konatigi kun ĝi, ĉar similajn demandojn povos estonte fari ankaŭ aliaj niaj leter-amikoj.

LA RUĜA STANDARDO

La ruĝa standardo delonge estas konsiderata kiel simbolo de revolucio, batalo de popoloj por sia nacia kaj sociala liberigo. La ŝtata flago de ruĝa koloro estis akceptita ne nur en Sovet-Unio, sed ankaŭ en Vjetnamio, Albanio, Ĉinio, Kongo, Maroko, Tunizio, Turkio k.a.¹ Ĉiu el tiuj landoj havis sian intreprenon de la simbola signifo de la ŝtata flago.

Ŝajne, unuafoje en la historio la ruĝa standardo iĝis simbolo de la batalo de popolaj amasoj kontraŭ siaj subpremantoj ankoraŭ en la 8-a j.c.² de n.e.³ dum la kamparana ribelo en la jaroj 778-779 en Irano, kaŭzita de la raba politiko de la regantoj kaj enirinta en la historion sub la nomo de la ribelo de “ruĝstandarduloj”. En la jaroj 1524-1526, dum la Granda kamparana milito en Germanio, sub la ruĝaj standardoj okazis kontraŭfeŭda batalo.

Dum la Granda franca revolucio en la jaroj 1789-1794 la ruĝa standardo iĝis unu el ĝiaj simboloj, kaj poste ĝi iĝis simbolo de la Pariza komunumo en la jaro 1871. Ekde tiam la ruĝa standardo simbolas proletan revolucion kaj internacian laboristan movadon.

Ĝian popularecon poste provis uzi la germanaj nazioj, kombinante sur sia flago la ruĝan koloron kun la simboloj de naziismo kaj rasismo — blanka rondo kaj svastiko.

En Rusio la ruĝan flagon unuafoje levis kamparanoj de la vilaĝo Kandejevka en Penza gubernio en la jaro 1861, protestantaj kontraŭ maljustaj kondiĉoj de abolo

de servuteco. En la jaro 1876 dum la manifestacio ĉe Kazana katedralo en Sankt-Peterburgo la ruĝa standardo ekflirtis super la vicoj de manifestaciantoj kiel simbolo de konscia revolucia batalo kontraŭ la carismo. Ankaŭ la partio "Popola libero"⁴ konsideris ĝin simbolo de sia batalo. Sub la ruĝaj standardoj okazadis la unuaj maj-kunvenoj⁵ kaj poste ĉiuj tri Rusiaj revolucioj⁶.

Post la venko de Oktobra revolucio estis aperigita ukazo de VCIK⁷ de la 14-a de aprilo 1918, laŭ kiu la ruĝa standardo iĝis la ŝtata flago de la Soveta ŝtato. Ĝi estis ruĝa rektangula tuko, enhavanta en la supra angulo, ĉe la stango, la bildon de orkoloraj serpo kaj martelo kaj, super ili, ruĝa kvinpinta stelo kun orkolora bordero.

Argumenti i fakti, 1988, N° 38, p. 8.
Mallongigita traduko.

— Ni aldonu, ke post la disfalo de USSR en decembro 1991 sur ĝia teritorio formiĝis sendependaj ŝtatoj kun propraj ŝtataj flagoj.

— Bonvolu diri kelkajn vortojn ankaŭ pri la esperantista standardo.

— Ĝi estas verda tuko, kiu havas en la supra maldekstra angulo blankan kvadraton kun verda stelo. La standardon, kiel simbolon de la esperantistaro, oni akceptis la 1-a UK⁸ en 1905.

— En ĉiu socio de tempo al tempo ekflamas diskutoj pri tio, ĉu uzi aŭ ne uzi fremdajn (prenitajn el aliaj lingvoj) vortojn. Antaŭ nelonge mi aŭdis per radio iun gravan personon, kiu arde protestis kontraŭ alprenado de novaj, Okcident-devenaj vortoj, kio, laŭ lia opinio, "transformas la rusan lingvon en ian Esperanton". Evidente, estante tute nekompetenta pri Esperanto, tiu persono (same kiel kelkaj ŝovinismemaj verkistoj) deziris iel ĵeti ombbron sur nian lingvon. Ankaŭ inter esperantistoj neniam ĉesas disputoj inter "puristoj" ("fundamentistoj") kaj "neologismuloj". Kie estas la vero? Eble, ie meze. Oni ne fariĝu ekstremulo de unu aŭ de la

alia tendenco. Cetere, ni aŭskultu, kion opinias pri tio kompetentuloj.

NEOLOGISMOJ — POR KAJ KONTRAŬ

Neologismo estas nomata ĉiu vorto neoficiala, ĝis sia oficialiĝo. Konforme al la libera evoluo de Esperanto, neologismon povas enkonduki ĉiu esperantisto: pri la prospero de la nova vorto decidis la esperantistaro, per ek-uzo aŭ per ignoro.

Rilate al la neologismoj kolizias du vidpunktoj inter si kontraŭaj: tiu de la simpleco kaj facileco kaj tiu de riĉeco kaj literatura taŭgeco de la lingvo. La kolizio ŝajnas nerepacigebla, ĉar nek la propagando povas rezigni pri la granda altirforto de la facilo kaj simpla, nek la literaturo pri la esprimforto kaj vortriĉo, sen kiuj vera literaturo, transdonanta ne nur la nudan penson, sed ankaŭ delikatajn nuancojn, metaforajn vort-aplikojn, duonklarajn aludojn, estas kaj restas nur pia revo. La problemoj ŝajnas solvebla nur per la apartigo de la "poeziaj vortoj", t.e. vortoj uzataj nur en la arta literaturo. Ĉi tiujn vortojn oni devus klarigi fine de ĉiu libro, en listo. Krome, devus ĉesi la principa antipatio kontraŭ la poezia vortriĉo, per la rekono, ke literaturo kaj intencavortmalriĉo estas konceptoj kontraŭdirantaj unu al la alia.

Zamenhof mem estis tre tolerema kontraŭ neologismoj, li avertis sole: "ne tro krude, ne tro multe per unu fojo". Jen kelkaj citaĵoj de li: "mi havas nenion kontraŭ la enprenado de tiuj vortoj"; "neologismoj... nenion ŝanĝante, nek rompante, prezentas por la lingvo nenian danĝeron"; "Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la *reguleco* de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua"; "Vi diras, ke la aperado de novaj vortoj faras la lingvon pli malfacile ellernebla. Sed kial? Ili ja tute ne elpuŝas la antaŭajn vortojn kaj ne ŝanĝas en io la ĝisnunajn principojn de la Esperanta vortfarado".

La principoj, laŭ kiuj la alpreno de novaj vortoj okazas, estas la jenaj:

1. Eviti, ĉe ofte uzataj vortoj, pezajn vortkunmetojn (piedpremi: treti; falpuŝigi: stumbli; malsupreniri: descendi; vizaĝsmirajo: ŝminko).

2. Distingi nuancojn (fali kaj sinki; jelpi kaj boji; langvoro kaj laco; sturmi kaj ataki).

3. Signi ideojn, esprimeblajn nur per pluraj vortoj (novalo: provizore ne kulturata plugtero; statisto: akcesora rolulo; kontempli: longe kaj medite rigardi; baŭmi: stariĝi sur la postaj piedoj).

4. Anstataŭigi, ĉe ofte uzataj vortoj, mal-kunmetojn (stulta: malsprita; kvereli: malpaci; efemera: maldaŭra; aflikti: malĝojigi; kompleksa: malsimpla; humida: malseketa; rara: malofta; trista: malgaja; dura: malmola; milda: malsovaĝa).

5. Simpligi pseŭdosufiksajn⁹ vortojn (apelacio: apeli; situacio: situi; dekoracio: dekori; federacio: federi).

6. Krome, per la plivastigo de Esperanto, oni certe pli kaj pli sentos la neceson de familiaraj vortoj (kaputa: rompiĝinta, ruiniĝinta; fatraso: aĉajaro; trampo: ĉifona malzorgita ulo; paŭti: malkontente silentadi; mungi: nazpurigi).

En la teknika lingvo, estas utile, ke la ĉefaj nocioj estu esprimataj per primitivaj vortoj, por kiel eble plej complete gardi la jam internacian vortotrezoron.

En la komuna lingvo, la demando estas iom alia. Ĉar la scienca precizeco tie ĉi ne estas plu bezonata, oni povas pli larĝe helpi la memoron per uzado de kunmetitaj vortoj: tio estas des pli aprobinda, ke multaj naciaj lingvoj vaste praktikas tiun rimedon. Oni povas do meti la principon, ke ĉiufoje, kiam en du el la ĉefaj eŭropaj lingvoj la koncerna ideo estas esprimata per vortkunmeto, ankaŭ en Esperanto estas eble aŭ oportune provi la saman esprimmanieron.

K. Kalocsay. Neologismo. // Enciklopedio de Esperanto. — Budapeŝt, 1979, p. 390-391. Mallongigita.

K. Kalocsay, G. Waringhien. Plena analizo gramatika de Esperanto. — Rotterdam, 1980, p. 526. Fragmentoj.

— Post tiel seriozaj temoj ni iom amuziĝu. Jen romano, verkita komence de la 20-aj jaroj. Grupo da personoj per tempo-maŝino trafas en la antikvan Romon, kiu estis ĉefurbo de la romia imperio (Romio). Inter aliaj aventuroj, ili estas invitataj al festeno, kiun aranĝas la imperiestro Nerono.

Jean Forge¹⁰

SALTEGO TRANS JARMILOJ

Antikva bakĥanalia!

Jen kuŝas la historia monstro Nerono. Kun dika vizaĝo, kiu ŝajnas ŝvelinta pro la ega duobla mentono. Kun kapharoj ruĝetaj kaj maldensaj. Li kondukas kiel malfeliĉe senhelpa dika virino, kun paŝoj el la tragedio, kun patosaj manmovoĵoj. En la miopaj kunpremitaj okuloj brilas sovaĝo kaj frenezo. Liaj nudaj grasaj brakoj estas ringitaj kaj sur la kapo kuŝas ora krono. Sur lia nazo — la okulvitroj de Fromaĝi. Karikaturo el febra sonĝo!

Ĉu ĉio ĉi ne estas sonĝo? Jes, la imperiestra vizitakcepto ŝajnas al mi febra sonĝo kun inkubo. Ŝajnas al mi, ke mi ĉiumomente vekigis al pli agrabla efektivo. Vivigas ĉirkaŭ ni la riĉe kostumitaj figuroj de l' Nerona epoko. Por ni ili estas duone maskobalo, duone malvarma ŝtoniĝinta historio. Levigis antaŭ ni la kurteno de l' antikva scenejo, sur kiu ni mem ludas strangan ĉefan rolon! Malfermigis la teatro de l' historio, en kies fono insidas krimego, brulo kaj morto!

Ekstere brulanta posttagmeza suno. Interne — malheligita salonego kun multnombra lumigilaro. Mi tute ne scias, ĉu do estas tag- aŭ vespermanĝo, kiun prezentas al ni Nerono. La salonego aspektas strange. Kaj la krepusko, kiu regas ĉi tie, frapas malserene miajn okulojn, kiuj kutimas la elektran lumon.

Ripozaj kuŝejoj anstataŭ seĝoj. Neniuĵ manĝilaroj. Manprenoj en la plandojn.

Fraŭlino Snob rifuzas kuŝi kaj meti la manojn en la pladojn. Ŝi sidas sur la kuŝejo en rigida pozo. Ŝiaj lipoj premiĝas ŝoke. Senĉese ŝi ĉirkaŭrigardas. Ŝi ne trovis

sian belegan heroon Marcus¹¹ Vinitius, sed ĉeestas multaj indaj anstataŭantoj.

Mi rigardas miajn amikojn el la dudeka jarcento. Jen, ili kuŝas meze en la brilantaj belajoj sur siaj kuŝejoj vere kiel kotaj makuloj. La abomena malbeleco de niatempaj vestoj montriĝas frapante. Ecepton, eble, faras Maria, kiu surmetis helruĝan someran veston. Ŝi kuŝas apud juna belega romano, kiu vigle parolas al ŝi.

Jen, profesoro Sovaĝi. Li aspektas vere sovaĝe. Kun fiero li klopodas konduti tute klasike. Oportune li etendiĝas sur sia kuŝejo. Li manĝas kaj trinkas ĉion. Liaj fingroj kaj liaj lipharoj gutas je graso. Li engorĝigas nemiksitan Falernan vinon¹². Lia nigra frako, kiun li verŝajne farigis ĉe iu fuŝtajloro, vestas lin malbone. Li etendas siajn malgraciajn botojn kun la malpuraj planĉoj. Ĉio ĉi ŝajnas al mi kria akuzo kontraŭ nia kulturo!

Fromaĝi deziras fikso-teni la solenan manĝon ĉe Nerono por eternaj tempoj. Karolo do alportas grandan fotografan aparaton kun plategaĵo. Profesoro Sovaĝi devas klarigi per arte studitaj frazoj latinaj la celon de la aparato. Li faras tion kun ŝviteganta kapo.

Sed sur la vizaĝoj de la romanoj montriĝas timo. Antaŭ ili troviĝas mistera aĵo. Ĝi distarigas siajn tri piedojn, kaj ĝia nigra truo rigardas fikse la grupon. Fromaĝi petas Nerono, ke li akceptu imperiestran pozon. Sed Nerono kaŝis sin pro timo malantaŭ Poppea¹³. Kun peno oni sukcesas venigi lin antaŭ la aparaton. Fine li paŝas antaŭen. Li portas la okulvitrojn kun timiga grotesko. Liaj okuloj moviĝas tien kaj reen. Oni metas ĉirkaŭ liajn ŝultrojn la trenajon en pentrinĉaj faldoj kaj donas al li liron. Kaj nun li sidas, bildo de kompato, antaŭ la aparato kaj rigardas la nigran truon, el kiu ŝajnas minaci terura danĝero.

Tiam profesoro Sovaĝi levas la dekstran manon kaj vokas laŭte la kutiman fotografan frazon: "Mi petas serenajn mienojn!" Fromaĝi fotografas kaj danke klinas sin. Karolo prenas la plataĵon. Li tuj veturas hejmen por riveli ĝin kaj plej rapide alporti pretan bildon. Horroj pasas. Malrapide...

Fraŭlino Snob, en kies kapo evidente efikas la Falerna vino, jam tute konformiĝis al la antikveco. Ŝi amvar-

miĝis. Ŝi kuŝas meze inter aro da junaj kaj maljunaj romanoj kaj rikanas bonhumore. Ŝi tute ne komprenas la romanojn, kiuj evidente mokpetolas ŝin, kaj mem povas respondi nenion.

Profesoro Sovaĝi estas tute ebria. Li ruliĝas al Nerono, kiu estas ne malpli ebria, kaj krias laŭte: "Vivu la granda Kezaro!"¹⁴ Post tio li grunte rakontas al Nerono pri la verko "De praulo ĝis la radio-homo".

Fromaĝi leviĝas kaj balbute invitas la imperiestron, la imperiestrinon kaj la korteganaron al festena manĝo. Ĉiuj ridas kaj aplaŭdas. La invito estas akceptata entuziasme. Jam fariĝis malfrua vespero.

Tiam aperas Karolo kun preta fotografa bildo. Oni starigas ĝin. La societo proksimiĝas. Unu preme puŝas la alian. Kaj dum ili ŝanceliĝas duonebrie, kelkaj etendas montre siajn fingrojn, virinoj ekridas akrasone kaj kvere, aliaj starante pli proksime ĉe la bildo ekkrias pro teruro.

Nerono ŝanceliĝas al la bildo. Liaj okuloj rigardas ĝin fikse kun esprimo de ebrulo. Kiam li ekkonas la bildon, li rulas la okulojn malantaŭ la okulvitrojn. Li fingromontras sur sian portreton kaj ekridetas kiel infano. Sed subite li ektermas pro teruro. Li skuiĝas froste. Liaj genuoj ŝanceliĝas senforte.

Generala tumulto! La romanoj, kuraĝigitaj de la alkoholo, subite montras minacan konduton. Unu el ili, gestante kun ekscito, komencas agitan paroladon kontraŭ la barbaroj. La tumulto pligrandiĝas. Fromaĝi forsavas sian bildon. Ni rapidas por eliri. Nur kun peno ni sukcesas elŝiri fraŭlinon Snob el la brakoj de ĝentila stranga amemulo. Karolo kaj mi fortrenas profesoron Sovaĝi, kiu apenaŭ povas stari pro ebrio.

Kaj dum la homamasoj ĉirkaŭkrias nin kaj minace levas siajn pugnoj, Karolo fajfigas la signalsirenon, kaj nia aŭtomobilo salte ekkuras.

Jean Forge. Saltego trans jarmiloj. —
Leipzig, 1924,
p. 128-132.

Mallongigita roman-fragmento.

— Ni finas per melankoliaj meditoj de Nikolao Lozgačov, kiu tuj prezentos ilin en versa formo.

*Nikolaj Lozgačov*¹⁵

KIAL?

Ho, kial vivas sur la Tero
apude bono kaj malbono,
justulo kune kun fripono,
vivcerto kune kun despero?

Ho, kial vivas sur la Tero
apude vero kaj mensogo,
diskreto kune kun arogo
kaj ĝuo kune kun sufero?

Ho, kial vivas sur la Tero
genio kune kun profano,
heroo kune kun tirano,
palaco kune kun karcerero?

Ho, kial vivas sur la Tero
mizerikordo kaj kruelo
kaj klostro kune kun bordelo,
bonstato kune kun mizero?

Ho, kial vivas sur la Tero
abstino kaj dipsomanio,
honesto apud kalumnio...
kaj Paradizo, kaj Infero
kiel kunvivas sur la Tero?

Nikolaj Lozgačov. La tago de l' eterno. —
Sverdlovsk, 1987, p. 22.

— En la sekva kunveno ni diskutos pri ekonomiaj problemoj de Rusio kaj spektos slajdojn pri Zimbabvo, kiujn faris niaj klubanoj Arkadio Kulagin kaj Vadimo

Perfiljev, kiam ili gastis ĉe siaj Esperanto-amikoj en tiu fora afrika lando.

KOMENTARO

1. k.a. — kaj aliaj.
2. j.c. — jarcento.
3. de n.e. — de nia erao.
4. "Popola libero" — eksterleĝa revolucia organizaĵo en Rusio (1879-1889), kiu celis abolon de la carismo.
5. politikaj unuamajaj aranĝoj.
6. Tri Rusiaj revolucioj: 1905-1907, februaro 1917, oktobro (novembro laŭ la gregoria kalendaro) 1917.
7. VCIK — rusa mallongigo por Tutrusia Centra Plenuma Komitato (de Sovetoj).
8. UK — Universala Kongreso de Esperanto.
9. Pseŭdosufikso — elemento, ofte ripetiganta ĉe fino de vortoj, kiu estas parto de radiko.
10. Jean Forge /Ĵan Forĵ/. Pseŭdonimo de Jan Fethke /Fétke/ (1903-1980). Pola filmreĝisoro. Esperantistiĝis en 1919. Kelkaj liaj libroj: "Abismoj", "Mia verda breviero", "Mr. Tot aĉetas mil okulojn", "La verda raketo". Reĝisoro de la esperantlingva kinofilm "Morgaŭ komenciĝos la vivo".
11. /Márkus/.
12. Se juĝi laŭ antikvaj skriboj, tiamaj grekoj kaj romianoj trinkadis neimageblajn kvantojn da vino. Oni povus supozi, ke ili ĉiuj estis alkoholuloj. Sed la sekreto solviĝas simple: la nefortan sekan vinon ili miksis kun akvo en la proporcio unu al ok. Do eltrinko de (hodiaŭa) sitelo da tia trinkaĵo ne devus esti tro ebriiga.
13. /Popéa/.
14. cezaro.
15. Lozgačov Nikolaj Viktoroviĉ. Naskiĝis en 1957. Esperantistiĝis en 1981. Inĝeniero en Urala urbo Permo. Verkas versaĵojn, eseojn, recenzojn.

LINGVA PRAKTIKO

La ruĝa standardo

1. Donu titolon al ĉiu alineo, kio kune formu planon de la teksto.
2. Respondu la demandojn:
 - a) En kiuj situacioj estas uzata la ŝtata flago?
 - b) Kion simbolas la serpo kaj la martelo?
 - c) Kion simbolas la verda stelo?
 - ĉ) En kiuj situacioj, laŭ via opinio, estas uzebla la esperantista standardo?
 - d) Kion simbolas diversaj koloroj?
 - e) Kiujn kolorojn havas konataj al vi flagoj?

Neologismoj — por kaj kontraŭ

3. Prezentu vian rilaton al la problemo de neologismoj en Esperanto.

Saltego trans jarmiloj

4. Elektu ĉion, kio rilatas al Nerono. Per kiaj rime-
doj estas atingata karikatureco de lia bildo?
5. Kiujn strangaĵojn en la konduto de romianoj vidas
la rakontanto-nuntempulo?
6. Trovu antitezojn “romianoj — nuntempuloj”. Ĉu
ankaŭ en ebria stato ili nete diferencas unuj de la aliaj?
7. Transformu ĉiujn taŭgajn vortojn el la teksto en
vortojn kun la prefikso *mal-* (ekzemple: nokto — mal-
tago, piedoj — malmanoj, moderna — malantikva, jes —
malne); ne gravas, ke multaj vortoj aspektos strange kaj
amuze, gravas, ke ili estu formitaj regule.
8. Prezentu la enhavon de la teksto, kiel ĝin rakontus
Nerono.

Kial?

9. Kiuj antitezoj de la versaĵo estas absolutaj kaj
kiuj — kuntekstaj? Diru aliajn antitezojn, kiuj taŭgas
por ĉi tiu versaĵo.

10. Formu vortojn laŭ la modeloj: ruĝ-standard-ulo,
cent-jar-ulo, hejm-sid-ulo.

11. Formu kiel eble plej multe da vortoj kun la su-
fikso *-ism-*, inkluzive vortojn por neekzistantaj “ismoj”
(la lastajn laŭeble klarigu).

12. Formu frazojn laŭ la modelo: ...a ...o iĝis ...o de
...o (ekzemple: la ruĝa standardo iĝis simbolo de bat-
alo).

13. Metu po unu vorton anstataŭ la tripunkto:

Kun kiu vi ... , tia vi estas. Kio nin ne ... , kuŝu
kiel kuŝas. Kie lumo ekzistas, ankaŭ ... troviĝas. Ebri-
eco pasas post dormo, ... pasas neniam. Kien kudrilo
iras, tien ... ĝi tiras. Per vorto ... ĉio estas facila. Ĉiu
vulpo sian ... laŭdas. Hundo ... , homo vojas.

14. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paroni-
moj:

Obstino — abstino, humila — humida, boato — boto,
trakti — treti, novulo — novelo — novalo.

15. Kvizo pri Esperantaj temoj:

- a) Kiel aspektas la esperantista standardo?
- b) Kio estas neologismo?
- c) Kies pseŭdonimo estas Jean Forge?
- ĉ) Kie loĝas Nokolaj Lozgačov?

16. Temo por diskuto aŭ rakonto: Ĉe botisto la ŝuo
estas ĉiam kun truo.

17. Imagu, ke antaŭ kelkaj tagoj en vian urbon venis
per tempomaŝino grupo da antikvaj romianoj. Priskribu
iliajn aventurojn.

LECIONO 24

— Antaŭ nelonge Viktoro Kojemjako kaj Jurio Ĥarlanov revenis el Luksemburgo, ĉefurbo de la ŝtato Luksemburgio. Aŭskultu ilian rakonton.

EN LA MILJARA LUKSEMBURGO

“Gardu la kapojn!” — kriis la ĉiĉerono. Kaj ĝustatempe: en duonobskuro de la subterejo ni mirakle evitis karambolon kun malalta ŝtona volbo de la streta pasejo, kondukanta en la kazematojn de la antikva fortreso. Ĝi dominas super la urbo. Por ascendi al ĝi, ni devis sufiĉe peni, grimpante sur la pado de kruta holmo, poste ni trafis en multbranĉajn kavernojn, kiuj memorigas la katakombojn en Odeso. Eblas imagi, kiom da laboro donis la prauloj de la nunaj luksemburganoj por trahaki en la roko sur diversaj niveloj tiujn zigzagajn koridorojn, kuniĝantajn per stretaj meandraj ŝtuparoj.

Centoj da jaroj ruliĝis ĉi tie, sur la kruciĝo de Eŭropaj vojoj, kaj por luksemburganoj ili estas markitaj de konstanta batalo por sendependeco.

Kaj nun, per la manoj sentante malvarmon de mezepokaj kanonoj, tra breĉoj de embrazuroj ni admiras la panoramon de la urbo kaj ties smerald-verdajn ĉirkaŭaĵojn. Diverskoloraj tegoloj de tegmentoj, akraj pintoj de temploj, multkolora ornama reklamo — ĉio ĉi, inundita de la hela suno, faras festan impreson. Briletante en kristala bluo de aŭtuna tago, fluas strie du riveroj, super kiuj kuŝas malnovaj multarkaj ŝtonaj pontoj, havantaj la saman koloron kiel la antikvaj turoj kaj bastionoj. Kaj samtie, bruske elstarante sur ilia fono, etendiĝas ne nur super la akvo, sed ankaŭ super kelkaj urbaj kvartaloj, sage rekta ŝtala ponto “Dukino Ŝarlota”. Ĝi direktiĝas en la modernisme konstruitan apudurbon.

Jen kie tuj videblas, ke Luksemburgo estas unu el la plej gravaj administraj kaj financaj centroj de la “Kommuna merkato”. Eŭropa parlamento, Eŭropa juĝejo, Eŭ-

ropa kontrolo... Unuvorte, kiel oni diras ĉi tie, Eŭropa centro.

... Ĉu ne estas paradokso, ke apud ses kaj duona miloj da kamparanoj ĉi tie estas ĉirkaŭ 13 mil bankaj oficistoj? Duoble pli! Tio estas ligita, nature, kun abrupta plinombrigo de bankoj en la lando. Kiam oni veturas tra la ĉefurbo, antaŭ la okuloj svarmas iliaj nomoj. Pli ol 120 bankoj operacias ĉi tie. Eksterlandaj bankoj jam donas al la fisko 15-20% de la ŝtataj enspezoj. Kurte dirante, Luksemburgio ĉiam pli konkurencas kun la fama ĉi-rilate Svislando.

Luksemburgio famas kiel produktanto de altkvalita ŝtalo: ties porkapa produktado je 370 mil de la loĝantaro (unu moskva distrikto!) estas pli granda, ol kie ajn en la mondo. Sed tio estas, supozeble, ankaŭ la plej verda lando de Okcidenta Eŭropo. Arbaroj ĉi tie okupas preskaŭ trionon de la tuta teritorio.

Konvenas diri, ke la tuta Granda Duklando longas 82 kilometrojn de nordo suden kaj 57 — de oriento okcidenten. Tio estas, unu nia distrikto en konsisto de regiono. La luksemburgianoj ŝercas: “Nia lando estas la plej granda inter la malgrandaj, kaj la malplej granda — inter la grandaj landoj”.

Tamen estas vere mirinda fakto, ke sur tiom malgranda surfaco estas koncentrita tia varieco de la naturo. Sude sterniĝas masivoj de vinberecoj, kaj norde troviĝas prizorgitaj arbaroj, kie miksiĝas piceo kaj tremolo.

La germanoj okupis Luksemburgion la 10-an de majo 1940, perfide rompinte ĝian neŭtralecon: sen ia averto. Tiam la faŝistoj, cetere, kalkulis, ke ili havos nenian klopodojn kun tiu pita lando.

Ili miskalkulis! Jam la unua ago — enketado de la loĝantoj pri ilia nacieco kaj lingvo — fiaskis. La nazioj senambigue komprenigis, kiun respondon ili atendas. Ĉar por ili tiu lando estis germana lando — ja tie estas uzata unu el la dialektoj de la germana lingvo. Sed la respondo estis jena: ni rigardas nin luksemburgianoj. Poste, multaj foriris al gerilo. En 1942, kiam la nazioj anoncis rekrutadon de luksemburgianoj en la germanan armeon, eksplodis totala striko.

Furiozaj pro la kreskanta kontraŭstaro, la faŝistoj torentigis sur la loĝantojn, precipe komunistojn, kruele-gajn reprezaliojn. Centoj da luksemburgianoj estis paf-ekzekutitaj, ĵetitaj en prizonojn kaj koncentrejojn. Multaj submetiĝis al rafinitaj torturoj, kiuj ofte finiĝis je morto.

... Sur iu turista mapo Luksemburgio estas prezentita en la formo de malgranda verda koro. Jen tia kortuŝa simbolo. Krome, kiam oni pensas pri tiu pita lando, ĝi ŝajnas minca kana tigeto en la centro de severaj eŭropaj ventoj.

La fieraj kaj sendependa, honesta kaj diligenta popolo, vivanta ĉi tie, havas rajton je feliĉo.

V. Kojemjako, J. Ĥarlanov. V tisjaĉletnem Luksemburge. // Pravda, 27.11.1987. Mallongigita traduko.

— Ankaŭ mi havis bonŝancon viziti Luksemburgion. Estas paradokse, ke ĝi impresas kiel sufiĉe granda lando: kun pluraj urboj kaj tiel nomataj vilaĝoj, kiuj similas al bone aranĝitaj urbetoj. Vere, la naturo estas varia: kampoj, ĝardenoj, holmoj, riveroj kaj arbaroj, arbaroj, arbaroj. Kaj superbaj vojoj. Kaj domoj negrandaj, originalaj, oportunaj. Apude — supermodernaj domegoj — rando de la ĉefurbo. Estis aparta plezuro sidi en apudhejma ĝardeno en kompanio de amikoj — luksemburgaj esperantistoj, bonege parolantaj Esperante.

— Hodiaŭ en nia klubo gastas pola esperantisto Joachim Werdin /Joáĥim Vérdin/, kiu travojaĝis multajn landojn, propagandante kaj instruante Esperanton. Li deziras paroli pri perspektivoj de novaj esperantistoj.

“KAJ POST LA KURSO, KION?”

Kion mi faros, kiam mi scios Esperanton? Ĉu mi povos uzi Esperanton? Kiun profiton mi havos el Esperanto?

Tiujn kaj similajn demandojn ankaŭ vi aŭdis eble de viaj kursanoj, eble de personoj, al kiuj vi konsilis lerni

la lingvon. Ĉu ni povas doni kontentigajn respondojn? Mi invitas vin al diskuto pri tio, kaj jen miaj respondoj.

1. Sendube vi povas *korespondi*. Miloj da homoj volas skribi leterojn al aliuloj per la neŭtrala lingvo. Vi trovos korespondemulojn el kelkaj dekoj da landoj, se vi volos. La adresoj estas en pluraj Esperantaj gazetoj, ankaŭ vi povas aperigi anoncon tie, cetere ne nur pri la korespondemo. Ekzistas apartaj servoj por faciligi trovon de korespondemulo¹.

2. *Partoprenu en esperantistaj aranĝoj* naciaj kaj internaciaj. Miloj da ili okazas ĉiujare. La plej konataj estas la kongresoj de UEA kaj TEJO, konferencoj de fakaj organizaĵoj, kulturaj aranĝoj de esperantistaj centroj, internaciaj feriadoj kaj tendaroj².

3. *Aŭskultu* radiajn elsendojn en Esperanto por ekscii diversajn aferojn el pluraj landoj³.

4. *Abonu* Esperantajn gazetojn: vi povas regule ricevi kelkajn dekojn da ili⁴. Ili estas riĉa fonto de informoj.

5. *Verku* por Esperantaj gazetoj. Multaj redaktistoj volonte akceptos viajn kontribuojn.

6. *Legu librojn* en Esperanto. Vi havos unikan ŝancon legi originalajn verkojn, kiuj ekzistas nur en la Esperanta literaturo. Vi povos ĝui ankaŭ bonajn tradukojn (el naciaj literaturoj) de famaj verkoj. Ĉiu trovas ion por si⁵.

7. *Verku aŭ traduku libron* kaj tiel vi kontribuos al pliriĉigo de la Esperanta (aŭ via nacia) literaturo⁶.

8. *Evoluigu vian interesigon*. Funkcias pli ol 50 fakaj organizaĵoj internaciaj, kiuj uzas Esperanton oficiale; vi povas aliĝi al iuj. Tiel vi kontaktos homojn, kiujn interesas la sama afero, do vi povos aktivi internaciskale.

9. Uzu Esperanton en via *profesia laboro*. Vi povas kontakti esperantistojn, kiuj havas saman profesion kiel vi, kaj evoluigi vian kunlaboron internaciskale. Tiel vi kontribuos al profesiigo de Esperanto⁷.

10. *Studu aŭ instru* en Akademio Internacia de la Sciencoj en Sanmarino. Unu el la oficialaj lingvoj de la akademio estas Esperanto.

11. *Turismu* per Esperanto⁸. Kiam vi vojaĝas per neesperantistaj entreprenoj, vi vizitas lokojn kaj objektojn.

Kiam vi vojaĝas per esperantista entrepreno, vi vizitas ĉion ĉi kaj ankaŭ amikiĝas kun homoj, vizitante anojn de la loka movado. Krome, pluraj Esperantaj entreprenoj ofertas relative nemultekostan turismadon. Eble, vi volos uzi ankaŭ Pasportan servon de TEJO⁹; unue membriĝu al ĝi. Biciklu kun esperantistoj: Biciklista Esperantista Movado Internacia aranĝos tion por vi.

12. Fondu *internacian entreprenon* (komercan, turisman aŭ alian). Pluraj esperantistoj interesiĝas pri tio¹⁰.

13. Vi povas ankaŭ *instrui* Esperanton. Ĉie sur Tero mankas kompetentaj instruistoj de la lingvo¹¹.

Tiuj supraj ekzemploj konsistigas ne ĉiujn eblojn de esperantoscio, krome ili estas ĝeneralaj. Ĉu vi alimaniere respondus la demandon?

Esperanto, 1990, N^o 1, p. 10. Mallongigita.

— Kiam mi relegis antaŭ nelonge la novelon "Tertremo", mi estis konsternita pro tio, ke la aŭtoro kvazaŭ antaŭvidus faktojn, ligitajn kun la katastrofa tertremo en Armenio en decembro 1988.

*Mauro Nervi*¹²

TERTREMO

Kiam la varietea spektaklo subite interrompiĝis, s-ro B., 51-jara prokuratoro¹³ de la ĉefurbo, ankoraŭ duondormis en sia vasta pufseĝo. Elmergiĝante malrapide al plena konscio, li blasfeme sakris kontraŭ la kuiristino, kiu tiuvespere atencis lian hepaton per frititaj terpomoj kaj eksterordinare piprita kolbaso, sed lia indigno ek-svenis, kiam la bildoj sur la televidekrano atingis lin, jam complete vekigintan. Temis pri gravmiena anoncis-to; vere bedaŭrinde, ke la unuaj vortoj perdiĝis pro la dormo.

"... la plej katastrofa tertremo en la historio de nia lando. La tero furioze vibris dum ses longaj minutoj; gigantaj fendoj ekfaŭkis en la grundo. La ĉefstratoj kurbi-

ĝis kaj krispiĝis, dum ĉiuj sonoriloj ektintis pro la ter-movo: imponajn damaĝojn kaŭzis la rokegoj, kiuj ekruli-ĝis de sur la ĉirkaŭantaj montoj. La nombro de la pere-intoj estas ĝis nun nekalkulebla, sed laŭ optimisma pri-juĝo, la urbaj ruboj entenas milojn da kadavroj..."

Verdire, la novaĵo tiklis la scivolemon de B., preskaŭ instinkte li prenis glaseton da konjako de sur pleto al li proksima.

"La senhejmaj familioj plenigas jam la stratojn kaj la placojn, al tio aldoniĝas nun senĉesa pluvo, kiu jam de kelkaj minutoj falas torente sur la frakasitan urbon. Ni spektu tamen la bildojn, kiujn nia kameraisto rekte telesendas".

Ci tiam la homo malaperis, kaj sur la ekrano enfo-kusiĝis la nigra kubo de antaŭurba konstruaĵo. Kiam la kamerao alproksimiĝis, ekdistingiĝis maljuna virino, si-danta sur kvarpieda skabelo, ŝi ploris kap-en-mane.

"En tiu ĉi kvartalo mortis verŝajne pli ol 60%-oj de la loĝantaro. Ankoraŭ mankas informoj pri la nombro de la vunditoj".

Eltrinkinte la konjakon, B. remetis la glason sur la pleton, delikate.

"La tegmento de ĉi tiu domo falegis jam ĉe la unua ekskuo. La brikoj mortigis la tutan familion, escepte de la avino, kiu sukcesis elhejmiĝi tuj. Male, la flanko do-mo suferis neniun damaĝon, dank' al siaj pli fortikaj fundamentoj; rilate al tio, oni certe estigos enketan komisionon por esplori, ĉu efektive ĉiujn domojn oni ma-sonis laŭ la leĝaj dispozicioj".

La penso de B. tuj flugis al la sensacia proceso kont-raŭ la fifama arkitekto V., kaj kun ia fiereco li memo-ris, kiel lerte li asistis tiun fiulon. Vera krimulo, jen, kiu tamen honorariis per krezaj¹⁴ sumoj.

"Kompreneble, la infanoj konsistigas la plej teruran tragedion. Granda parto el ili pereis, multaj orfiĝis, kaj nun vagas senhelpe inter la ruinoj".

Sur la ekrano aperis kvinjara etulo, ploranta ĉe la kadavro de mortinta virino. B. profunde suspiris, kaj per la maldekstra mano ekkaptis frandan kukon.

"Pormomente oni muntis kelkajn tendojn, por ke la postvivintoj povu tranokti en seka ejo. Vi vidas unu el

la multaj ambulancoj, kiuj ĉi-momente kuradas tra la tuta urbo: la ĉefhospitalo plejparte ruiniĝis, kaj la vunditojn oni devas porti en la antaŭurbajn klinikojn”.

Sekvis longa paŭzo. Antaŭ la okuloj de B. preterkuris la bildoj de granda urbo preskaŭ tute forbalaita far¹⁵ titana kataklismo: blankaj kuracistoj aperadis de temp’ al tempo inter la brunaj restaĵoj de pluretaĝaj domoj. Multaj junuloj ŝovelis la amasojn da rubo. Ĉiam, kiam el sub la brikoj oni eltiris novan vunditon aŭ kadavron, la kamerao tuj alglitis por pli bone evidentigi la misformitajn vizaĝojn kaj la nigrajn sangokrustojn.

Dume, B. atendis la nomon de la urbo kun ia streĉiteco. Temis ja pri urbo en la Sudo, kie jam antaŭ kelkaj jaroj okazis io simila, kvankam malpli katastrofa.

Dum kelkaj sekundoj surekranigis panorama bildo de la urbo, kaj malgraŭ la nokto oni klare distingis la fordetruitajn palacojn. Stranga maltrankvilo ekserpentis en la menso de B.

“Laŭ multaj atestantoj, en ĉiuj kvartaloj la hundoj freneze ekbojis unu-du minutojn antaŭ la tragedio: kaj pluraj homoj ŝuldas sian vivon ĝuste al tiu konata averto. Krepuskas do la sangoplena vespero, dum kiu...”

La kutima bombasto, pensis B. Kaj tamen lia ŝajne senkaŭza maltrankvilo fariĝis pli akra, kaj fine B. ekkonsciis ĝin.

“... dum kiu teruro kaj malespero miksiĝis kun la polvo de la disfalantaj palacoj. La tertremo...”

La bildoj sekvis ĉiam pli rapide. Ili enhavis ion tre konatan, kion B. rimarkis nur iom post iom: la arboj, la stratoj... B. stariĝis subite. Ekstere la nokta ĉielo plenumiĝis, kaj hundo ekbojis malproksime.

“... La tertremo trafis ĉiujn, riĉulojn kaj malriĉulojn, inter la pereintaj eminentuloj ni citu urbestron Z., urbokomitatanon F. ... nu, ni vidas, ke oni ĵus elŝovelis prokuratoron B. ...”

B. horore vidis sur la ekrano sian korpon, frakasitan de brikoj. Blanka kuracisto kovris ĝin per griza tolaĵo. Plumba silento. Kio okazas? KIO OKAZAS?

La planko ekvibris sub liaj piedoj.

Baza literatura krestomatio. —
Budapest, 1986, p. 254-257.

— Ni finu la literaturan parton de la kunveno per io gaja, per fablo.

*Reto Rossetti*¹⁶

KRITIKO

Dresita Urso de cigano
eklernis danci dupiede.
Ĝi sin ekzercis laŭ la plano
fiere, daŭre kaj obsede.

Jen al Simio ĝi demandis:
“Ĉu Homon mi ne rolas lerte?”
Kaj ĉi fakulo tuj respondis:
“Ho, nur malbone, tute certe!”

La Urso diris ne kontente:
“Vi ja kritikis min envie!
Ĉu mi ne gestas elokvente?
Ĉu mi ne paŝas do gracie?”

Ĉeestis Porko, kiu donis
aprobon vikle senhezitan:
“Belege! Mi neniam konis
artiston tiel rafinitan!”

Nu, kiam tiu laŭdo sonis,
la Urso paŭzis konsidere.
Jam pli modeste ĝi rezonis,
kaj fine ĝi konkludis: “Vere,

kiam Simio min mallaŭdis,
en mi la dubo sin balancis;
sed kiam Porko min aplaŭdis,
do certe mi malbone dancis!”

Verkisto, lernu do admone
el tiu fabla histori’:
Se Kler’ kondamnas — jam malbone;
se Stulto laŭdas — tiom pli!

Esperanta antologio: Poemoj 1887-1981. —
Rotterdam, 1984, p. 444-445.

— Post semajno ni aranĝos en la klubo vesperon de kursfinintoj kun koncerto, enmanigo de atestoj kaj teumado. En la fino de la vespero ni spektos videofilmon pri Jugoslavio, kiun faris niaj klubanoj Teodoro Korolkov, Genadio Mironov kaj Romano Celikov, ripozante la pasintan someron en internacia Esperanto-tendaro ĉe Adriatiko.

KOMENTARO

1. Ĉe UEA funkcias Koresponda Servo Mondskala. Ankaŭ en apartaj landoj estas similaj Esperanto-servoj.
2. Kalendaroj de esperantistaj aranĝoj estas publikigataj en la ĉefaj movadaj gazetoj "Esperanto" kaj "Heroldo de Esperanto", ankaŭ en informiloj de REU kaj de aliaj landaj organizaĵoj.
3. Vidu la tekston "La radio kontraŭ la malbeno de Babelturo" (leciono 10).
4. Krom la du menciitaj tre popularaj gazetoj, jen kelkaj aliaj titoloj: "Moskva Gazeto", "La espero el Koreio", "Paco", "Bulgara esperantisto", "Juna amiko", "El popola Ĉinio", "Internacia pedagogia revuo", "Monato", "Ekonomia bulteno pri Usono", "Fonto", "Literatura foiro", "Kontakto", "Scienca revuo", "Sennaculo", "TEJO tutmonde", "Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj".
5. Atentu, ke finante studi tiun ĉi lernolibron, vi jam bone orientiĝas en la Esperanta literaturo kaj povas facile legi kiun ajn libron.
6. kaj nepre petu spertajn lingvoparolantojn, laŭeble alilandajn, legi viajn verkojn kaj doni konsilojn.
7. Precipe gravas utiligo de Esperanto en la scienco.
8. Vidu la tekston "Ferioj" (leciono 2).
9. Pasporta servo: tiel nomiĝas la populara gastiga servo de TEJO. Ĝia celo estas faciligi la internacian vojaĝadon, donante al la uzantoj la eblon gastii ĉe esperantistoj.
10. Vere, kial ne provi? Sed anticipu konsultu fakulojn kaj spertulojn kaj bone ĉion pripensu.

11. Oni povas ekzameniĝi ĉe UEA, REU kaj aliaj aŭtoritataj organizaĵoj kaj ricevi diplomon de Esperanto-instruisto. En kelkaj landoj tutjare funkcias internaciaj Esperanto-lernejoj, ekzemple, en Bulgario kaj Svislando.

12. Mauro /Maŭro/ Nervi. Naskiĝis en 1959. Italo. Esperantistiĝis en 1975. Aŭtoro de la libro "La turoj de l' ĉefurbo".

13. ĉi tie: membro de la urba estraro.

14. Krezo — lasta reĝo de Lidujo, fama pro siaj riĉaĵoj.

15. Far = (fare) de

16. Vidu la komenton 6 en la leciono 22.

LINGVA PRAKTIKO

En la miljara Luksemburgo

1. Imagu, ke post ekskurso en Luksemburgio kaj ĝia ĉefurbo Luksemburgo vi gastas en hejmo de lokaj esperantistoj; vi interŝanĝas kun ili impresojn pri vidindaĵoj kaj la historio de la lando.

"Kaj post la kurso, kion?"

2. Rakontu pri tio, kiel vi uzis Esperanton, kiel vi intencas aŭ deziras ĝin uzi. Kiujn ideojn vi havas rilate praktikan uzadon de Esperanto?

Tertremo

3. Per kiuj rimedoj la aŭtoro montras ŝanĝiĝon de la etoso?

4. Klarigu, kial kaj en kiuj cirkonstancoj la heroo de la novelo vidas sian kadavron. Kio okazis?

5. Prezentu la enhavon de la teksto en la formo de radiospektaklo.

Kritiko

6. Rerakontu la fablon proze kun viaj propraj komentoj. Se vi konas iun fablon, en kiu rolas Simio, Urso aŭ Porko, rakontu ĝian enhavon.

7. Formu vortojn kun la prefikso *fi-* de taŭgaj por tio vortoj el la tekstoj de la leciono.

8. Al la frazeoj el la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu bojas,	havas mielon.
Kiu bone ŝmiras,	mem sin malbenas.
Kiu havas abelojn,	tiu ne mordas.
Kiu kaŝon aranĝas,	kaptas neniom.
Kiu langon ne tenas,	tiu mem manĝas.
Kiu ĉasas du leporojn,	bone veturas.

9. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Konsisti — asisti, strikta — streta, domaĝi — damaĝi, ŝovi — ŝoveli, atendi — atenti — atenci.

10. Kvizo pri Esperantaj temoj:

- a) Pri kio estas konata Joachim Werdin?
 - b) Kiu servo de UEA helpas akiri adresojn por korespondado?
 - c) Nomu titolojn de kelkaj Esperanto-gazetoj.
 - ĉ) Kio estas Pasporta servo?
 - d) Kie oni povas ekzameniĝi por ricevi diplomon de Esperanto-instruisto?
 - e) Kiun libron verkis Mauro Nervi?
11. Temo por diskuto aŭ rakonto: Ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan.
12. Imagu, ke vi prenas intervjuon de la prezidanto de UEA por la gazeto "Heroldo de Esperanto".

LECIONO 25

— Pri Andrej Dmitrijeviĉ Saŝarov (1921-1989) oni povas paroli multe. Se diri mallonge, li estis Homo, Civitano, Sciencisto. Ĉio kun majusklo. Hodiaŭ Sergeo Leskov rakontos nur pri unu, la plej malfacila, periodo de la vivo de Saŝarov. La rakonto nomiĝas "Amara ekzilo" alude al la rusa vorto "gorjkij" (amara), ĉar la Sciencisto estis ekzilita en la urbon Gorjkij (esperantigita formo — Gorkio, kiu estis fermita por eksterlandanoj; nun la urbo rricevis sian malnovan nomon Nijnij Novgorod).


AMARA EKZILO

En la lastaj tagoj de decembro 1979 limigita (kiel informis oficiala komunikaĵo) kontingento de sovetiaj trupoj eniris Afganion por realigo de internaciisma helpo. Sed jam en la unuaj tagoj post la enigado de la trupoj, en nia lando sentime eksonis protesta voĉo. Akademiano Andrej Dmitrijeviĉ Saŝarov trifoje faras deklarojn, organizas gazetarajn konferencojn, kie li malaprobis tiun agon kaj alvokas la sovetiajn estrojn revenigi la trupojn sur sian teritorion.

Ĉu nur lia pozicio pri Afganio iĝis la kaŭzo por ekzili lin en la urbon Gorkio? Ne, malkontento pri la sciencisto, kiu esprimadis herezajn ideojn pri reformado de la socio de "evoluinta socialismo" kaj permesis al si havi propran opinion pri bilanco de mondaj armilaroj, maturiĝis delonge. Juĝigi lin oni timis, kaj ne troveblis kaŭzo por tio, do oni decidis izoli lin for de la ekstera mondo.

Apenaŭ elirinte el la aviadilo, Saŝarov skribis malfermitan leteron pri kontraŭleĝeco de sia ekzilo kun postulo de malfermita juĝo super si. La ondo de protestoj kontraŭ lia ekzilo ekregis vastajn tavolojn de la monda socio.

Antaŭ la pordo de Saŝarov tutdiurne deĵoris milicisto, reveniganta ĉiujn, kiuj ne havis specialan permeson.



Eksterhejme lian etan “Ĵigulon”¹ akompanadis nigra “Volgo”². Fotoaparaton, kinoaparaton, magnetofonon, radioricevilon, eĉ tajpilon oni konfiskis dum traserĉo. Telefono en la loĝejo, kompreneble, forestis. Kaj eĉ uzi stratan telefonon post ioma tempo jam estis malpermesite. Sed ĉiamaniere Andrej Dmitrijeviĉ penis akiri ligan kun la ekstera mondo, kaŝe transsendis leterojn, protestojn, artikolojn, deklarojn.

Pri la fiziko li pensis ĉiam kaj kunigis en si tiajn kvalitojn, kiuj starigis lin en la vicon de la plej grandaj sciencistoj de nia jarcento. Ne nur kreo de la hidrogena bombo, sed aro da aliaj principaj sugestoj ebligas al multaj fakuloj nomi Saŝarov-on “genio de l’ fiziko”. En Gorkio li kreis sep teoriajn verkojn pri fiziko, kaj ĉiu el ili povas iĝi komenco de nova direkto en la scienco.

Ĉi tie li kreis ankaŭ unu el siaj ĉefaj sociaj verkoj — “Danĝero de termonuklea milito”, en kiu estas prezen-

titaj konsideroj pri konkreta scenaro de totala malarmado kaj ties etapo, pri nepro de kompromisoj en tiu ĉi procezo, pri evitigo eĉ de lokaj konfliktoj, pri “malfermiteco” de la socio kiel garantio de packonservado.

Kiam apud la nomo de Saŝarov ankoraŭ sonis ofendaj epitetoj, ekrealiĝis utopi-ŝajnaj ideoj de la sciencisto pri malarmado, ekplifortiĝis humanismaj tendencoj, ekŝanĝiĝis la ĝenerala politika situacio en la lando kaj en la mondo. Sed eĉ en la jaro 1986 oni ne permesis al Saŝarov, malgraŭ lia peto, partopreni en likvido de sekvoj de la Ĉernobila katastrofo³, kvankam ĝuste lia saĝo povus esti tie neanstataŭigebla.

Sed la perestrojko akceliĝis. Izolado de la homo, kiu alvokis ĝin, iĝis absurdo. La 15-an de decembro 1986 malfru-vespere en la Gorkia loĝejo estis instalita telefono, kaj post du tagoj okazis interparolo de M.S. Gorbaĉov kaj A.D. Saŝarov. Andrej Dmitrijeviĉ, espriminte dankon, tuj diris, ke lian ĝojon ombras la sorto de politikaj malliberuloj. Poste estis ankoraŭ multe da disputoj inter M.S. Gorbaĉov kaj A.D. Saŝarov⁴, sed ili okazis antaŭ ĉies okuloj kaj sendube servis tion, ke la perestrojko evoluu, venkante sur sia vojo malfacilaĵojn kaj kontraŭdirojn.

A.D. Saŝarov restigis post si ne nur kaj ne ĉefe politikajn iniciatojn; li pruvis, ke la vortoj *honesteco*, *nobleco de animo*, *fideleco al idealoj* — tiuj multoble trivialigitaj vortoj havas vivan karnon, kaj ke la homo povas konservi ilin en ĉia tempo.

Nome tio estas la “skolo”, kiun postlasis Andrej Dmitrijeviĉ Saŝarov, la morala leciono, kiun li donis.

Sergej Leskov. Gorĵkaja ssilka. //
Izvestija, 1990, N^o 27. Mallongigita traduko.

— La 15-an de decembro la esperantistoj celebras la naskiĝtagon de Lazarj Markoviĉ (Ludoviko Lazaro) Zamenhof. Certe, por multaj li estas historia figuro, kaj oni malfacile imagas lin kiel homon. Sed en Zamenhof estis nenio monumenteca. Do ni provu imagi lin laŭ la sekva rakonto.



Gaston Waringhien

ZAMENHOF KIEL HOMO

Li estis malaltstatura, kun forta barbo brune-griza kaj frutempe kalva kapo. Ĉiam nigre vestita, li portis por-miopajn, orkadritajn okulvitrojn, kiujn li neniam demetis. Li ne estis oratoro, parolis milde kaj mallaŭte, kaj, laŭ la maniero de la litovaj judoj, prononcis *ŝ* preskaŭ kiel *s*. Li multe fumis, precipe cigaredojn. Jam de ĉirkaŭ la jaro 1900 li suferis je malforteco de la koro kaj manko de pulso en la piedoj. Tial, kiam liaj enspezoj tion ebligis, li vizitis somere germanajn ban-urbojn. Li heredis la pedantan ord-amon de sia patro, kaj nur dank' al tio li povis retrovi sin en siaj kalkuloj de eldo-

nisto, de librovendisto kaj de kontraktanto kun Hachette⁵. Absolute senruza en la komercaj aferoj, dolore spertinte la valoron de la mono, li tamen neniam cedis al ĝia allogo, plurfoje fiere rifuzis la helpon de sinceraj admirantoj, kaj mem ne ŝparis siajn helpojn al malriĉuloj. Li estis timema antaŭ la publiko kaj malinklinis al la oficialaj ceremonioj, kiujn li partoprenis nur pro la bono de Esperanto. Nature modesta kaj pacema, li ĉiam penis mildigi ĉiujn konfliktojn ĉirkaŭ si kaj neniam montris ian resenton kontraŭ siaj ofendintoj. Eĉ al tiu, kiu lin plej kruele perfidis, Louis de Beaufront⁶, li ĝis la fino volis helpi kaj skribis por li mirige pardoneman leteron. Li estis unu el tiuj maloftaj homoj, kiuj ludis gravan internacian rolon, kaj tamen havas nenion por timi el la publikigo de sia korespondajaro: ĝi rivelas nur lian denaskan ĝentilecon, lian profundan sincerecon kaj lian altan senton pri justeco.

Sed plej gravaj trajtoj de lia karaktero estis la volforto, per kiu li ĉion oferis por siaj idealoj, kaj la pacienco obstino, per kiu li forpuŝis ĉiujn obstaklojn al ilia efektiviĝado. Kaj tiun volforton kaj tiun paciencan li ĉerpis el la vere senmezura amo, kiu instigis lin alporti, per ĉiuj fortoj de sia korpo kaj spirito, iom da konsolo al tiu fizike kaj morale blindiĝinta homaro en plenumado de la antikva orakolo: "Konsolu, konsolu mian popolon!" (Jesaja XL, 1).

Gaston Waringhien. 1887 kaj la sekvo... — Antverpeno — La Laguna, 1980, p. 21-22.

— Kiam ni relegas kongresajn paroladojn de Ludoviko Zamenhof, ni vidas, ke ili estas bonege aranĝitaj el la stilistika kaj retorika vidpunktoj, kaj tial ili tre efikas al la sentoj kaj al la menso⁷. Li posedis parolon logikan kaj samtempe bildecan, kion ni povas vidi el jena lia letero pri novaj naturalismaj projektoj de lingvo internacia. Atentu, ke ĝi estas ordinara privata letero, sed ne literatura verko.



Ludoviko Zamenhof

PRI NOVAJ PROJEKTOJ DE INTERNACIA LINGVO

(letero al Dow /Daŭ/, 21.02.1907)

Via granda batalado kontraŭ la diversaj projektoj de novaj lingvoj ŝajnas al mi tute superflua, ĉar laŭ mia opinio vi batalas kontraŭ fantomoj. Iŝi dissendas leterojn al diversaj personoj, kiuj *komprenas la plej gravajn eŭropajn lingvojn* kaj poste ili trumpetas al la mondo, ke tiuj personoj tuj komprenis iliajn leterojn pli ol leterojn en Esperanto. Sed tio ĉi estas ja nur trompa iluzio, kiun multaj personoj bedaŭrinde ne rimarkas, sed kiu tuj aperos, kiam oni volos *lerni* ilian lingvon. *Poliglota*j personoj facile komprenas ilin, ankaŭ se ili skribos *angle, france* aŭ *latine*; sed ĉu kolektoj de vortoj kompreneblaj por poliglotoj⁸ estas *lingvo* kaj povas servi al la *tuta mondo*?

Pri unu nutraĵo ejoj ĝi estas ankaŭ no, kiu ekkaptis la tuj donos al vi nu akvon, enmetis en saĵ *sataj* personoj ne estas multe pli la respondon "jes" lia nutraĵo estas la *malsata* kaj provis⁹ ro ekkriis: "Jes, vi tute ne estas nutra por ke ia miksaĵo nur digestebla por *nutra*.

L.L.
(Pier

— Bela parolado nun ne ĉesas aperi. Kaj iuj ĵurnaloj vol sensaciaj antaŭdiro la, eŭropeca, tutm ranto. Ekzemple, la nid-on, sed "Koms pro nekomprenebla ekton Uropi. Lasta tigi (precipe inter sur naturaj lingvo kun kiu eĉ Volap komprenebla lingvo precipe novaj, sent La supraj paroloj c tiu temo: la fanto povas aldoni, ke in projekto estas la sa kaj projekto de dc estas facile transfo

nan kaj longe loĝatan domon? Pri la kaŭzoj de la venko de Esperanto super ĉiuj kaj ĉiaj lingvoprojektoj legu la tekston "Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof" (leciono 15).

— La 15-a de decembro estas ankaŭ la Tago de Esperanta libro. Al tiu temo estas dediĉita la dua superrigardo, farita okaze de la 100-jariĝo de Esperanto. Ĝin prezentas la plej alta kompetentulo pri la Esperanta literaturo William Auld.

William Auld

CENT JAROJ DE LITERATURO EN ESPERANTO

Por D-ro Zamenhof literaturo estis ĉiam grava faktoro en la evoluo de lia lingvo kaj ties movado. Pro tio en la Unua Libro inkluzivigis ankaŭ poemoj, tradukitaj kaj originalaj; kaj pro tio li dediĉis dum tridek jaroj grandan parton de sia trookupata tempo al tradukado de literaturaj verkoj. Strange, dum la samaj tridek jaroj ne mankis esperantistoj, kiuj tion malaprobis. Tiu opinio ne povis sukcesi kontraŭ la plimulto, por kiu Esperanto estis afero emocia, enkorpigo de aspiroj al harmonio kaj paca kunvivado de la homoj, malgraŭ diferencoj gentaj, religiaj kaj sociaj.

Alia diskutpunkto inter la fruaj esperantistoj temis pri tio: se indas, ke Esperanto havu literaturon, ĉu tiu literaturo devus esti tradukita aŭ originala? Kiam aperis en 1907 la unua longa romano originale verkita en nia lingvo, "Kastelo de Prelongo"¹⁰, ĝi estis akceptita de kelkaj kiel defio kontraŭ tiuj, kiuj favoris nur tradukadon. Spuroj de tiu disputo estas rimarkeblaj iam-tiam en nia hodiaŭa movado. Per tradukado, oni argumentis, oni pravas la kapablecon de Esperanto redoni ĉiujn sencojn de la aliaj lingvoj. Tio estas ja vera; sed ĝi ignoras la fakton, ke Esperanto kapablas esprimi ankaŭ nuancojn, kiujn ne posedas aliaj lingvoj. Tiujn nuancojn trafas, kompreneble, nur niaj verkistoj originalaj, kiuj manipulas Esperanton ekster nacilingvaj kadroj.

Ofte la esperantistoj estas tro ekstremismaj, tro rigide difinas siajn poziciojn. Kiel dirite, Zamenhof jam en la Unua Libro difinis la dezirindon: literaturo *kaj* tradukita *kaj* originala, el kiuj ambaŭ kontribuas al la bonfarto kaj eĉ ekzisto de la lingvo. Tia estas la idealo, kaj tia estas nia literaturo centjara.

Jam en 1894, Zamenhof definitive pruvis la taŭgecon de la sepjara (!) lingvo por altnivela literatura tradukado, per la "Hamleto" de Ŝekspiro... Nun en mia biblioteko troviĝas literaturaj tradukoj en Esperanton el ne malpli ol cent diversaj lingvoj, el kiuj la plimultaj tradukoj ŝajnas kontentige adekvataj.

Pere de Esperanto oni povas jam nun tre bone sin eduki pri la mondliteraturo el la t.n.¹¹ grandaj lingvoj, sed ankaŭ tradukoj de ĉefverkoj en malpli disvastigitaj lingvoj, kies nacilingvaj tradukoj plejparte aŭ ne ekzistas, aŭ estas fuŝe tradukitaj, aŭ estas malfacile trovblaj.

Sed lingvo nur traduka vivus nur duone. Kaj verkemulo, kiu senpere pensas kaj sentas per iu lingvo, certe emos per tiu lingvo verki. Tiel estis en kazo de Esperanto, kaj pro tio naskiĝis la literaturo originala de tiu lingvo¹².

La evoluo de nia originala literaturo estas studobjekto interesa kaj instrua. Se, anstataŭ nei ĝian ekziston (neesperantistoj), aŭ lamenti, ke ĝi ne altiris sian Ŝekspiron (iuj esperantistoj), la homoj serioze studus ĝin, ili profitus eblecon tute unikan en la mondhistorio. Oni povas vidi la seninterrompan kreskon kaj evoluon de unu literatura kulturbazo ekde ĝia komenciĝo mem; kaj la lingvo de tiu literaturo estas la sola lingvo de sia speco. Kaj ĝi estas la sola literaturo kreita senkonsidere pri geografiaj limoj laŭ tutmonda skalo. Tio ne signifas, ke unuopaj verkoj malhavas geografian orientigon: Engholm¹³ videble verkis pri Svedujo, Varankin¹⁴ pri Soveunio, Schwartz¹⁵ pri Francujo kaj Germanujo, Linton¹⁶ pri Novgvineo, Miyamoto¹⁷ pri Japanujo ktp. Iliaj verkoj sciigas al ni multon pri la koncernaj medioj. Sed ili celis legantaron efektive tutmondan, kaj tio certe influis ilian verkmanieron, kaj sekve la literaturan tradicion de la lingvo.

Ĉu en Esperanto jam aperis verkoj, kiuj indas traduki en aliajn lingvojn? La respondo devas esti *jes* — ĉar tio jam okazis. Estas eldonitaj, ekzemple, “Kredu min, sinjorino!”¹⁸ en la hungara kaj la japana, “Metropoliteno”¹⁹ en la angla, “La infana raso”²⁰ en la nederlanda, “Mistero minora”²¹ en la pola, “Pri arto kaj morto”²² en la portugala ktp²³. Oni eĉ sukcese filmigis romanon de Jean Forge²⁴.

La literaturo de Esperanto estas jam tiel kreskinta, ke estas malfacile aliri ĝin...

El popola Ĉinio, 1987, N^o 4, p. 15-17. Mallongigita.

— Kaj ni finu per unu el la plej belaj kaj melodiecaj versaĵoj en Esperanto.

*Nikolaj Ĥoĥlov*²⁵

VINTRA FABELO

Sur la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo,
Kun tintila sonorad’
Ni veturas — aventuras, la ĉevaloj fluge kuras
Sub la stela miriad’.

En sereno de l’ ebena malaperas la fadeno
De la glata vintra voj’.
Mia Nita — am’ subita, de la frost’ ebrigiĝita
Alpremiĝas en la ĝoj’.

En fabelo kaj sen celo rotacias karuselo
De la sentoj en la kor’.
Hej, rapide kaj senbride flugi ien, flugi fide
Kun favoro de Amor’!

Hej, ĉevaloj, hufaj ŝtaloj, kiel rido de cimbaloj
Por dancanta ciganin’,
Uraganu, akompanu, dolĉe tiklu, ĝu-tiranu
Per freneza takto nin!

Brila neĝo — vintra reĝo — ĉion tenas en sieĝo,
Gaje ĉirpas en la knar’,
La survoja vento ĝoja en malklara gam’ hoboja
Vokas, logas al kampar’.

Unu suno — unu juno... la unua febra kuno
Kaj magia stelpoem’...
Mia Nita, am’ subita, de la frosto rozkisita
Ĉion kronas per alprem’!

N. Hohlov. La tajdo. — Kōln, 1928, p. 59-60.

— Okaze de Zamenhof-tago la kluba estraro decidis premii per valoraj Esperanto-libroj la klubanojn, kiuj estis tre aktivaj dum la jaro, tio estas: Vadimo Ĉirkov, Eleonora Zikina, Leonido Bujak, Alina Najdjonova, Demetro Kravĉenko, Galina Rozova, Andriano Vojnickij. Ni aplaŭde gratulu niajn aktivulojn!

— En la sekva kunveno ni aranĝos oratoran konkurson pri la temo “Esperanto — perfekta solvo de la internacilingva problemo”. Maksimuma daŭro de la oratorajo — dek minutoj. Poste ni pridiskutos problemojn de Esperanto-movado en la kondiĉoj de la merkata ekonomio, la aktualigantan demandon pri kreo kaj funkciigo de kunaj rusiaj-eksterlandaj Esperantaj entreprenoj kun miksita kapitalo, diversspecan kunlaboron kun internaciaj kaj eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj. Kaj ni renkontiĝos kun gastoj el Finnlando.

— Tute baldaŭ, dimanĉe la 27-an de decembro, ni havos ĝeneralan kunvenon de la klubo, en kiu ni pridiskutu ĉiujn aspektojn de la kluba laboro dum la jaro kaj elektu novan estraron. Bonvolu serioze prepariĝi por la kunveno, pripensi ideojn por perfektigo de nia komuna agado kaj proponi kandidatojn por la nova kluba estraro, kiu gvidos ĝin dum la sekva jaro.

KOMENTARO

1. “Ĵigulo” — marko de person-aŭtomobilo.

2. "Volgo" — marko de luksa person-aŭtomobilo.

3. Detalojn pri tiu katastrofo oni povas ekscii el la esperantlingva libro de Jurij Ŝčerbak "Ĉernobil", eldonita de "Progreso" en 1990.

4. en la kongreso de popolaj deputitoj, kies kunsid-ojn en la jaro 1989 la tuta lando atente sekvis per tele-vido.

5. Laŭ kontrakto kun Zamenhof, la fama franca eldonejo "Hachette" /Aŝét/ eldonis multe da valoraj libroj en Esperanto.

6. Louis de Beaufront /Luí de Bofrón/ (1855-1935) estis reprezentanto de Zamenhof antaŭ la Delegacio por alprenado de la lingvo internacia, sed anstataŭ defendi Esperanton, li prezentis al ĝi anonime sian projekton de reformita Esperanto sub la pseŭdonimo Ido. Tio rezultigis skismon inter la esperantistoj. Beaufront mem fariĝis ĉefo de la Ido-movado, kiu nun nombras, eble, 200-300 personojn. Vidu la komenton 5 en la leciono 21.

7. Vidu ekzemple la paroladon "Patriotismo kaj pseŭdopatriotismo" (leciono 9).

8. Prefere: poliglotoj.

9. Prefere: gustumis.

10. La aŭtoro estas Henri Vallienne /Anrí Valjén/ (1854-1908). Franco. Esperantistigis en 1903. Kuracisto. Lia alia romano — "Ĉu li?"

11. t.n. — tiel nomata.

12. La personoj nekompetentaj ofte atribuas al Esperanto iajn invadajn aspirojn: kvazaŭ ĝia celo estus anstataŭi ĉiujn lingvojn. Pruvon (?) de tio ili vidas en la ekzisto de la originala Esperanta literaturo (ekzemple, la konataj lingvistoj Reformatskij kaj Gornung). Kiel oni povus malpermesi al la homo verki en tiu lingvo, en kiu li emas verki? Ĉu tiun verkemon oni povus opinii lingva imperiismo? Mirinda (mal)logiko! Amuze, kiel la poeto Miĥail Lukonin patose eksklamaciis: "Neniam la nepoj verkos versojn en Esperanto!" (eble, liaj nepoj, honore al la avo malklera pri la mondlingva problemo, sed opinianta sin profeto; feliĉe, ne ĉiuj nepoj en la mondo estas nepoj de Miĥail Lukonin).

13. Stellan Engholm (1899-1960). Svedo. Esperantistigis en 1920. Instruisto. Kelkaj liaj libroj: "Per balono

al la poluso", "Homoj sur la tero", "Infanoj en Torento", "Vivo vokas".

14. Vidu la komenton 11 en la leciono 4.

15. Vidu la komenton 29 en la leciono 7.

16. Kenneth /Kénet/ Linton (1906-1985). Aŭstraliano. Verkis la libron "Kanakano el Kananam" — pri novgvineaj moroj.

17. Miyamoto /Mijamóto/ Masao (1913-1989). Japano. Esperantistigis en 1933. Profesia esperantisto. Aŭtoro de multaj libroj, inter ili "Kvin virinoj de amoro", "Japana kvodlibeto", "Invit' al japanesko", "Naskitaj sur la ruino", "Pri arto kaj morto", "Sarkasme kaj entuziasme", "La morta suito". Multe tradukis el la japana literaturo.

18. Vidu la tekston "Songo teruras, songo forkuras" (leciono 7).

19. Vidu la tekston "Metropoliteno" (leciono 4).

20. Vidu la komenton 4 en la leciono 22.

21. Vidu la komenton 7 en la leciono 22.

22. Vidu la komenton 17 en ĉi tiu leciono.

23. Oni aldonu multajn tradukojn de "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo" — vidu la tekston "La plej danĝera besto de la praarbaro" (leciono 13).

24. Vidu la komenton 10 en la leciono 23. Ĉi tie temas pri la filmo "Mil okuloj de d-ro Mabuse" de fama germana filmreĝisoro Fritz /Fric/ Lang laŭ la romano de J. Forge.

25. Ĥoĥlov (Hohlov) Nikolaj Ivanoviĉ (1891-1953). Esperantistigis en 1905. Ekonomiisto. Famiĝis pro la poezia libro "La tajdo". Tradukis kelkajn librojn, i.a. "Historio de la mondlingvo" de Ernest Drezen (4-a eldono en la Moskva eldonejo "Progreso").

LINGVA PRAKTIKO

Amara ekzilo

1. Konkize rerakontu la tekston kun viaj eventualaj komentoj kaj aldonoj.

Zamenhof kiel homo

2. Surbaze de ĉi tiu teksto kaj de informoj, aperintaj pli frue en la lernolibro, preparu por solena kunveno de via Esperanto-klubo prelegeton pri la temo "Ludoviko Zamenhof: vivo, idealoj, agado".

Pri novaj projektoj de internacia lingvo

3. Klarigu la sencon de la parabolo, kiun rakontis Ludoviko Zamenhof.

4. Kion vi opinias pri kreado de novaj projektoj de internacia lingvo?

5. Provu mem verki skizon de lingvoprojekto. Se vi sukcesos, donu al ĝi belan nomon — tio estas la plej grava por trafi en la senfinan liston de provoj krei projekton de internacia lingvo. Se ankaŭ tion vi sukcesos, skribu en via lingvo ardan amleteron. Se ĝi plaĉos al via amat(in)o, provu verki vialingve versaĵon aŭ traduki en ĝin, ekzemple, la unuan strofon de la versromano "Eŭgeno Onegin".

Cent jaroj de literaturo en Esperanto

6. Kion vi pensas pri rilatoj inter la originala kaj traduka literaturo en Esperanto?

7. Kiuj verkoj el la originala Esperanto-literaturo, studitaj en ĉi tiu lernolibro, aŭ legitaj aparte, al vi pleje plaĉis kaj kial?

Vintra fabelo

8. El ĉiu verslinio elektu nur la rimigantajn vortojn. Observu la sinsekvon de la rimoj kaj klasifiku ilin.

9. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj:

Reanonci, reeksplodi, reprodukti, resoni, rezoni, repagi, remeti, rebati, rebrili, repuŝi, rekruti, remunti, rekonsideri, resakri, resumi, resaluti, respeguli, respekti, rekaŝi.

10. Elektu vorto(j)n laŭ via palĉo:

Antaŭ mortigo de urso, ne vendu ĝian (viandon, voston, felon, grason). Kion rajtas leono, ne rajtas (simio, kuniklo, kapro, azeno, kokidino, kanario, rano). Al felikulo eĉ (pavo, anaso, ansero, krokodilo, testudo, najtingalo, pigo, koko, pasero, korvo) donas ovojn. Kiam la kato promenas, (muŝoj, musoj) festenas. Al ĉevalo donacita oni (krurojn, kolharojn, hufojn, orelojn, dentojn, buŝon, voston) ne esploras. Li havas la (nazon, cerbon, okulojn, lipharojn, kapon, langon, barbon) sur la ĝusta loko. Scias la kato, kies (viandon, kolbason, fiŝon, buteron, sandviĉon, lardon, kaĉon, pipron) ĝi manĝis.

11. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Kaserolo — karuselo, sitelo — stelo — ŝtelo, profilo — profito — profeto, vario — varianto — varieteo, pleto — plato — plado — pledo — plendo.

12. Kvizo pri Esperantaj temoj:

a) Kiun rilaton al Esperanto havis la eldonejo *Hachette*?

b) Kial Beaufront kaŭzis skismon inter la esperantistoj?

c) Diru la titolon de la unua originala Esperanto-romano.

ĉ) Kiomjara estis Esperanto, kiam Ludoviko Zamenhof publikigis la tradukon de "Hamleto"?

d) Nomu iun libron, kiun verkis Stellan Engholm.

e) Nomu iun libron, kiun verkis Miyamoto Masao.

f) Nomu kelkajn librojn, kiuj aperis en nacilingvaj tradukoj el Esperanto. Al kiu libro apartenas ĉi-rilata rekordo?

g) Pro kiu libro famiĝis Nikolaj Ĥoĥlov?

13. Temo por diskuto aŭ rakonto: Ne volas kokin' al festeno, sed oni ĝin trenas perforte.

14. Imagu, ke en landa Esperanto-kongreso vi estas proponita kiel unu el kandidatoj por la posteno de prezidanto de la landa Esperanto-asocio. Verku vian programon paroladon, kiu estu laŭeble ne nur profundenhava, sed ankaŭ bonstila oratorajo, ornamita per trafaj stilaj figuroj.

LECIONO 26

— Post alveno de perestrojko kaj glasnosto, en Sovet-Unio aperis multegaj verkoj nepublikigeblaj antaŭ tiu tempo. Evidente, la titolon “libro de la jaro 1987” devus ricevi la romano de Anatolo (Anatolij Naumoviĉ) Ribakov “Infanoj de Arbat-strato”. Ĝi elvokis kontraŭdirajn opiniojn. Demokratoj konsideras ĝin unu el la plej altnivelaj verkoj de la nuntempo. Ne vane tradukoj de la romano aperis en multegaj lingvoj en plej diversaj landoj, bedaŭrinde, dume ne en Esperanto. Kompreneble, stalinanoj kaj ŝoviniistoj nomas ĝin kalumnio kaj “nigrigo de nia realo”. En ajna okazo, estas sendube, ke la romano ege influis la socian opinion. Ni konatigu kun pensoj de unu el la plej aĝaj kaj meritplenaj sovetiaj verkistoj pri tiu furora libro.

Veniamin Kaverin

LA FAKTO KUN VIVAJ POSTSEKVOJ

La romano “Infanoj de Arbat-strato” estas ne nur kreaĵo de talenta verkisto, ĝi estas ankaŭ kreaĵo de talenta civitano. Ĝia aŭtoro Anatolo Ribakov kun neniuj disputas, nenion kontestas, nenie prezentas iun principaron, kaj li ne “nigrigas” la priskribatan tempon, sed male, penas doni al ĝi la naturan koloron.

Unuavice, tio estas ampleksa romano. Ampleksa ne en la senco de pagokvanto, sed en la senco, ke ĉiu evento en ĝi estas konsiderata amplekse, el ĉiuj eblaj vidpunktoj. La libro estas verkita de homo, kiu komprenas, ke la plej alta valorajo estas la vivo, ke la homo devas resti en la rondo de “moralaj konstantoj”, kiuj estas la amo al siaj proksimuloj, al sia urbo, al sia patrio.

La objekto de lia esploro estas la tempo. Sufiĉe kurta tempoperiodo — komenco de la 30-aj jaroj. Vico de karakteroj pasas antaŭ la leganto. Ili estas multaj, kaj neniu el ili eĉ iom similas la alian.

Plimulto de leteroj, kiujn sendis al Ribakov eminentuloj de kulturo, substrekas neordinaran forton en priskribo de Stalin.

Mi vidis Stalin-on ĉe la enterigo de Gorjkij. La verkistoj staris en honora gardo ĉe lia cindra urno kaj poste viciĝis ĉe la enirejo de la Domo de profesiaj sindikatoj. Stalin elaŭtigis, et-statura, paŝante rezolute, nerete-neble, firme. Liaj postirantoj ŝajnis same et-staturaj kiel li, kvankam kelkiuj estis konsiderinde pli altaj. “Li elektas laŭ staturon” — nevole mi pensis.

Poste mi vidis lin en la funebra mitingo. Li ne diris eĉ vorton. Sed post longa tempo, en la 70-aj jaroj, al mi ŝajnis, ke mi ekvidis lin ĉe mia tablo. La homo, sidanta kontraŭ mi, reproduktis liajn pensojn, parolis en lia maniero, per liaj vortoj. Tiu estis Ribakov. La verkisto ne nur elstudis la vivon de Stalin kun neordinara diligenteco, sed ankaŭ sukcesis kvazaŭ transformiĝi en lin.

Kio do estas la sekreto de tiu metamorfozo? Ĝi estas en tio, ke la aŭtoro definitive rezignas roli juĝiston. Li nek pravigas, nek akuzas.

La historio de ĉiu heroo de la romano bazas sin sur tragedio, kaj la figuro de Stalin estas tragedio de nemezurebla soleco, plena malebleco imagi sin en pozicio de alia homo. La tragedio de homo, forpuŝinta de si ĉiujn naturajn sentojn de amo, amikeco, libereco. Li estas saĝa. Li egaligas vorton kaj faron, li atingas sian celon, kaj lanĉinte la senprecedencan teroron, agas per Granda Timo kiel per obeiga ilo. La subtileco de liaj artifikoj konsternas la leganton. Ili samtempe estas simplaj kaj komplikaj. Eĉ plie, ili estas talentaj, sed malhumanece talentaj, ĉar en ĉiuj liaj konsideroj, meditoj, faroj plene forestas tiu, por kies bono li, liavorte, agas. Forestas la homo.

Saŝa Pankratov. Li estas junulo, kies aperteco, pureco, sincereco — estas minaca riproĉo al Stalin, kiu sangobstine rifuzas kaj la unuan kaj la duan kaj la trian. Kaj Saŝa venkas, ĉar la naturo mem kontraŭstarigas lin al Stalin.

La patrino de Saŝa estas personiĝo de amo, kaj ja nenio en la mondo fortas pli ol la patrina amo.

Sed estas ankaŭ aliaj figuroj. Jurij Ŝarok estas ple-numanto, obeema sklavo de historio, persono esence malkomplika, sed timiga pro sia evoluanta malkomplikeco. Li estas ombro de ombro, respegulo de respegulo. Ĉiuj strebas al potenco, ankaŭ li strebas, ĉar la potenco estas muziko de la epoko. Li ne estas rabisto de granda vojo, li estas vermo sur la fundo de senlima maro de krimoj; sed iam tiu vermo transformiĝos en stepan araneon, pro kies mordo kamelo mortas post naŭ minutoj. Li estas unu el tiuj, kiuj ĵetas la reton de timo sur la tutan landon, la reton de malkonfido, suspektemo, perfido.

La karakteroj estas multaj kaj preskaŭ ĉiuj ili estas reliefaj, veraj. En la romano "Infanoj de Arbat-strato" absolute ĉio estas rarece interligita kaj interligita perfekte. La agado estas facile transigata el Kremlo en iun modan restoracion. Kaj el la restoracio — al Angara, la ekzilejo, kie Saŝa Pankratov suferas pro afer-manko, maltrankvilo pri la patrino, pri la nova, same senkulpa amiko. El la grandega metalurgia uzino — en trajnan kupeon, kie, por ne perdi la tempon, laboras la nobla, talenta, fidela al Stalin ingeniero Rjazanov.

La pasia strebo rakonti la veron tute ne malpliigas artan fortecon de la romano. Male, ĝi pligrandigas ĝin, ĉar neniam verkisto elpensas ion pli belan kaj potencon ol la vero. Uzante la esprimon de Pasternak, oni sendube povas nomi la libron de Ribakov — "fakto kun vivaj postsekvoj". "Infanoj de Arbat-strato" estas edukromano. Ne enhavante eĉ aludon pri instruo, ĝi, tamen, instruas.

Unuavice ĝi instruas fidelecon. La fidelecon al tiuj konvinkoj, sur kiuj la homo devas bazi sin en ĉiuj siaj faroj kaj vortoj. La fidelecon al siaj amikoj, familio, urbo, Patrio. Kaj fine la fidelecon al la vero. Ĝi instruas atente rigardi sin, taksu ĉiun sian agon el vidpunkto de humaneco, bonkoreco kaj honoro. Ĝi instruas esti fortvola, ne subiĝi al malbonaj influoj, mem elekti sian vojon.

Sen scio kaj kompreno de la pasinteco ne eblas iri antaŭen. Tion pruvis jam Puŝkin, preninte la plumon de

historiisto kaj komprenante, ke la studado de la pasinteco estas premiso por la progreso de la literaturo.

Veniamin Kaverin. Fakt s ĵivimi posledstvijami. //
Moskovskije novosti, 1987, N^o 31, p. 16.
Mallongigita traduko.

— Nun ni venis al la tria superrigardo, farita okaze de la 100-jariĝo de Esperanto. Ĝi estas parolado ĉe la solena malfermo de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en la jaro 1987, kiun faris tiama prezidanto de UEA.

*Humphrey Tonkin*¹

VENAS NUN LA PERIODO DE DISVASTIGO

Karaj gekolegoj!

Antaŭ cent jaroj, ĝuste en la hodiaŭa tago, en pre-sejo apud nia nuna kongresejo, aperis malgranda libro. Ĝi nomiĝis, en la rusa lingvo, "Lingvo Internacia". Ĝi priskribis simplan, bazan projekton de lingvo por faciligi la internacian komunikadon. Ĝia aŭtoro kaŝis sin mal-antaŭ la nomo "Doktoro Esperanto".

Malmultaj estis la homoj, kiuj profetis korekte la estontecon de tiu libro. La presistoj, kiuj ĝin kompostis kaj pasigis tra la presilo, apenaŭ povis scii, ke, cent jarojn poste, kolektiĝos en Varsovio ses mil homoj el sepdeko da landoj por festi la finfaron de tiu simpla pre-seja tasko. Malmultaj estis la homoj, eĉ inter tiuj, kiuj aĉetis la libron, kiuj povis ĝuste antaŭvidi, ke tiu eta kaj modesta broŝuro semos semon, kiu disbranĉiĝos en planan kaj vivipovan lingvon, kiu etendiĝos en ĉiun angulon de la terglobo kaj estos uzata por ĉiuj taskoj, ĉiuj funkcioj, por kiuj la homaj lingvoj estas uzataj.

Malmultaj estis la homoj, kiuj povis profeti la grandajn ŝanĝojn, la grandajn eventojn, kiuj trafos la mondon en tiu jarcento de tiam ĝis hodiaŭ. Eble, la spirito de optimismo de 1887 profetus la aviadilon, la televi-

don, la spacveturadon², la komputilon. Eble, ĝi profetus la grandajn gajnojn kontraŭ malsano kaj malriĉo, kontraŭ analfabeteco, kontraŭ malsato, kiujn registris nia jarcento. Eble, ĝi povus antaŭvidi la konsciigon pri la homaj rajtoj, pri la rajtoj de virinoj, pri la rajto al demokrata partopreno en la socio, kiuj en nia epoko estas kodigitaj en la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj aliajn dokumentojn.

Eble, ĝi povus antaŭvidi la kreon de la Ligo de Nacioj kaj poste la fondon de Unuiĝintaj Nacioj, ĉar ja en tiu epoko la sopiro al supernaciaj organizaĵoj, kiuj helpu la naciojn vivi en paco, estis granda.

Sed ĉu tiuj legantoj de la Unua Libro, kaj tiuj laboristoj, kiuj ĝin presis, povus scii, ke interne de tridek jaroj tuta Eŭropo plonĝos en la nokton de la plej granda milito, kiun iam ajn spertis la homaro? Ĉu ili imagus, ke ĉiuj tiuj eltrovoj de la scienco kaj la tekniko, kiuj levos la vivnivelon de la homoj, faciligos al ili la ĉiutagan vivon, pligrandigos ilian vivosperton — ĉu ili imagus, ke ili ĉiuj havos ankaŭ sian malluman flankon, kaj ke la brila tekniko, kiu alportos vivon, portos ankaŭ morton? La sensencan detruon de tiu unua mondmilito ni ŝuldas al la teknika progreso, per kiu unu nacio povis ĵeti kontraŭ alia armilojn, neniam antaŭe eltrovitajn. Tiu brila progreso, kiun ili tiel admiris, detruis Dresden, detruis Coventry³, kaj, en fina paroksismo de neniismo, detruis Hiroŝimon...

Kaj la tekniko, kiu faris la tankojn kaj la militaviadilojn, kiu faris la atombombojn kaj la militraketojn, estis tiu sama tekniko, kiu eltrovis novajn metodojn por persekuti la homojn pro la raso, al kiu ili apartenas, la religio, kiun ili kredas, la lingvo, kiun ili parolas. Temas pri la sama tekniko, kiu inventis la gasejojn kaj la fornojn, kiujn neniuj homoj, tie ĉi en Varsovio kunvenanta por festi la centjarigon de Esperanto, povas plene forgesi...

Kiam en 1917 Zamenhof mortis, Esperanto tamen vivis. Ĝi vivis tra ĉiuj ŝtormoj, ĉiuj uraganoj — tra la skismo de Ido⁴, tra la skuoj de la unua mondmilito, tra la korŝira malsukceso ĉe la Ligo de Nacioj⁵, tra la persekutoj de la 30-aj jaroj, tra la katastrofoj de la dua

mondmilito. Ĝi vivis spite al antaŭjuĝoj, spite al superteraj reformoj, spite al organizaj fuŝoj, spite al jaluzoj kaj kvereloj...

Kaj ĝian historion, spite al la obstakloj, spite la renversojn, punktas belaj sukcesoj, kuraĝaj agoj. Ni memoras la tradukon de "Hamleto"⁶, ni memoras Boulogne-sur-Mer⁷, ni memoras la forajn pionirojn — Grabowski⁸, Kazimierz Bein⁹, Privat¹⁰, Hodler¹¹. Ni memoras tiujn, kiuj tra la unua mondmilito laboris pere de Esperanto por ligi parencojn trans la batalado de oponaj armeoj¹². Ni memoras Kalocsay¹³ kaj Baghy¹⁴. Ni memoras Cseh¹⁵. Ni memoras la sukcesojn en Montevideo kaj Sofio¹⁶. Ni memoras la kongresojn en Tokio kaj Pekino¹⁷... Se Zamenhof mortis, se herboj kreskas sur la ruinoj de iama Varsovio, Esperanto vivas kaj prosperas. Kaj se ni kaj niaj kolegoj maljuniĝas en nia kunlaboro, vivas forte la esperantoj. Ili ĉirkaŭas nin tie ĉi, kaj ili portas nian lingvon en la estontecon.

Kion alportos tiu dua jarcento al Esperanto? Same kiel la unuaj adeptoj de la lingvo de doktoro Esperanto, same kiel la laboristoj, kiuj presis tiun broŝureton, ni apenaŭ povas profeti. Unu afero estas tamen tute klara: la lingvo mem, kiu pasis tra la fandejo de cent jaroj de evoluo, brile sukcesis. Neniu, kiu ĝin uzas, povas dubi, ĉu ĝi estas lingvo plena kaj kompleta. Neniu, kiu uzis ĝin en la scienco aŭ legis ĝian literaturon, povas tion diri — eĉ se necesas daŭre ĝin modernigi kaj ankoraŭ kompletigi. Sed se ĝi brile sukcesis kiel lingvo, ĝi ankoraŭ ne brile sukcesis kiel lingva komunumo — la plejparto de la homoj ankoraŭ ne parolas ĝin, eble eĉ nenion scias pri ĝi. Ni havis niajn sukcesojn tiurilate: jen okazis sukcesoj informkampanjaj aŭ instruadaj, jen oni akiris oficialan rekonon, jen fakuloj serioze ĝin traktis. Sed la granda laboro restas antaŭ ni.

Ĝi estas ja giganta laboro. Ĝi estas nenio alia ol konvinki la homojn, ke Esperanto prezentas la plej bonan solvon al la lingvaj problemoj de la mondo. Esperanto tion faras, ĉar ĝi estas facile lernebla. Ĝi tion faras, ĉar ĝi estas neŭtrala. Ĝi tion faras, ĉar ĝi traktas ĉiujn homojn en spirito de egaleco. Neniu alia lingvo tion faras. Tiuj aliaj lingvoj prezentas pseŭdosolvojn, kiuj

privilegias certajn homojn super aliaj kaj kiuj disvastigas certajn kulturajn valorojn kaj ne aliajn. Ili foje bele aspektas, ili foje aspektas nehaltigeblaj, sed ili ne solvas la fundamentajn problemojn, kiujn Zamenhof celis solvi. Ja finfine lia lingvo estis kaj estas pli ol proponata solvo de la lingva problemo: ĝi estas provo alfronti la spiriton de malegalo, de netolero, de malamo, kiu tiel disŝiras nian belan mondon.

Multaj parolantoj de Esperanto ĝuas sian lingvon, kaj ĝin uzas, sen granda entuziasmo ĝin disvastigi. Al ili sufiĉas la kongresoj, ilia loka klubo, okazaj libroj aĉetitaj de la libroservo. Eĉ ĝenus ilian komfortan kaj hermetikan mondon subita alfluo de novaj lernantoj, novaj adeptoj. Ja per simpla utiligo de la lingvo ili helpas ĝian lingvan pliriĉigon. Sed, karaj gekolegoj, tio ne plu sufiĉas. Venas nun la periodo de disvastigo. Ni kreis murojn ĉirkaŭ ni: sekuraj en niaj kluboj kaj kongresoj, ni ne bonvenigas adekvate la novulojn, ni ne sufiĉe pledas por nia lingvo, ni ne alfrontas la publikon, ni ne agas sufiĉe discipline kaj celkonscie. Dirante tion, mi neniun akuzas, mi neniun kritikis. Mi simple faras tiun ĉi konstaton: ke la lingvo ekzistas unue por disvastigi, due por ĝui. Fojfoje ni inversigas tiun ordon, kaj forgesas nian veran celon.

Kiam Zamenhof kreis sian lingvon, li kaj liaj samtempuloj optimisme rigardis la estontecon. Ili opiniis problemojn solveblaj. Ili kredis je la progreso. La posta jarcento montris, ke ili pravis kaj ne pravis: ke altiĝis la intenseco de la sukcesoj kaj samtempe la intenseco de la malsukcesoj. Sed ni ne forgesu, ke malgraŭ ĉio (kaj malgraŭ tio, ke la pliboniĝo ne estas universala), pliboniĝis la homa kondiĉo tra la pasintaj cent jaroj. Plivastiĝis la egaleco. Pligrandiĝis la demokratio. Necesas nun lerni la saman lingvon, por ke komune, solidare, en spirito de kompreniĝo, ni povu fronti kuraĝe la problemojn de la moderna mondo — laŭ la ekzemplo de Zamenhof kaj kun la sindediĉo, saĝeco kaj klarvido de realismaj esperantoj.

Esperanto, 1987, N° 9, p. 155-156.

— Finiĝas la jaro, kaj baldaŭ okazos datreveno¹⁸ de la refunkciigo de SEU. Ni rememoru ĝin per relego de la urĝa informo, kiun publikigis la revuo "Esperanto", organo de UEA.

MORTIS ASE, VIVU SEU!

Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), unu el la plej imponaj landaj organizaĵoj en la historio de Esperanto, malaperinta en 1938 sub la stalina teroro, vivas denove en Sovet-Unio. Perestrojko (rekonstruo) atingis ankaŭ la Esperanto-movadon.

En la konferenco, okazinta en Moskvo de la 23-a ĝis la 25-a de januaro 1989, esperantistaj delegitoj el la tuta lando decidis forlasi la ekzistantan Asocion de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) kaj reiri al sia historia praorganizaĵo. Fondita en marto 1979, ASE en sia 10-jara historio neniam sukcesis ekroli kiel pozitiva forto en la sovetia Esperanto-movado. Male, ĝi rapide transformiĝis en bremsilon de la agado, precipe kiel barilo de ĉiaj internaciaj kontaktoj (kun escepto de tiuj kun la socialismaj landoj¹⁹).

UEA multfoje en tiu periodo aliris ASE pri la demando de ties aliĝo al UEA. Kiam en 1984 tiu aliĝo ŝajnis finfine okazonta, ASE subite ofendiĝis, ĉar en la revuo *Esperanto* aperis "insulto al Stalin", kiun jam antaŭe Ĥruŝĉov kaj poste Gorbaĉov "insultis" multe pli elokvente. Tial, se ASE nun mortis, UEA ne sendos florojn al ĝia tombo.

Preskaŭ ĉiuj novaj funkciuloj de SEU estis aktivuloj de la iama neoficiala sed brila Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM), kiu agadis de 1965 ĝis 1978.

Esperanto, 1989, N° 2, p. 22. Mallongigita.

— Ni aldonu, ke kiel honoraj prezidantoj de la refunkciigita SEU estis elektitaj postmorte Ernesto Drenzen²⁰ kaj Eŭgeno Bokarjov.

— En la pasinta dimanĉo okazis jarkunveno, en kiu ni elektis novan estraron de la klubo. La estraro jam kunsidis, kaj hodiaŭ ni povas anonci la distribuon la taskoj: prezidanto — Boriso Gulin, vicprezidanto — Danielo Solomin, sekretario — Ludmila Gureviĉ, kasisto — Natalia Morozova, organiza fako — Georgo Poltoranov, mastruma fako — Valentena Glovinskaja, instru-metodika fako — Marko Stolbov, fako de internaciaj rilatoj — Bazilo Artjomov, fako de lingvo kaj literaturo — Roza Istomina, fako de amatora arto — Konstanteno Ivanic-kij, informa fako — Raisa Jaĥontova, historia fako — Luiza Grafova.

— En la pasinta merkredo okazis la oratora konkurso, kiu montris, ke ni havas bonajn oratorojn. La ĵurio anoncas la venkintojn de la konkurso, kiuj ricevas honorfoliojn. Ili estas: Valerio Babuŝkin, Eduardo Jacenko kaj Irena Nazarova.

— En la kluban bibliotekon venis novaj libroj. Poezio: Eŭgeno Miĥalski “Prologo”, Edwin de Kock /Édvin de Kok/ “Fajro sur mia langa”, Raymond Schwartz “Verdkata testamento”, Ueyama /Uejama/ Masao “Por forviŝi la memoron de ŝi”. Du prozaj verkoj de John Francis /Ĝon Frénsis/ “La granda kaldrono” kaj “Vitraro” kaj la libro de Kenelm Robinson “Se grenere-to...”. Mi ne dubas, ke libroŝatantoj estos tre ĝojaj ekscii, ke en la biblioteko aperis “Retoriko” de Ivo Lapenna²¹ kaj pluraj libroj de la eldonejo “Stafeto”²².

— La 30-an de decembro ni spektos la serion de slajdoj pri Rusio, kiun ni preparis laŭ peto de niaj francaj amikoj. Ni pridiskutos ankaŭ la tekstojn, kiuj klarigas la bildojn sur tiuj slajdoj. Kaj ne forgesu bone prepariĝi al la novjara Esperanto-balo, kiu okazos la 31-an de decembro.

— Ni finu la kunvenon per la versaĵo, kiu ligas tri fenomenojn: Esperanto — homo — homaro.

Nikolaj Nekrasov²³

SONETO PRI ESPERANTO

Vi, Esperanto, estas mia prismo,
Tra kiu vidas mi el mia ĉel'.
Tra vi mi vidas nigron de abismo,
Tra vi mi vidas blankon de ĉiel'.

Kun vi konverĝis mia organismo
Kaj eble do pro tiu paralel'
Mi mem en mia stranga egoismo
Reflektas Esperanton en malhel'.

Ĉu estas mi individu' unika,
Ĉu nura homarer', senkvalifika —
Kaj kiun rolon ludas mia vers'?

Mi mian koron nur konscias bone
Batadi samregule, unutone
Kun la grandega kor' de l' univers'.

Esperanta antologio: poemoj 1887-1981. —
Rotterdam, 1984, p. 207-208.

KOMENTARO

1. Humphrey /Hámfri/ Tonkin. Naskiĝis en 1939. Usonano. Esperantistiĝis en 1956. Doktoro pri literaturo. Rektoro de universitato. Bonega organizanto kaj oratoro. Multjara prezidanto de UEA.

2. *Spaco* ĉi tie estas uzata en la senco *kosma spaco*.

3. Coventry /Kóventri/ — urbo en Britio, detruita dum la dua mondmilito, same kiel Dresden kaj Hiroŝimo. Ne estas menciitaj grandegaj detruoj en Sovet-Unio.

4. Vidu la komenton 6 en la leciono 25.

5. Provoj akceptigi rezolucion pri instruado de Esperanto en lernejoj, kiuj estis farataj precipe de Edmond

Privat ĉe la Ligo de Nacioj en 1920-25, en la lasta momento malsukcesis.

6. La brilan tradukon de "Hamleto" Zamenhof faris en 1894 en la kriza momento, kiam li, cedante al multaj postuloj, preparis kontraŭvole projekton de reformoj en Esperanto.

7. En Boulogne-sur-Mer /Bulónj-sjur-Mer/ okazis la 1-a Universala Kongreso (1905), kiu demonstris plenan taŭgecon de Esperanto por la internacia komunikigo.

8. Antoni Grabowski /Grabóvski/ (1857-1921). Polo. Esperantistiĝis en 1887. La unua persono, kiu konversaciis kun Zamenhof (krom ties familianoj) en Esperanto. Inĝeniero-kemiisto. Famiĝis unuavice per poeziaj tradukoj.

9. Kazimierz Bein /Kazímej Bejn/ (1872-1959). Polo. Esperantistiĝis en 1903. Sub la pseŭdonimo Kabe famiĝis per prozaj tradukoj.

10. Vidu la komenton 2 en la leciono 11.

11. Vidu la komenton 1 en la leciono 16.

12. Pri tio okupiĝis UEA, kies oficejo troviĝis en la neŭtrala Svislando.

13. Vidu la komenton 6 en la leciono 10.

14. Vidu la komenton 17 en la leciono 2.

15. Vidu la komenton 6 en la leciono 16.

16. La Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis favorajn rezoluciojn pri Esperanto en siaj sesioj en Montevideo (1954) kaj Sofio (1985).

17. En Tokio (1965) kaj Pekino (1986) okazis la plej amasaj kaj sukcesaj ekstereŭropaj Universalaj Kongresoj.

18. Datreveno — reveno al difinita dato.

19. Post gravaj politikaj eventoj, okazintaj en tiuj landoj en 1989-1990, oni eknomis ilin eksaj socialismaj landoj, same kiel fine de la jaro 1991 ekuziĝis la esprimo "la teritorio de eksa USSR".

20. Drezen Ernest Karloviĉ (1882-1937). Esperantistiĝis en 1910. Sovetia ŝtata kaj socia aganto, sciencisto. Elstara fakulo pri scienc-teknika terminologio, interlingvistiko kaj esperantologio. Ĝenerala sekretario de SEU, ĉefa figuro de la antaŭmilita sovetia Esperanto-movado. Arestita kaj ekzekutita la 27-an de oktobro 1937 pro

akuzo pri kreo kaj gvidado de kontraŭsovetia terorista organizo de esperantistoj, pri efektivigo de diversi-terorista agado enkadre de ĝi kaj pri spionado por Germanio. Postmorte rehabilitita la 11-an de majo 1957 kiel senkulpa. Ĉefaj libroj: "Historio de la mondolingvo", "Analiza historio de Esperanto-movado", "Skizoj pri teorio de Esperanto".

21. Ivo Lapenna (1909-1987). Jugoslavo, dum multaj postmilitaj jaroj loĝinta en Britio. Esperantistiĝis en 1928. Unu el la plej meritplenaj agantoj de la Esperanto-movado, al kiu li dediĉis sesdek jarojn de sia vivo. Konstruinto de la moderna UEA, ĝia multjara ĝenerala sekretario kaj prezidanto. Fondinto kaj direktoro de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo). Renoma sciencisto, juristo, teoriulo de la internacilingva problemo, fama oratoro, aŭtoro de multaj gravaj verkoj, inter kiuj elstaras "Retoriko". La Unesko-rezolucio pri Esperanto, akceptita en Montevideo, estis frukto de lia persista kaj sagaca agado.

22. "Stafeto" — fama Esperanto-eldonejo sur Kanariaj Insuloj (Hispanio), kiu de 1952 ĝis 1975 eldonis 94 elstarajn librojn en Esperanto. Ĝia motoro estis profesoro Juan /Huán/ Régulo Pérez /Péres/, "kiu per sia eldona agado flegis la Esperanto-kulturon" (H. Tonkin). Naskiĝis en 1914. Esperantistiĝis en 1935. Doktoro pri hispana filologio. Dum multaj jaroj gvidis katedron de Esperanto en la universitato de la Laguna.

23. Nekrasov Nikolaj Vladimiroviĉ (1900-1938). Esperantistiĝis en 1915. Journalisto. Kunfondinto kaj kunredaktoro de la revuo "La nova epoko" (1922-1930). Multe tradukis, i.a. la romanon de Puŝkin "Eŭgeno Onegin" kaj la libron de Drezen "Historio de la mondolingvo" (kun N. Ĥofilov). Originale verkis poeziaĵojn kaj literatur-kritikajn studojn. Publikigis multe da leteroj de Zamenhof. Ekzekutita la 4-an de oktobro 1938 kiel "organizanto kaj gvidanto de faŝista, spiona kaj terorista organizaĵo de esperantistoj". Posmorte rehabilitita la 26-an de novembro 1957.

LINGVA PRAKTIKO

La fakto kun vivaj postsekvoj

1. Esprimu la esencon de ĉiu alineo per unu frazo.
2. Pridiskutu iun el la ideoj de la teksto aŭ de la libro.

Venas nun la periodo de disvastigo

3. Trovu en la teksto la rimedojn, kiuj faras la paroladon emocia.
4. Verku vian propran oratorajon pri la temo "La vojo de Esperanto", uzante materialojn el la parolado de Humphrey Tonkin kaj el aliaj tekstoj de la lernolibro kaj aplikante konvenajn stilajn rimedojn. Por konvinkiĝi pri perfekteco de via oratorajo, tralegu ĝin plurfoje, laŭte kaj ne rapidante, imagante vin antaŭ grandnombra publiko, ĉiam polurante la lokojn, kiuj ĝenas fluecon de via parolado.

Mortis ASE, vivu SEU!

5. Surbaze de ĉi tiu teksto kaj informoj, troveblaj en la lernolibro, verku artikolon pri SEU, antaŭmilita kaj postmilita.

Soneto pri Esperanto

6. Trovu ripetojn en la versaĵo. Kiun rolon ili ludas?
7. Elskribu la rimojn kaj atentu ilian sinsekvon, karakterizan por soneto.
9. Kiujn ideojn esprimas la aŭtoro?
10. Lernu la soneton parkere.

11. Trovu en la tekstoj de la leciono la vortojn kun la prefikso *mal-*. Formu vortojn kun la prefikso *mal-* de taŭgaj por tio vortoj el la tekstoj de la leciono. Provu

trovi por ili absolutajn sinonimojn sen la prefikso *mal-* (ekzemple: maldelikata — kruda, mallaborema — pigra).

12. Elektu vorto(j)n laŭ via plaĉo:

Al ĉiu besto plaĉas propra (festo, modesto, majesto, vesto, honesto, gesto, digesto, protesto, nesto, aresto). Kiu akceptas donacon, perdas (sagacon, kuracon, lacon, pacon, spacon, aŭdacon). La tempo venos, ni ĉion (benos, ekzamenos, divenos, entreprenos, komprenos, katenos, solenos, partoprenos, venenos). Bona (aktoro, aŭtoro, doktoro, honoro, humoro, koro, laboro, memoro, profesoro, redaktoro, esploro, gloro, tajloro) pli valoras ol oro. Restu, (sinjoro, oratoro, diktatoro, ŝoforo, tajloro, reĝisoro), ĉe via laboro. Kion mi ne sentas, pri tio mi (atentas, diligentas, konsentas, kontentas, silentas, komentas, kompetentas, ne pentas, prudentas, argumentas, lamentas). Kiso malsincera estas (mizera, modera, sufera, sukera, danĝera, infera, kolera, leĝera, severa, tenera, efemera).

13. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Aperi — aperti, artikolo — artiklo — artifiko, vitro — vitrino — vitralo, kompanio — kompano — kampanjo, strebi — streĉi — streki — sterki — striki — strikti.

14. Kvizo pri Esperantaj temoj:

- a) Kie okazis Universala Kongreso, dediĉita al la 100-jariĝo de Esperanto?
- b) Kiun sciencan gradon havas Humphrey Tonkin?
- c) Kiam kaj kie okazis la 1-a Universala Kongreso?
- ĉ) Kiu estis la unua persono, kiu konversaciis kun Ludoviko Zamenhof en Esperanto?
- d) Kies pseŭdonimo estas Kabe?
- e) Pro kio estas fama Ernest Drezen?
- f) Diru la titolon de konata libro de Eŭgeno Miĥalski.
- g) Kies merito estis la rezolucio de Unesko en Montevideo?
- ĝ) Pri kio pensas ĉiu klera esperantisto, aŭdante la vorton *stafeto*?
- h) Pri kio estas konata Nikolaj Nekrasov?

15. Temoj por diskuto aŭ rakonto: Tro da kuiristoj kaŝon difektas aŭ Pli bona estas pano sen butero, ol kuko sen libero.

16. Imagu, ke vi devas informi pri novjara festvespero en via universitato:

- a) skribu anoncon en la afereca stilo;
- b) skribu anoncon gajan, kun sento de humuro;
- c) komuniku buŝe al la studentoj de via grupo;
- ĉ) komuniku al via kamarado dum interlekcia paŭzo;
- d) skribu inviton al via profesoro;
- e) invitu la profesoron buŝe;
- f) invitu vian amat(in)on telefone.

17. Prezentu cerban atakon pri la temo "Perspektivoj de Esperanto en nia lando". Formo de laboro: grupo da kompetentaj personoj (ne pli ol dek) koncize formulas sian ideon aŭ proponon. Neniu ĝin komentas aŭ pridis-kutas, eĉ se ĝi estas tro kuraĝa, paradoksa, stranga, neplenumbla. La gvidanto kolektas la ideojn, faras ĝeneralan superrigardon kaj konkludon.

ENHAVO

ANTAŬPAROLO	3
LECIONO 1	5
LECIONO 2	19
LECIONO 3	31
LECIONO 4	42
LECIONO 5	58
LECIONO 6	72
LECIONO 7	84
LECIONO 8	98
LECIONO 9	113
LECIONO 10	124
LECIONO 11	136
LECIONO 12	149
LECIONO 13	161
LECIONO 14	175
LECIONO 15	187
LECIONO 16	198
LECIONO 17	210
LECIONO 18	225
LECIONO 19	236
LECIONO 20	248
LECIONO 21	262
LECIONO 22	275
LECIONO 23	287
LECIONO 24	298
LECIONO 25	309
LECIONO 26	324

Борис Колкер
ПУТЕШЕСТВИЕ В ЭСПЕРАНТИДУ

на языке эсперанто

Художник **Л.Д. АНДРЕЕВ**
Художественный редактор **Е.А. АНТОНЕНКОВ**
Технический редактор **Т.И. ЮРОВА**

ИБ № 18532

Фотоофсет. Подписано в печать 19. 06. 92. Формат 84x108 1/32.
Бумага офсетная. Печать офсетная.
Усл.печ.л. 18,06. Усл.кр.от. 18,48. Уч.изд.л. 16,41. Тираж 4000 экз.
С 114. Заказ 1611 . Изд. № 47234.

АО Издательская группа «Прогресс»
119847, Москва, Zubovskij bul'var, 17

Московская типография № 7 Министерства печати
и информации Российской Федерации
103001, Москва, Трехпрудный пер., 9.

FAVORPREZE FAVORPREZE FAVORPREZE

LIBROJ

- vendado de sovetaĵaj eldonaĵoj (en Esperanto, rusa kaj aliaj lingvoj);
- sendevizaj interŝanĝoj (inkluzive neesperantistajn) individuaj kaj grupaj (E-kluboĵ, lernejoj, familioj k.s.);
- tranokteĵoj en Rostovo, Moskvo, Volgogrado;
- turista priservo de esperantistoj kaj aliuloj;
- ligoj kun rusiaj turistaj firmaoĵ;
- vizitado al grotoj kaj ligoj kun loka speleologia klubo.

RUSA LINGVO

- kursoj por eksterlandanoj (esperantistaj kaj ne) en Rusio kaj eksterlande.

KOMERCA PERADO

- reklamado en gazetaro de la suda regiono k. Moskvo;
- ligoj kun sudrusiaj firmaoĵ, entreprenoj, kooperativoj;
- luado de oficejoj en Rostovo;
- reprezento de interesoĵ de iu firmao.

KULTURA KAJ SCIENCA PERADO

- gastrologio de rusiaj muzikistoj en restoracioĵ, surŝipe k.s.;
- ligoj kun sciencaĵ institucioĵ (aitlernejoj, esplorcenroj ktp).

DUNGO-PERADO

- dungigo de ekssovietianoĵ por ajnaj laboroj eksterlande (kemio, pentrado, gitarfarado, senkvalifikuloĵ k.a.).

Esperanto-klubo, p.k. 393, RUS-344007, Rostov-Don-7, Rusio;
telekso 123201 PTB SU, telefakso 7-8632/644-550; tel.: 7-8632/393-484.

MENDU SAMLOKE
LA ESPERANTOLOGIAJOJN

de d-ro Aleksandro S. MELNIKOV

1. SPECIFAJ KULTURAJ SCIOJ DE LA ESPERANTISTA KVAZAŬETNO KAJ ILIA RESPEGULIGO EN LA KONCERNA LINGV(AJ)O. Rostov-na-Donu, 1992, 103 p. Prezo — 30 gld. Rabatoĵ: 3 ekz. — 60 gld., 10 ekz. — 150 gld. (Afranko inkludita).
2. PRI TIPA ESPERANTISTO, ESPERANTO-LINGVANO KAJ... HANDIKAPOJ. Esco. Rostov-na-Donu, 1992, 12 p. Prezo 8 gld. Rabatoĵ: 3 ekz. — 16 gld., 10 ekz. — 45 gld. (Afranko inkludita).
3. LINGVISTIKAJ PREMISOJ KAJ TIPOJ DE VORTLUDOJ EN ESPERANTO-LINGVAJO. Presata.



ТРОЯ

ИСТОРИЧЕСКИЙ
ЖУРНАЛ
ДЛЯ ДЕТЕЙ

Eldonejo "Progreso" ofertas al ĉiuj amikoj de la rusa lingvo riĉe kaj kolore ilustritan revuon por junularo "TROJA" (ruslingve), en kiuj vi legos:

- **POPOLOJ SURVOJE:** la eventoj antaŭlongaj kaj ne tre,
- **PATRUJO:** paĝoj de la rusia historio,
- **AGANTOJ:** historiaj figuroj,
- **MALKOVRO DE LA PASINTO:** arkeologoj kaj arkeologio,
- **DIOJ KAJ PROFETOJ:** religioj de la mondo,
- **FESTOJ:** ceremonioj kaj moroj de diversaj popoloj,
- **HOMO FABER:** instrumentoj, armiloj, maŝinoj,
- **VOĈOJ:** mitoj, legendoj, eposo,
- **KREO DE LA MONDO:** arto de epokoj,
- **MISTEROJ, ENIGMOJ, HIPOTEZOJ**
kaj multo alia...

La mendojn direktu al:

Rusio, Moskva, 119847, Zubovskij bulvar, 17, "Progress-Junior" (tel. 246-79-25)

aŭ:

Rusio, Moskva, 109044, Krutickij val, 24. kom. 20, Evladova E.B. (tel. 276-48-42, 241-52-44)

SOCI-POLITIKA KAJ BELETRA ALMANAKO IMPETO'91

Impeto'91, almanako, 248 p., 20 cm., ilustrita, 2-a kajero. Moskvo: eld. "Progreso" — Krasnojarsk: eld. KGU, 1991.

En la kajero:

- *Igorj Zajcev.* Neformaluloj en USSR aŭ junulara kontraŭkulturo, elirinta el konspirejo.
- *Detlev Blanke.* La historio de EKRELO.
- *Elena Ŝevĉenko.* Klubo en Siberio.
- *Viktor Perŝin.* El la libro de rememoroj pri Vasilij Eroŝenko.
- *Boris Tokarev.* Georgo Deŝkin.
- *Boris Pasternak.* Rakontoj.

Mendu tiun titolon ĉe:

ESPERANTO-FAKO DE LA ELDONEJO PROGRESO.

17 Zubovskij bul., 119847 Moskvo, Rusio.

Telefono: (095) 246 09 32

Telefakso: (095) 230 24 03

Japana distribuanto de la libro estas:
INTERNACIA KULTURA LABOREJO.
I.P.O.B. 5458, Tokyo 100-31, Japanio
Telefono: (+813) 3610-5882
Telefakso: (+813) 3612-6083